Kálmán Mikszáth

BONAJ PALOCOJ SLOVAKAJ KUNFRATOJ

Hungaria Esperanto-Asocio

e-libro HEA

Kálmán Mikszáth

Slovakaj kunfratoj
La bonaj palocoj

Novelaroj

Slovakaj kunfratoj

Originala titolo: Tót atyafiak
Eldonis: Grimm Gusztáv, Budapest, 1881

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

La bonaj palocoj

Originala titolo: A jó palócok
Eldonis: Légrády Testvérek, Budapest, 1892

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio

Titolpaĝo: Jozefo Horvath

ISBN 978-963-571-525-1

@Horváth József 2025

e-libro HEA

Kelkaj klarigaj notoj

Por bone kompreni la tempon, lokon kaj cirkonstantojn de la du novelaroj necesas iom da klarigoj.

Tempo de la agado: fino de la 19a jarcento.

Loko de la agado: Aŭstra-Hungara MonarĥIio, konsistanta el Aŭstrio kaj la tiama, historia Hungario, entenanta la nunan Slovakion, kiu tiutempe ne ekzistis kiel ŝtato. La ŝtatestro de Aŭstrio estis la imperiestro kaj tiu de Hungario la reĝo en unu persono.

Palocoj: Palocoj estas popolgrupo kun lingvaj, sociaj, popolkostumaj kaj ceteraj propraĵoj, vivanta de la mezo ĝis la nordo de Hungario (montaroj Mátra, Bükk kaj la valo de la rivero Ipoly), nun iom transetendiĝanta en Slovakion, parolanta la hungaran lingvon, inter la hungara kaj slovaka lingvolimoj. Ĝia origino estas ĝis nun neklarigita (posteuloj de kabaroj, polovecoj-kumanoj, avaroj, hungaroj, miksiĝo de hungaroj kaj slavoj?).

Slovakoj: Dum la tempo de la agado la slovakoj vivis en la norda parto de la tiama Hungario, ĉefe en la montaroj.

Latinaj vortoj: Ĝis 1844 la latina estis la oficiala lingvo en Hungario en la ŝtata administrado, leĝdonado kaj la parlamento. Kleraj homoj do uzis multajn latinajn vortojn, parolturnojn en sia parolado.

Nobeljuĝisto: Komence juĝisto de nobeloj, poste administracia estro de subprefektujo.

Prefektujo: Plej granda administracia unuo. Ĝi havis du estrojn: la prefekton, nomumitan de la reĝo kaj la vicprefekton, elektitan de la prefektuja asembleo kaj praktike gvidanta ĝin.

Propraj nomoj: La geografiaj kaj familiaj nomoj estas uzataj laŭ la tiamaj oficialaj formoj. La nunajn toponimajn ekvivalentojn slovakiajn serĉu en la hungara Vikipedio.

Kálmán Mikszáth

Slovakaj kunfratoj

Noveloj

La fraŭlino el oro

Enkonduko

Sinjoroj, se la diabloj en la infero foje ekhavus la ideon, konstrui urbon, ĝi estus sendube tia, kia Selmecbánya[1].

Pardonu min la tiea meritplena magistrato pri ĉi tiu mallaŭdo; ĝi celas esti nek ofendo, nek moko, precipe rilate al la loĝantoj tie, kiuj ja neniel kulpas, ke iliaj prapatroj konstruadis sur tiel kaprica loko. Afabla leganto, kiu ankoraŭ ne veturis en tiu kurbplena lando, imagu al vi tri mil montopintojn, samtiom da valoj, dek-kelkajn rokojn, dense trakonstruitajn per domoj de ĉiaj formoj, la antaŭaĵo de kiuj estas ofte trietaĝa, dum ilia postaĵo modeste gluiĝas al montoflanko.

Se vi iras tra ĉi tiu urbo, pavimita de la naturo, via koro ĝiselflue pleniĝas de humanismaj sentoj kaj kortuŝite vi suspiras: „Ĉu eĉ ĉi tie loĝas homoj?!”

La regiono estas teda, melbela, la vetero malagrabla.

La frosta Szitnya[2], „amatino de nuboj”, perforte tiras al siaj sekiĝintaj mamoj siajn amatojn, kien ajn ili klopodas. Kaj se ĝi ne trovas nubojn, ĝi montras sin ofendita kaj blovas kiel eterna fraŭlino. Do se ne pluvas, vento siblas tra la zigzagaj stratoj kaj intervojetoj.

Deprima urbo estas tiu ĉi! La aero estas venena pro minejaj haladzoj, pro ĝia akvo kreskas kropo sur la kolo de palvizaĝaj knabinoj kaj malspritaj viroj. Ĉe la tria-jara rekrutado taŭgis nur kvar el sescent servodevaj junuloj, por esti „homo de la imperiestro”[3]. (Mi preskaŭ hontas skribi pri tio.)

Foje mi vidis en la „inspektoreja” strato multaĝan virinon grimpi supren anhelante kaj turmentate pro laciĝo, kun gapige granda korbo surdorse (ja en Selmecbánya oni aŭ suprengrimpas, aŭ malsupreniras; *tertium non datur*[4].

La korbo fumis kiel kamentubo. Mi kredis, ke io ŝia bruliĝis, do mi

[1] Selmecbánya aŭ mallonge Selmec: urbo en Karpatoj, nun: Banska Štiavnica en Slovakio.
[2] Szitnya: la plej alta monto ĉe Selmecbánya.
[3] Soldato de la komuna armeo de Aŭstrio-Hungario.
[4] Tertium non datur (latine): Tria eblo ne ekzistas.

postkriis la malfeliĉan slovakinon:

– Avino, via korbo brulas!

Ridetante ŝi turnis al mi sian stangrizan vizaĝon kaj diris kun patrina fiero:

– Ej, ne ja. Mia Náckó pipas en ĝi.

Kaj fakte: diablido adoleskanta sidis kaŭre korbofunde, kiu jam pipfumadis, kaj kiun la patrino ankoraŭ devis porti surdorse.

Nenie en la mondo estas la dia prizorgo tiel partiema kiel en Selmecbánya. Por la surmonte loĝanta Stevo Csemez la suno leviĝas unu horon pli frue kaj subiras unu horon pli malfrue ol por lia senpera najbaro, la subloĝanta Stevo Kutlik, kaj krome kaj krone: la geografia situo nenie montras tiel originalajn trafikajn cirkonstancojn kiel ĉi tie.

La filino de ges-roj Csemez, Kristino ekzemple ekstaras posttagmeze en la verde farbita dompordo, kaj kiam per siaj revemaj nigraj okuloj ŝi ekvidas fraŭlinon Bohuska Mirkowszki sur la najbara montokresto promeni en la ĝardeno, ŝi salutas ŝin afable per klino de sia mirinda kapeto kaj per freŝa, sonora voĉo transdemandas:

– Ĉu vi tagmanĝis, Bohuska?

Bohuska turnas sin je la afabla, agrabla kaj konata voĉo kaj saltante kuras renkonte al la malgranda Kristino ĝis la rando de la montokresto, kie komenciĝas faŭkanta profundo; ili estas apenaŭ dudek paŝojn unu dis la alia: ili povas babili laŭplace:

– Jam eĉ forgesite. Kie vi estos hodiaŭ?

– Hejme – respondas Kristino.

– Ĉiam nur hejme! Pli bone, se vi transvenus al mi ĉi-posttagmeze.

– Mi mem volus, Bohuska, ĉar mi havos netolereblajn gastojn… malbelajn homojn…

– Nu, nu, ne troigu! Kiuj estas tiuj tre malbelaj homoj? Ĉu vere malbelaj?

La bela Kristino ekridis. Aŭdinte ŝian sonoran ridon, la najtingaloj ĉesis kanti en la „nigra makiso”. Ili alorelis al la pli bela voĉo.

– Ĉu vere malbelaj? Tiaj ja, Bohuska. La maljuna mingrafo[5] estos ĉe ni kaj profesoro Csutkás.

[5] Mingrafo: heredata titolo de distrikta ĉefinspektoro de fiskaj minejoj.

– Hu, Kristino, do vi vere devas transfuĝi al ni.

– Mi ankaŭ farus, se vi ne estus tiel malproksime.

Kaj vere, de la domo Csemez ĝis ges-roj Mirkowszki kuŝas vojo pli ol unu kaj duonhora, ja oni devas sobiri ĝis la luterana preĝejo, ĉirkaŭiri la urbon direkte al la Szél-minejo kaj sur ŝtona ŝtuparo apud la katolika domo de Dio suprengrimpi ĝis *Klopacska*[6], de kie jam kondukas tolerebla vojo ĝis la domo Mirkowszki.

– Malgraŭ ke malproksime, Kristinjo, ĉu estas malhelpe por vi?

– Ne, ne, Bohuska... kiam pli frue mi vizitadis vin kaj vespero trafis min, mi povis tranokti ĉe vi, – sed nun... nun, vi scias, vi ja scias... neeble...

La animitan, belegan vizaĝon de Kristino inundis ruĝo. Okulkatena feinkoloro, eĉ ĉielarko povus envii ĝin.

– Prave, prave... Tiu sentaŭga knabo! Eĉ pensi pri li... — rediris Bohuska humorperde –, mi eĉ forgesis, ke li estas en la mondo.

Kristino senvorte rigardis malsupren en la valfaŭkon, sur kies fundo kaj flankoj, kiel ekdancintaj terbuloj fabelaj, ekvivis la tegmentoj, nigrigitaj de la tempo, kaj komencis movi sin, ŝanceliĝi, kvazaŭ volante ekvoji ien al la Baka-minejo.

– Venu do vi ambaŭ! Venu vi, Bohuska... – proponis Kristino kaj ektiris la blankan tulan tukon sur la kapo tiel profunde sur la okulojn, ke nenio vidiĝis el la bela vizaĝeto krom la pinto de ŝia mentoneto: peceto da ĉielo.

Unua ĉapitro

S-ro instruisto Csutkás kaj s-ro Demetrio Luppán estos prezentitaj al la afabla leganto

Geedzeco estas certe unu el la plej belaj aferoj ĉi-monde. Dio min gardu, ke mi ĝin fordisputu de la sekva generacio; ĉar se ni jam trinkis el ŝu-cira botelo, trinku ankaŭ la ceteraj, laŭ la logiko de la cigano en la

[6] Turo kun pendanta ligna tabulo, per frapado (klakigo) de kiu oni konigis skipoŝanĝon por la ministoj, alarmon aŭ enterigon de ministoj en Selmecbánya.

anekdoto[7]. Do se mi ĝin ne malaprobas ĉe la postrestontoj, mi havas nenian kaŭzon – retrorigarde en la tempon – kritiki inter niaj antaŭuloj ankaŭ kavaliron Demetrio Luppán aŭ s-ron instruisto Csutkás pro tio, ke ili sopirus sidiĝi en tiu varma banakvo, enpaŝinte en kiun oni tuj volas eliri.

Pli granda malfeliĉo estas, ke la inklino tiris al la sama bankuvo ilin ambaŭ, kiuj estas laŭeble plej grandaj amikoj ekde tiom da jaroj.

Ja, karaj gesinjoroj, tio ne estas miriga ĉe homoj, kiuj senĉese kunestas, inter kiuj reciprokaj estimo kaj konsento regas, kies naturo, inklinoj kaj pensmaniero kunfandiĝas en certa samformeco, kaj kiuj tiel longe laŭdadis, observadis kune Kristinjon de sia tria similulo, animakorpa amiko, Ĥemi-profesoro Stefano Csemez, ĝis ili enamiĝis al ŝi ĝisorele.

Almenaŭ mi konsideras tre natura, ke tio devis okazi tiel kaj ne alimaniere. Samtempe eksunis en ilia koro la „somero de maljunuloj" kaj la sama floro enradikiĝis en la sekaj grundoj. Se io mirigas min, estas nur, ke s-ro Stefano Csemez mem ne enamiĝis al iu, ja ili estis unu animo en tri korpoj, kaj ekde la mondokreo neniam estiĝis inter ili ajna pridisputinda demando aŭ diferenco de opinioj, se ne koncerne la ĝuon de flartabako.

Ĉi-kampe la tri s-roj estis memstaraj potenculoj. Kavaliro Luppán ja asertadis, ke flartabako devas esti enspirata, samkiel hufmagneto aŭ frotita sigelvakso altiras nadlon aŭ paperpecon, do de malproksime; por nenia rezono oni proksimigu ĝin al la nazotruoj, devalutante tiel la ĉielan plezuron, kiu laŭ ĉi tiu metodo atingas frenezigan gradon. Sed s-ro instruisto Csutkás ne povas tion akcepti, li prenis sian arton same ne el sterkamaso, por ke per ia surfaca kaj nenatura... nenatura kaj individuaĉa... individuaĉa kaj malbona kutimo li lasu fali tiun kardinalan principon, laŭ kiu nazotruoj estas kreitaj rekte, por esti ŝtopataj per tabako. Kaj zorge ŝtopataj. La nocio de truo ja mem sugestas la nocion de manko. Se ne alian, almenaŭ tiun de korpa kontinueco. Manko

[7] Trovinte botelon kun nigra enhavo, la anekdota cigano gustumis ĝin. Je la demando de siaj kamaradoj: kio enestas, li senvorte pludonis ĝin. La dua faris la samon al la tria kamarado, por ke ankaŭ tiu ne suferu mankon de la gustumado de – ciro.

estas forigenda! Kaj per kio ĝi forigendus, se ne per tabako?

Sed la procedo farendas kun certa modereco kaj bongusto. Dum ni regalas la nazon, ni devas konvene subteni la ujon, pinĉante ĝin inter la montro– kaj dikfingroj, por ke la konscio pri la perdo de falantaj tabakeroj ne ĝenu la plezuron. Koncerne ĉi tiun punkton, t.e. la subtenadon de la ujo, viro povas elmontri pli da gracio, ol sufiĉas, por turni la kapon de ĉiuj virinoj.

La opinion de sia meritplena kolego konfesas ankaŭ s-ro Csemez, sed kun la esenca diferenco, ke la subtenado de la ujo estas nura sensencaĵo; flartabakanto, staranta sur alta ŝtupo de perfekteco certe ne submetas sin al tia koncepto; vera fakulo elŝovas la langon, dum la superfluaj tabakeroj faladas, kaj subkaptas la perdiĝuntajn erojn. Ĉi tiu estas la sola ĝusta sistemo laŭ s-ro Csemez, kiun defendi li konsideras sia devo ĉiufoje, kiam necesas.

Krom ĉi tiuj detale konturitaj disopinioj nur profundiĝema homkonanto kapablas trovi nuance diferencajn trajtojn inter ili, ankaŭ kies figuroj, vizaĝoj preskaŭ samformiĝis kun la tempopaso; eĉ la haroj, ekde kiam kavaliro Luppán portas perukon. Malgraŭ tio ni ne konsideras afero superflua lasi fali kelkajn vortojn por la pli funda konigo de ĉi tiuj meritplenaj viroj, prezentante pli detale almenaŭ s-rojn Csutkás kaj Luppán.

S-ro prof. Csemez estas intera fenomeno kaj proporcia miksaĵo de tiuj du; ĉiu inteligenta homo eĉ blinde-palpe orientiĝas pri li.

La identiga priskribo de s-ro Csutkás, ekstraktita laŭvorte el lia pasporto de la pasinta jaro, estas jena:

Religio: luterana
Naskita en: Podzencsok, prefektujo Trencsén
Aĝo: kvardek ok jaroj
Vizaĝo: oblonga
Nazo: normala
Okuloj: bluaj
Haroj: blondaj, grizetiĝantaj
Speciala konilo: ruĝa nazo.

Ankaŭ per la priskribo de la persono de kavaliro Luppán ni tuj pre-

tos menciante, ke en lia pasporto, post la plenigo de la koncernaj rubrikoj, vidiĝas diferenceto nur en du punktoj, vizaĝo: „ovala”, speciala konilo: „nazo malhele blua”.

Kontraŭe, ho, kiom pli vastan kampon malfermas por kontemplado la spirita mondo de ĉi tiuj viroj!

S-ro instruisto Csutkás estas fanatika pedagogo, vera Pestalozzi, kiu elirante de la plej modernaj principoj, fundamentas siajn sukcesojn instruadajn per la amo de siaj disĉiploj, trovas en ĝi sian rekompencon kaj per ĝi fanfaronadas ĝistede. Li parolas malmulte, en silenta enprofundiĝo sidadas ĉiuvespere inter siaj du amikoj, nur malofte levas la okulojn, faras unu tiron laŭ sia konata metodo el la tabakujo, kaj silente murmuras: „Ili kroĉiĝas al mi…”

Poste li fermas la okulojn, ŝajnas aŭskulti siajn amikojn, fojetempe hm-hm-adas kaj kapjesadas, certigas ilin perkape, somnoliĝadas, vekiĝadas kiel kokino balancata.

– Jes, jes… ili kroĉiĝas… – li vekiĝas alarmite kun ĉi tiuj vortoj, ĉirkaŭrigardante senkomprene.

Liaj amikoj, kiuj jam scias, ke sub tio li komprenas la amon de siaj instruatoj, ekde multaj jaroj tiomgrade alkutimiĝis al ĉi ade reaj ekvokoj, ke ili konsideras tion nur kiel pensanstataŭigajn „hm” kaj „nu jes”, kaj trovas tion tute natura. S-ro instruisto Csutkás estas homo vaste respektata, kaj kvankam en lia pasinteco ne troviĝas tiom da brilaj kaj malĝojaj memorindaĵoj, pri kiuj kavaliro Luppán povas fieri, tamen mi devas mencii, ke jes ja, okazis al li mirinda evento, kiu lin levas en la senperan proksimecon de la literaturhistorio.

Li estis la profesoro pri poetiko de Petőfi[8]!

Ĉu vi aŭdas, ges-roj, tiu de Petőfi! Ĉu iu edukis pli valoran homon ol li por la nacio? Li, s-ro instruisto Csutkás donis al li la rudimentojn. Nu, kiu povus aserti, ke la rudimentoj ne estis bonaj? Neniu. Parolas la faktoj, ĉiam la faktoj… vere nur la faktoj.

Kvankam malicaj langoj flustradas, ke onidire pri li skribis Sándor

[8] Petőfi, Sándor (1823-1849): hungara poeto, revoluciulo, nacia heroo, unu el la plej konataj kaj elstaraj figuroj de la hungara poetiko.

Petrovics[9] (s-ro Csutkás kutimas mencii lin per ĉi tiu nomo): „tamen min kvalifikis pluraj miaj profesorojazenoj per »nekontentiga«, mi falis ankaŭ en poetiko”, sed ĉar parolas la faktoj, ĉiam kaj ĉie, la faktoj diras, ke tio ne estas vera, la aŭtentika notregistro ja troviĝas ĝis ĉitage en la arĥivo de la lernejo, kaj el ĝi evidentiĝas, ke Petőfi ricevis de li bonan noton. Ĉar li ja tuj rekonas, en kiu kio kaŝiĝas!

En Selmec rakontiĝas pri ĉi tiu Petőfi romantika legendo, pri kiu ĉiu scias ion, sed komplete neniu ĝin konas, nur s-ro instruisto Csutkás.

Generacio sekvas generacion en la granda, flave farbita liceo, sed ili eĉ ereton ne forprenas el la legendo pri Petőfi. La antaŭuloj fidele transdonas ĝin almemore de la posteuloj, kaj la memoro zorge vigilas super ĝi kaj konservas ĝin, kiel homo gardas siajn okulojn. Ĝi ĉiam-eterne vivos tie, ankaŭ tiel mankenekomplete, kiel mi trovis ĝin kvaronan jarcenton post la tiea restado de la poeto.

Se s-ro Csutkás volus paroli!... Li scias! Li devas tion scii, ĉar al li ja la legendo ligiĝas.

S-ro Csutkás ne estas homo, fermanta sian buŝon pri tiaj aferoj, kaj temas ne pri tio, ke li ne volus rakonti: li volonte kontentigas la plaĉon de ĉiuj siaj amikoj kaj konatoj, s-ro Csutkás estas efektive „bona homo”, kiu povas rifuzi nenion al ili; kaj ili ja sufiĉe petadas, demandadas lin, sed kian utilon tio havas, se li estas tiel kreita, ke krom *praelection*[10] kaj teorio de flartabakado li kapablas paroli pri nenio alia pli longe. La monotoneco kaj la specifa naturo de lia tridek-jara instruista kariero malebligis por li, prezenti kion ajn krom parkeraĵoj.

Nur vino povas malligi al li la langon, kio ja ne povus esti obstaklo rakonti la legendon, ĉar s-ro Csutkás tre ofte trinkas vinon, kaj ekde pluraj jaroj en tiaj okazoj ĉiam pridiskutiĝas ĉi tiu aventura kaj malklara parto de la meritplena vivo en la rakonto, ke la taŭzhara Petrovics loĝis sur la monto super la liceo ĉe la maljuna fiskoficeja hajduko Muszur, kies filo antaŭ nelonge revenis el Italio, el la legio, kie li ricevis pordistinge sur vizitkarto gluitan pecon da tuko, ŝiritan el la bandaĝo, per kiu oni ĉirkaŭvolvis la sangantan kruron de la vundita Garibaldi.

[9] Petrovics: origina familia nomo de Petőfi.
[10] Prelego (latine).

Kio? Ĉu ekzistas pli alta honorado? Aŭ ĉu ie ekzistas pli granda heroo ol Garibaldi en la historio kaj de la Malnova, kaj de la Nova Mondoj? Ne ekzistas, kiu dirus, ke ekzistas? Neniu asertus. Kaj s-ro Csutkás ankaŭ ne konsilas tion, ĉar tia homo ekhavus malfacilaĵojn kun li, kun liaj argumentoj. Ĉar argumentoj estas akra armilo, neesprimeble akra armilo... Kiu ne kredas, al tiu li servos per pruvo.

Ni vidu ekzemple la kazon de carino Katarino...

Kurte kaj koncize, en tiaj okazoj s-ro Csutkás malproksimiĝas tiagrade de la baza penso, servanta por eliro, ke revenonte li jam somnolas, lia kapo sindone velkas super la tablon, kaj li balbutetas duone cis-, duone jam transdorme: „Ili kroĉiĝas al mi...” kaj li transglitas en dormon.

Sed kavaliro Luppán estas homo, ho tute alispeca! Nura babilo, la korpiĝinta malfermiteco, liajn rememorojn li ne tenas sub seruro. Li rakontas eĉ aferojn, kiuj neniam okazis, pri kiuj sole li imagas, ke li travivis, trasuferis ilin.

Ĉi tiuj estas malgajigaj rememoroj, dolore tremigantaj lian koron dum la rakontado, elpremantaj larmojn el liaj okuloj. Tamen li refabeladas ilin, ĉar agrabla estas al li ĉi tiu pietata tristeco.

Lia vizaĝo animiĝas; lia voĉo fariĝas milda, supla, kiam kun plej sinceraj signoj de emocio li revokas elmemore la morton de la bedaŭrata edzino: kiel la karmemora kuŝis tra pluraj tagoj en la lito, luktante kun la neniiĝo; kun kia zorgego li gardosidadis tage-nokte ĉe la agonianta patrino, kiu – albrakante al si lastafoje siajn etulojn alkore – diris al ili kun velka rideto: „Ne ploru, mi revenos por vi, kunportos vin”.

...Kaj ŝi post nelonge kunportis ambaŭ.

La malgranda Laĉjo mortis duonjaron poste je pulmoinflamo. Dio mia, Dio mia, kiel saĝa, kiel afabla infano li estis !

S-ro Luppán daŭrigus tiel pri mil kaj unu aferoj, rilataj al la eta Laĉjo kaj la postmortinta filino Estero, se sufoka plorsingulto ne superregus liajn vortojn...

...Kvankam en ĉiuj ĉi aferoj eĉ vorteto da vero ne kernas. La pasintecon de kavaliro Luppán, ekde lia infanaĝo ĝis la hodiaŭa dato, ĉiu homo en Selmec konas, kaj certe tre bone scias, ke li neniam havis

edzinon, sekve nek infanojn.

Sed eĉ se oni scias la malon, oni ne obĵetas, ĉar li tion sankte kredas, kredas sen esti proe mense perturbita. Ne, ne, al la mingrafo (en Selmec ankaŭ la filo heredas la rangon de la patro) tute ne mankas klapo en la kapo.

Li estas saĝa, brava kaj honesta homo, kun ĉiuj karaktertrajtoj de fraŭleco, sed en ĉi unu afero tre unika, tre diskutima.

Pluraj homoj rekondukas la aferon al tio, ke kavaliro Luppán iam estis enamiĝinta al juna, bela knabino, kiun ŝiaj gepatroj ne volis edzinigi al li. La knabino tristiĝis proe tiom, ke ŝi glutis venenon kaj mortis inter teruraj suferoj. Al la trosentema humoro de s-ro Luppán (vere trosentema deklaras lin la Selmec'anoj) forte efikis ĉi tiu evento, kaj li falis en altan febron, el kiu apenaŭ li povis restariĝi.

Dum ĉi tiu malsano, daŭranta du monatojn, okazis kredeble lia ofte rememorata familia vivo, ĉi-dume naskiĝis, kreskis kaj mortis lia trezoreto: la malgranda Laĉjo kaj la blonda, anĝelvizaĝa Estenjo…

Eble iomas vero en tio, sed tio finfine neniel tuŝas nin, kaj laŭpromese prezentinte ambaŭ bravajn sinjorojn, ni povas kun trankvila konscienco transiri al la dua ĉapitro de nia rakonto, kiu, ĵure mi promesas, ne estos tiel teda, kiel la unua.

Dua ĉapitro

Deŝiro de floreto – tri manoj etendiĝas

Kiel menciite de la ĉarma Kristinjo en la enkonduko, kavaliro Luppán kaj s-ro Csutkás estis gastoj de s-ro Csemez ĉi-posttagmeze por iom da fantoludo. Ĉi tiu nobla amuzo okazis kutime alterne, foje ĉe unu, foje ĉe la alia. Hodiaŭ venis la vico de la „orfaristo". Tiel oni nomis epitete s-ron Csemez pro lia eco, ke li senĉese rompis al si la kapon pri orfarado kaj esprimis ĉiun nocion per oro. Maja pluvo egalvaloris por li kvintalon da oro; se li laŭdis iun inter siaj instruatoj, li diris, ke ties cerbo kaj diligento valoras oron, kaj se li bondeziris al iu, ankaŭ tion li esprimis en oro: „ĉiuj haroj viaj fariĝu oro!" k.s. Tio estis lia malforta flanko, sed vidante liajn multajn bonajn ecojn, oni povis

pasi preter tio kun bona konscienco.

Do ili fantoludis, nome en la ĝardena laŭbo. La vitoj, entruditaj en la Selmec'an grundon, rampis kiel maldika trunko sur la latiso, kaj la suno nemalhelpate trabrilis sur la tri kalviĝantajn vertojn, elpremante terurajn ŝviterojn el la bravaj moŝtaj personoj. Feliĉe, la bela Kristinjo, laŭ supera komisio, regaladis ilin per refreŝiga biero, kiu tenis ilin daŭre viglaj kaj atentaj en la velkiga varmego. Kristinjo mem sidis apud sia patro, rigardante liajn kartojn, kio devis esti tre utila, ĉar li jam plurfoje elvokis: „Oraj kartoj venas al mi!"

Kontraŭe, kavaliro Luppán kaj s-ro instruisto Csutkás estas hodiaŭ veraj „dupoj", eĉ la „bela tercio" ne funkcias por ili, ĉiupaŝe ili stumbladas-faladas kaj ridetante kaj kun tia pacienco ili akceptas la batojn de la sorto, falantajn al ili sur la nukon, ke s-ro Csemez trovas konvena, doni konkretan formon al sia miro:

– *Horribile dictu*...[11] Hodiaŭ vi estas tre distrataj! Hodiaŭ vi estas, estimataj sinjoroj, vera orminejo. Mi jam gajnas la kvinan forinton. *Noch a' Glas, Kristin!*[12]

Sekve de ĉi tiu „ora" deziro la kara infano stariĝis kaj verŝis bieron el unu de la kruĉoj, entombigitaj en la glacia sino de sitelo, starigita sub rozarbeto, unue al sia patro, poste al la ceteraj, kiuj kun dankoplenaj okuloj akceptis ĝin el la blankaj manetoj.

Sed ĉi tiuj dankoplenaj rigardoj havis tre suspektindan aspekton. Iom kompetenta psikologo povus malkovri en ili diversajn kombinaĵojn: amsopiron, deziron, esperon kaj kontenton. Ja ili havis kaŭzon kontenti pri la elektito de sia koro. Ŝi estas ja belega, kvazaŭ naskita ne de patrino sed de libera, kaprica fantazio poeta, kiu traflugis super la universo, elektis kolorojn de feaj floroj por la vizaĝo kaj lipoj, pruntepreni formon por la frunto ĉe la ĉielvolbo, sveltecon por la staturo ĉe susurantaj kanoj, brilon por la okuloj ĉe diamanto, formon de migdalo kaj koloron ĉe la malhela nokto; kaj kion ĝi pruntepreni ĉe rozo, rubeno, roso, sunradio, ĝi esprimas kun peka trokuraĝo per ses literoj: ideala.

[11] Horribile dictu (latine): eĉ diri estas terure.
[12] Noch a' Glas, Kristin (germane): ankoraŭ glason da (biero), Kristino.

Tia idealo estis Kristino.

Mem la brava s-ro Csemez, kiun ja krom la beleco de oro nenio plezurigas, ne povis ne murmureti al si, kiam li fojefoje ĵetis deflankan rigardon al la jam plenkreskanta junulino (Kiel rapide kreskas ĉi tiuj infanoj!):

„Ecce! mulier formosa…”[13]

Kaj kiam unufoje lia kolego Csutkás rimarkigis al li inter kvar okuloj: „Nu, vi atingis, al kio vi sopiris: vi serĉadis ĉiam oron, kaj jen, havata estas la granda peco da vera oro: Kristinjo”, s-ron Csemez ekregis kuraĝaj pensoj kaj mirindaj ideoj enloĝiĝis en lia cerbo.

„Jes ja, oro… pura oro estas ĉi tiu knabino! Hehehe! La homoj estas malsaĝaj kaj opinias koton oro. Koton, la homon. Kaj *denique*[14], se la tuta mondo eraras, la tuta mondo tamen pravas; se la tuta mondo opinias Kristinjon oro, ŝi estas certe oro, de la ungopintoj tute ĝis la kalkanoj.”

Kaj krome memoriĝis al li tiuj diversaj kavaliraj romanoj, pri kiuj s-ro Luppán (kiu avide kaptas por tiaj) ofte parolas. Riĉaj princoj kaj reĝidoj sobiras el siaj kasteloj al malriĉaj paŝtistaj filinoj; la knabino havas neĝe blankajn manetojn, la reĝido brilan kronon, li genuiĝas antaŭ ŝi, suspirante: „Knabineto, ni interŝanĝu: via mano estu la mia kaj mia krono la via.” Tio ja estas sufiĉe granda sensencaĵo, sed povas okazi, ĉar se ne povus, historioj pri tio ne estus presitaj.

Krome foje s-ro Csutkás diris ankaŭ:

– Vi, Stevo (la nomo Stefano plinobliĝis je „Stevo” en Selmec)! Ĉi tiu oreto via iĝas ĉiam pli granda. Post pli-malpli ŝi maturiĝos fianĉino. Oni ŝin forprenos de vi! Frapite elstreĉis s-ro Csemez la okulojn al sia meritplena kolego.

– Forprenos? Hehehe! Sed mi ne donos ŝin!

Je ĉi tiu originala deklaro s-ro Csutkás skuis la kapon, elpoŝigis sian buntan tukon, skuante ĝin kaŭze de singardemo, por purskui ĝin laŭeble, se hazarde papriko estus surŝutita de lernejaj buboj (kio ofte okazas, se li forgese lasas ĝin sur la katedra tablo); kaj post kiam li

[13] Ecce! mulier formosa (latine): Jen plaĉa virino.
[14] Denique (latine): finfine, finsume.

spertis, ke ĝi estas sena ĉi unu fojon je ĉiaj fremdaj kaj nekonvenaj elementoj, dufoje li traviŝis per ĝi siajn ŝvitantajn vizaĝon kaj frunton.

– Ho, tute ne, tute ne! Ili kroĉiĝas al mi... Pri kio temas? Jes ja, ili kroĉĝas... Kio koncernas vian antaŭan aserton, amiko Stevo Csemez, ĝi ne estas, laŭ mia modesta opinio sur la nivelo de ĉi tiu epoko. Mi kredas, ke ĝi ne estas... mi estas konvinkita, amiko Stevo Csemez, ke vi elparolis nepripensitajn vortojn... ĉar virino estas destinita... Nu, por kio?

S-ro Csutkás ruĝiĝis ĝis la oreloj. Subite li ligis nodon sur la elpoŝigita tuko kaj komencis ĝin mordadi.

– Mi kredas... mi opinias, analizante pli funde, mi eĉ kuraĝas aserti, ke mi proksimas al la ĝusta difino, se mi rilatigas la esencon de la virina destino en strikta kaj sistemeca, sistemeca kaj ekskluda maniero al la ideo de edziniĝo. Ĉar la kerno de ĉiuj aferoj estas amo... ho, kiel ili kroĉiĝas al mi...

La maljuna orfaristo restis ĉe sia starpunkto.

– Mi donos Kristinjon al neniu. Mi vartis ŝin ne por ke iu fripono akaparu ŝin, trovinte ŝin matura kiel rubuson surkampe, kaj deŝiru kaj glut... formanĝu ŝin.

– Sed la altiriĝo, la amo?

– Min ŝi amu!

– Tio ne sufiĉas.

– Nu, ŝi amu ankaŭ vin...

Csutkás subite mallevis siajn grandajn palpebroharojn kaj ridetis.

– Aŭ se ankaŭ tio ne sufiĉas, ŝi amu ankaŭ kavaliron Luppán. Csutkás subite malfermis siajn okulojn kaj ne plu ridetis.

– Estas malfacile ordoni al la koro. La koro havas rajtojn, Stevo. Vi ne konas la koron. La koro estas delikata aĵo, Stevo! Ĝi facile rompiĝas!

S-ro Csemez oscedis kaj diris kategorie, ke rompita vitro faras pli da bruo ol rompita koro... Domaĝe malŝpari la tempon por tiaj senutilaj babiloj; iom kartludi valorus pli; li donos Kristinjon al neniu, se ne por tiel granda orpeco, kiom ŝi pezas. Hehehe! Por tiel granda orpeco, kiom Kristinjo pezas.

S-ro Csemez ruzete kuntiris unu okulon, kaj dum ĉiuj liaj trajtoj tordiĝis en unusolan grimacon, esprimantan ruzecon, li eligis ankaŭ la

langon, ekklakante per ĝi en siaspeca maniero.

– Kia ideo! – suspiris Csutkás, okulumante honteme al la sigelringo sur sia fingro, el kiu ankoraŭ multe mankis, por ke ĝi egalpezu Kristinjon.

Tiom kaj ne pli interparoliĝis pli frue pri Kristinjo inter s-roj Csutkás kaj Csemez. Deposte jam duonjaro forpasis, s-ro Csutkás ne plu memoras tion, eble nek Csemez.

Kaj Kristinjo estis hodiaŭ tiel bela, klopodanta graciplene ĉirkaŭ ili, la biero tiel bona, la flartabako tiel eskvizita, ke s-ro Csutkás sentis sin kvazaŭ levita en la ĉielon, kaj paginte per rideto la „kontribucion" post perdita partio, li kolektis, intermiksis kaj duonigis la kartojn per kavaliro Luppán kaj per subita movo glitigis ilin en la internan poŝon de sia jako.

Lian aŭdacon sekvis silento de konsterniĝo. Kio nun okazos? Ĉiuj vizaĝoj turniĝis demande al li.

S-ro Csutkás elprenis sian flartabakujon, metinte ĝin antaŭ si sur la tablon, ripozigante sur ĝi la montro– kaj dikfingrojn de sia dekstra mano, por ke pli solene efiku, kion li estis dironta.

– Sinjoroj kaj fraŭlino! Vi diros, ke ili kroĉiĝas al mi. Jes ja, ili kroĉiĝas, sed…

Li trinkis guteton el sia glaso kaj daŭrigis flustre:

– Sed tio ne sufiĉas. Kiu diras, ke tio sufiĉas? Vi ne diras, kavaliro. Ankaŭ Csemez ne diras, ankaŭ mi ne diras. Nu, se tio ne sufiĉas, oni devas klopodi, ke tio sufiĉu! Mi do diras, ke mi bezonas koron… Mi serĉas koron, sinjoroj kaj fraŭlino! Kavaliro Luppán ekbalancis la kapon kun suspiro.

– Ankaŭ mi… honorvorte mi diras, ankaŭ mi. Ni iras sur la sama vojo, damnite sur la sama vojo… De kiam mia forpasinta edzino…

– Ba, jam dividu la kartojn! – interrompis ilin la orfaristo.

S-ro Csutkás leviĝis kaj etendis ambaŭ manojn kun aktoreca patoso al Kristinjo kaj ŝia patro.

– Tiu koro estas ĉi tie, Stevo – li elvokis emociite –, ĉi tie mi ĝin trovis, ĝi estas Kristinjo; ŝi kroĉiĝos al mi, ŝi estos la mia, se vi donos ŝin al mi. Estos mia edzino. Kaj vi ne povas ne doni ŝin al mi, ĉar mi amas ŝin, ĉar…, ĉar… mi feliĉigos ŝin; ŝi kroĉiĝos al mi…

Samtempe kun tio li forte ekpremis la manon de la knabino kaj de s-ro Csemez, fermis la okulojn kaj atendis en mallumo la respondon de s-ro Csemez, kiu embarasite rigardis ĉirkaŭ si, dum la knabino staris pala kaj tremante, vane klopodante elŝiri sian manon el tiu dika de Csutkás.

– Kiel vi opinias prie, Luppán? – demandis s-ro Csemez leĝere, turnante sin al la kavaliro.

– Mi diras, ke vi farus pli bone donante la manon de Kristino al mi. Ho, kiel ŝi similas al mia forpasinta edzino. Mi kisus eĉ la lokon…

Emociite li viŝadis la okulojn per sia poŝtuko, sur kiu pompis la blazono de Luppán'oj, du kruce metitaj marteloj kun la subskribo: „*Glück auf!*"[15]

Je ĉi tiuj vortoj s-ro Csutkás subite ellasis la manon de Kristino kaj Csemez, ĵetis teruran rigardon al la kavaliro, stumblinta en sia oratoraĵo.

– Sinjoro! Vi rigardis en miajn kartojn… Aŭ jes, jes, vi volas disdoni miajn kartojn al vi mem… tio estas… vi venas kontraŭ mi, vi atakas min. Nu, bone. Sed notu al vi… ŝi kroĉiĝas… ŝi kroĉiĝas al mi, sinjoro! Ĉu vere, Kristino? S-ro Csutkás ĉirkaŭrigardis, sed jam eĉ la ombro de Kristino ne videblis. Kiel timigita kapreolo ŝi kuris el la ĝardeno al la domo. Ŝia vizaĝo ne plu estis pala sed enflamiĝinta, ŝia koro laŭte batis, ŝia brusto rapide leviĝadis. Dio mia, Dio mia, kiel granda malfeliĉo ŝin trafis! Dio mia, Dio mia, kio nun fariĝos?…

Kaj dum ŝi blinde kuras, mem ne sciante, kial, kien, neatendite iu baras al ŝi la vojon.

– Ha ho! Ha ho!

– Ho, jen kiuj, Bohuska kaj…

Bohuska kaj ŝia frato Nikolao Mirkowszki. Tiu malbela knabo Nikolao, kun kiu ŝi kutimis ĉiutage babili tra la abismo, pro kiu ŝi nun ne povas viziti Bohuska, post kiam li hejmenvenis el Budapeŝto, ja li estas jam granda knabo kaj…

Kristino denove paliĝas, ektremas, inerte mallevas la manojn, ŝiaj kruroj malfortiĝas kaj ŝi staras antaŭ siaj gastoj kiel marmora statuo disfalanta.

[15] Glück auf! (germane): Bonŝancon! Minista bondeziro.

– Kio, ĉu vi eĉ ne kisas min? Malvarme vi rigardas – plendas Bohuska. – Ĉu vi koleras, ke mi lasas min akompani de Nikolao?

Kristino skuas la kapon silente, malgaje.

– Estas tute mia kulpo – ŝi daŭrigas. – Batu min pro tio, kara. Li mem ne kuraĝus veni; lin kuraĝigis mi. Sed kiel pala, ekscitita vi estas? Ĉu io okazis?

Kristino inerte jesas per sia bela kapo. Kaj poste per subita turno ŝi saltas apud Nikolaon kaj metas la malgrandajn manetojn en liajn manojn.

– Ĉu estas vere, Nikolao, vi amas min, vi tre amas min?

Bohuska lasis fali la ventumilon pro ĉi tiuj neatenditaj vortoj kaj mire rigardis al sia amikino, kiu tenere premis sin al Nikolao.

La junulo ekflame ruĝiĝis. Ĝis nun ja eĉ unusola vorto, unusola aludo ne falis ĉi-rilate.

Ili babilis kune kelkfoje, jen ĉio! Kaj jen nun!...

– Ĉu mi amas vin, Kristino? Tre, mi vivas sole por vi! Ho, Bohuska, diru, diru vi, kiel mi amas ŝin! Mi sola ne kapablas rakonti. Dio mia, kia feliĉo! Kiu estus kredinta? Ekde la unua minuto, kiam mi ekvidis vin.

Nikolao tremis kiel aŭtuna folio.

– Ĉu mi estus kuraĝinta prirevi? – li daŭriĝis kun interrompoj. – Ho, Kristino, do vi... ĉu ankaŭ vi deziras mian amon?

– Jes – ŝi flustris kvazaŭ lace, kun fermitaj okuloj.

– Ĉu vi demandas min, ĉu vi petas min?

– Jes – ŝi ripetis plende, kaŝante sian belegan vizaĝon inter la manoj. – Vi estas pli bona ol la ceteraj, vi estas pli bela ol la ceteraj, vi pli konvenas al mi ol la ceteraj. Amu min do, jes amu min kaj mi...

– Kaj vi, Kristino?

– Ĉu mi? – Kaj ŝi malprenis lin, kvazaŭ vekite el sonĝo, kaj ŝia vizaĝo fariĝis strange nenioesprima. – Ĉu mi? Kiu parolas pri mi? – ŝi diris preskaŭ modeste. – Ĉu vi ne sentas, kiel varmege estas?

– Ni iru en la laŭbon – proponis Bohuska embarasite, kiun ankoraŭ tenis ravita la frapanta romantikeco de la priskribita sceno. Ŝi mallevis honteme la okulojn, kvazaŭ ŝi estus farinta gravan kulpon.

– Ne, ne! – kriis Kristino ribele – tien ne!

– Kien do? – demandis Bohuska milde.

– Kien ajn! En la mondon – diris amare Kristino, kaj unu larmo ruliĝis tra ŝia bela vizaĝo.

Nikolao rigardis sufere tiun ruliĝantan larmoguton kaj pensis pri tio, se li nur povus ĝin forkisi de tiu ĉarme rava feinvizaĝo.

Tria ĉapitro

En kiu estas rakontataj eventoj, kiuj ne povis trovi lokon en la antaŭa ĉapitro

Nikolao Mirkowszki estas unu el tiuj figuroj, pri kiuj virinoj opinias: ili estas interesaj. Li havis grandajn, parolantajn bluajn okulojn, abundan blondan hararon, sveltan staturon kaj lertajn manierojn. Nur antaŭ duonjaro li hejmenvenis, por kompletigi siajn jurajn studojn hejmurbe en la minista akademio, kaj se la bonŝanco lin favoros, por ekvoji en la vivon kun la espero, fariĝi iam minafera konsilisto. Li povos tion atingi; li havas sufiĉan talenton por tio; krome li povas ankaŭ adaptiĝi al la vivo. Kiel dirite, li estas nur ekde duonjaro en Selmec kaj jam arbitranto ne nur en junularaj renkontejoj, en la „Ora Meĉujo" kaj ĉe la „Vigla Martelo" sed ankaŭ en virinaj salonoj, ĉar li ne ĉiam tiel mallertas, kiel nun, kiam li staras muta, rigidiĝinta, enradikiĝinta en la tero antaŭ Kristino, kaptante kontraŭvole per la manoj al la folioj de robinio super sia kapo, kiujn li kvazaŭ volus demandi, dum li ilin fingrofrotas distrite: „Ĉu ŝi amas min?... Ŝi ne amas min..."

Neniel li povas kompreni, ke se Kristino amas lin, kial ŝi ploras, kial ŝi elprenis tiel rapide siajn manojn, dum li demandis pri la reciprokado de sia amo, kaj kial ŝi fariĝis meditema kaj malgaja...

Dia obskuro regas en la virinaj koroj, sankta mistero, plena de poezio, ĉarme rava ombro de la timata realo.

Ho, la unua konfeso estas granda poezia vorto.

La herberoj suspiras reveme al la bela knabino: „Paŝu al mi, surtretu min: mi fariĝos pli freŝa, pli verda..."

Sunradio vokas malsupren al la junulo: „Ankaŭ vi havas mondon, pli grandan ol la mia estas: pli grandan kaj ankaŭ pli belan..." La proksimiĝanta krepusko postlasas urĝan mesaĝon al la nokto: „Ne venu,

restu for... ĉi tie okazas io, kion vidante, eĉ vi ne povus resti malhela...”

Kaj kiuj elparolis ĉi tiujn grandajn vortojn, aŭskultatajn kun frapita raviteco de la universo, la enamiĝinta junulo kaj la kuraĝa knabino, staras ĉiam plu mutaj, mallertaj kaj atendas timeme, kun batantaj koroj, kiam la firmamento falos sur ilin.

– Ho, Dio mia, kion mi faris, kion mi faris... kion mi faris! – flustras Kristino kaj sentas, kvazaŭ la mondo komencus kunpremiĝi en grandan, rondan knedaĵon kaj turniĝi ĉirkaŭ ŝi kun sovaĝa rapideco, ĉiam pli proksime. Senforte ŝi mallevas la kapon kaj manojn, kiel mortanta birdo siajn flugilojn, ŝanceliĝe ŝi iras al Bohuska kaj apogas sin al ŝia ŝultro.

Kaj Nikolao ne havas eĉ unu vorton responde, konsole: obtuza apatio lin ekregas kaj subpremas la naskiĝontan penson en ties ĝermo. Ĉi tiu neatendita evento donis tiel fortan puŝon al lia koro, ke simile al trosvingata pendolo, ĝi kapricas inter ekstremoj. Kaj la ekstremoj buntas per specifaj bildoj, en mil renoviĝadantaj variantoj, laŭ tio, ĉu li kredas esprimiĝi penton, heziton, indiferenton, senesperiĝon, malĝojon aŭ amon en la okuloj, voĉo, gestoj de Kristino.

Fine Bohuska reakiras kiel unua sian spiritan ĉeeston kaj diras kun la kutima vigleco:

– Nu, infanoj, tiom sufiĉas: ni iru vere ien. La promenado efikos al vi bone, karulino. Nikolao, donu vian brakon!

Al Nikolao ankoraŭ restis tiom da saĝo, ke li donis la brakon ne al Bohuska sed al Kristino.

Tiu ĉi ektremis kaj ekskuis sin, kvazaŭ fremda mano tuŝus dormanton.

– Dio mia, Dio mia! Mi ne komprenas vin... – ekparolis Nikolao per subpremita voĉo kaj metis la manon, kiun la knabino hezitis akcepti, sur sian varmegan frunton.

– Ĉu vi... min? Ĉu mi diris ion?

Kaj mirante ŝi rigardis al Nikolao per siaj grandaj, parolantaj okuloj.

– Ne frenezigu min! Ne malfermu antaŭ mi la ĉielon, nur por ke mi blindiĝu pro ĝia lumo, kaj por ke poste vi fermu ĝin antaŭ mi. Kiel ebl-

as, ke vi estas tiel ege kruela?!

– Nu kio?! – petolis Bohuska – estis nur ŝerceto, nenio alia.

– Ĉu ŝerco? – eksplodis Nikolao amare, kaj lia vizaĝo kovriĝis per ruĝo. – Diri „mi amas vin”, poste diri „mi ne amas vin”, ĉu tio estas ŝerco? Ĉu tio estas nuraj vortoj kaj la vortoj estas nura malplena aero?! Aero povas enhavi venenon, karaj fraŭlinoj! Aŭ vere, vere... ja mortigi koron, ankaŭ estas ŝerco.

Kiam Bohuska rigardis al la taŭzita vizaĝo de sia frato, ŝiaj ruĝaj lipetoj, kreitaj por kiso, tuj kurbiĝis je ploro. Kun natura timiĝo kaj ĉarma naiveco ŝi falis ĉirkaŭ la kolon de Kristino.

– Vidu, vidu – ŝi diris viŝante al si la larmojn -, nun restis vere nenio alia ol...

La hezitema rigardo de Kristino alprenis demandan karakteron.

– ...oI ke vi amu ĉi tiun folan knabon Nikolao. Vidu, kiel li malĝojas...

Kun kata flatemo ŝi karesetis la mentoneton de Kristino, ambaŭmane levis al si ŝian pendantan kapon kaj per afabla, persvada voĉo diris:

– Nu, nun jam amu lin! – Poste senpacience ŝi aldonis: – Tuj amu lin... nu, amu lin! Li povus fari ion kontraŭ si. Li ĉiam estis obstina, neklinebla...

Kristino spiteme levis la kapon.

– Ne eblas – ŝi diris malrapide –, mi ne povas fari, mi amas iun alian... Mi kredas... mi pensas...

– Vi amas iun alian! – kriis Nikolao, kaj liaj okuloj vastiĝis je grandeco de pugno. – Estas neeble! Pripensu pli bone, diru, ke vi nur ŝercas!

La suno malheliĝis, antaŭvento de proksimiĝanta tempesto tremigis la foliojn de la robinio, la varmego kreskis ĝis netolerebla. La junulo faris kelkajn paŝojn por foriri, sed post iom li falsidiĝis senforte ĉe arbotrunko kaj kovris sian palan vizaĝon.

– Vi kaŭzis grandan doloron al mia koro – li diris milde kaj antaŭgarde turnis sian riproĉan rigardon, vualitan de larmoj, for de Kristino: ĝi ne doloru al tiu, kiun li tiel forte amas.

Ĝi tamen doloris al Kristino. Ŝi paŝis ŝanceliĝe al Nikolao kaj mallevis ambaŭ manetojn sur lian kapon.

– Nikolao, kio vin trafis? Ĉu vi koleras min, ĉar mi estis sincera al vi? Dio mia! Ne forlasu min, restu bonkora, akceptu min kiel..., ho, Dio, kiel elparoli?... Kiel edzinon.

Nikolao tuj saltleviĝis, la larmoj sekiĝis en liaj okuloj, lia vizaĝo fariĝis fiera.

– Estu trankvila! Ankaŭ mi ne plu sopiras al vi – li diris obtuze, per mezurita voĉo –, sed mi ankaŭ ne forlasos vin. La amo estas senmorta! La amo ne perdiĝas kiel surtretita vermo, nur alprenas ian formon. Amu, kiun vi volas, sed estu mia edzino!

Li rektigis sin en sia tuta alto, liaj okuloj ĵetis fajrerojn. Mirfrapite Kristino retroiris paŝon for de li kaj diris afable sed triste:

– Jes, Nikolao; mi volas fariĝi via edzino, por ke vi konsolu min per via sindona amo, por ke vi helpu al mi toleri la vivon, por ke...

Torenta larmopluvo trakovris la belan vizaĝon.

Ho, Nikolao ne povis plu rigardi tion senage. La demono de kolerego ekposedis lin, disgalopis tra liaj vejnoj kaj ekfajreris el liaj okuloj. Senkonscie kaj kun certa krudeco li ekprenis la brakon de la knabino, lia minaca, malmilda voĉo tremis.

– Ne, ne, Kristino! Neniam, ne... Neniam eĉ iom... Ni mortos! Kaj vi, kaj mi. Mi ne permesas, eĉ se la firmamento krevos, falos, mi ne cedos... Mi ne cedos eĉ je hareto via, efemera ombreto de via unusola hareto, ĵetita sur la muron... Vi mortos! – li kriis, kaj lia voĉo laŭtiĝis je tondro -, se vi ne diros la nomon de la homo, kiun vi amas!

Kristino provis rideti, mordetis la lipon per siaj blankaj dentetoj, por subpremi la larmojn.

– Kiun mi amas? Neniun, Nikolao! Neniun, neniun...

La eĥo de la monto Szitnya rediris dufoje: „Neniun...”

Nikolao ne lasis ŝin, sed dum per unu mano li forpuŝis ŝin impete, per la alia li premis ŝian brakon tiel forte, ke la malfeliĉa eksiblis pro la akuta doloro. Li estis ne plu homo sed ĵaluza, sovaĝa besto. Monstro, kiu ne pensas, sed kuntreniĝas de pasioj.

– Ne vere, Kristino! Vi trompas min! Mi devas scii... mi volas!

– Do bone; mi ne amas vin, sed nek alian, almenaŭ ne tian, kian mi povus nomi; mi revas pri viro tiel bela kiel Don Alvira en la romano

Nigra virino kaj tiel brava kaj facilanima kiel Athos en *Tri musketeroj*, tiel amanta, tiel senkompara kiel Gaston en *Tri oraj haroj*, tiel multescia kiel Ivan Berend en *Nigraj diamantoj*.

– Tiam vi estas ja vera malsaĝulineto! – ekridis Bohuska bonhumore. – Se vi kredas al la vortoj de tiuj nub-irantaj poetoj!

– Ho, Dio, mi mem ne scias vere, kia li devus esti... Mi sentas nur, ke ne tute tia kiel Nikolao... Ve, mia kapo preskaŭ krevas! Estus Nikolao iomete, nur tre iomete alia, mi vere amus lin..., sed nun...nun...

Nikolao nun pli preme tenis ŝian brakon.

– ...Nun mi volas fariĝi via edzino nur, ĉar vi estas bela..., tute plaĉa knabo, kaj onklo Csutkás kaj Luppán petis min edzine de mia patro en la laŭbo.

Kun ektima rigardo ŝi turnis sin al la ĝardeno.

Kaj vere, sur la vojeto, borderita de riboj, proksimiĝis la tri sinjoroj.

Kavaliro Luppán atingis kiel unua la gejunulojn. Lia vizaĝo brilis de ĉiela-miela afableco.

– Jen, jen – li alvokis joviale –, vi ja ploras, Kristino! Kiu plorigis vin? Aha! Tiu damnita maljuna fripono... Sed ĉit, jen li venas... Li povus aŭdi...

S-ro Luppán retrorigardis esplore.

– Jes, jes, damnita maljuna fripono, kiu krome estas ankaŭ ridinda. Jes, jes, mi kuraĝas aserti antaŭ la tuta mondo...

Kun heroa gesto li returnis sin por ĉirkaŭrigardi, ĉu Csutkás ankoraŭ malproksimas, poste li daŭrigis mallaŭte:

– Sed ĉar li estas tre galoplena homo... mi ne volus, ke tio venu en liajn orelojn, la troa galo malutilas al lia sano. Vere, fraŭlino, vi faris bone, ke vi forkuris. Mi trovas tion ĝusta, Kristino mia! Per nenio alia vi povus min pli distingi kontraŭ la „maljunulo”. Tio estis konfeso, Kristino. Delikata sed komprenebla; mi komprenis ĝin!

– Ho, halt, onklo Luppán! – interrompis lin Kristino kun ruzeta rideto.

Virinoj kapablas en la sama minuto plori, malami, koleri, ami, revi kaj rideti. Samtempe ili estas naivaj simplulinoj kaj rafinitaj diplomatoj.

La alparolo „onklo” frapis kavaliron Luppán.

– Ej vi, ej vi, raneto, knabineto! Vidu, vidu, kiel ŝi priŝercas min. Hm, Kristino... mi kredas, vi ne tro insistas pri la alparolo „onklo” kaj pretas ŝanĝi ĝin al pli ĝusta. Pli ĝusta, mi diris, Kristino, sed mi povus diri ankaŭ: pli dolĉa!...

Nikolao metadis sin maltrankvile de unu piedo sur la alian, kaj se la petega rigardo de Bohuska ne mildigus lin, Dio povus diri, kiel akre li ofendus la mingrafon.

– Onklo Luppán ŝercas – diris Kristino kaj levis sian katunan antaŭtuketon kun gracia petolemo tiel, ke ĝi tute kaŝu ŝian vizaĝon for de s-ro Luppán, kaj ankaŭ ŝian dolĉafektan mienon, kiu igis Bohuska, vidantan ĝin deflanke, eksplodi en petolan ridon.

– Jam denove! – diris Luppán plendavoĉe. – Ĉu mi aspektas kiel ŝercanto? Ne tiel, Kristino! La vortoj de serioza viro, kiel mi, valoras kvazaŭ presitaj. Krome vidu, mi estas tute por tio, ke oni amu min. Ĉiuj miaj fibroj estas por tio. Mi povas min konsideri provita, sperta individuo, ne ia nazmukulo, ĉe kiu ankoraŭ verdas en la kapo, kiu bolkape ekvojas en la Saharon de la vivo.

S-ro Luppán spiris profunde ĉe tiu ĉi pompa esprimo, li volis vidi la efikon, kiun li elvokis per ĝi sur la vizaĝo de Kristino, por kiu celo li kontraŭvole kaptis al ŝia antaŭtuko, por flankentiri ĝin kun aminda petolo.

– Ne, ne, ne! – ŝrikis Kristino, kurante kelkajn paŝojn for al Nikolao.

La maljuna amanto postkuris ŝin kaj ameme prenis la kurantan anĝelon, stumblintan je trogo sur la korto, ĉe la talio. Ho, kiel bategis ŝia koro!...

– Kie do mi ĉesis?... Jes ja, jes ja... – li balbutis kun fajrerantaj okuloj.

– En la dezerto Saharo – atentigis lin Bohuska.

– Jes, ĝuste. Mi diris, ke mi jam estas sperta homo, ĝuis la plezurojn de la geedza vivo, mi enestis en ĉi tiu sankta ligo, mi jam entombigis unu edzinon. Ho, mi jam entombigis unu kaj kapablas ankaŭ alian...

La emociiĝo, kiel kutime en tiaj okazoj, malhelpis lin por momento en la parolado, kaj kvazaŭ lacigita de la plezuro, li ellasis la gracian talion de Kristino, pro la tuŝo de kiu mirinda ekscita varmego inundis liajn

vejnojn kaj pulsante galopis tra liaj senfortiĝintaj membroj.

– Entombigi, jes ja, entombigi… Aŭ pli precize, ne ja!… Kion mi diras? Mi volis uzi la vorton: feliĉigi. Aŭdu, Kristino, feliĉigi! Vi estas inda fariĝi mia edzino.

En ĉi tiu momento, kiam s-ro Luppán jam tute regis la situacion, neatendite alpaŝis s-ro Csutkás kaj metis sian dikan, vilan manon, havantan nun plumban pezon, al li sur la ŝultron.

– Homo! – li diris, surpezigante ankaŭ sian alian manon. – Ne estu triviala! Ĉu vi ne vidas, ke ŝi fremdemas al vi kiel sanskrita alfabeto al mi. Fakte, la knabina koro estas alfabeto, ĉu ne, Csemez? Alfabeto muta, tamen parolanta. Mi konas ĉi tiun alfabeton, Luppán kaj scipovas ĝin legi. Ŝi kroĉiĝas al mi…

– Amikoj! – interrompis ilin s-ro Csemez, alprenante seriozan mienon, dum li umadis sur la ora ĉeno de sia horloĝo per unu mano –, la afero, kiun vi tuŝas, estas delikata privataĵo; la objekto, kiu mallongigis la hodiaŭan fantoludon, estas familia afero, kaj dum unuparte ĝi ne meritas tiom da vortoj, kiom tiel eminentaj kaj bravaj viroj malŝparas por ĝi, aliparte konsideru ankaŭ, ke ĉeestas junaj gegastoj de mia filino, la eta Bohuska kaj Nikolao, por kiuj estas ankoraŭ tro frue aŭdi tiajn, tiel nomatajn „scenojn”…

S-ro Csutkás kapbalancis jese, sed Nikolao antaŭenpaŝis, kaj levinte fiere sian belan kapon, diris per decida, sonora voĉo:

– Permesu al mi eldiri, kara sinjoro, mi havas nenion kontraŭ ĉi tiu sceno; eĉ, mi mem volas en ĝi roli; ankaŭ mi amas Kristinon, ankaŭ mi petas por ŝia mano…

Sekvis silento solena.

S-ro Csutkás viŝis al si la ĉiam pli ŝvitantan frunton per tuko kaj grumblis apenaŭ aŭdeble: „Junuleto tro kuraĝa.”

Kavaliro Luppán mordis al si en la lipon kaj levis la manojn alĉiele, kvazaŭ plendante al la forpasintoj en la ĉielregno: „Vidu, karulinjo, vidu Esterinjo, Laĉjo mia, denove kia miskazo!”

Nur s-ro Csemez konservis sian flegmon, kaj okulmezurinte sian ruĝvizaĝan kunulon de la kapo ĝis la piedoj, antaŭparole snufis tiron el la tabakujo kaj lasis fermiĝi ĝian kovrilon kun tiel emfaza klako, ke an-

taŭvideblis eksterordinara evento, per kiu la sino de la sekva minuto estis, gravediĝanta.

Kaj tiu ĉi eksterordinara evento estis la deklaro de s-ro Csutkás.

– Hehehe! La situacio komplikiĝas. Vera gordia nodo!... Ankaŭ ĝis nun la situacio estis tikla, ĉu je unu fadenlarĝo pli aŭ malpli, ne gravas... Nu, juna sinjoro, bone, tre bone, hehehe! Ankaŭ vi paŝis en la arenon! Kial ne? Mi konas vian patron. Brava honestulo kaj mia bona amiko... Nu, atendu iom, baldaŭ mi distrancos ĉi tiun gordian nodon per io. Hehehe!

– Patro! – diris Kristino, preninte la manon de sia patro. – Mi devas al vi konfesi, ke...

– Ĉit! Vi devas konfesi nenion. Mi faris *elaboratum*[16] en mia kapo responde al la deklaroj de miaj karaj amikoj, kaj ĉi tiun *elaboratum* neniom tuŝas ĉi tiu tria deklaro, samkiel ne povus tuŝi sekve viaj vortoj. Ĝi estas firma kiel Ciono. La vera amo estas kiel oro de tri karatoj, sed ankaŭ la vortoj de vera viro estas kiel oro de tri karatoj. Kaj Stefano Csemez estas vera viro.

S-ro Csutkás kaj kavaliro Luppán konsideris ĝusta, sekve de ĉi tiuj fortaj vortoj paŝi antaŭ la „veran viron" kaj varme premi al li la manon.

– Dankon – li diris -, sed ĉi tie estas diable varme. Kie estas la biero, Kristino? Portu la kruĉojn post ni en la ĉambron. Jes, sinjoroj, ni iru en la ĉambron, ĉar, ĉar...

Li haltis, ne scipovante trovi la logikan fadenon, por fini la frazon.

– Ĉar... ja ankaŭ la kruĉoj estos tie. Vi rapidu same, Kristino! Ankaŭ vi aŭdos tion. Stefano Csemez ne sekretumas, kion li diras, tio estas dirita. Se li elpensas ion apartan, li havas por tio rajton, se li diras sensencaĵon, ankaŭ por tio; ĉiu mem estas sinjoro de siaj pensoj.

Post ĉi tiu scienca ekspliko li disrigardis kun memplaĉa vizaĝo kaj instigis aparte ĉiun ĉeestanton eniri la farbitan antaŭĉambron, de kie oni povis paŝi rekte en lian kabineton.

Ĝi estis ĉambro, tuj atestanta scienculon. Ne nur pro tio, ke pasintjare oni balais en ĝi lastafoje, ke surplanke, surseĝe, surŝranke diskuŝis dikaj, ŝimaj foliantoj, diversaj retortoj, kaldronoj, provtuboj kaj apara-

[16] Elaboratum (latina): ellaboraĵo, propono, plano.

toj, sed ankaŭ pro tio, ke la muroj estis dense kovritaj de portretoj de doktaj viroj kaj mondfamaj alĥemiistoj en talaro kaj kun nuda kolo. Kvankam la scienco de ĉiuj kune ne valoris ŝtopeton da bona piptabako; kaj se Csemez volus plezuriĝi per la trajtoj de vera „orfaristo”, li povus pendigi pli bone la portreton de juda uzuristo, certa Luka Zeelig, kiu donadis pruntojn je la salajrobiletoj de la s-roj instruistoj kontraŭ „moderaj” procentoj.

Dum la biero estis servata, deprimiteco regis en la malserena ĉambro, sed la biero subpremis la deprimon, kaj s-ro Csemez, liberiginte lokon por ĉiu kun la atentigo: nenio tuŝendas, kaj post kelka gorĝoraspa tusado li komencis jene konigi sian *elaboratum*:

– Mi estas tre honorita…. Mi diras, vere. Kaj ke ankaŭ Kristino estas honorita, mi diras, samvere… Honorvorte. Sed la afero statas tiel, ke mi havas principojn; mi ne donas la filinon, mi bezonas ŝin. Vi diras, ŝi estas bela, floranta kaj kara, kaj pro tio vi volas ŝin, sed ankaŭ mi ĝuste pro tio volas ŝin. Ankaŭ mi bezonas ĝuste la belan, la karan. Ŝi floru por mi! Ĉar ni konsideru la malon, se ŝi estus nek bela, nek kara, nek floranta, vi ne volus ŝin, sed mi, mi ankaŭ tiam devus voli ŝin. El tio sekvas, ke tio estus malavantaĝa por mi, do mi meritas havi ankaŭ avantaĝon. La maljuna Csemez estas homo kun obstina kapo, kaj ne ekzistas povo, kapabla eltiri el lia kapo tion, kion li plantis tie; mi donos mian filinon nur al tia homo…

Li prenis longan spiron, fermis la okulojn kaj reĵetis la kapon.

– Nur al tia homo, nur al tia…

Li faris mallongan paŭzon, kaj pugniginte ambaŭ manojn, li etendis la brakojn.

–…kiu portos al mi tiel grandan orpecon kiel Kristino.

Iĝis morta silento, nur Bohuska subridis.

– Mi opinias, tiel grandan, veran orpecon. Se ĝi estos eĉ nur je lodeto malpli, ĝi egalos neniom. Mi ĵuras, egalos neniom…

Kavaliro Luppán vigle intermetis:

– Revo! Tio estas revo, Stefano!

S-ro Csemez rigardis la interparolinton kun indigno kaj respondis kun digna, malrapida tono:

– Nun parolas la patro, sinjoroj, ne la bona amiko! La serioza, matura patro. Donu la ŝuldatan respekton! La ideo estas romantika sed ne malsaĝa. Kion mi diris, tio estas dirita. Ni ne parolu plu pri la temo. Transdonu tiun kruĉon, filino Kristino!

S-ro Luppán prenis sian ĉapelon ĉe tiuj ĉi vortoj kaj returninte sin, diris el la pordo:

– Adiaŭ, Stevo! Neniam mi estus kredinta! Ĉi tiu maniero egalas la primokadon de malriĉuloj. Bone, Stevo! Mi diras, bone, Stevo! Jes, mi diras…

Batferminte post si la pordon kaj farante kuraĝajn frapojn per sia dekroĉita pluvombrelo tra la aero, li foriris grumblante. Nikolao sidis enpensiĝinte por momento apud sia fratino, kiu, post la vortoj de Csemez, lasantaj nenian pluan esperon, premis kuraĝige la manon de sia frato; sed eble ne necesis kuraĝigo: ĉi tiu momenta malsereniĝo, vidiĝanta sur lia frunto, estis eble nur la efemera ombro de akuŝata, kuraĝa ideo.

Montrante trankvilon, li stariĝis kaj paŝis antaŭ Csemez.

– Mi aŭskultis vin – li diris – kaj kaptos vin per via propra vorto: mi portos al vi tiun grandan pecon de oro.

– Ha, ha! – elvokis s-ro Csemez mirigite. – Ĉu vi portos ĝin?

– Ne hodiaŭ, nek morgaŭ, mi mem ne scias, kiam: sed mi alportos ĝin, aŭ mi mortos.

En la okuloj de Kristino ekbrulis mirinda fajro, kiu, simile al brulanta kandelo, ŝajnis sendi longajn, mallarĝajn flamojn al la junulo, kiu sub la influo de la brulaj radioj mallevis sian animitan vizaĝon.

– Ho, Nikolao – flustris la knabino feliĉe -, tio estas bela, romantika vorto deflanke de vi. Amu min tiel forte! Nun mi sentas, kvazaŭ ankaŭ mi amus vin, ankaŭ mi tiel forte amus vin.

S-ro Csutkás disrigardis senkomprene al la ĉirkaŭstarantoj, poste malgaje mallevis la kapon kaj unu post aliaj malfermadis la trokreskintajn ungolancojn de siaj pugnigitaj manoj, kvazaŭ li nombrus aŭ klarigus ion per ilia helpo al sia animo. Kelkaj stertorecaj suspiroj leviĝis de tempo al tempo el lia brusto, fine li fermis la okulojn, liaj longaj, taŭzitaj brovoj tiriĝis supren, li ekirigis sian larĝan manon al la ventro, por

trapalpi la nuksograndajn arĝentajn butonojn sur sia veŝto, kvazaŭ li divenadus per ili: „ĉu pastro… soldato… senfeligisto…” Poste laŭte li singultis du-trifoje kaj balbute ellasis tra la dentoj:

– Nu, ne gravas… ne gravas! Ili kroĉ… kroĉiĝas al mi.

Kvara ĉapitro

*Estos klarigita la mirinda forto de la vorto „*tempus*” al la leganto*

La arbaristaj kaj ministaj studentoj estas tre originalaj knaboj. Ili trovas grandan plezuron en spitado kontraŭ la mondo, socio, instruistoj kaj aktualaj ideoj, kiujn bagatelojn ili resumas kaj ignoras sub la kolektiva nocio *Wurst*, kolbaso, do indiferentaĵo.

La akademia junularo estas aparta ŝtateto, laŭmodele de germanaj studentaj societoj *Burschenschaft*; ĝi estas multrilate karikaturo de la nuna socio, sed en certa aspekto ĝi havas apartajn trajtojn. La societa spirito forĝiĝas ĉi-kaze en veran fratecan ĉenon, kvankam ne sen miskreskoj. Se studento estas arestita pro misfaro, la ceteraj pretas oferi sian vivon por liberigi lin: amase ili sieĝadas la juĝejon, ĝis la tribunalo cedas al la tempeste esprimiĝanta komuna volo – malfavore al la justeco; tiu ja ne havas gorĝon por krii, nek pugnojn por minaci, nek grundon, domon aŭ ajnan nemoveblaĵon, sekve nek influon en Selmecbánya. Se tavernestro aŭ kafejestro ne kreditas al studento, tio tuj iĝas *casus belli*, kaŭzo por milito, kaj al tiu malfeliĉulo ne restos kviete inter la antikvaj muroj de la orfruktanta urbo; li povas tuj fermi sian negocon, ĵeti ĝian ŝlosilon al la plej profunda putofundo, ĉar pri kio la „staĝantoj” juĝas „*Abzug*”, do for, tio estas mortinta por ĉiam. La kapo de ĉi tiu originala *societas* estas, kiu trinkas la plej multan bieron unuside, kaj tiu ricevas la titolon bierreĝo. La bierreĝo estas granda sinjoro kun preskaŭ senlima potenco, kiun reguligas nure la ŝtatkonsilio, konsistanta el la du plej grandaj vintrinkantoj. La impostopagantaj servutuloj, la freŝbakitoj estas la unuajaranoj, kiuj asigniĝas kiel servistoj al pli maljunaj studentoj kaj submetiĝas kun blinda obeo, ĉiu al sia „veterano”, rekompence por kio ili estas patronataj de ĉi lasta kaj ricevas sian

parton el la graco, ke la kvarajaranoj, ĝuantaj vastan reputacion, degne permesas gastigi sin el monata stipendio de tiuj; ja por la veteranoj jam ĉio estas permesata en ĉi tiu kulpa mondo: bati, frapi, frakasi, treti ĉion kaj ĉiun senpune; civila leĝo ilin ne retenas, homa forto ilin ne malhelpas, dian leĝon ili ne atentas; ili respektas nur unusolan vorton inter ĉiaj teraj potencoj.

Ĉi tiu unusola vorto estas : *tempus*[17].

Se minista staĝanto skribus *tempus* sur centforinta monbileto kaj forĵetus ĝin surstrate, eble dum pluraj tagoj neniu ĝin levus, ĉar tiu ĉi vorto signifas: „Ne tuŝu ĝin!" Kaj ve al tiu mortemulo, kiu ĝin tamen tuŝas. Se veterano diras pri freŝbakito: "*tempus* al mia freŝbakito", ĉi tiu fariĝas ekde tuj vere sakrala kaj netuŝebla persono; se sur subŝtofo de mantelo estas inke skribita *tempus*, eĉ ŝtelisto ne kuraĝas ĝin forpreni, aŭ se ĝin tamen forprenas, la sekvan tagon tremante ĝin kaŝportas returnen. Sur kio *tempus* ne videblas, estas *res nullius* [18]: se iu ĝin ŝtelas, tiu havas bonŝancon, neniu rajtas ĝin serĉi.

Sed ĉi tiu estas tre ampleksa kaj ankaŭ ne amuza afero, krome ne apartenus al nia rakonto, se mi ne devus klarigi, kial la vorto *tempus* estis ĉizita sur la geedza ringo, kiun Nikolao Mirkowszki tiris sekvatage sur la fingron de Kristino.

Li venis posttagmeze kaj trovis ŝin sola. Li estis pli pala ol kutime, la postsignoj de la nokto, tramaldormita pro la hieraŭaj okazintaĵoj vidiĝis sur lia bela vizaĝo, alivorte: lin faris pli interesa.

– Mi venis por adiaŭi, Kristino.

Kristino demetis el siaj manoj la akvumilon, el kiu ŝi aspergis la florojn kaj mirante direktis siajn grandajn, nigrajn okulojn al Nikolao.

– Kien vi iros? – ŝi demandis malrapide.

– Al Kalifornio, San-Francisko, aŭ mi ne scias, kien... En lokon, kie oni fosas oron.

– Ne ŝercu!

– Jam hieraŭ mi decidiĝis. Ne plu demandu; mi iros, Kristino, ĉar mi amas vin neesprimeble, kaj restis nur demandi, kiom...

[17] Tempus (latine): tempo. Ĉi tie: prokrasto, domaĝo, ŝirmateco.
[18] Res nullius (latine): nenies aĵo. Jura esprimo: havaĵo sen posedanto.

– Kiom da funtoj mi pezas, ĉu ne! – diris Kristino ridetante, sed ŝia rideto estis trudita, senkolora.

– Jes, tion mi devas scii antaŭ ĉio, Kristino – respondis Nikolao serioze.

– Mi pezas okdek unu... Mi sidis pasintan semajnon sur la pesilo ĉe la lama buĉisto.

– Multe, tre multe! – li ekspiris kaj aliris ŝin malrapide, prenis ŝian maneton kaj aldonis al siaj antaŭaj vortoj:

– Sed ne gravas... Unu, du funtojn pli-malpli...

Post tio li elprenis el la veŝtopoŝo arĝentan ringon, sur kiu li mem gravuris nokte la vorton *tempus*, kaj tiris ĝin sur la fingron de la knabino.

– Jen al vi, Kristino, ĉi tiu ringo! Oran mi ne povas doni, mi ne povas malŝpari oron, sed ankaŭ tia bone taŭgas por la celo: ekde ĉi tiu momento vi estas mia fianĉino. Ĉu ne vere?

La knabino balancis mute konsenton per sia bela kapo.

– Sed ĉu vi atendos min? Se dum pluraj jaroj mi ne revenus, vi ne aŭdus famon pri mi, mi ne povus skribi leteron, ĉu malgraŭe vi atendos min? Ĉar se ne, tiam... tiam, eĉ se mia koro krevos, forĵetu tiun ringon!

Anstataŭ forĵeti, Kristino levis al siaj lipoj kaj kisis ĝin.

– Mi dankas vin... – li flustris. – Dankon. Nun mi jam estas forta, nun mi jam atingos la celon. La memoro pri ĉi tiu momento akompanos min, kunestos kaj helpos. Aŭ la vera amo jam ĉesis fari miraklojn! Mi sentas, ke ne. Adiaŭ, kara... kara Kristino!

– Ne, ne, Nikolao... Eble vi ne devas for tiel rapide! Haltu! Mi parolos kun mia patro, li devas forlasi ĉi tiun strangan ideon. Ne eblas, ke vi foriros, ne eblas.

Nikolao skuis la kapon.

– Mi konas vian patron, Kristino, li estas la plej obstina homo en la mondo. Dio kun vi, ankoraŭfoje! Konservu vian amon al mi, pri vi mi zorgis, tiu ringeto retenos vin por mi...

La knabino prenis pretervole la brakon de Nikolao kaj ne ellasis ĝin longe, ĝis ŝi konsciiĝis, ke tio eble ne decas, kaj ruĝiĝinte ŝi ekflustris:

– Ho, faru, kion vi opinias ĝusta; mi amos vin ĉiam kaj atendos eter-

ne... Dio atestu por mi...

En la okuloj de Nikolao kolektiĝis larmoj, subite li forturnis la vizaĝon kaj per kuraĝa, lerta ekmovo li klinis sin malsupren al Kristino, kisis ŝiajn koralruĝajn lipojn kaj elimpetis kiel amoko tra la dompordo.

Statue ŝtonigita, senmova, per fiksitaj okuloj ŝi postrigardis lin, ekpremis la manojn alkore kaj sentis, ke la voĉo formortas, la vivofortoj rapide konsumiĝas al ŝi, simile al postsigno de spiraĵo sur klingo.

– Li foriris... – ŝi pensis plie ol diri, kaj ŝia koro tordiĝis –...li foriris, foriris! – ŝi kriis poste jam laŭte.

Skuata de ploro, ŝi falsidiĝis sur seĝo.

– Dio mia, nur nun mi sciiĝis, kiom mi amas lin. Li ja estas kiel heroj de romanoj...

Epilogo

Ekde tiu tago neniu vidis Nikolaon Mirkowszki en Selmec. Li foriris sen postsignoj, forlasante la gepatrojn, la fratinon. Dum tuta jaro famo ne venis pri tio, kie li malaperis, kien li iris, en kiun parton de ĉi tiu vasta mondo la pasio pelis lin, ĉu li vivas aŭ jam mortis.

Finfine venis letero al Kristino, kun poŝta stampaĵo el San-Francisko; ĝia enhavo estis precize la sekva:

Kara Kristino mia!

Mi vivas. Mi havas dek sep funtojn da oro, mankas nur sesdek kvar. La scio, ke fine vi estos la mia, vivigas kaj feliĉigas min. Vian respondon direktu al San-Francisko, Hotelo de Orministoj. Tien mi iros por ĝi. Nikolao.

Kristino tuj respondis:

Kara Nikolao!

Mi plu atendas vin! Mia patro estas neklinebla, mi tamen iom progresigis la aferon. De kiam vi foriris, mi manĝas nur tiom, ke mi ne mortu pro malsato. Dio mia, kiel bone fasti por vi! Hodiaŭ mi pesigis min, kaj imagu, mi maldikiĝis dek kvar funtojn dum unu jaro. Se estos tiel ankaŭ plu, al vi ne malfacilos elfosi la bezonatan kvanton dum jaro.

Ho, Dio helpu, ke vi elfosu ĝin!

Kristino.

Pasis proksimume dek jaroj, sed respondo ne venis al la letero de Kristino. Dume la maljuna Csemez mortis, kaj la bela Kristino fariĝis floranta fraŭlino, kiu jam hontetas, resti sub la pucela harbendo. Sed ja ĉiuj scias, kial ŝi ne edziniĝas! En fora lando, trans maroj ŝia fianĉo fosas oron el sablo, kaj ĉe ĉiu halto li suspiras. Ankaŭ la popolkanto tiel eternigis tion:

Li fosas plu oron,
Hej, por kio fosas?!...
De ŝia vizaĝo
Post ĉiu sablero
Rozpetal' forflosas.

Nura famo pri li estis rakonto de vagabondo, reveninta el trans la oceano, laŭ kiu li renkontis Nikolaon Mirkowszki en Brazilo, antaŭ ĉirkaŭ tri jaroj, tiam li jam havis duonkvintalon da oro.

Dio mia, se oni povus mesaĝi al li, ke jam nenio necesas, li nur venu, flugu rapide!

S-ro Csutkás kaj kavaliro Luppán estas ĉiutagaj gastoj ĉe Kristino; ili alkutimiĝis al la domo tiel, ke ankaŭ post la morto de la maljunulo ili tie kunvenadas por konversacii, snufi tabakon. Pri edziĝo, amo jam neniu el ili pensas, estus ankaŭ sensence, ja la ringo katenas la fingron de Kristino: „*Tempus* je mia fianĉino!"

Pri kiu estas dirita *tempus*, tiun neniu kuraĝas peti edzine dum ŝia vivo.

Kristino atendis de tago al tago, jen kun perdiĝanta, jen kun reviviĝanta espero.

Necerteco havas doloran, tamen dolĉan poezion.

Se la dompordo ekknaras, aŭ io ekbruas ekstere, estas eble Nikolao, nun li metas la manon sur la klinkon; se la hundeto ekgraŭlas, ankaŭ tio povas antaŭsigni la alvenon de Nikolao; se la tondilo falas el ŝia mano kaj boriĝas pinte en la plankon, kara gasto atendeblas ĉe la domo: hodiaŭ alvenos Nikolao. Se kun s-ro Csutkás, fariĝinta nun eĉ pli vortŝpara, hazarde ili elparolas samtempe la saman vorton, renkontos sin geamantoj, Dio mia, eble vere li aperos...

En tiaj okazoj s-ro Csutkás faras snufon laŭ sia sistemo kaj diras:

– Ne ekskludite! Se mi ne estus tiel maljuna, Kristino... mi irus por li, Kristino... jes, mi irus por li, kaj kaptinte je la orelo, mi rekondukus lin al vi. Ĉu vi aŭdas, Luppán, mi estas tia homo, kiu irus por li, ĉu vi aŭdas, mi irus por li! Povas esti, ke mi faros tion, Luppán. Mi faros tion.

Li klinas la kapon kaj viŝadas siajn larmojn el siaj malfortiĝintaj okuloj.

– Sed ne, ne! Mi ne povas iri, Kristino, mi ne povas lasi ilin... la knabojn... la disĉiplojn, ĉar ili kroĉiĝas... jes, jes, kroĉiĝas al mi.

Makulo tre nigra

Ne ekzistas ŝafejo, komparebla al tiu de Brezina.

Ĝi havas kalkitajn murojn, ruĝan tegmenton; la pordegon garnas plumbonajloj. En ĝia ĉirkaŭaĵo floras tulipoj. Altaj, centjaraj arboj kovras ĝin milde, ombro kaŝas ĝin garde: ĝin ne vidu ajna ventkapulo. Elstaras nur la svelta kamentubo, pipanta indiferente ĉe la fino de la konstruaĵo, kie la ŝafomastro[19] vivas kun siaj brutoj sub komuna tegmento.

Disbabilu ja la kirliĝanta fumo de tiu kamentubo, ke la fama ŝafomastro Tomaso Olej kuiras hejme ĝuste „eksterkontan viandon" en la kaldrono; tio lin ne tuŝas. Ekde la maljuna montaro Mátra tute ĝis la valo Kopanyica mastras li sola. Revemaj melodioj flaĝoletaj pludonas la kanton tra montoj kaj valoj:

Ĉe ŝafoj de Olej
Herbejo tre molas,
Kolumo arĝentas,
Tintilo orsonas.

Kaj kiam la mil brutoj paŝadas sur la rosobrila herbejo, kun la naŭ grandaj tintilŝafoj fronte, saltetante la idoj, reveme la junŝafinoj, digneserioze la cent silkolanaj virŝafoj, do se tiel kunestas la tuta grego, kaj hundo Merkuj vigle kurpelas, por kunteni ilin en rondo, la koro de Tomaso Olej ŝvelas brustoleve pro fiera plezuro, kiel tiu de reganto, antaŭ kiu defilas liaj taĉmentoj.

Vicŝafisto en bele ornamita feltmantelo akompanas la ŝafojn ĉi–flanke, dum kontraŭflanke la ŝafomastro mem postpaŝadas, tenere okulkaresante ilin, konatajn unuope, eĉ laŭkolore.

…Tiu mislerta junŝafo foje erarvagis en vepron kaj implikiĝis en neŝireblaj dornovergoj kaj klematidoj. Merkuj retrovis ĝin, brave liberigis kaj duonmortan retrenis ĝin al la grego. Saĝa hundo – meritas ne esti homo!

[19] Ŝafomastro: estro de ŝafistoj kun granda memstareco, ŝuldanta doni konton nur al la posedanto de la ŝafaro

Kaj al tiu ŝafuko[20] kun torditaj kornoj, apud tiu nigra ŝafidino, rompiĝis la maldekstra postkruro antaŭ du jaroj. Ĝi premfiksiĝis ĉe la ŝafeja pordo. Olej trudis ĝin inter tri lignopecojn kaj kuracadis la kompatindan beston tiel persiste, ke nun ĉiuj kvar kruroj montras perfekte la saman formon, kvazaŭ laŭkomande.

Tiu sendenta, maljuna patrinŝafo, kiu nun vigle skrapas la sekan falfoliaron, por satiĝi bonapetite per la herbo, kreskinta sube-kaŝe, hu, kia friponeto ĝi iam estis! Ĝi naskiĝis en tranĉe frosta nokto, krome antaŭtempe. Kiam ĉirkaŭ noktomezo la ŝafomastro enrigardis la ŝafejon, ĝi jam estis duone frostmortinta. Ĝia patrino mem malsanis kaj ne povis varmigi ĝin per sia elspiro: mankis nemulte por ĝia morto... Olej prenis la senpovan besteton, portis ĝin en la ĉambron, sed ja ankaŭ tie malvarmis, do li kuŝigis ĝin prove en la liton de la eta Anjo, inter varmajn kusenojn. La infano kaj la ŝafido dormis kune, ne sciante unu pri la alia. Matene, kiam ili vekiĝis, la infano ridetis pro la reviviĝinta besteto, kaj tiu vigle skuadis la voston. Ambaŭ ĝojis, ja nek la ridetanta infano, nek la vigla ŝafido havis patrinon.

Tiu de Anjo mortis, kiam ŝi naskiĝis. Dio disponis pri Tomaso Olej tiamaniere, ke Li prenis al si lian edzinon page por la infano, ĉar eĉ la bona Di–Sinjoro donas malofte ion senpage. Tio estis komence tre korprema interŝanĝo por li, sed li konsoliĝis, ĉar la ŝafomastro de Brezina estas homo, kiu konas la „morojn".

La Sinjoro volis tiel. Inter liaj tri sinjoroj plej potencas Dio, Lin oni ne incitu, Li havas liberan manon, atingas per ĝi la tutan mondon, batas per ĝi laŭplaĉe; sed eĉ se doloras la spuro de la bato, pacienco kuracas ĝin.

Olej estimas kiel sian sinjoron ankaŭ lian princan moŝton de Talár, al kiu li ŝuldas doni konton, al kiu apartenas la tuta Brezina kun la ŝafejo, ĉio ene kaj ekstere kaj ankoraŭ pli: ĉio ĉirkaŭe, ĝis la vido atingas. La princo de Talár estas potenca, granda homo, kiun oni forsonorigos en sepdek vilaĝoj, kiam li mortos, kaj antaŭ kiu oni demetas la ĉapelon en naŭ prefektujoj, dum li vivas. Tomaso servas lin fidele; ne saĝas ja tiu homo, kiu fortranĉas la branĉojn de la arbo, en kies ombron li retir-

[20] Ŝafuko: kastrita virŝafo.

iĝas. Kaj kio koncernas aliulojn, neniu kroma ordonas al la ŝafomastro de Brezina. Lia moŝto staras sur la propraj piedoj. Al neniu li malbonfaras, ankaŭ al li neniu malbonfaru. Tiu lia malforteto, ke de tempo al tempo kuiriĝas ŝafo en lia kaldrono, kiu ne apartenas ekde la mondokreo al lia ŝafaro, ne konsideriĝas kulpo, tio ja enestas en la naturo de pornaskitaj paŝtistoj, kion ĉiu saĝa homo scias, escepte la respektindan prefektujan administracion, kiu havas nek komprenon, nek kompetenton pri paŝtistaj moroj.

Tial ofte ekflamas diskutetoj kun ĉi tiu tria sinjoro lia, kiu ofte emas levi sin moŝto super aliuloj. Nu, sed afero negrava. Ĉiam troviĝas ja ĉe Olej por la nobeljuĝisto donacebla ŝafo, je kies beado la justico mutiĝas.

Olej ne apartenas al sentemuloj; de kiu ja lerni sentemon? Li ne kunvivis kun homoj, nur kun ŝafoj. Kaj ĉi tiuj paciencaj brutoj ne suferas je ĉi tiu malforto; por ili ĉio konvenas.

Tamen en nia heroo enestis tiu instinkto, tiu praforto, kiun Dio inokulis en la plej sovaĝajn, nekulturitajn korojn eble kun la celo, ke estu en ili io, kio instigas ilin turniĝi fojfoje al Lia vizaĝo.

Kvankam li ne pli amis Anjon ol sian ŝatatan ŝafidon, sed se Dio lasis tiun birdeton ŝarĝe sur lia kolo, li ne povis elmeti ŝin prede al lupoj sur la herbejon, do li dungis nutristinon por ŝi kaj zorgis ŝin laŭbezone. Nun ŝi jam kreskis granda knabino, mem preparas la kuminan supon kaj la ŝaffrikasaĵon, mem tajlas kaj kudras subvestojn por Olej kaj la vicŝafisto.

…Ŝi jam posedas tiom da artoj kaj lertoj kiel ŝia patrino. Nu jes, Tomaso bedaŭris sufiĉe la patrinon, kiam ŝi mortis. Estis bona edzino, Dio ripozigu ŝin en paco. Ŝi vere meritis la indan sepulton kun la trifoja sonorigado, duhora versa adiaŭigo. La homoj vivantaj transe, en la vilaĝo, kaj senĉese kverelantaj inter si, riproĉis lin, ke la „sovaĝbesto de kampoj” ne ploris super Borinjo, ili ne vidis ĉe li eĉ larmeton.

Olej ne kapablas orientiĝi pri la vilaĝaj moroj. Li ne ploris, li ja ne emis. De kie li scius, ke la deco postulas tion. La neparolemaj arboj de Brezina ne instruis lin mensogi.

Borinjo mortis, estas for, neniam ŝi revenos. La koro premiĝis al li.

Senvorte, kun malkovrita kapo li akompanis ŝin ĝis la eterna ripozejo, post la sepulto li pagis la pastron kaj la kantoron, kun amara sento premis la vastan ĉapelon sur la kapon kaj ekiris al la ruĝtegmenta ŝafejo.

Pri kio li meditis dumvoje?

Li iris sur la malnova, konata, milfoje tretata pado, tamen li ne rekonis ĝin. Li kredis vagi en fremda loko. Kie forestas la ĉirkaŭaĵo de la domo de Brezina? Ĉio staras, kiel antaŭe, la montoj vid–al-vide, la silka herbejo kun la rojo sube, la rada puto en la korto kaj la granda kripo malantaŭ la ŝafejo. Ĉio, ĉio samlokas, tamen nenio tiel kiel antaŭe... Io mankas, la ĉirkaŭaĵo de la domo tute malplenas, senhomas.

La feina Brezina estas ŝanĝita – por iu multe pli malgaja!

Ĉu li sciis, pro kio?

Kaj eĉ nun, post dek ses jaroj, kiam vento plezure portas la revemajn kantojn de Anjo el la valo en liajn orelojn, dum li kuŝas sur la deklivo de la monteto sur sia labortaga peltmantelo apud la ŝafaro, skuiĝanta pro la insektoj, foje-foje travibras flustranta, mistera voĉo tra la miriadoj de aeratomoj:

„Tomaso!...”

Ĝi venas de la arboj kaj forŝvebas inter ili. Arbustoj ektremas, ĝi traondas herbojn, kaj profundega silento sinkas post ĝi sur Brezina.

La koro de la ŝafomastro batas pli forte, li eklevas sian velkan kapon. Ĉu denove aŭdiĝos la vorto „Tomaso” per tiu konata, iama voĉo, kiun eble antaŭ dek ses jaroj forkaptis la eĥo de sur tiuj belaj, ruĝaj lipoj, kiujn la vermoj sube, en la nigra tero jam muelis en cindrokoloran polvon.

Kaj dum dek ses jaroj la eĥo de Brezina ĉiam pludonis tiun voĉon; arbaro al arbaro, rojo al rojo transŝuŝis ĝin, kiel nun, kiam ĝi same revenas el sia granda rondiro en la orelojn de Olej, en la mezon de lia koro...

Aŭ ĉu li erarus?

Ĉu la ombro de la mortinta edzino pasas inter la arboj, ĉu ŝi alparolis lin en sia dolĉa, milda voĉo? Aŭ ĉu okazas, ke tiu voĉo gravuriĝis iam en lia koro kaj ĝi nun disvolvas siajn flugilojn?

La ŝafomastro saltleviĝas, kaptas al la kapo per la manoj. La flava, granda kombilo, fiksanta liajn ĝisgenuajn harojn, glitas teren, la harondoj ektorentas sur la muskolstreĉaj ŝultroj. Tufo de ili enfiksiĝas sub la kupran bukon de la ornamita burso. Olej ne rimarkas tion. Streĉe li atentas, gvate li esploras la ĉirkaŭaĵon.

Ho jes, kiu jam ekde kvardek jaroj konversacias kun arbaroj, rokoj, nuboj, povas ekhavi ĉiaspecajn pensojn!

Eble li nur sonĝis, ke Borinjo mortis... La voĉo ja estis tute la ŝia! Nekonfuzeble ŝia. La ŝafomastro levas siajn pugnojn. Kiu aŭdacis imiti ĉi tiun voĉon?

Kaj kun ombriĝanta rigardo li ĉirkaŭgvidas la okulojn, kies bluo turniĝas en blankon.

Li vidas neniun, li aŭdas neniun.

La ŝafoj kviete paŝtadas sin, la tintilporta gvidoŝafo algapas lin fikse, kun indiferenta mieno, la vicŝafisto plezure dormas sur la herbo; la folioj sur la arboj ne moviĝas, eĉ la birdoj restas silentaj.

Kiu do alparolis Olej?

Kiu scias?

Eble mem la silento, kiun vibrigas nur abelzumo en misteran, revigan harmonion.

Ho, se iu scipovus diri, pri kio la abeloj zumas en la valo de Brezina!

Ĉu ili scias ion pri tio, ke mortintoj delonge polviĝintaj, elŝvebas el la transmondo?

La ŝafomastro reapogas sin sur la kubuto kaj enpensiĝas. Strangaj pensoj kirliĝas en li! Kiu pruntas siajn pensojn disde arboj, rokoj, falantaj rojoj kaj drivantaj nuboj, neniam malhavas da ili.

Tiu granda, profundega mistero, ŝvebanta super la majesta frunto de la Naturo, tuŝas kaj alparolas eĉ ĉi tiun sovaĝan animon, kaj tiu respondadas al Ĝi.

Vi ne kredu, ke Olej ne kutimas pensi.

Li pensadas, tamen li ne havas pensojn, ĉar ili disfluas kiel fandita plumbo.

Ili estas kirliĝanta ĥaoso, ne ricevanta formon; granda nokto, kies nigro estas lumo. Kaj ĉi tiu lumo estas la Prapoezio.

Olej kutimas pensi pri ĉio, sed kun neniu li interŝanĝas siajn pensojn. Li pensas por amuziĝo. Kaj tio neniam ŝajnas malbona distriĝo. Nur, li malgajas kelkfoje.

Maloftas tago, kiam la edzino ne rememoriĝas al li, kiam li ne memoras la efemerecon de la estado, la horon, kiam ankaŭ li elturniĝos el la vivo, iĝos muta, senmova mortinto, vokiĝos laŭ la ordo de la Naturo en la tombon kaj neniam plu revidos Brezina, nek la ruĝtegmentan ŝafejon, nek la naŭ tintilŝafojn, nek la cent silke lanajn ŝafukojn, ne havantajn al si egalajn en ĉi tiu vasta mondo. Kaj la suno ankaŭ deposte brilos, kiel nun, kaj la arbaro susuros mistere, kiel hodiaŭ, la herbo kreskos printempe, la glacio de la rojo degelos kaj reglaciiĝos, nova ŝafgeneracio ĉirkaŭsaltados vigle la konatajn arbustojn – nur ŝi neniam plu estos ĉi tie.

Kaj se ĉe ĉi tiuj tristaj pensoj la kantoj de Anjo eksonas el la valo, subite travarmigas lian animon la konscio, ke lia vivo iel tamen pludaŭros.

– Domaĝe, ke ŝi naskiĝis ne knabo – li suspiras kaj ĵetas sovaĝe la bastonon en la ŝafaron, je kio ili distimiĝas en ŝiritajn arojn.

Sentu ankaŭ ili la koleron de la ŝafomastro, kiu tiamaniere komunikas al ili siajn trankvilrabajn pensojn.

Kaj dume alia, nova kanto leviĝas per la flugiloj de la vento de malsupre, el la direkto de la ŝafejo – en slovaka popola stilo, dolore, kun revema malgajo...

Jam venas Garibaldi en la najbaran vilaĝon,
Jen rajdas kun li Klapka, aliĝas Gracza, Záhony;
Geoĉjo de Biró–oj jam selas sian ĉevalon.

Kiel envenis la politiko en la valon de Brezina, kie pasas nur birdoj? Kiu alportis la vundoŝiran memoron de pasintaj bataloj kaj esperoj? Alportis ĝin la aero. Enŝtelis ĝin en la vesto de poezio. Tiel ĝi estas gasto, volonte akceptata. Hodiaŭ ĝin kantas Anjo. Aŭskultas ĝin la birdoj de arbaroj. Morgaŭ jam ankaŭ la turdo ĝin postfajfos.

En Olej vekiĝas malnovaj memoroj, la bruo de la granda „milito”, kiam Gracza, Záhony atake elkuris el Brezina. Ili estis bravaj defend-

antoj de la patrujo... aŭ, pli ĝuste: ankaŭ nun... ĉar kvankam estas pruvite, ke ili falis per kaŝmurdaj manoj en Vadkert, dum ili fuĝis, la brava slovaka popolo reatendas ilin kun firma kredo.

Olej ne partoprenis la militon; ne eblis al li, sed li asertas, ke tio estis belaj tempoj; ĉar estas ja bone ankaŭ, se du junaj bravuloj kunmezuras la fortojn, kiom pli se du landoj...

...Se li ne estus havinta submane ĉi tiun brutaron, kies tintiloj estas tiel dolĉe vokaj, restigaj, kiel tiu de la feino en la fabelo!...

Horojn li meditas pri tio, dum la krepusko sinkas. Alvenis la tempo de ripozo por la ŝafaro. Ĝi kunpremiĝas en densan kirlon signe, ke ĝi satiĝis kaj jam volas nur remaĉi.

Ekde mateno la vicŝafisto nur nun kuraĝas alparoli la ŝafomastron:

– Mastra moŝto, ĉu vi ne aŭdas, oni sonorigas vesperon en Talár?

– Mi aŭdas. Ne babilu tiel multe! Prefere elserĉu mian plumbitan bastonon; poste ni ekiros. Mi jetis ĝin inter la bestojn.

Li denove esploras siajn ŝafojn, ĉu ĉiuj satmanĝis, neniu mankas?

Se eventuale mankus eĉ nur unu, liaj spertaj okuloj, kutimiĝintaj al mil, tuj rimarkus la malpliiĝon je unu inter naŭcent naŭdek naŭ.

Nenio malorda. Trankvile li svingas la peltmantelon sur la ŝultrojn, kaj malrapide ekiras malsupren, en la valon.

La tintiloj de la naŭ antaŭŝafoj kunsonoras en bela harmonio, ekfajfas ankaŭ la sakŝalmo de la vicŝafisto. Anjo povas aŭdi defore, ke la brutaro proksimiĝas, kaj povas meti super la fajron la bongustan ŝaffrikasaĵon, la ĉefpladon de ŝafistoj, por ke ĝi bolu ĝuste, kiam ili alvenos.

La vicŝafisto surdorsigas la sakŝalmon, kiam ili atingas en domproksimon, per esploraj okuloj rigardas al la hejmo, ĉu li vidus en la korto la konturon de tiu svelta, brila staturo, kiu image senĉese ŝvebas antaŭ li, eĉ se li fermas la okulojn. Kiom li donus, se li povus ŝteli iom el la neŝtelebla.

Anjo jam atendas ilin ekstere, kio plaĉas al Maĉjo. Kvankam, kiu scias, kial ŝi staras ekstere, eble por distriĝo, eble nur por vidi la ŝafaron.

Belega kreito de Dio ŝi estas; plezurigas la okulojn, dum ŝi tie staras: la svelta korpo estas duone forturnita, la okuloj esploras reveme la malproksimon, la laŭnature molaj manetoj estas mallevitaj, por ke

la konata maljuna ŝafo, dorminta ŝafidaĝe apud ŝi, povu alkuri kaj atingi ilin. Ĉu ĝi lekas ilin pro dankemo, amo aŭ kutimiĝo? Ĉu ĝi memoras, ke ili kundormis iam antaŭ longe, aŭ scias, kiel bongustaj estas la dommastrinaj manetoj, fosintaj en salkuvo? Kiu povus koni ĝisfunde la ŝafan filozofion?

– Bonan vesperon, Anjo! – milde alparolas Maĉjo la knabinon. – Kiel vi pasigis la tagon?

– Hodiaŭ pli bone ol hieraŭ – ŝi respondas ridetante. – Kaj viaj moŝtoj, kiel laŭdas la tagon?

– Nenio grava pri ni, hirundeto – respondas la ŝafomastro, demetinte la feltan jakon –, gravas nur, ĉu vi pretas kun la vespermanĝo.

– La ŝaffrikasaĵo jam vaporas, patro.

La vizaĝo de la ŝafomastro sereniĝas pro la vorto ŝaffrikasaĵo. Porfesta plado ĝi estas por li.

– Iru, filo Maĉjo, kirlu ĝin super la fajro, ĉar mi estas superstiĉa en tiaj aferoj kaj kredas: ŝaffrikasaĵo povas bongusti nur, se ankaŭ ŝafista mano trakirlas ĝin.

– Mi eĉ ne scias, mastra moŝto, kie estas la forno, krome mi ne lertas pri kuirado.

– Ne rezonu, filo de diablo, se mi diras... Ĉu ne ĉe la forno vi fandis plumbon kun Anjo en la nokto de Sankta Andreo, kiam via fizionomio muldiĝis en formo de fianĉo por mia filino?

– Ne tute... – diras Maĉjo ruĝiĝinte – ...tio estis nur plumba figuro kun sakŝalmo sur la dorso...

– Estis ne sakŝalmo – objĵetis Anjo –, sed...

– Sed? – stertoris Maĉjo.

– Fusilo, se vi volas scii.

Kvazaŭ ponardo pikus en la koron de Maĉjo!

Kial Anjo nomas fusilo tion, kion ĝis nun ŝi vidis sakŝalmo? Trista konjekto komencis kunpremi lian koron!...

Meĥanike li rapidis fermi la pordon de la ŝafejo post la ensvarminta ŝafaro.

La pensoj de Olej tuj returniĝis al la vespermanĝo, aŭ ankoraŭ ne apartiĝis de ĝi.

– Ĉu ni havos frikasaĵon? Nu, brave, Anjo! Oni kredus, gasto venos en la domon.

– Jes ja, venos. Baldaŭ alvenos.

– Kiu, mil diabloj?

– Tre stranga homo – respondis Anjo.

– Ĉu mi konas lin?

– Ne, ne. Speco de sinjoro, eble ĉasisto... Neniam mi vidis lin.

– Tiu devas esti ne ĉasisto, filino, sed plumknaristo en iu prefektuja kontoro. Hu, oni neniam povas resti en paco!

– Ne prefektuja sinjoro li estas, tro juna por esti tio. Lia vizaĝo blankas kiel lintolo, eble eĉ vento ankoraŭ ne tuŝis ĝin.

– Ĉu li havas fusilon? – demandis la ŝafomastro.

– Jes, li havis, kaj kian!

Maĉjo nun jam tute sobtiris la ĉapelon sur la okulojn, kaj apogis sin al la alta nigra poplo, ĉar li ekhavis tiel amaran penson, kiel la profundega infero estas; ve, tuj li kapturniĝos.

– Kuraĝa homo – murmuris Tomaso Olej –, ke li aŭdacis veni ĉasadi en la arbaroj de la princo. Se li ne estus promesinta sin gasto, mi forprenus de li la fusilon.

– Li venis ĉirkaŭ kolaziono – plubabilis Anjo. – Viaj moŝtoj povas imagi, kiel mi ektimis lin unue. Li petis lakton. Mi portis al li, por kio li donacis al mi al ĉi tiun plaĉan moneron.

– Kial vi akceptis ĝin? – indignis Olej.

– Mi diris, ke ne por mono ni donas lakton, da ĝi ja estas, dank' al Dio, sufiĉe, tamen li forgesis ĝin sur la tablorando.

– Ni redonos ĝin – diris Olej. – Dio gardu! Kion pensus la mondo pri la ŝafomastro de Brezina, se li donus lakton por mono al pasantoj.

Ĉe tio li prenis la moneron en la manojn kaj mirigite ekkriis:

– Ne estu mia nomo Olej, se ĝi ne estas ora krono! Ĉu vi scias, pri kio mi pensas? – li aldonis flustre –, tiu devas esti aŭ Gracza, aŭ Záhony. Ĉe ili mi vidis tian monon... Mil diabloj, Maĉjo, hodiaŭ estos granda festeno. Ne perdu la bonhumoron, diablido, buĉu prefere ankoraŭ unu ŝafon! Poste kuru senhezite por vino! Mi ja diras al vi, aŭ Gracza, aŭ Záhony. Li venis vidi la ŝafomastron de Brezina.

Anjo skuis ridetante la kapon. Kaj Olej kaptiĝis de entuziasmo.

– Kaj li venis ĝustaloken, li estos hejme. Mi gardos lin, kvazaŭ li sidus en la sino de sia propra patrino. El la manoj de Tomaso Olej ne elprenos lin eĉ mil ĝendarmoj. Kio? Ĉu li havas ankaŭ fusilon? Mi diris malmulte! Eĉ kvin mil ne elprenos. Sed nun jam ĉit, infanoj, eĉ muroj havas orelojn.

Anjo ankaŭ plu nekredeme skuis la kapon.

– Patro, ĉu vane mi diras al via moŝto: estis juna homo, kiu kunbabilis ĉiajn malsaĝaĵojn...

– Kiel vi povus tion prijuĝi, nazmukulino?!

– Li nomis min kampa floro, idolo de sia koro.

– Ĝuste tiel kokumas Záhony ĉiam, se li vidas jupulinon.

– Sed Záhony devas esti homo pli maljuna, patro.

– Ĉu tio estus tubero en la vero? Záhony estas granda iluziisto, laŭplaĉe ŝanĝas sian haŭton. Hodiaŭ okdek–jara maljunulo kun longa, griza barbo, kalva verto, morgaŭ jam junuleto kun lanugeto subnaze. Ĝuste je tio mi rekonas lin.

– Sed li ja diris, ke li ne konas vin.

– Nu jes, kial li dirus alion? „Diro estas spiro, aero; por kredanto sankta vero."

Por Anjo tamen malfacilis kredi, ke tiu svelta junulo identus la maljunan Záhony.

– Krome li diris ankaŭ, ke mi estas feino, kaj per forto li volis min kisi.

Maĉjo kontraŭvole levis la pugnon.

– Ĉu vere? – li stertoris obtuze.

– Li sidiĝis apud mi sur la sojlo de la porĉo kaj petege insistis tre dolĉe, ke mi permesu al li nur unufoje, unu solan fojeton brakumi mian talion, ĉar li freneziĝos, se mi ne cedos.

– Vi cedis, ĉu ne? – eksiblis Maĉjo.

– Se tiel vere li asertis, ke alie li freneziĝos?!

– Tute same kiel Záhony! – ekkriis kun plaĉo la maljunulo.

– Kaj kiam li volis kisi min, mi svingis tiel mian manon, malpuran pro la sarkado, sur lian vangon, ke la spuro certe restis sur lia delikata

vizaĝo.

– Ho, ho! – ridis la ŝafomastro. – Ĉu li ne koleriĝis?

– Li montris al mi la alian vangon, ke mi frapu ankaŭ tiun. Li diris, ke tio agrablis al li, kaj neniam li lavos sin, por ne forviŝi la frapon. Afable li adiaŭis, petante min fari bonan vespermanĝon, ĉar se li satvagos, returne li preterpasos. Sed jen, li jam venas!

Olej kaj Maĉjo turnis la okulojn en la montritan direkton. Svelta ĉasisto paŝadis malsupren sur la deklivo de la monteto, en griza kamizolo kun verdaj roversoj, en ĝisgenuaj botoj, kun sinjoreca ĉasista ekipaĵo.

– Bonan vesperon, ŝafisto! – li diris paŝinte en la korton, sen eĉ tuŝeti salute la ĉapelrandon. – Nu, ĉu pretas la vespermanĝo, kolombinjo?

– Estu bonvena – respondis Olej humorperde, parte pro tio, ke la gasto estis ne Záhony, parte ke incitis lin, ke lia titolo estis tiel ignorita. Se la atenco kontraŭ la formalaĵoj estus okazinta ne ĉe li, tio havus sekvon certe nekutiman, li ja titoliĝas ŝafomastro, do li staras super la ŝafista ordeno; krome ĉapelo sur la kapo de viro sidas, ankaŭ por esti levata salute, kiam oni pasas tra la sojlo de honestulo. Tamen oni devas ĉion ĉi gluti, se temas pri gasto.

– La vespermanĝo pretas, ni atendis nur vin – diris Anjo kaj enkuris la ĉambron.

La ŝafomastro paŝis al la gasto kaj etendis al li sian krudan, vastan manon.

– Ni eniru.

La ĉambro estis plaĉa kaj pura: tri vestokestoj kun pentritaj tulipoj en la anguloj, kelkaj benkoj, unu seĝo kaj tablo, kovrita per belaspekta tuko konsistigis ĝian meblaron. La muroj estis ornamitaj per la ĉiela patrono de paŝtistoj: portreto de Sankta Vendelino kaj per teraj patronoj: vinkruĉoj kaj brandboteloj, pendigitaj en bela aranĝo. Sed la pleja ornamo staris sur la tablo: vaporanta plado, el kiu bongusta frikasaĵo ridetis al ili.

– Bonvolu regali vin, kvazaŭ vi estus hejme – invitis la ŝafomastro la gaston, enmanigante al li la plej profundan lignokuleron. – Ĝi sufiĉos por ni tri.

– Ni estas kvar por ĝi.

– La knabino ne kalkuliĝas, sinjorido, se io restos por ŝi, bone, se ne, same bone.

La ĉasisto avide metis sin al la manĝo kaj senĉese laŭdadis ĝin.

– Tian mi ankoraŭ ne manĝis.

– Mi ja kredas. Tia frikasaĵo kiel ĉe la ŝafomastro de Brezina ne kuiriĝas eĉ ĉe la princo de Talár. La gasto ridetis.

– Se nur mi povus manĝi ĝin ĉiutage!

Je tio decis diri:

– Bone, do la samon ni manĝos ankaŭ morgaŭ.

– Mi dankas cin por la invito, mi venos.

La ŝafomastro mordis al si la lipon. Tio jam estas tro! Ciparolas al li tia junuleto, kiu estis ankoraŭ sučinfano, kiam la notario jam alparolis lin per honesta „vi”.

Ho, se li ne estus gasto!

– Vi ne nur venos, sed eĉ ne foriros hodiaŭ. Vi troviĝas ĉi tie en bona loko. Anjo pormetos al vi liton en la kamero. Kien vi nun irus, baldaŭ fulge malhelos.

– Mi ordonis venigi la kaleŝon al la ŝafejo.

– Ĉu la sinjorido estas el la regiono, se mi ne ofendas vin per la demando.

– De proksime.

– La koĉero malfacile trovos la vojon ĉi tien.

– Ne ja. Estis por li dirite: al la ŝafejo de Olej. Oni nomas cin Olej, ĉu ne?

– Mia nomo estas Tomaso Olej – diris spitfiere la mastro, elskuita el sia pacienco –, kaj mia tuta nomo estas Tomaso Olej, ŝafomastro de Brezina, kaj mi povus aldoni: ĝia sinjoro.

La gasto ridis.

– Se ci sinjoras en Brezina, oldulo, kio do restas al mi?

Ofendita, la ŝafomastro streĉis trapikajn okulojn al la ridanto, kaj kontraŭvole elglitis el li la supereca demando:

– Kiel do ni diru viajn honestajn nomon kaj titolon? Ĉar per ili ni, pekemaj mortemuloj kutimas respekti unu la alian.

– Mi estas princo Paŭlo Taláry.

Elfalis la forko el la mano de Olej, ektime li saltleviĝis kaj paliĝis. Tio estis por li grandaj vortoj. Sidas vid–al–vide al li la juna princo, ol kiu eĉ la reĝo nur je hareto pli grandas; kiu estus supozinta...

– Ho, ekscelenco... ho, princa moŝto – li balbutis timeme –, kiu supozus tion?!

– Nenio malbona, oldulo – diris la princo bonhumore –, kvankam Brezina ne apartenas al ci, ci havas trezoron pli karan, la belan Anjon.

En Maĉjo, sidanta apude ĉe la tablo, ĉiuj sangeroj glaciiĝis; li ne povus movi sin, nek elparoli unusolan vorton, eĉ se minacata per senkapigo.

– Knabino ne multe valoras, ekscelenco, plie nur kostas.

En ĉi tiu momento enpaŝis Anjo kaj metis vinon sur la tablon. Kun senĝena petolemo ŝi plenigis glason al la junulo, dirante al li:

– Kaj uzu la vinon singarde: ĝi povas facile konfuzi al vi la kapon.

– Ci jam sufiĉe konfuzis ĝin.

– Se ĝi ne estis jam pli frue konfuzita – respondis la knabino kun naiva rigardo, pro kiu la koro de la heroo de silke molaj salonoj komencis varme batadi.

– Ho, vi malfeliĉa! – riproĉis ŝin la patro. – Kiel vi aŭdacas?! Ho, ho!...

– Ba! – replikis Anjo senhezite. – Li ja ne estas farita el sukero, nek estas vicprefekto. Ni jam konas unu la alian ekde posttagmeze. Se li koleriĝas, li ankaŭ repaciĝas, se li volas.

La princo neniam sentis similan plezuron kiel nun, kiam tiel malŝataj vortoj perlis de tiuj ruĝe pufaj lipoj. Ĉi tiu rava elokvento gravuriĝis en lia koro. Li aŭskultus ĝin tra mil jaroj.

– Ĉit, knabino! Eksciu, kun kiu vi parolas. Li estas lia ekscelenco, la juna princo, nia sinjoro.

Anjo sonore ekridis. Ŝia freŝa rideto estis kiel feina tintileto.

– Oj-oj! Ĉu vi farus min azeno? Mi kretenus, se mi kredemus! La juna princo ne venadas al Brezina, eble nek al Talár. Li loĝas en urbo Vieno en nure ora palaco, cent ĉasistoj pafadas por li vespermanĝon, kaj ne li mem vagadas por leporoj en Brezina. Kaj ĉu li bezonus la frikasaĵon de Olej'oj, li vespermanĝas laktokremon kun pano, bakita el

rosmarenaj grajnoj. Krome ĉu la princo aspektus kiel ordinaruloj? Ĉu mi ne scius tion? Li ne estus princo, se li tiel aspektus.

– Pardonu, ekscelenco ĉi tiun pekeman infanon.

La ekscelenco tiom pardonis, ke li komencis vetridi kun Anjo, kiu – kredante, ke ŝi estas priridata – ŝanĝis subite sian vizaĝon ofendiĝeme riproĉa (bone konvena al ŝi), kaj elturniĝinte tra la pordo, ŝi grumbletis ion similan al: „ĉesu, ne kredu min dupo".

Sed kiam ŝi estis ekstere, tamen dubo plantiĝis en ŝia kapo. Eble tamen la princo... Eble li revenis el Vieno. Ankaŭ Anjo aŭdis de la kampogardisto Steĉjo Lapaj, ke post la morto de lia pli frua sinjoro, la maljuna princo, la sennombraj bienoj herediĝis al la princido. Ŝajnas ja ne maleble, Dio mia, kiel domaĝe, ke li estas princo: li ja povus esti ankaŭ bonhava kamparana junulo.

Tute humorperde ŝi suprenkuris sur la ŝtupetaro en la subtegmenton de la ŝafejo, por rigardi de supre al la krepuskanta pejzaĝo.

Ŝia koro kunpremiĝis. Vere, la princo! Sur la kastelo de Talár, kies brila ladtegmento ĝisvidiĝis, flirtas flago. Ŝi aŭdis de Lapaj, ke la flago anoncas al la regiono, ke la princo restadas hejme.

...Dio mizerikorda! Ŝi vangofrapis lian ekscelencon. Ŝi spitis, primokis, priridis lin. Ve, Dio la Kreinto, eble oni eĉ senkapigos ŝin!

Kun angorplena koro Anjo paŝadis sur la ŝtupetaro malsupren, cerbumante, kie kaŝi sin pro la honto – kaj ni eldiru, ankaŭ pro la timo al la princo –, kiam pompa kaleŝo haltis antaŭ la domo, kaj dum ŝi stumbladis ĝis la lasta ŝtupeto, princo Paŭlo jam staris sur la korto. Ho ve, li ne ekvidu ŝin!

Tamen li ekvidis ŝin, kaj ĉu realo aŭ miraĝo, li mem saltas al la ŝtupetaro, por mallevi kaj demeti ŝin kiel flokon sur la teron, el kio Anjo nek sentis, nek sciis ion, ĉar ĉiun ŝian senson katenis paraliza, sorĉa duonsonĝo, turmenta kaj tamen agrabla duon-maldormo.

– Ĉu nun vi jam kredas, ke mi estas la princo?

Kaj ĉe tio la belstatura junulo saltis ridante en la kaleŝon, manosvingis adiaŭe al la maljuna Olej kaj al Anjo flustris per mola, flata voĉo:

– Sed neniam mi estu princo por vi, Anjo. Kaj vi estos por mi ĉiam princino, ĉiam...

La kaleŝo brue forruliĝis, sed la adiaŭaj vortoj restis. Mirindaj vortoj! Teksitaj el flagranta fajro, ellasanta longajn flamosagojn rekte en la koron, kiuj bruligas kaj tremigas ĝin violente, kvazaŭ ili celus ĝian pereon. Sonorilo alarma estas nun la koro: senĉese eĥas la mirindajn vortojn, kaj poste ĉio ripetas ilin de unu vespero ĝis la alia... Nokte la mallumo krias, matene arbofolioj susuras ilin; la silentemaj montopintoj eksonas, la vaporo, leviĝanta el la tero suspiras ilin al la herboj, eĉ la bolanta pansupo zumas pri ili super la kraketanta forno: „kaj vi estos por mi ĉiam princino, ĉiam..."

Kaj Anjo aŭskultas tiel volonte, kion ĉio ripetas.

Tra la tuta tago ŝi estis distrita, silentema. La kantoj de Brezina ripozis. Nek Olej, nek Maĉjo aŭdis hodiaŭ la kantojn de Anjo; ankaŭ la sakŝalmo de Maĉjo mutis. Pli vera poezio regis ĉi tie hodiaŭ! For arbusto, arbaro ja venas...

La knabino pensis, kial la princo kreiĝis por ĉi tiu mondo, se li estas tiel bela, ke la turto ne povas diri al sia parulino, mi estas pli plaĉa birdo, mi havas pli brilan plumaron, mi ne povas ami vin! Ja tiel bela li estas, ke kompare ĉiuj turtoj estas samformaj.

Kaj la vicŝafisto cerbumis, kial la sakŝalmo iĝis subite fusilo sur la ŝultroj de la fianĉo, elsorĉita en la nokto de Sankta Andreo el la plumbofandaĵo...

Al la trista demando estas ĉiu signo trista respondo. Vespere, kiam li hejmenvenis kun la ŝafomastro, refoje estis la novaĵo, ke la princo preterpasis.

Kaj poste ankaŭ la sekvan tagon, trian tagon la juna moŝto ĉasadis plu en la ĉirkaŭaĵo kaj eniris al Anjo por glaso da lakto. Li devas tre ŝati ĉasaĵojn kaj lakton.

La trian tagon la maljuna Olej jam kuntiris la brovojn je ĉi tiu novaĵo kaj diris al sia vicŝafisto:

– Morgaŭ vi sola iros post la ŝafaro. La moŝto multe ĉasadas ĉi tie. Mi volas paroli kun li.

Anjo ektremis, kaj oni ne povis aŭdi de ŝi eĉ unu vorton dum la vespero.

La sekvan tagon Olej restis hejme. Dum dudek jaroj tio eble eĉ du-

foje ne okazis. La mil ŝafoj povis mediti kun bona kaŭzo, kie ilia tera prizorganto forrestas, kune kun la plumbita bastono kaj la kutimaj komandvortoj: „he vi, he” kaj „brĉ for”. Hodiaŭ la salo ne bone gustos al ili, nek la herbo iĝos pli dolĉa. Almenaŭ Olej kredis tion, kiu same enuis sen sia brutaro. Anjon li sendis fruposttagmeze kun mesaĝo al Steĉjo Lapaj, de kie ŝi povos reveni nur en malfrua vespero. Li plenŝtopis la argilan pipon per tiu malfeliĉiga planto, por kiu reĝoj kaj popoloj iras glave unuj kontraŭ aliaj, kaj kiun la ŝafisto plimultigas, kiel la printempan lanon: li tenas ĝin en malseka loko, kie ĝi ensorbas humidon kaj donas el si duoblon. Olej bruligis la pipon, kuŝiĝis dorse sur la florbrodita herbo de la korto kaj observadis la ŝafejon, ĝian belan, ruĝan tegmenton, la blankajn, ornamitajn murojn, la elstarantajn, dikmuskolajn trabojn... Longe li observis ilin, neniam li satiĝis per la vidaĵo. ...Di-sinjoro, Kreinto de la mondo, kiel sperte lerta konstruisto estis, kiu levis ĝin!

Gapante tiel, li rimarkis moviĝantan ombron sur la muro kaj ĵetinte rigardon malantaŭen, li ekvidis princon Paŭlo. Ĝuste lin Olej atendis.

Tiu direktis sin rekte al la pordo de la porĉo, sed post kiam li skuis la fermolaĉon, kaj la riglilo ne cedis, humorperde li turnis sin al la fenestro kaj ekfrapis ĝin.

– Malfermu la pordon, Anjo! Ĉu vi eble dormiĝis, bela feino, eta ŝafido mia...

La princo vane frapis, la ŝafideto ne enlasis lin, anstataŭe respondis la kruda voĉo de Olej:

– La pordo estas ŝlosita, ekscelenco. Estas mi hejme, se via princa moŝto deziras ordoni.

– Hm! Ĉu estas ci, olda Olej? Nu, kie estas Anjo?

Olej skuis sian broditan burson sur la talio, glatumis sian frunton per siaj grandaj, brunaj manoj.

– La knabino ne estas dungito de la bieno – li diris –, mi kaj unu via ŝafisto staras por la dispono de via ekscelenco: pri la knabino disponas nur mi.

Paŭlo Taláry streĉis mirantajn okulojn al Olej.

– Kion ci volas diri per tio?

La ŝafomastro paŝis tute proksimen al la grandsinjoro, kaj ekskuis

siajn pugnojn en la aero. La vastmanika ĉemizo malfermiĝis ĉe la kolo, kaj lasis vidiĝi liajn potencajn muskolojn, la vejnoj elstreĉiĝis sur lia veterhardita frunto, lia malmola, raspa voĉo fariĝis tondra, tempesta:

– Mi volas diri, ke se vi ĉasados plu ĉirkaŭ la ŝafejo, anstataŭ birdo vi eble renkontos urson, kvankam vi ŝargas vian fusilon nur per ŝroto.

Kaj ĉe ĉi tiuj vortoj li signife frapis al si la bruston per la pugnoj, kvazaŭ dirante: „tiu urso estas mi”.

La potenca sinjoro, forsonorigota en sepdek vilaĝoj postmorte kaj salutata ĉapeldemete en naŭ prefektujoj dumvive, ruĝiĝis, kiel kampa papavo; kaj starante tie, li ne sciis, kion fari, kiel respondi, kiam la ŝafomastro de Brezina fiksis al li siajn grandajn, kolersangajn okulojn. Sub la efiko de ĉi tiu rigardo, liaj kruroj komencis tremi. La fusilo, kiun li demetis de la ŝultro, eble por direkti ĝin kontraŭ Olej, same tremis.

– Ĉu ci forgesis, kun kiu ci parolas? – li balbutis.

– Mi scias, kun kiu mi parolas: kun mia sinjoro. Sed ankaŭ via ekscelenco ne forgesu, kun kiu vi parolas.

– Nu, kun kiu?

Olej levis la kapon defie kiel heroo:

– Kun la patro de tiu knabino.

Taláry kapjesis leĝere. Li ekhavis bonan ideon.

– Do bone, ŝafomastro, mi parolos kun ci, kiel decas kun patro. Mi bezonas cian filinon por ĉiu prezo.

– Kaj mi donos ŝin por neniu prezo!

– Aŭskultu min, ŝafomastro! Kiel ci opinius, se ĉi tiu ŝafejo apartenus al ci kune kun ĉiuj ĝiaj brutoj; mi donacus ĝin al ci.

Oni ne povus diri ion pli plaĉan, orelkaresan al la ŝafomastro.

La okulsorĉaj legendoj de „Mil kaj unu noktoj” estas nura vantaĵo kompare kun ĉi tiu blindige brila realaĵo! La ŝafejo kun ruĝa tegmento, la naŭ tintilŝafoj, la cent silke lanaj ŝafukoj kaj la ceteraj – ĉiuj apartenus al li, sole al li. Kiel malmulte restus kompare kun tio al la cetera mondo!

Ŝancelata, li staris tie, kiel pesilo, en kies teleron oni ĵetas tiel pezan pecon, kiu balancas ĝin dum kelkaj minutoj, eĉ se ĝi ne povas subpremi ĝin.

La princo kun ĝuo rigardis ĉi tiun esperigan balanciĝon.

– Tiel ci fariĝus vere la sinjoro de Brezina.

La ŝafomastro fikse rigardis antaŭ sin. Brilaj bildoj el la futuro pasis preter liaj spiritaj okuloj. Li havos oritan bukon sur la burso; silkan ĉemizon, kiam li eliros kun la ŝafaro; botelon kun mielbrando portos post li servisto, dungita nur por diri al li „je via sano”, ĉiufoje se li glutos el la botelo; ĉiuj homoj preterpasantaj salutos lin ĉapeldemete kaj envios lin: vidu, jen venas la ŝafomastro de Brezina, kiu havas tiom da riĉaĵoj, trezoroj, kiom ne malmultus eĉ en la monkestoj de la prusa reĝo.

Olej ekskuis sin.

Sed oni ekscios ankaŭ, kiu donis al li la amason da riĉaĵoj, kaj oni ekscios ankaŭ, kial. Kiom valoras vanta honorado, se granda nigra ombro postiras ĝin? Granda nigra ombro, tiu de la memakuzo.

– Nu, Olej, decidu!

– Ne, ne, ekscelenca moŝto, forlasu min, mi petas vin! Forlasu min, forlasu min! Mi estis honesta servisto de via patro, ne ŝutu honton sur mian grizan kapon!

– Haltu, ne trorapidu! Ne ĉiam ci trovos min en donacema humoro. Inter mil homoj troviĝus nur unu, kiu rifuzus tian proponon! Mi amas Anjon, kunprenos ŝin en Vienon, ŝi havos sorton similan al grafa fraŭlino. Ankaŭ ŝi amas min kaj venos volonte. Kial do heziti, olda Olej? Donu cian manon!

Dikaj ŝviteroj perlis de sur la vizaĝo de la maljunulo; li diris per mallaŭta, tremanta voĉo:

– Neniam!... Neniam!

– Ci estas malsaĝulo, sencerbulo. Komprenu, kion mi deziras. Nur tion, ke ci fermetu la okulojn, ne grincigu la dentojn kaj ne plenkriaĉu la mondon. Por tio mi donos al ci la ŝafejon kaj la brutojn. Nenio malpura gluiĝas al tio. Ekzemple, se mi forrabos Anjon, kompreneble, sen via scio, ci respondecos pri nenio. Tio estos nur la rado de la Sorto, al kies spokoj al ci ne eblis kroĉiĝi.

Olej forturnis la kapon.

– Kial vi do malkaŝis vian intencon – li stertoris obtuze –, anstataŭ agi sen tio...

– Bone, do mi agos sen diri – respondis la princo, returninte sin subite –, Dio benu vin!

Kaj per rapidemaj paŝoj li foriris fajfetante.

Olej ŝanceliĝis al la muro. La forto forlasis lin. Li volis krii ion post la foriranton, sed la lipoj nur mute moviĝis, voĉo ne elvenis; liaj sovaĝe turniĝantaj okuloj fiksiĝis kun nepriskribebla rigardo post la princo; teruro, naŭzo respeguliĝis en ili.

Alpremiĝante kaj apogiĝante al la muro, li ŝanceliris en la ĉambron. Lia kapo turniĝis, turmentaj pensoj kirliĝis en ĝi, kiuj, simile al rokoj, ruliĝantaj de monta kruto, iom post iom peziĝis sur lian koron, kunpremegante ĝin.

– Ve, la koliko! – li kriis stertore.

La montosuproj rediris: „Ve, la koliko". Kaj Olej sciis bone, ke tio ne veras! Oni mensogas al si.

Enirinte la ĉambron, li enlitiĝis, kredigis al si suferi je koliko. Komence li ĝemis kiel malsana sovaĝbesto, kaj kaŝinte poste sian fantomeciĝintan vizaĝon sub la kusenoj, li elpensis plifaciligon por la mildigo de siaj turmentoj: li komencis kanti.

Ĉu la ideoj, pruntitaj de la kanto, eble forpelos liajn nigrajn pensojn?

Longe li turmentiĝis en tia stato, streĉe atentante dume, ĝis li ekaŭdis la elastajn paŝojn de Anjo ekstere.

– Ŝi alvenis, vidos min! – ekkriis la maljunulo kaj saltleviĝis kiel frenezulo. Kontraŭ la lito pendis spegulo, montranta lian taŭzitan vizaĝon: li ekstaris antaŭ ĝi, rigardante sian memon per vitriĝantaj okuloj, poste subite ekmuĝis, levis la pugnojn, prenis elanon kaj frapis sur ĝin per tiel terura forto, ke ĝia vitro disruliĝis, rompita en mil pecojn.

El liaj manoj fluis sango, la okuloj elturniĝis supren; li kuŝis sen konscio sur la planko, kiam Anjo envenis kun la mesaĝo de Lapaj.

Ŝi ne povis imagi al si, kio okazis al li; rapide ŝi rekonsciigis lin per akvo kaj rekuŝigis lin en la liton. La tutan nokton li deliris, luktante kun fantasmaj monstroj, serpentoj, drakoj, kiuj mordis en lian koron, volis elŝiri lian hepaton. Ĉe la matenkrepusko li pliboniĝis, elpelis la ŝafaron kun Maĉjo, sed ne vekis Anjon, kiel kutime, pro la matenmanĝo: ili

foriris tiel, kun malplena stomako.

Estis bela somera mateno. El la serena rideto de la naturo iom donaciĝis al ĉiuj objektoj. La rosa herbo proponis sin abunde al la ŝafoj, kaj obeante, ili gaje muelis ĝin, la birdoj samgaje ĉirpadis..., unuvorte estis tiel agrabla mateno, kian poetoj prikantas, sed kiu ĉiam postrestas la realan: estas ja sole la naturo, kiun fantazio ne kapablas plibeligi, pligrandigi, ja nur pale redoni.

Estis ĉio gaja, nur Olej grumblema kaj Maĉjo mishumora. Olej ne retrovis sin dum la tuta tago. Kuŝi estis malbone, peli la ŝafojn, plekti korbon tede, iri–veni lacige, pensi, ho pensi estis turmente!

Kaj tamen maleblis eskapi la pensojn; ili ade-ree atakis, postkuris lin ĉie, antaŭgalopis en ĉiu lia okupo.

Pensoj estas impertinentaj, ne lasas diri al si: „For de ĉi tie!”

Kio okazos al Anjo? Li volis fordoni sian infanon, li Tomaso Olej, la ŝafomastro de Brezina. Por trezoro, riĉo li marĉandis je la propra sango. Neniam, neniam!

Kaj la voĉo, vaganta ekde dek sep jaroj inter la arboj, jam la trian fojon alparolis lin riproĉe: Tomaso! Tomaso!

Terure! Interfrapitaj, la tintiloj de la naŭ gvidoŝafoj, elformis la rimon: „prenis trezoron, donis honoron”.

– He, viculo, deprenu tiujn tintilojn!

Maĉjo obeis, sed ne povas imagi, kio trafis la cerbon de sia mastro.

– He, viculo, aŭdu, lasu la tintilojn: mi alipensis. Prenu vian peltmantelon! Kioma horo devas nun esti?

– La suno estas trans sia vojduono.

– Vi iros al Talár.

– Mi komprenas, mastra moŝto.

– Vi iros tie en la princan kastelon kaj diros, ke la ŝafomastro de Brezina sendas vin, kaj ke vi volas paroli kun la princo. Maĉjo streĉe atentis, retenante la spiron.

– Vi estos enkondukita. Vi stariĝos antaŭ la princo kaj diros al li laŭvorte: „Ekscelenco, la ŝafomastro de Brezina mesaĝas per mi, ke el tiu certa afero neniam io povos iĝi; rezignu pri ĝi, ekscelenca moŝto!” Ĉu vi komprenis min? Nu ek, rapidu!

Maĉjo volus pli funde kompreni, kio estas tiu certa afero, sed la fiera naturo de la ŝafomastro toleris nenian intervenon, nek demandojn. Instinkte li eksentis, ke la mesaĝo ne plaĉos al la princo, do li rapidis kun ĝi.

Estis tempo ĉirkaŭ kolaziono, kiam li revenis el Talár. Li venis spiromanke, lace, tamen fajfante. De kiu diablo li prenis ĉi tiun bonan humoron?

– Kion la princo sciigas? – demandis la ŝafomastro premvoĉe.

– Ion, preskaŭ nenion, mastra moŝto, eĉ pli malmulte ol tion.

– Ĉu vi eble ne parolis kun li? – li demandis angore la knabon.

– Ne ja – respondis tiu ĉi kun trankvila konscienco.

– Ĉu mi ne ordonis? – li ekblekis kolere.

– Se vi ordonis, se ne... hodiaŭ ĉirkaŭ tagmezo la princo forveturis Vienon, tien mi ne povis postkuri lin – novaĵumis la vicŝafisto petolete en la certa scio, porti bonan novaĵon.

La ŝafomastro diris nenion, nur la okuloj elstreĉiĝis al li, kaj la vizaĝo plipaliĝis.

Li svingis la feltmantelon sur la ŝultrojn kaj ĵetis sin kun amoka kuro malsupren.

Lia suspekto pruviĝis.

Antaŭ la domo vidiĝis freŝaj radosulkoj. Ene li trovis la ĉambron malplena.

Sur la tablo kuŝis la labortaga vesto de Anjo: la blankmakula kaptuko, la olebrila veŝto, la verda krudlina jupo kaj la galonita, foruzita flava lanjako. Sur la lanjako kuŝis malfaldita skribaĵo kun la blazona sigelo de la princo de Talár: leono kun glavo interdente. La donacletero pri la ŝafejo kaj la grego.

Kvazaŭ ponardo estus puŝita en la koron de la ŝafomastro, kiam li ĉion ĉi ekvidis. Ĉion li divenis, ĉion li komprenis. La memakuzo estas eltrovema vojmontrilo! La princo agis, kiel li sugestis: li mem agis – kaj fulmorapide.

La maljunulo glatumis sian frunton per la mano, ĉirkaŭrigardis hezite kaj komencis voki senespere:

– Anjo! Anjo!

Kvankam li sciis, ke respondo venos de nenie. Kie for jam Anjo veturas! Trajno flugigas ŝin al urbo Vieno.

Vokadinte ĝisneplu, li abrupte silentiĝis: la tristo kaj senesperiĝo malaperis de lia pala vizaĝo, ĝi iĝis sombra, spita. Li eliris antaŭ la pordon, sidiĝis sur la sojlo, kaj plenŝtopinte sian pipon, nubigis la fumon tiel flegme, kvazaŭ li meditus maksimume nur pri tio, ĉu morgaŭ pluvos aŭ ne.

Foje li subite ekstaris kaj suprenminacis per la fingro al la ĉielo.

– Aŭdu, Dio! Mi ankoraŭ montros ion al vi hodiaŭ!

Post tio li residiĝis kaj fumis seninterrompe, kvazaŭ li havus nenion alian por fari.

Li leviĝis nur, kiam sub la gvido de Maĉjo la ŝafaro ensvarmis la korton.

– Bone, ke vi venas, filo mia – li parolis al la vicŝafisto tiel afable kiel neniam antaŭe. – Ene sur la tablo kuŝas urĝa skribaĵo, kiun vi devas tuj porti al la sinjoro administristo en Talár; li sendu ĝin post la ekscelencan moŝton, sed li ne sigelu ĝin, atendu ĝis morgaŭ. Morgaŭ li havos ankoraŭ ion por alskribi.

– Tuj mi eniros por ĝi, mastra moŝto.

– Ne penu, mi mem elportos ĝin.

– Sed permesu al mi almenaŭ peti iom da kuiraĵo de Anjo.

– Ne zorgu pri tio. Jen mono, manĝu, trinku dumvoje!

Maĉjo balancis la kapon. Kio okazis ene, ke la maljunulo ne enlasas lin? Certe pro Anjo. Ĉu eble ŝi dormas? Ĉu eble ŝi ploras? Tiel bone varmigus Maĉjon vidi ŝin almenaŭ por minuteto... kiel ŝi aspektas. Li vidas ŝin ĉiutage, ŝi ĉiam ŝvebas antaŭ li, tamen li forgesas ŝian aspekton. Ho, kiel amo strangas!

Nu egale, ŝi nur konsumiĝu hodiaŭ pro la forveturo de la princo, morgaŭ, postmorgaŭ ŝia amo returniĝos al li. Denove aperos sakŝalmo sur la ŝultro de la muldita plumbofiguro...

Maĉjo ekiris en bona humoro kun la dokumento, postlasita de la princo. Olej rigardis post li kun krucitaj brakoj, ĝis tiu malaperis, nur poste li turnis sin en la ŝafejon.

Laŭvice li preteriris siajn ŝatatajn ŝafojn, ie-tie li haltis antaŭ kelkaj, murmuris al ili nekompreneblajn duonvortojn; fine ankaŭ ĉi tiuj duon-

vortoj perdiĝis en la erupcianta, skuanta ploro.

La ŝafomastro de Brezina ploris kiel infano.

Profunde li tiris la ĉapelon sur la okulojn, por vidi nenion el sub ĝi, tiel li eliris tra la ŝafeja pordo. Elveninte, dufoje li turnis la ŝlosilon en la seruro, kiel ĉiam por nokto, sed kion antaŭe neniam li faris, li paŝis rekte al la puto apud la trogo kaj ĵetis la ŝlosilon kun laŭta suspiro en la puton.

Kaj nun li metis sin vere al laboro, kvankam jam krepuskiĝis. Sur la korto troviĝis stako da sekaj kanoj; li disportis ilin kun streĉa hasto, starigante ilin ĉirkaŭ la ŝafejo, kompakte, dike.

Kaj preparinte ĉion, li surmetis sian festan feltmantelon kaj bruligis la kanon en almenaŭ ses punktoj: kaj suprenirinte sur la ŝtupetaro, ĵetis grandan brulantan garbon en la subtegmenton, plenan de furaĝo.

La vento avide kaptis al la gaje flagrantaj flamoj kaj kreskigis ilin gigantaj dum minutoj.

Kaj la ŝafomastro de Brezina ekkuris tra montoj kaj valoj, sen celo kaj direkto, sen eĉ foje rerigardi... Ja kial? Li bone scias, kio okazas. Kie li kuras, la arbaro heliĝas kiel plentage. Kaj pli fore, kie la fajrolumo ne povas penetri tra la arbardenso, descendas iaj miraklaj, vermoformaj bestetoj el la alto sur lian vizaĝon kaj pinĉas, jukas... Unu li kaptas dumkure, prenas en la manon por ekzameni... Estis ne vermo, sed nigra fulgo, ĝisportita de la vento el la brulanta ŝafejo de Brezina...

Kaj la ŝafomastro de Brezina kuras kaj kuras. Nur la mizerikorda Dio scias, kie li haltos...

Hejmenveninte kun la matena krepusko, Maĉjo trovis nenie la ŝafejon de Brezina, nur grandan fumantan makulon ĝialoke.

Garbe falintaj traboj, kuŝiĝintaj muroj, nigriĝintaj ostoj... Ĉu tiu osto apartenis iam al homo aŭ besto?

La granda, konsterna enigmo, frapinta la vicŝafiston, kunpremis al li la koron.

Li vokadis pernome Anjon kaj la ŝafomastron.

Respondis neniu.

„Dio mia, kie ili devas esti?”

La krepitantaj fajreroj, fojfoje ekbrilantaj sub la cindro, ne donis res-

pondon.

Kaj ekde tiam la valo de Brezina kuŝas en silento, ĝia grasa herbo tretiĝas nek de homo, nek de bruto; jaroj venas, iras, la sovaĝa pirarbo kreskigas kaj faligas siajn fruktojn, la herbo elkreskas kaj denove sekiĝas, nur unu nigra makulo neniam reverdiĝas. Kiu scias, kial? Ankaŭ la priplora kanto diras nur tiom alude:

Fulgas sur Brezina, makulo tre nigra,
Loko iama de ŝafejo enigma.

Lapaj, la fama sakŝalmisto

Nia fajrujfonda slovaka kunfrato trancas al si ok pecojn da unu- kaj duonklaftaj brancoj, pintigas ĉiujn ambaŭfine kaj pikas ilin laŭvice en la teron en distanco de unu kaj duono da spanoj, ricevante tiel la framon de sia estonta loĝloko. Sur la supro de la duonronde starantaj brancoj li ligas per ŝnuro trairantan avelvergon por kuntenilo, kiu aspektas tute tiel, kiel la dorsospino, servanta por la kunteno de la ripoj. Nun li kovras la primitivan konstruon per frondoj, herbaco, humida herbo, ĝiajn flankojn subŝtofas per verda maizo, sur ĝian kliniĝantan dorson fiksas fumumitan, acan pajlotufon kiel banton, kaj pretas la polica palaco.

Ĝi regas kun timiga efiko, esprimanta ofican aŭtoritaton, super la kamparo, ĉiu pia kristana animo, klopodanta en bona aŭ malbona afero, kun inda respekto kaj konsterno preterpasas ĝin, car ĝi estas la „unua forumo" de la venĝo al malicaĵoj, kies eksteraĵo malkaŝas, ke eĉ se ĝi estas iom malpli granda ol la prefektejo, ĝi laŭas ties aspekton, originas el la sama sango.

Sed vera majesto, povo nur tiam radias el la kampogardista kabano, se granda ronda makulo nigras antaŭ ĝi signe de la ĉeesto de la puna justico, kies personiganto, Steĉjo Lapaj, la fama sakŝalmisto bakas terpomojn ĉe la ekflagranta brancetaĵa fajro kaj kelkfoje iom da „nemezurita" viando, la emon al kiu li heredis de la prauloj, siaj ŝafistaj antaŭuloj.

Eĉ pli emfaza estas la efiko, se la granda nodohava bastono, la insigno de la povo estas apogita al la flanko de la „palaco", aŭ se por fortimigo de ĉiuj ankaŭ la kruddrapa, ruĝe borderita mantelo pendas ekstere sur la fasado, car en ĉi tiu kazo estas preskaŭ sendube, ke la kampogardisto, la aglookula Steĉjo ripozas ene, kaj tra la breĉoj li elvidas al la kamparo, per unu okulo orienten, per la alia okcidenten. Kelkfoje eĉ leporoj ne aŭdacas preterpasi!

Povas esti, ne maleblas ankaŭ tio, ke la tuta afero estas nur fia ruzo, kaj dum ĉi tie la drapmantelo kaj la bastono gardas la regionon, ilia mastro, la fama Lapaj aventuras alidirekte, car lia oficiala agosfero

estas vere vasta kaj disetendiĝa, kaj bezonatas aparta arto por evoluigi ĝin al tia perfekteco kiel li, kiu konas ĉiujn lertojn kaj spertojn de sia metio, kiun li devas ofte plenumi tiel, ke li multobligas sin.

Lia panakiro ja ne estas afero por ŝerco; li brave perlaboras sian panon, kaj se ŝvitanta laboristo envie rigardas, ke Steĉjo Lapaj, kuŝante surventre, gapas al la suno, li certe ne pensas pri tio, ke por lia moŝto la ordo de la mondo estas inversigita, ja kion filo de alia homo dediĉas al ripoziga trankvilo, do la nokto, por li estas lia maltrankviliganto.

Liaj oficaj horoj komenciĝas vespere. La tuta naturo dormas, li devas esti maldorma. Meditiga silento sidas sur la kamparo. La maljuna Fátra morne rigardas malsupren per siaj lumaj okuloj, la brilantaj paŝtistaj fajroj en la nokto, kaj nuboj descendas, kvazaŭ ili volus soblasi nevideblan mantelon sur la nukon de la ŝtelistoj, dum la ondoj de la pitoreska rivero Garam sube en la valo suspekte babilas: „Lapaj ne vidas nun. Bum, bum, bum, vi povas ŝteli nun, nun, nun!”

Tamen ili ne pravas: Lapaj tiatempe vidas plej akre.

Li kaŭras ekstere antaŭ la pordo. Pro politikaj konsideroj li estingis la fajron. Fajro estas malbona aliancano de la ordotenado: oni vidas lin de malproksime, se la fajro lumigas lian figuron, kaj li eĉ proksimen ne vidas pro ĝi. Fajron li toleras tiatempe nur en *zapeĉka*, sia pipo. Tie ĝi estas sialoke, por lukti kun la damnite humida tabako, kiun li kutimas miksi kun velkaj terpomtigoj, ĉar estas ja brava afero, se saĝa homo faras tiel senvaloran planton „hungara reĝa tabako”[21]. Krome tiel ĝi bone gustas. Fumo, fumo! Lapaj havas nenion kontraŭ ĝi, kun plezuro li suĉas ĝin, kaj liaj okuloj reveme postsekvas la krispajn fumrondojn, ĝis ili povas, dum tiuj flugas en la grandan nenion, kaj kroĉiĝas al la nuboj. Ĝis mateno ili fariĝos roso.

La mutecon nur kelkfoje interrompas la voĉo de siaj kolegoj, alportitaj per ventoflugiloj el la vilaĝo, do bojado de hundoj kaj kokerikado de kokoj. Tiuj gardas la vilaĝon, li la kamparon. Lapaj estas ilia bona konato, kaj oni povus veti per du kontraŭ unu, ke li preskaŭ komprenas ilin. Li almenaŭ konas ilian voĉon, sciante, ke Viszkocs de Mátyás Svarka estas la alparolanto aŭ Ulan de Marci Lipták. Ankaŭ rilate al la

[21] Reĝa, do ŝtata monopolo.

koka generacio la afero simile statas: eĉ en ĉi tiu rigardo la dudek-dujara sperto (dum kiu li vigilas, superrigardante la kamparon) pridonacis lin per la malkaŝo de ĉiam precize funkcianta horloĝo.

La unua koko, kutime tiu de la s-ro rektoro, komencas la kantadon jam je la dek-unua horo (kaj havas pli bonan gorĝon ol ĝia mastro), eble ĉar ĝi estas la plej malsata en la vilaĝo; ĝi rapidas forkrii la noktomezon, ĝi havas longan tempon ĝis la matenmanĝo kaj kredas la fola, ke tiel ĝi pli rapide alvenos. Post ĝi transprenas la vorton la vjetnamaj kortobirdoj de la sinjorina moŝto, vidvino de la administranto precize je la dek-unua kaj duono. La koko de la pastora moŝto estas la plej akurata, ĝi kokerikas ĉe noktomezo, kvazaŭ laŭ komando; estas facile al ĝi, antaŭ ĝia beko estas la turhorloĝo, ĝi povas legi la tempon. Post la eklezio tiuj de la ordinaraj fideluloj krias en la nokton, kelkaj maldike, kelkaj dike, kelkaj per tute necizelita voĉo, kiujn Lapaj ĉiufoje kapablas diferencigi, kvazaŭ li estus individue konanto de ĉiu.

Ĝi estas heredita arto, transdonata de generacio al generacio. La avo de Lapaj estis ĉefpaŝtisto en la ŝafejo de Hlina, kiu en la mondo de paŝtistoj estas almenaŭ tiel alta rango kiel la prefekteco en la ordinara vivo; ĉi tiu statuso de la antaŭulo ĵetas favoran lumon de la patro al la filo kaj nepo. Lia patro trafis el pluvo al kuvo: li fariĝis simpla paŝtisto, sed ankaŭ li vivis ekstere en la naturo kaj ellernis ĝiajn sekretojn, kutimiĝis al ĝiaj mildaj loĝantoj, la bestoj; li apartenis plie al ili ol al la homoj. Amasego da ŝafoj estis sub lia mano, samformaj bestoj kun senesprima vizaĝo, kiujn ne diferencigas aliaj vizaĝkoloroj, diversaj fruntoj, propreca sinteno, karakteriza voĉo, ili ja estas kreitaj laŭ la bildo de unu de la alia kiel la folioj de trifolio. Ne ekzistas tia akademiano, kies scienco kapablus orientiĝi: kiu estas unu, kiu la alia; male, paŝtisto konas ĉiujn, liaj okuloj penetras ĝis la kaŝitaj trajtoj, kiujn ordinarulo ne kapablas okulkapti, multe malpli ekkoni, kiel ŝafisto, kiu aparte konas ĉiun sian ŝafon, eĉ se miksutan en ajne grandega fremda grego; krome kaj krone li konas generaciojn, memoras patrinojn kaj avinojn. Mi kredus tion fabelo, se mi ne estus tiomfoje konvinkita pri tio.

Lapaj heredis de siaj prauloj sian akran observokapablon, kaj eĉ se

li deglitis de la aristokrata ŝafista kariero, li utiligas ĝin ankaŭ kiel kampogardisto. Granda heredaĵo estas por li, ke lia patrino estas la naturo kaj liaj plej proksimaj parencoj la bestoj. Tiu ne estas por li vicpatrino, kaj ĉi tiuj estas pli bonaj ol la homoj. Almenaŭ bestoj estas tiaj, kiaj ili montras sin, oni povas ilin ekkoni, sur sia haŭto ili portas siajn ecojn.

Ĉevalo dismordas, aĉe distretas brasikojn, se ĝi estas lasata libere inter ili; hundo kiel filozofo travagas aŭtune la ĝardenon kaj faras kelkfoje grandan damaĝon en la ĵaluze gardata fruktoĝardeno; bovo, bovido rekte kuras al luzernokampo, kvankam ili pufiĝas de tio, anstataŭ peli sin por la bongusta furaĝmaizo (nu, tial ĝi estas bovo, la kompatinda); la pli sciencama porko prospektoras inter la sekretoj de la tero, kaj prosperas pli facile, ĉar la ŝlemila terpomo elŝovas foliriĉajn tigojn por sia pereo.

Kaj dum pri bestoj antaŭscieblas, kion ili turnas en la kapo, kaj ili montras sin aperte, pelataj de siaj instinktoj, la plej danĝera homo proksimiĝas embuske, kun fia ruzo, kaŝrigardante la foreston de Lapaj, misuzante lian sonĝon, malhelon, aŭtunajn nebulojn, kaj kion liaj du okuloj vidas tiafoje, por tio li etendas ambaŭ siajn manojn.

La homon oni ne povas ekkoni. Li venas kun agrabla vizaĝo, deziras di-benitan bonan vesperon al Lapaj, regalas lin per tabako, lasas fari al li tiron el sia brandbotelo, kaj Steĉjo jam kredus, nu, tiun kondukis al li amikeco, sed post mallonga tempo Lapaj malkaŝas, ke la plej bela brasikokapo kreskigis piedojn, kaj ankaŭ tiu grandega bak-matura kukurbo, fiero de la kamparo, sur kiu la sinjorina moŝto ĉizis per trikilo sian nomon, emis postiri la brasikon.

Ĉu do mirigas, ke li ne ŝatas la homojn? Kun kaŭzo li estas suspektema, malfidema; li ne estis, eble neniam estos kun ili en pli strikta kontakto. Apenaŭ mi komprenas, kiel kaj de kiu li ellernis paroli, kaj multe malpli, ke li intertempe ne forgesis la parolon.

Sed pri kio li parolus, eĉ se li havus por tio okazon? Li havas nek ĝojojn, nek dolorojn, sekve nek pensojn, al kiuj li volus doni esprimiĝon. Ja jam la tuta slovaka gento estas pli malvarma, pli senpasia, pli sensentema ol la hungararo. Tio neniel mirigas. Pli malvarma pejzaĝo naskas ilin, la suno pli malfrue leviĝas por ili, pli frue ĝi subiras, kaj eĉ

ĉirkaŭ tagmezo ĝi velke varmigas, kvazaŭ ĝi ne farus tion volonte. La naturo jam konas ilin kaj ne ofendiĝas proe, sed bele adaptiĝas al ili.

Iliajn fruktojn: la juglandon kaj avelon ĝi fermas en malmola ŝelo; ilian teron plenkovras per ŝtonoj, por ke ĝi neniam povu vere rideti kaj ne povu vesti sin en tute gaja festa robo; da serena ĉielo al ili haviĝas nur tute malgranda peco: la ceteron forfermas antaŭ ili la mornaj, neĝkovritaj rokoj.

La ventojn, tempestojn ĝi retenas en Fátra, kaj se ĝi ellasas ilin, ties spiro ilin trafas unue; la printempon ĝi alportas somere, la someron neniam, sed anstataŭe sendas sur ilin la vintron, kiam ĝin ankoraŭ neniu bezonas. Por ili ĉio estas bona, ili estas pri ĉio kontentaj. Ili estas silentema, pacienca popolo.

Ĉio simias la petolajn kapricojn de la naturo. Spikoj ne plenkreskas, duone pli malgrandas ol sur la kaĵolataj grandebenaĵaj kampoj, kaj kreskigas tiel etajn, melankoliajn kaj malmolajn grajnojn, kvazaŭ ili mem ne volus fariĝi aliaj ol brano; la brasikoj konstruas etaĝojn el siaj folioj, anstataŭ bele kunfermiĝi, kaj ne ekzistas potenco, kiu elsaltigus ilin el ilia filika stato; piroj kaj pomoj sovaĝiĝas, kaj pro ilia gusto pensas pri Siberio tiu, kiu mordas en ilin.

Eĉ ilia ampoezio, kiu freŝe sonas ĉe ĉiu popolo tra ĉiu monto kaj valo, kiu mondvaste estas varmega kiel fajro, raviga kiel florodoro, ĉe ili estas acerba, senkolora kaj stranga:

Mi sidis ĉe la flanko de mia amatino,
Niaj koroj komencis bati, niaj vangoj ekbruli,
Kaj jam estus ŝmaconta la unua ĉarma kiso,
Sed ĉi-momente mia pipo estingiĝis,
kaj mi devis foriri, por plenŝtopi ĝin.

Kaj ĉi tiu estas ne ia ŝerca, humura versaĵo, sed kanto kun malgaja, melankolia melodio. La fraŭlo priploras kun tempesta doloro la kruelan manon de la fato, kiu neniigis la dolĉan momenton, estinginte en lia *zapeĉka* la spiron, sen kiu neniu feliĉo estas perfekta en ĉi tiu mondo.

Kiel bele, kiel kortuŝe scipovis Steĉjo Lapaj sakŝalmi ĉi tiun kanton! Kvankam li eĉ tion ne trasentas. Li amis neniam ajnulon. Knabina vizaĝo ne havis efikon sur lin en la tera vivo. Li ne memoris, ĉu lia koro (se ĝi ekzistas) iam ekmovis sin, batadis pli rapide, kvankam li ja havis sufiĉe da okazoj por tio, ĉar li sakŝalmas en ĉiu iom signifa nuptofesteno province. La plandoj de multaj belulinoj jam tikliĝis de liaj famaj kantoj.

Kie li ellernis ilin sonigi tiel triste, tiel dolĉe dolore, tiel silke mole, tempeste gaje, ke kiu aŭdas ilin, ties koro krevas pro doloro; tamen ĝi ne krevas, prefere fandiĝas, iĝas vakso, kaj mirindaj feinaj sentoj premiĝas en ĝin... poste eĉ pli ĝi disfluas, nun ĝi estas jam ne vakso sed fluanta mielo, dolĉa pro la sakŝalma sono, kaj tuj fariĝanta amara, se Lapaj triste blovas la sakŝalmon, ĝuste kiel la mielo, se falas en ĝin ero da veneno.

Kiu estis la mastro de la naturfilo, ne konversacianta kun homoj? Ĉu eble lia propra koro instruis lin? Ne. Tiu estas indiferenta, fremda. Rokoj, montoj, valoj rigardas mute al li, kiel li al ili; tiuj ne instruis lin. Lia silentema publiko: la brasikaj kapoj kaj maizaj tigoj ne instigis lin per siaj aplaŭdoj. Kie, de kiu li do gajnis la povon de la sakŝalmado? La junpaŝtisto, kiu montris al li en lia infanaĝo la prenojn sur la origina muzikilo, estis ankaŭ mem amatoro, kaj alia ne troviĝas larĝe-vaste en la ĉirkaŭaĵo, kiu kompetentus pri ĉi tiu arto; Hikszum loĝas en Nógrád ĉe la piedo de la montaro, kaj Petrus ie en Nyitra.

Krome Steĉjo neniam forlasis sian regionon, escepte antaŭ longe, en sia junaĝo, dum siaj hezitoj elekti profesion; ankaŭ lin kaptis la febro de la nacia alvokiĝo, kiu konsistis en tio, ke en la lukto de rompiĝemaj fizikaj korpoj kontraŭ la pasemo li stariĝis al la flanko de la pli malfortaj, kaj pere de dratriparado de vazoj li helpis spiti la faton (cetera ribelemo ja ne troviĝas en la slovaka popolo). Steĉjo en ĉi tiu kariero forvagadis malproksimen en la mondo, sed post duonjaro li tediĝis de la laŭdinda metio, dotanta ankaŭ senanimajn argilobjektojn per la granda ideo de senmorteco, kaj veninte hejmen, li okupis la ĝuste vakiĝintan kampogardan oficon.

Li mem ne eme mencias sian vojon trans montoj kaj maroj, sed la

pastora moŝto, kiu, estante vera luterano, kolektis en fremda lando, inter mondfamaj prusaj popoloj tiun amason da bibliaj kaj ceteraj saĝaĵoj, kiujn nun ĉiudimanĉe li lasas faladi po eroj inter la piaj fideluloj, ofte rakontas, ke dum foje, post dujara foresto li pasis en la stratoj de Berlino, revante pri la hejma lando, liaj ĝoje ekbrilantaj okuloj malkaŝis malpuraĉan samvilaĝanon, sian infanaĝan kunludanton Lapaj kun milobla dratringaro sur la brako, larĝa, kuprobuka rimeno sur la talio.

– Ĉu estas vi, ĉu vere estas vi, karega Steĉjo? – li kriis, falinte ĉirkaŭ la kolon de la vazriparisto, veninta el lia lando, sur kies sandaloj eble ankoraŭ restis iom da hejma polvo.

Lapaj indiferente malvolvis sin el liaj brakoj.

– Ĝuste, Steĉjo mi estas, nu kaj? – kaj li senplie marŝis plu, sentante eĉ ne eron da surprizo, ĝojo pro la renkontiĝo.

– Lapaj! Lapaj! Haltu do! Ĉu vi ne rekonas min?

Je tio (laŭ la prezento de la pastora moŝto) nia heroo tamen returnis sin kaj replikis kun incitita voĉo:

– Ej nu! Kion vi volas? Vi estas la studenta filo de la pastora moŝto. Ĉu vi havas eble ion por dratumi?

Ĉiufoje, kiam la pastora moŝto komencas rakonti la epizodon, kio tre ofte okazas al li, ĉar, Dio mia, tiel malmulte ja okazas al homo, kiun la „montoj glutis” (ĉi tiun esprimon li uzas por karakterizi la faton, kiu enterigis lian vastan sciencon en ĉi tiu malriĉa, mondranda slovaka paroĥo), do ĉiufoje, kiam li rakontas la epizodon, li deviĝas resti ĉe tio, kio jam antaŭ longe estis okazinta; kaj ĉar krom ĝi la memoro de junaĝa bubaĵo, brava interbatiĝo, onidire kun lia partopreno kaj trie lia konatiĝo, okazinta en mirinda maniero kun la pastroedzina moŝto konsistigas la kernon kaj la ĉefajn momentojn de lia vivo, kaj ĉar la naturo patrino benis lin per abundparolemo meritanta pli bonan sorton depost la tempo, kiam li eliris el sub la devo de la lerneja lecionrecitado, ne eblas miri, ke la rakontado de ĉi tiu anekdoto tiel ofte okazas en lia societo kiel ofte legeblas certaj teditaj pladoj sur la manĝokartoj de kelkaj gastejoj. Tio akcepteblas de li des pli, ke ĉi tiu lia anekdoto estas maldensigita en animpastora suko por la edifo de la fideluloj, kaj akompanata de la klarigo, ke en la slovaka popolo ne estas pli teneraj

sentoj, kaj mankas altiriĝo al la propra naskolando, kaj ke Lapaj estas misnaskito, peco da ligno, kiu ne havas sentojn, kaj nur pro tio li ŝajnas esti kreita en la mondon, por ke je unu vastranda ĉapelo pli vendiĝu en la dek-naŭa jarcento.

Malgraŭ ĉio li amas Lapaj, kaj vintre, kiam la naturo patrino fermas post si la pordon, kaj Lapaj restas eksterporde, li havas loĝejon en la tiatempe forlasita paroĥa muelejo, situanta en malproksima kampobieno. La pastora moŝto disponigas ĝin, por kio Lapaj ŝuldas gardi la muelejon ĝis printempo; kaj la arbaro donas materialon por okupiĝo: por korbo- kaj abelujplektado, skulptado de ŝoveliloj kaj rastiloj.

Teda loĝejo, umada laboro! Homo malofte pasas preter tiu loko, lupoj des pli. Pleje ĉirkaŭ karnavalo trafas tien kelkaj samteranoj, por marĉandi pri sakŝalmado, aktuala ĉe la domoj pro nuptofestenoj.

Multe ankaŭ tiafoje oni ne muelas la vortojn. La arto de Lapaj havas fiksan prezon, el kiu li cedas neniom. Kvaronfunto da tabako, kruĉo da rekrementa brando ĉirkaŭ vespero, litrono da miela prunbrando ĉirkaŭ noktomezo kaj kvarto da frumatene, eblo manĝi ĝisgorĝe, kontante ok groŝoj. Ne malmulte, sed ankaŭ ne multe, precipe se iom ni disrigardas en la mondo. Jen estas ekzemple Hikszum, la sakŝalmisto de Kékkő! Ne malpli ol barono Balassa igis pentri lin kune kun liaj sakŝalmo kaj bastoŝuoj per pentristo, venigita el Italio, kaj lia bildo estas pendigita en la palaca salono inter tiuj de palatinoj, prefektoj, kaj li estas pagata per oro. Kaj alian mondfaman sakŝalmiston Petrus la grafo de Nyitra provizas per ĉio, li havas tian sorton, ke li banigas en vino, graso estas lia manĝo, fandita butero lia trinkaĵo (kian vivmanieron eĉ la slovaka fantazio promesas nur en la estonta vivo por bonmoruloj).

Kaj Lapaj estas pli granda, pli fama ol ili ambaŭ. Li ne scias tion, sed ĉiuj aliaj scias, ĉar la du grandaj sakŝalmistoj, kiel la popolo rakontas, pelataj de vanteco kaj ĵaluzo el la sepa prefektujo pseŭdoveste vizitis iun nokton Lapaj en lia kabano, pagante ok groŝojn por unu kanto, por ekscii, ĉu li estas vere tiel brava kiel lia famo.

Steĉjo blovis melankolie, dolĉe dolore la plej tristan kanton de la montoj, eĉ la luno haltis sur la ĉielvolbo, por aŭskulti ĝin; ebriaj pro

plezuro, eĉ la ondoj de la maljuna rivero ĉesis plaŭdi, babili, por ne ĝeni lin:

Ho, trista ŝafejo
Supre, en montneĝo:
Ŝafar' estas manka,
Ŝafisto en ĉeno.

Hikszum ne ĝisatendis la finon de la kanto, pro honto li elkuris en la mondon kaj li ĉiam plu kuras, se dume li ne laciĝis; kaj Petrus ekploris kiel infano, kaj apenaŭ reveninte en la vilaĝon, kie li lasis sian sakŝalmon, lia unua farendo estis preni poŝtranĉilon kaj disfendi sian instrumenton, akiritan al li grandan gloron, ĉar post kiam li aŭdis Lapaj, ĝi iĝis nun jam nur mizera zumfero en liaj okuloj.

En sia granda malesperiĝo li demandis etajn kaj grandajn, kie Lapaj lernis, de kiu li lernis sian arton. Eĉ se li vivos ĝis tiam, eĉ se liaj kruroj eluziĝos ĝisgenue, eĉ se lia instrumastro loĝas ĉe la rando de la mondo, li vizitos lin, por ellerni eĉ pli bone la lertojn de la sakŝalma ludo, por atingi Lapaj.

Sed pri tio neniu scipovis informi, vanis ĉia cerbumado, divenado. Fine la publika opinio venis al interkonsento pri tio, ke en la sakŝalmo kaŝiĝas la miraklofara, sorĉa forto. La sakŝalmo estas la mortaj restaĵoj de nigralana ŝafo. Troviĝas, kiuj konis ĝin el ĝia ŝafidaĝo. En la nokto de Sankta Luciino, ĝuste ĉirkaŭ noktomezo fulgonigra ŝafideto vojerarinta enŝteliĝis mekante inter la gregon de la forpasinta Lapaj, kiu donacis ĝin al sia filo Steĉjo en la piafekta patra kredo, ke ja retroviĝos ĝia mastro. Steĉjo tre amis la krispan lanbesteton, dum horoj li ludadis kun ĝi, el sia mano li manĝigis ĝin, favoris ĝin per freŝa herbo, multekosta salo, tiel ke ĝi fariĝis tute karesmilda, ĝi havis eble nur la solan mankon, ke ĝi ne kapablis paroli. Steĉjo donis al ĝi ankaŭ nomon, kio estas por ŝafo nekutima distingo: li baptis ĝin Infereto.

Sed kiam dek tri jarojn post la granda Ĥolero venis la vico de amasmorto pro varieco al la ŝafa gento, ankaŭ Infereto cedis al la reganta epidemio, tamen en ĝi estis tiom da dankosento kiel ankaŭ en la aliaj, kaj ĝi postlasis sian felon memorige al Steĉjo, li faru el ĝi, kion li volas.

Steĉjo farigis el ĝi sakŝalmon. Belegan, artan sakŝalmon, kies supra fajfilo estas abunde tegita per pura arĝento kaj ĝia malsupra tenilo estas, se ne oro, almenaŭ kupro. Tian muzikilon eĉ Sankta Davido ne havis! Se Steĉjo blovas ĝin, en ĝi tuj aperas la spirito de Infereto, ĉar, estu dirite inter kvar okuloj, la iama nigra ŝafido venis en la nokto de Luciino en la gregon de la maljuna Mátyás Lapaj, ĉar ĝi estis malbenita, ŝafidigita feino reĝidino, kaj ĉar Steĉjo zorgis ŝin tiel ame, nun ŝi spiras post sia morto tiajn kantojn laŭ lia fingrumado, ke la neĝo de la maljuna Fátra preskaŭ degelas de ili eĉ en februaro; ĉar oni ja ne kredu kun malsaĝa menso, ke Steĉjo blovas la kantojn, li nur kaŭze de ŝajno altenas sian buŝon, maksimume la komencon li enflustras, poste li fingrumas, premadas ĝin subaksele, moviĝas, kliniĝas laŭe, kvazaŭ li mem farus tion.

La imagon de Petrus katenis ĉi tiuj multaj babiloj, ne povis liberiĝi de la dezirego akiri la sakŝalmon de Lapaj. Sed ĝi ne estis aĉetebla malgraŭ tio, ke Petrus, ekscitita pro la obstina rifuzo de siaj ofertoj, perataj de la judo Éliás, kun moŝta superemo promesis cent durajn talerojn por la muzikilo.

Sed spite al ĉiu klopodo li ne ricevis ĝin. Lapaj nur ridis. Kial li bezonus monon? Li eĉ sian sandalrimenon ne donas por reĝeco, se li alkutimiĝis, multe-multe malpli do sian sakŝalmon, sian unusolan trezoron. Éliás vane klarigis, ke por kvindek taleroj (ĉar nur kvindek ofertis la firuzulo) eĉ tri sakŝalmojn li povus aĉeti, belan, pli belan kaj plej belan, kaj krome restos al li tiom da mono, ke se li pruntos ĝin por interezo, li iĝos pli granda sinjoro ol Rothschild.

Sed en la griziĝanta kapo de Steĉjo Lapaj neniam nestiĝis la deziro rentumigi sian monon, nek pliriĉiĝi ol Rothschild; se Éliás estus almenaŭ dirinta al li, ke lia hejtoligno, per kiu li bakas siajn terpomojn, estos polurita, lia ĉiutaga ĉemizo estos el susuranta silko, li havos karbunkolan bukon sur sia zono, kaj la ŝafomastro de Brezina demetos sian ĉapelon el distanco de naŭ paŝoj, se li vizitos lin, tiel li eble estus kompreninta, kiel granda utilo kaj moŝteco rezultus por li el la vendo de la sakŝalmo.

Mallonge, la vendaĉeto ne realiĝis, je granda ĉagreno de Éliás, kiu

lasis foriri Petrus kun la magra espero, ke ĉi-tempe estas tute neeble akiri la sakŝalmon, ĉar li ne donas ĝin por mono, kaj ŝteli ĝin same ne eblas, ĉar tage li ĉiam portas ĝin sur la ŝultro, nokte uzas ĝin por dormokuseno; homa potenco ne povas forproprigi ĝin de li, nek nun, nek en la futuro, ĉar se nun li ne bezonas la monon, ankaŭ pli malfrue li ne bezonos ĝin, ĉar – domaĝe! – li ne estas drinkema homo, kun kiu estus pli facile marĉandi, la gorĝo de tia homo ja estas lia konsilanto.

Sed, tiel diras Éliás, la ulo jam maljunas, pli-malpli frue deskuos de si la teran polvon, kaj tiam li akiros por Petrus la faman sakŝalmon (kiun ricevos tiu, kiu igos lin enterigi), pro kio, se Petrus fidelos al sia vorto, li donu al li antaŭpagon, kaj por ke li povu mesaĝi al li, li postlasu sian adreson.

Petrus donis sian manon, postlasante sian adreson jene: trans la granda arbaro de Brezina staras kaduka muelejo, maldekstre de ĝi malfermiĝas la rondvalo nomata Rocska; tri padoj kondukas tra ĝi, la mesaĝisto iru sur la plej forlasita, ĝis liaj okuloj vidas; tiel li alvenos ĉe la monto nomata Motika; kiam li alvenos, li grimpu sur ĝian plej altan pinton, kaj de tie disrigardinte, li ekvidos la plej grandan paŝtistan fajron, tie devas esti Petrus, aŭ se li ne estas tie, oni diros, kie li restadas. La cent taleroj disponeblas ĉe li tagnokte por la sakŝalmo.

Nia heroo sciis nenion pri la interkonsento, ĉar Éliás havis la prudenton, ne skribi tion sur la nazo de vilaĝaj onidiroj; Lapaj eĉ tion ne eksciis, ke liaj neparolemaj gastoj estis Petrus kaj Hikszum. Egalhumore li daŭrigis sian malnovan vivmanieron, kelkfoje tra tagoj ne parolante kun homaj estaĵoj, kaj tamen neniam enuante. Ĉar li estis en tiel bona amikeco kun la naturo. Siaspece ili amuzis sin. Aŭ li sakŝalmis, kaj la festa silento, sidanta mute super valoj kaj montopintoj, ekvibris kiel revekiĝanta koro; herberoj kaŝe salutsvingis unu al aliaj, kliniĝante dekstren, maldekstren, floroj elspiris sorĉajn odorojn, en kiujn mistere miksiĝis la elvaporiĝo de la tero kvazaŭ sekreta amsuspiro: aŭdi ne eblis ĝin, sed senti des pli.

Aŭ Lapaj mutiĝis, por aŭskulti la naturon. Ŝuŝado de arbaroj, plaŭdado de riveroj, flustrado de frondoj, abelzumado, kantado de laboristoj en la foro, formortanta kornosono eĉ pli malproksime, ĉiuj kunfand-

iĝas en dolĉe fluantan harmonion, pli belan, pli plezuran, pli enlulan, pli ĉarman ol kiun koro povas senti, orelo povas aŭdi, malvarma, mizera muzikilo povas interpreti.

La majstron, kiu kondukis Lapaj al la supera grado de perfekteco en la sakŝalmado, Petrus ne devus serĉi malproksime, ĝi ĉie ĉeestas. Oni bezonas nur scii paroli kun ĝi kaj scii obei ĝin.

Ĉu ne ĉion la naturo, la tero patrino instruas al ni? La tero havas koron. Kiu klinas sin al ĝi kaj alpremas sian orelon al la bruna korpo de la komuna, nutranta patrino, tiu aŭdas sube misteran frapadon, kvazaŭ obtuzajn batojn de giganta martelo en profundo de cent mejloj; tio estas ĝia korbatado.

La tero ankaŭ pensadas. Ĝiaj pensoj estas la floroj. Aŭ de kie venus tio, ke en forlasita arbaro, kie homa mano ne semis, kie birdo ne alportis grajnojn, iun tagon mil kaj mil floroj de neniam viditaj koloroj kaj formoj estiĝas de si mem? Tio estas la poezio de la tero! Tio estas ĝiaj novaj pensoj!

Kaj se ĝi pensas, se ĝi havas koron, ĝi devas kapabli ankaŭ senti, havi malĝojojn kaj ĝojojn. Dum granda sekeco ĝia sino fendiĝas, kaj kiel infano sur la mamoj de suferanta patrino, ĝia plantaro mizeriĝas, miskreskas, dum en rosoplena aŭroro ĝia tuta estaĵo estas nura rideto.

Kaj ĝia plantaro: la floroj, arboj, herberoj, ĉiuj sentas, ĉiuj pensas, kaj ĉiujn tenas kunkroĉitaj la granda ideo de amo. La teron amas ĝia plantaro, kaj tiu la nubojn kaj sunradiojn. Hungaro, se lia semitaĵo elsekiĝas, ne plantiĝas, trafe diras: „Ĝi ne ŝatas la teron.” La teron, al kiu li atribuas bonkorecon, senteman koron, dum li transdonas al ĝi sian karan mortinton: „La tero estu por li malpeza”! Kaj ĝi ja iĝas por li malpeza.

Ĉion kuntenas amo. Ĉu do sole Lapaj ne sentus, ne pensus, ne amus? Ĉu do tio eblus? Kiu scias diri? Ĉar neĝo kovras la maljunan Fátra kaj kalva, ĝi anoncas, ke el sia interno ne fontas viviga varma forto, kiu donus nutron al herboj, floroj; sed kiu scias, ĉu ne bolas en ĝia interno, profunde enterigite, fajro, kiu muĝante erupcias, se ĝi trovas fendon?

La trista stipo, aŭ kiel la popolo diras: orfinohararo, kiu sen ĉiu amo

kreskas tie, kaj kiu mizeras kiel blanka hararo sur la kalva plataĵo, parolas nur pri malvarma, dezerta mondo, sed ankaŭ ĝi ne scipovas diri, kio kaŝiĝas pli interne.

Estas morna aŭtuna nokto. La tranĉa vento ĵetadas malvarmajn pluverojn kontraŭ la vizaĝon de Lapaj, sed ne pro tio li rapidas al sia kabano, li zorge spionas la pejzaĝon, kies kreaĵoj tiatempe troviĝas en plej granda danĝero, ĉar ĉiu nur iom lerta ŝtelisto elektas tian porhundan veteron kiel mantelon por sia agado. Fulga obskuro farbas nigra la tutan mondon. Kiuj ajn povus inkognite vangofrapi nin. La kampogardisto povus tiafoje kaŝi siajn okulojn en la poŝo de sia kruddrapa jako: liaj oreloj transprenas nun la oficon.

Li aŭskultas, atentas. Neniu brueto. Nur kelkaj brasikaj kapoj fendiĝas jen tie, jen ĉi tie pro la troa beno, fluanta el la ĉielo, aŭ preterkuranta leporo kraketigas apenaŭ aŭdeble falfoliojn. Tamen li aŭdas malproksime ankaŭ ion similan al homaj paŝoj, kiuj plaŭdas en flakkoto, donante sonojn kiel falantaj gutoj de lesiva kuvo.

Li rapidas renkonte al la paŝoj. Li havas grandan sperton en la orientiĝo pri direkto: el la flanko de la kabano iu venas al la rivero. Steĉjo vidas konsilinda halti malantaŭ avelujo, por ne fortimigi al forkuro per siaj propraj paŝoj la ŝteliston, rapidantan renkonte al danĝero, ja ne povas esti iu alia en ĉi tiu sovaĝa vetero, kiam esti ekstere ne timas nur hundo kaj kampogardisto.

Belstatura virina figuro glitas preter la arbusto: ŝiaj okuloj, kiel du lampiroj, lumas eĉ en la nokto, trahumidigita blanka tuko gluiĝas al ŝia svelta staturo, ĝiaj pendantaj anguloj krispe flirtas en la vento. Jen ŝi haltas hezite, jen kure ŝi ekiras; la vento eligas laŭtajn ridojn post ŝia dorso.

La vento eligas laŭtajn ridojn, kaj metinte du mezfingrojn kiel provizoran fajfilon en la buŝon, Lapaj eligas akran fajfon post ŝi tiel, ke la maljuna Fátra kredus unuaaŭde, ke vaporlokomotivo kuras malsupre.

– He ho! Haltu! Kiu vi estas? Kion vi portas?

La virino returnas sin, de malproksime vidiĝas, kvazaŭ ŝi svenus, la anguloj de la tuko pendas ĝistere, sed ŝi ree altiĝas, kaj tremanta, milda voĉo venas responde:

– Nur min mem mi portas. Min mem, min mem.

Kaj poste ŝi avide aldonas:

– Se vi ne kredas, rigardu mian antaŭtukon kaj litotukon. Mi ŝtelis ja nenion, ne baru al mi la vojon!

Lapaj iras proksime al ŝi, rigardas esplore el sub la larĝa rando de sia ĉapelo, sed vidas neniun suspektan indikon, donantan kaŭzon por oficiala procedo kaj preskribita serĉpalpado.

– Ne baru al mi la vojon – ŝi ripetas amare, dissterninte kaj skuinte sian tukon –, malproksima estas mia vojo, longa estas mia vojo.

Nu, Steĉjon ne interesas, kiel ajn longa ĝi estas. Pro li la tuta mondo povas vojaĝi eĉ al Ameriko, nur la kamparo restu sialoke. Senvorte li returnas sin kaj ekamblas returne.

La virino stariĝas per hezitaj paŝoj antaŭ li, kaj spasme kroĉas sin al la pendanta maniko de la kruddrapa jako.

– Haltu por vorto, nur por mallonga vorto, karega aveto Lapaj! Ĉu vi konas min? Ĉu vi scias, kiu mi estas?

La kampogardis skuas responde la kapon, li ne konas ŝin. Sed kiel li povus koni ŝin, se ŝi ŝtelis nenion?

– Rigardu do min! – ŝi balbutas per sufokita voĉo, tremante tutkorpe, kun interklakantaj dentoj, kiuj estas tiel blankaj kiel alabastro. – Ho, rigardu min, miajn harojn, miajn okulojn, mian palan vizaĝon, kaj rakontu al la kompatinda, kia mi estis…

La maljuna Steĉjo neniam havis tian kazon: en malluma nokto gracia, svelta knabino premiĝas al ŝi, duone apoginte sin sur lia ŝultro kaj diras al li:

– Ho, rigardu min!

Tio estas jam afero, pri kiu ne eblas alpreni decidon sen ekfumi.

Lapaj do diras nenion, sed, por ke la pluvo ne impertinentu kontraŭ lia pipo, li faras volbon per sia deprenita ĉapelo super ĝi, ŝtopas ĝin kaj per malrapidaj movoj elfrapas fajrerojn. La fajroŝtono donas abunde fajrerojn, prilumante por momento la vizaĝon de la virino, kaj nia heroo senvole restigas sian rigardon sur ŝi tiel, ke la brulantan tindron li erare enŝovas sub la ĉapelrimenon; pro kio cetere sekvas nenio malbona, ĉar la tindro havas prudenton; apenaŭ ĝi rimarkas, ke ĝi trafis

misloken, ĝi silente estingiĝas, pri kiu nobla takto oni ja ne povas miri, se ni pripensas, ke la rimeno maturiĝis sur la sciencula kapo de la pastora moŝto – en kvalito de ĉapo.

Kaj estas ne mirinde ankaŭ, ke Lapaj iom konfuziĝis. Tiel belan jupulinon li ankoraŭ neniam vidis. Ŝiaj korvonigraj harplektaĵoj malligiĝinte falas sur la blankan tukon, kaj sur ŝia pala vizaĝo doloro estas pentrita; en ŝiaj nigraj okuloj malesperiĝo, sur ŝiaj tremantaj lipoj nevideble ŝvebanta preĝo. Ŝia vesto, la verda jupo, blanka antaŭtuko kun ruĝaj franĝoj, la miljara, neniam sanĝiĝanta modo de la slovaka popolo gluiĝas trahumidigite al ŝiaj graciaj formoj.

Sed Lapaj ne havis senson por io tia.

– Nu kaj? – li demandis malafable, ree farante preparojn por fajrerkaptado. – Kion mi rigardu sur vi? Iru kun beno de Dio, tuŝu nenion dumvoje! Ne pripredu la abrikotujon de la juna moŝto en Tövises, ĉar ili estas kalkulitaj!

– Ĉu de la juna moŝto? – ekridegas la knabino dolore, spasme. – Dio frapu lin, kiam li maldormas kaj kiam li dormas!

– Ne aŭdacu peki kontraŭ Dio, knabino! – diris Lapaj. – Mi povas diri al vi nur, ke ankaŭ Li servas al la sinjoroj. Li estas tute tia kampogardisto kiel mi, nur Li devas superrigardi pli grandan kamparon. Li ja ankaŭ plenumas tion brave. Lasu Lin en paco! Iru sur via vojo!

– Mi jam iras, mi jam iras. La bona Dio benu vin!

Ŝanceliĝe ŝi faris kelkajn paŝojn.

– Sed diru al la kompatinda, kia mi estis.

Lapaj kontraŭvole murmuris per sia raspa ursovoĉo:

– Al kiu diablo mi diru?

La virino ekaŭdis tion. Ŝi haltis por momento. Ŝi volis respondi, sed subite alipensinte, ŝi ekkuris supren al la monteto, sub kiu akvo fluis, de tie ŝi kriis malsupren per korŝira, akra voĉo, kiun la montopintoj ĝeme transdonis unu al aliaj:

– Pardonu al mi, kion mi faris! Kion mi faris al vi…

La kampogardisto premetis la fajron en sia pipo kaj pensis en si: „Ĉu do la sendia tamen ŝtelis. Kvankam kiel bonan fizionomion ŝi havas! Kaj ŝi ne hontas krii al mi, ke li priŝtelis min! Nu atentu! Se vi

ankoraŭfoje trafos en miajn manojn!”

Tiel hontiga primoko de la kampogardista aŭtoritato, estante escepta okazo, vekis en Lapaj pensojn, kiuj eble unuafoje en lia vivo turniĝis ĉirkaŭ la vanteco kaj malico de la virina genro.

Kaj ŝi lasis sin pririgardi! Ho, vantaj virinaj personoj! Eĉ en mallumo ili volus admirigi sin. Pli-malpli frue ni ĝisvivos, ke ili pendigos meĉujon noktotempe sur la kolon, por ke ilia vizaĝo estu daŭre prilumata kiel la montriloj sur kelkaj turhorloĝoj.

Nu, se ŝi ankoraŭfoje trafos antaŭ miajn okulojn!

Sed tio ja neniam okazos.

La vento frapis ĝismedolan ŝrikon al liaj oreloj: la kolera rivero lasis aŭdi poste laŭtan plaŭdon, la kunfrapiĝantaj ondoj obtuze, sovaĝe stertoris, ke trista historio estas nun enterigita.

La piedoj de Lapaj rigidiĝis kvazaŭ enradikiĝintaj. Li scias, kio okazis: la knabino saltis en la akvon. Li elbuŝigas la pipon, dekaptas sian larĝan ĉapelon, demetas ĝin sur la kotan teron, kaj surgenuiĝinte, turninte sin al la rivero, li preĝas mallaŭte la Patronian, atentante, ne implikiĝi en ĝi.

Ankaŭ la vento nun turniĝas kaj kun lamenta ĝemado portas la vortojn de la preĝo al la ondoĉerko. Simpla funebra ceremonio, sed de Lapaj sufiĉas ankaŭ tiom. La kompatinda knabino, kiun li antaŭ nelonge suspektis pri ŝtelo. Almenaŭ ŝi ne iros en pagana maniero en la transmondon. Sed kial ja bezonus mortonto teran nutraĵon?

Por tiu sufiĉas por provianto ankaŭ la preĝo, kiun li postsendis.

Li sentis eĉ iom da kontento en la koro, pro kio tiel rapide evidentiĝis la senkulpeco de la knabino. Ankaŭ la mokado, kiu tiom tranĉe tuŝis lin, nun jam perdis sian akrecon, ĉesis esti ofenda, kvankam ĝi ankaŭ plu restis enigma.

Steĉjo kaptis sin ĉe tio, ke li enpensiĝis, ke li recitas en la memoron la vortojn de la junulino. Ŝi diris, ke ŝi iros al longa vojo (ja prave!), ŝi malbenis la junan sinjoron (ties kaŭzon same ne estas malfacile diveni), sed kion li devus pardoni, al kiu diri, kia ŝi estis, kiaj estis ŝiaj okuloj, buŝo, ĉi tion li ne scipovis klarigi.

Kio koncernas la aferon, li ne multe cerbumis pri ĝi. Li ne estis ami-

ko de divenado de rebusoj. Ĉio statas tiel bone, kiel estas. La homo, la kruddrapa jako, la kabano, la pipo, eĉ la sakŝalmo estas elmetitaj al pasemo, konsumiĝo, sed la kamparo – ĝi estas eterna. Ĝi estis ĉiam ĉi tie, kaj ĉi tie ĝi estos ĉiam sialoke. Kvankam la rivero estas tiel granda potenculo, ke ĝi kunprenas pecojn eĉ el ĝi, se dum la printempa inundo ĝi ŝveligas sin.

Nu, la rivera fluo kunprenis ankaŭ la belan junulinon. Tio ne plu estas ŝanĝebla: vane ajnulo repostulus ŝin de ĝi…

Ĝishaŭte humida, li revenis al sia kabano, ankoraŭfoje trarigardis sian vastan imperion, la kamparon, kaj post kiam li vidis disflui la solenan muton de paco, kun rigardo al la avanco de la tempo kaj ankaŭ al la torenta pluvado, kun vera kontento li retiriĝis en sian kabanon „por ŝanĝi sekan veston”, kio ĉe li konsistis en tio, ke li deskuis la gutantan fluaĵon de la granda ĉapelo kaj la kruddrapa jako, surmetante ĉi lastan elturnitan.

Ĉar ekstere regis mallumo, estas klare, ke en la kabano estis pli malhele. Li do ĵetis la sakŝalmon trafe-maltrafe en angulon, kaj komencis la supre skizitan transvestiĝon, kiu ne postulis spegulon, kaj multe malpli lumon.

Ni devas paroli pli detale ankaŭ pri la kruddrapa jako, ĉar ĝi estis samtempe ankaŭ familia genealogio. La krevo ĉe ĝia kolumo memorigis al Lapaj lian avon, ĉar li portis ĝin antaŭ cent jaroj ĉe la fama interbatiĝo en Körmöc, kie ses paŝtistoj trabatis kvindek ordinarajn kamparanojn (iu ne tenere devis kapti tiutempe la florepoke vivantan, heredan drapaĵon, ĉar la krevo etendiĝas ĝis la dorsomezo). Unu truo ĉe la poŝo estiĝis en la tempo de lia patro: musronĝo. La grasmakulo maldekstraflanke, kiu scias, de kio ĝi estiĝis, sed verŝajne memoraĵo de familia evento, kaj estas supozeble, ke dum ampetoladoj de la adama ripo de la iama Lapaj, kiam kelkfoje ekflugis la grasujo, kiun ŝi alĵetis por emfazo de siaj asertoj. La verda makulo sub ĝia akselo devenas de la festa jupo de lia patrino, dum la apenaŭ videbla elpufiĝo super la poŝo estas ankaŭ hodiaŭ profunda sekreto; ĝi kaŝas duvostan lacerton elsekigitan, trovitan en la nokto de iu tago de Sankta Georgo, ĝi estas nome tie enkudrita, kaj laŭofice ŝirmas la mastron de la jako kontraŭ

ĉio malica kaj ĉiuj tentoj en ĉi tiu mondo.

Ĉi tiun faman jakon Lapaj do deskvamigis unue de sia korpo, kaj potence ekskuis ĝin tiel, ke la malpuraĵo sur ĝi disŝprucis ĉiudirekte, kio sola ne estus tiel granda malfeliĉo, se neniun tio ĉagrenus.

Sed sekve de la sube prezentotaj cirkonstancoj ĉi tiu ago de Lapaj rezultiĝis ofenda, kaj ĉi tiu ofendo manifestiĝis en potence ekmuĝanta infanploro el la malantaŭo de la kabano.

Timigita, Lapaj lasis elfali la jakon el la mano kaj la pipon el la buŝo. Tiu, kompreneble, suferis nenian damaĝon, sed ĉi tiu brile sigelis lian supran teorion pri la pasemo.

Sed kio estis ĉi tiu malfeliĉo, lia nuna ektimo kompare kun la surprizo?

Komence li volis forkuri kiel mensperdinto, sed levinte la jakon kaj palpinte en ĝi la sekigitan lacerton, li regajnis sian kuraĝon kaj el sia zono li elskrapis pecon de sebo, kiun li sukcesis ekbruligi nur pene, ĉar liaj manoj tremis, kaj la brulanta fino de la alumeto kaj la meĉo de la kandelo neniel sukcesis rendevui.

Kiam fine estiĝis lumo, la stangolonga, fortika Lapaj direktis sian rigardon kun malkuraĝo de infano al la fatala loko, de kie post la ĉeso de la ploro aŭdiĝis malrapida, regula spirado.

Infano, volvita en vindo, kuŝis ĉe la malantaŭo de la kabano sur amasigita herbo.

La vastaj, pufaj vangetoj de la eta estaĵo moviĝis, ĝia eteta buŝo pintigite ŝmacetis, kaj ĝiaj libere lasitaj manetoj sencele moviĝis tienreen sur la rugŝtria kuseno, en kiu ĝi estis forte ligita. Ĝiaj grandaj okuloj gluiĝis kun kelka scivolo al Lapaj, dum ĝiaj larmoj aŭ eble la pluveroj, surŝprucintaj de la jako, brilis freŝe sur ĝia ruĝa vizaĝeto kiel roso sur floro.

Lapaj ankoraŭ neniam vidis ion tian.

– Hm! – li murmuris kaj skuis la kapon. – Mil fulmoj kaj tondroj! – li diris poste laŭte kaj pli forte skuis la kapon.

Li eble skuus ĝin ĝis hodiaŭ, se la eta gasto ree ne ekplorus.

– Nu, la eta homprodukto muĝu, ĝi havas sufiĉan kaŭzon por tio. Ĝia patrino flosas inter la ondoj, kaj ĝi mem same ne kuŝas en orita

lulilo.

Tion pensis nia heroo, kaj refalinte en sian kutiman egalhumoron, kuŝiĝis en la antaŭo de la kabano por iom ripozi; sed li tediĝis pli frue aŭskulti ol la infano plori, kaj ĉar li povis fari nenion alian, li prenis ĝin en la brakojn, komencis luli ĝin dekstren-maldekstren, zumkantis al ĝi, por dormigi ĝin. La vento ridege siblis tra la fendoj: Hahaha! La morna Lapaj lulas infanon.

Sed la maliculeton eĉ iom ne interesis la lulado, eĉ pli forte ĝi ploris. La pacienco de Lapaj jam estis konsumota, kiam enkapiĝis al li, ke la sono de la sakŝalmo ŝtopus ĝian buŝon. Li do blovis al ĝi kantojn, belajn kaj pli belajn kun tia emo, sindediĉo, kvazaŭ naŭ vilaĝoj aŭskultus lin.

La eta estaĵo vere mutiĝis por mallonga tempo, kaj per siaj fingretoj ĝi skrapadis lude sur la vizaĝo de Lapaj, de kio li rimarkis, ke la manoj de la beo estas glacie malvarmaj, tial li prenis ilin en siajn grandajn manoplatojn, varmigis ili per sia spiro.

– Malbenita ideto! Mi ne volus, ke ĝi frostiĝu miakulpe!

Dume komencis mateniĝi, kaj la infanon ne plu distris la sakŝalmo: ĝia plorado estis kiel aŭtuna pluvo, oni ne povis ĝisatendi ĝian finon.

– Diablo prenu min, se mi ne povas luli ĉi tiun infaneton. Nu, nu... ne ploru, karega grajneto mia!

La malafabla Lapaj ellernis flati.

– Ne, he ne! Jen, jen, vidu la suneton, kiel ĝi leviĝas! Vi vidas, ĝi estas bona, ĝi ne ploras. Do ankaŭ vi ne ploru! Tin, tin, tin, tintileto! Aveto Lapaj amas vin, se vi ne ploras.

Sed la flataj vortoj ne havis akcepton, kaj al Lapaj okazis la miraklo, ke li komencis serioze cerbumi, kio malbona trafis la etulon, kaj honoron al lia erudicio, li ankaŭ divenis tion. Malsata estas la kompatinda.

Eĉ, tiom li ellernis eltrovemon, ke apenaŭ li ekvidis knabon, pelantan kaprojn sur pado, li ekhavis bravan ideon, kaj demetinte la infanon el la brakoj, postkuris kaj baldaŭ atingis lin, kunprenante lin kune kun liaj kaproj.

– Aŭdu, Matykó – li diris al la knabo –, vi restigos ĉi tie la bestojn, rapidos reen en la vilaĝon, rakontos al la vilaĝestro, ke la maljuna La-

paj sendas al li sian honoran saluton kaj mesaĝas: en la kamparo estas nenio malbona, neniu ŝtelis ion ajn, sed iu enŝtelis bebon en la kabanon. Pro tio, ke la infano estas vivanta, kaj mortbati ĝin ne eblas, li komandu iun maljunulinon por esti ĝia patrino, kiu transprenu ĝin en la hodiaŭa tago. Rapidu! Revenu ĝis malfrua kolaziono!

La paŝtisteto kompleze ekrapidis sur la revenvojo, sentante sin honorita, ke li povas iri por afero de la vilaĝo. Steĉjo melkis la kaprojn, kaj sorbigis lakton al la eta trovito, kio estis ja okupo ne sen komplikaĵoj kaj implikaĵoj; sed por li ĉio ĉi ŝajnis granda amuzo, eĉ kiam li elportis la satmanĝintan infanon al la varmiga sunlumo, kaj ĝi komencis tie rideti, la sovaĝa kampogardisto sentis tiel, ke varmigas lin ne la suno sed ĉi-foje io de interne.

– Kiel stranga, fola Dio-kreaĵo ĝi estas!

Kaj foje, kiam la stranga Dio-kreaĵo ekmovis siajn brakojn, kiel birdeto kutimas disvolvi siajn flugilojn: disetendante ilin, por flugi sur la kolon de Lapaj, li ne povis ne levi ĝin, kaj (ĉu vi kredas, ĉu ne) ne kisi ties ruĝan vangeton, de kio tiu iĝis eĉ pli ruĝa, ĉar lia dorna mentono piketis ĝin. Kaj vidu, ĝi eĉ ne ekploris pro tio.

Lapaj ne retenus siajn larmojn eĉ por ĉiuj trezoroj de la mondo.

– Tiel, jen tiel eta mia sciureto! Tiel amas vin Lapaj, se vi ne ploras. He ho, he ho! Ankaŭ vi amas Lapaj, ĉu?

La bebo direktis al li siajn grandajn, saĝajn okulojn, kvazaŭ ĝi komprenus la demandon, poste okulumis jese. Ĝi pruntis la kolorojn kaj aromon por ĉi tiu dolĉa okulumo el la unua rideto de la printempo, el la oraj radioj de la suno, el la plej bela kanto de la najtingaloj.

Ankaŭ Steĉjo mem fariĝis vera infano en ĉi tiu tago por la ĝojigo de tiu alia infano; li portis ĝin al la rivero, por aŭskulti ties zumadon, kunprenis ĝin sur la rokojn, sidigis ĝin sur la plej alta pinto, en la arbaro li plukis florojn por ĝi, sur la kampo li pripredis nestojn por ĝia distrado. Ili ambaŭ bone amuziĝis kune. La tempo de la kolaziono alvenis tiel, kvazaŭ pro rapidemo ĝi estus interŝanĝita kun la tagmezo.

Ĉirkaŭ kolaziono laŭorde ankaŭ alvenis, kiujn li jam ne atendis: la knabo por la kaproj kaj maljunulino laŭ supera instrukcio por la infano. Tiuj, kiuj kredas, ke tio okazis malfrue, forgesas, ke la kampoj de la

altlandaj vilaĝoj etendiĝas kutime sur pluraj mejloj, kaj la koncerna komunumo mem situas ofte tiel malproksime de la kampobieno, nomata *laz*, ke mastro, kiu ekvojas por rigardi sian maizkampon, ekiras kvazaŭ al longa vojo, ceremonie adiaŭante sian familion,.

La ŝrumpinta avineto, akuŝistino de la vilaĝo jam de malproksime komenci krii:

– He, filo Lapaj! Ha ho, filo Lapaj! Donu al mi tiun infanon, mi rekonos ĝian familion. Tio estas jam mia afero. Dio donu bonan tagon kaj bonan laboron! Kie do estas la eta kateto? Lasu min forpreni ĝin de via kolo, kara filo; mi esperas, ke vi bonvenigos min per kelkaj brasikokapoj pro dankemo; mi kunportis ankaŭ saketon por ili.

– La infano dormas – diris Lapaj, montrante al kratago –, ne eblas veki ĝin.

– Kio? Ĉu ne eblas veki ĝin? – stridis la avineto, elmontrante sian unusolan elstarantan dentegon. – Ĉu do eble mi atendu, ĝis ĝi bonvolos vekiĝi? Ej nu, filo, kiom alte vi taksas ĝin! Ĉu ĝi estas princo aŭ princino?

– Knabino, onjo Agnisa, knabino. Flanken de ĝi! Mi ne permesas veki ŝin. Ŝi ĵus dormiĝis, la kompatinda!

Kaj la sovaĝa homo flankenpuŝis la maljunulinon, kaj ĵetinte teneran rigardon al la dormanto, li sidiĝis apude, kaj dum silenta pipfumado aŭskultis ties regulan spiretadon.

– Kio trafis vin filo Lapaj? Ĉu vi freneziĝis? Jen, jen, oni vidu, kiel bona infanistino vi fariĝus! Ne licas veki la infanon, oni devas atendi, ĝis ŝi mem malfermas la okulojn. Nu, nu, Steĉjo! Kia fola parolo estas tio? La maljuna Agnisa ne estas tiel malsaĝa, por perdigi ĉi tie la tempon. Krome la vilaĝo estas malproksime; iĝos noktomezo, ĝis mi atingos Hlina. Aŭ eble eĉ ne ĝisvenos.

– Almenaŭ ne hodiaŭ okazos la fino de la mondo – diris ridante Lapaj, apogante sin sur tiu miljara publika opinio, kiu la finon de la mondo metas sur tiun tagon, kiam la slovakoj, disirintaj por eterne el Hlina, ĉiuj reestos kune en sia vilaĝo. Laŭ ĉi tiu teorio la mondo daŭros vere eterne.

– Ne ŝercu kun maljunuloj, Lapaj, ĉar vi pentos. Vi diras, ke vi estas

sesdek-jara! Kiom estas tio, vi laktosuĉulo?! Mi tenis vin sub la baptan akvon. Ne ludu do kun mi farson, ne retenu min, donu al mi la ideton, ĉar se vi puŝos min en koleron, mi elskrapos viajn okulojn!

Kaj ŝi ankaŭ farus facile, kion ŝi promesis, se la infano hazarde ne farus malaktuala la diskuton per tio, ke ŝi vekiĝis.

Lapaj levis ŝin el la ombro de la arbusto kaj etendis ŝin al la maljunulino. Lia vizaĝo estis preskaŭ malgaja, kiam li faris tion, en lia brusto kirliĝis proprecaj sentoj, sur lian animon sinkis deprima, laciga nebulo.

La infaneto maltrankvile moviĝetis en sia nova loko. Ektime ŝi suprenrigardis al la posedanto de la ĉirkaŭprenantaj sekaj brakoj kaj pro ŝia vizaĝo ŝi tuj ekploris. Ŝi etendis siajn braketojn al Lapaj. Ŝi petis transiri al li.

Tiu ne povis kontraŭstari, por ankoraŭfoje enbrakigi ŝin. La malfeliĉa ideto ĉesis plori, kaj strikte alpremiĝis al la brusto de la sovaĝa homo. Eble ŝi sciis, sentis, ke kaŝita varmo radias de tie, el lia profundo. Per siaj manetoj ŝi ĉirkaŭprenis lian kolon tiel forte, ke tiu preskaŭ sentis la premon. Kaj kiam la virino perforte volis deŝiri ŝin, kun ŝriko ŝi eĉ pli preme katenis sin al li.

Lapaj estis emociita, kaj ne kapablis eligi vorton, nur per sia mano li gestis al Agnisa, ke ŝi ne tuŝu la infanon. Sur lia frunto elpufiĝis la vejnoj, lia koro pli laŭte batis, en liaj okuloj aperis larmoguto – unu larmoguto!

Dum li tenis brakumita sian malpezan ŝarĝon, liaj okuloj rigide fiksiĝis al la tero, al la mutaj nigraj terbuloj, kvazaŭ li volus peti konsilon de tiuj, kiuj kovras forĵetitan tritikograjnon kaj plenkreskigas ĝin.

Kaj la terbuloj certe ankaŭ diris al li, kion li ŝajnis demandi de ili.

Trankvile li paŝis al Agnisa, kaj metinte sian manon sur ŝian ŝultron, li diris per emocie milda sed decida voĉo:

– Mi alipensis, avino. Vi povas reiri.

– Kiel vi komprenas tion, filo Lapaj?

– Tiel, ke mi ne donos la infanon. Dio donis ŝin al mi; ŝi estu la mia.

Kaj kun tio li forturnis sin de la miranta virino, kaj per silentaj, trankvilaj paŝoj eniris sian kabanon.

La decida vorto estis eldirita. Li fariĝis patro. Serioza nubo de patraj

zorgoj aperis sur lia frunto. Dolĉaj zorgoj, pezaj zorgoj! Dolĉaj por riĉuloj, pezaj por malriĉuloj.

Estis ja ne tro malfacile, dum ne alvenis la nokto, dum la infano ne iĝis malsata kaj ne sentis malvarmon, sed poste?... Lapaj estis malesperigita. Vane li provis regali la etulinon per manĝoj, kutimitaj de li, vane li kovris ŝin per la kruddrapa jako; tiun ŝi ne bezonis, tiu ne varmigis ŝin sufiĉe. Li devas akiri kapron kaj kelkajn kusenojn ĉiupreze, eĉ se el sub la tero li elskrapos ilin.

Sed estas ja facile elpensi, kion elskrapi estas tre malfacile. Unu kapro kaj kusenoj! Dio en la alto! Kia havaĵo ili estus! La infano devas havi ĉiam freŝan lakton kaj varman liton.

Dum la tuta nokto li revis pri tio sur sia dormoevita kuŝejo, jen gajpetole, jen suferante, laŭ tio, ĉu lia eta patronato estis trankvila aŭ ĝemetis. Post noktomezo ĝia ĝemetado iĝis preskaŭ senĉesa, kaj tio elvringis el Lapaj malfacilan decidon.

Li levis la knabineton en la brakojn, la sakŝalmon sur la ŝultron, kaj lasinte unuafoje en sia vivo la kamparon negardata, li ekiris per preskaŭ tiel rapidaj kaj tiel grandaj paŝoj al la vilaĝo, kiel la gigantoj de la slovakaj fabeloj, kiuj paŝegas de unu monto sur alian.

Frumatene li jam ekfrapis la fenestron de la judo Éliás, kiu terurite vekiĝis pro la batado de la vitro.

– Kiu vi estas ekstere? Ĉiu bona animo dormas tiatempe. Kion vi volas?

– Malfermu la pordon, Éliás, estas mi, Lapaj!

– Mi jam malfermas – aŭdiĝis de interne –, tuj mi malfermos. Ej nu, kian farendon vi havas en tiel frua mateno? Nu, kio! Ĉu tio estas infano? Ĉu ankaŭ tia planto kreskas en la kampobieno?

– Kial ne? Sed nun ne demandaĉu, sed ekbruligu fajron en la forno kaj donu lakton, vigle movu la piedojn!

Baldaŭ gaja fajro kraketis, kaj la infano bonapetite suĉis la lakton.

– Éliás! – diris Lapaj serioze, pikante decide la sakŝalmon, kuŝantan sur la tablo – Mi vendas ĝin!

– Kion vi vendas?

Eĉ por la tuta mondo Lapaj ne povus eldiri tiun doloran vorton per la buŝo, nur per sia tremanta mano montris ree al la sakŝalmo:

– Jen tiun! – li diris obtuze, per sufokita voĉo.

– Kio??? Ĉu vi vendas la sakŝalmon? Ĉu nun, kiam eĉ diablo ne bezonas ĝin? Vi devus forĝi la feron, dum ĝi estis varmega, kiam troviĝis aĉetanto; nun vi jam povas trovi lin kiel forflugintan venton. Kvin grošoj ne estas multaj, sed ankaŭ tiom estas forĵetita mono por via sakŝalmo.

Sekve de ĉi tiuj vortoj terura deprimiteco speguliĝis sur la vizaĝo de Steĉjo, li ĵetis malgajan rigardon al la etulo, lasis sinki la kapon kaj profunde suspiris.

– Kvankam – li balbutis, subŝovinte profunde sian ĉapelon sur la frunton –, mi kredis, Éliás, mi pensis, ke vi aĉetos ĝin. Mi havas nenion ceteran, mi vendus ĝin tre malmultekoste.

– Nu? Kiom vi postulus por ĝi?

– Du kusenojn, unu matracon kaj – li aldonis tre timide, kvazaŭ jam ankaŭ li mem trovus ĝin troa – unu vivantan kaprinon.

Éliás vestis sian ruzan, rufan vizaĝon per la kostumo de filantropa bonvolemo (mise ĝi sidis sur li).

– Ĉu vi scias, kion mi proponas al vi? Ĉar mi amas kaj estimas vin, kaj ĉar tiel frue eĉ la menso de judo ne funkcias klare, kaj ĉar hieraŭ mi aĉe kverelis kun mia edzino, nun mi spite volas ĉiupreze bankrotiĝi, etendu al mi vian manon, la marĉando estu sigelita.

La deziratej aĵoj estis baldaŭ elserĉitaj. Steĉjo larmis, kiam li devis adiaŭi la sakŝalmon por eterne. El la pordo li ankoraŭfoje revenis, ankoraŭfoje li blovis sian plej ŝatatan melodion por la lasta fojo.

Ĝi sonis tiel bele kiel neniam. La felo de Infereto fariĝis vera feino, kiu eĉ la maljunan Éliás, malmulte mankis, puŝis al danco, dum sur la vizaĝo de la infaneto plantis gajan, ludeman rideton.

Tiel bela, brila, tiel freŝa estis ĉi tiu rideto, ke vidante ĝin, Lapaj subite forgesis la kanton, la sakŝalmon, ĉion, li kaptis al si la infanon sur unu brakon, la kusenojn sub la akselon, kaj gaje li trotis kun ili al la *laz*.

Estiĝis bela aŭtuna mateno. La infaneto pepadis dum la tuta vojo sur lia brako, la kaprino, iranta antaŭ ili, kvazaŭ responde, eligis kelkajn mekojn, dum li mem tiel volonte aŭskultis ambaŭ, kvazaŭ li komprenus ilin.

Pereo de la bando Jasztrab

La nobela moŝto, s-ro István Gerge sidis ĝuste en la galerio kaj fumis sian pipon. Ĉar kiam li ne fumas sian pipon, li daŭre sakras, sed ĉar li daŭre pipfumas, do li estas Dio-tima, pia homo.

Cetere por la nobela moŝto estas sakrado vera kaj efektiva rimedo, apartenanta al lia profesio pro tio, ke s-ro István Gerge estas jam de dudek kvin jaroj ĝendarmo de la prefektujo.

Krome tia ĝendarmo, kies famo ne nur disflugis trans montojn kaj valojn, sed efikas ankaŭ al eksteraj landoj.

Ja troviĝas ĉe li da menso abunde, eĉ se ĝi ne vidiĝas. Li estas maljunuleto kun grizaj okuloj, kurte tonditaj haroj, ankaŭ siajn barbon kaj lipharojn li razas, kaj lia fizionomio kun la agla nazo, pintiĝanta mentono similigas lin prefere al birdo.

Sed malgraŭ la nevidinda eksteraĵo li estas vera leono, nevenkebla, kuraĝa kaj persista. Teruro por rabistoj, orgojlo por la respektinda prefektujo, tia, kiun eĉ la majesta imperiestro bezonis foje.

Tiu estis tre grava kaj implike komplika krimkazo, pri kiu ankaŭ la imperiestro mem vigle interesiĝis, kaj kiun la viena polico dum monatoj ne scipovis elspuri, tiel ke la reganto ekflamis en kolero, kaj laŭ la konsilo de s-ro Ádám Reviczky li venigis lian moŝton István Gerge en la sidejon de la brila imperio.

La viena policestro ironie subridis prie:

– Nu, ĉu ĝuste ĉi tiu elesploros la bovo-aferon, kiu eĉ orientiĝi ne kapablas en ĉi tiuj zigzagaj stratoj! Estos bonŝance, se li scipovos retrovi la vojon el la strato en sian gastejan tranoktejon. Kia ideo de lia imperiestra moŝto kurigi por flarado mallertan justican pedelon tien, kie ankaŭ nia nazo sentis nenion.

La policestro, por ke estu la fiasko de la hungara ĝendarmo perfekta, permesis al si la ŝercon, ke li transvestigis du ordinarajn policistojn friponoj kaj konfidis al ili konfidence, ŝteli la antaŭdiluvan horloĝon el la poŝo de la nobela moŝto. Li rememoru ĝismorte Vienon.

Sed kiam la brava sinjoro ĝuste disdonis siajn rilatajn instrukciojn, neatendite enpaŝis s-ro Gerge kun ĉi tiuj vortoj:

– Retroviĝis la bovoj, kolego!

– Ne ŝercu la sinjoro! Kiel vi divenis, kie ili estas?

– Tio estas mia sekreto.

Temis pri la samaj mil bovoj, kiujn la prefektujo Szatmár donacis en natura formo al Francisko la 1a por la celoj de la kontraŭfranca kampanjo, al kiuj okazis tre stranga historio post ilia morto.

El la mil bovoj estiĝis nome nur kvincent kvintaloj da viando kaj nur cent naŭdek feloj en la manoj de la provianta konsorcio.

Evidentiĝis do, ke kelkaj el la bestoj ne pezis pli ol 50 funtojn, kaj ke okcent mildaj bovoj sen haŭto tretis pli frue la koton de sia ĉi-tera vivo.

La imperiestro iĝis kolera, lia severa ordono puŝis en movon la policestron kaj la enketan juĝiston sed senrezulte! La soldatproviantaj konsorcioj jam ankaŭ tiam havis samtiom da menso, kiel nun, kaj ili vualis sin per tia obskuro, ke devus esti escepte brava homo, kiu kapablus penetri en ĝin.

Gerge estis tiu homo; dum dudek kvar horoj post sia alveno li eltrovis, kio kaŭzis la tiomgradan korpan malmultiĝon de la mil, historie famaj brutoj. Estas domaĝe, ke ties historio ne apartenas al nia temo.

Pri la mil bovoj estu dirite nur tiom, ke ne nur la historio eternigis ilin, ne nur *Pitaval*[22] skribis pri ili, sed eĉ la poezio revenadis al ili.

Kiam la reganto post ĉi tiu kazo baldaŭ nomumis novan prefekton por la prefektujo Szatmár, inter la estimataj ordenoj kaj statoj komencis cirkuli la sekva sprita pamfleto:

Mil bovojn la imperiestro ĉe Szatmár mendis,
Sed la imperiestro nur unu al Szatmár sendis.

Cetere temos ĉi tie propre ne pri bovoj, multe malpli pri lia moŝto, la estro de la prefektujo Szatmár, aŭ pri la tieaj estimataj ordenoj kaj statoj, sed nur pri listigo de kelkaj bravuraj agoj de s-ro Gerge.

Pluraj bravuraj konfesigoj liaj cirkulas en onia buŝo ankaŭ hejmlande, el kiuj ne la lasta estas la sprita konfesigo de tri neripareblaj friponoj.

La ĉefnobeljuĝisto fiaskis ĉe ili. La tri staris antaŭ li kiel paliso,

[22] Kolekto pri sensaciaj krimoj.

mute, neŝanceleble, pretaj por prefere lasi tani al si la haŭton ol konfesi eĉ silabon.

La ĉefnobeljuĝisto tediĝis pro la vana klopodo tra tri tagoj, li do sendis ilin al la s-ro ĝendarmo: ankaŭ li havu iom da distro.

S-ro István Gerge babilis ĝuste en la granda konsiliĝejo, kiam hajduko anoncis al li, ke alvenis la tri mutuloj, kies famo jam diskuris en la tuta urbo, kaj pri kies aventuroj cirkulis mirigaj kaj eĉ pli mirigaj fabeloj. Ilia muto flikis iliajn ĉifonojn per koloroj de romantikeco. Dise-vaste oni divenadis: kiuj ili estas.

Ĉu ne la fama vojrabisto Marci Zöld estas unu aŭ Miska Szellő, bandito de la Granda Ebenaĵo, se ne la dana reĝido mem kun sia akompano, kiu inkognite alvenis, por esplori pri la fraŭlinoj Majornoky, kiel tio kutimas en popolfabeloj.

– Alkonduku ilin! – li ordonis al la hajduko.

La tri sovaĝaspektaj junuloj estis alkondukitaj.

– Kiel vi nomiĝas? – li demandis unu. – Kiu vi estas?

Nenia respondo. La junulo gapis kun senesprima vizaĝo al la nobela moŝto, kvazaŭ li estus muta kaj ankaŭ surda.

– Kaj vi ambaŭ, kiuj vi estas?

Ankaŭ ili ne respondis.

S-ro Gerge gratis la freŝan stoplon, griziĝantan sub lia lipo kaj afable diris al li:

– Ne gravas, karegaj filoj; iom post iom ni ja konatiĝos.

Poste li turnis sin al la hajduko:

– Alvoku tri policistojn!

La tri baldaŭ aperis.

– Kaj vi, karegaj filoj, se vi ne volas diri, kiuj vi estas, mi ne trudas vin – li alparolis la nekonatajn vagabondojn –, anstataŭe vi stariĝos en po unu angulo de la ĉambrego, turnitaj al la muro kun po unu policisto apud ĉiu kun ŝargita fusilo kun la instrukcio, ke se vi ekmovos vin, ĝis mi ne donos permeson, ili mortpafu vin. Ĉu estos bone, tiel karegaj filoj.

Lia voĉo estis fandiĝa pro afableco.

Kaj li efektive starigis siajn arestitojn en la angulojn, kaj preninte je

la brako du prefektujajn sinjorojn, li komencis senzorge promeni tienreen, kaj post kiam li pruvis kun fajra ardo la neceson de la napoleonaj militiroj en la putriĝinta Eŭropo, ŝajne forgesante pri ĉio cetera, kio ankoraŭ troviĝas en la mondo, subite li elŝiris sin el la brakoj de la du kunpromenantaj sinjoroj kaj per potenca voĉo ekkriis meze de la ĉambrego:

– *Halbrechts!*[23]

Je la konata komandvorto du el la tri vagabondoj maŝinece turnis sin.

– Aha! Nun ni jam konas unu la aliajn. Vi estas profesiarmeaj soldatoj! El kiu regimento vi estas?

Nun jam restis nei nenion. La junuloj konfesis la tutan kazon: ili tediĝis de la fiska soldatpano kaj forlasis la regimenton, forgesante anonci tion al la kolonela moŝto.

La ĉefjuĝisto tre miris, kiam post apenaŭ duonhoro s-ro Gerge resendis ĉiujn tri arestitojn konfesigitaj, du *kun rigardo al la celo de estonta eskortado al ilia regimento* (laŭ la oficiala stilo de la skribita protokolo), kaj la trian tial, ke ĝis la eldiro de la verdikto la ĉefjuĝisto sendu lin en tiun brilan konstruaĵon, pri kiu frugilegoj, korvoj anoncas grakante, ke en ĉi tiu nobela prefektujo ĉi tiu estas la plej vasta, la plej necesa konstruaĵo.

Ĝi estis plenplena de friponoj. Tra du jardekoj s-ro Gerge brave densigis ĝian loĝantaron. En la unua jaro de lia oficado la publika sekureco estis tute ŝancelita. Ne nur la abunde obliĝantaj indiĝenaj rabistoj kaj banditoj predadis, rabadis, sed eĉ dizertintaj kaŝvaguloj el la najbaraj prefektujoj transvizitadis por facilaj aventuroj.

En tiaj cirkonstancoj la nova komisaro por la persekutado de banditoj uzis ne la malnovan praktikon, kiu jam komencis pruviĝi tute neuzebla; li sentis, ke li bezonas elpensi novan.

La malnova praktiko estis nome tia, ke homo de la ĝendarmo ŝajnigis komplici kun la rabistoj kaj ŝtelistoj, iris kun ili, elkovis kun ili la planojn, ŝtelis kun ili, kaj ĉion li rakontis al la komisiita persekutisto. Se efektive li rakontis ĉion, ĉar malofte iu surhokiĝis per tia metodo.

[23] Halbrechts! (germane): Dekstren, ek!

Gerge iom turnis la praan kutimon: li sendis inter ilin ne sian homon, sed ilian homon akceptis al si. Kaj tiu estis neniu alia ol la fama luktisto Matyej Szlimák el la slovaka rabista bando de la timiga Jasztrab, kiu, kiel la plej malnova firmao, havis vastan reputacion kaj ĉe la rabistoj, kaj ĉe la publiko, kaj ĉe la respektinda prefekta oficejo.

Gerge argumentis jene al la kaptita Matyej Szlimák:

– Estas domaĝe por tiel brava junulo bruli ekstere en la suno, kie neniu vidas lin, en la arbaro, kie neniu miras lin. Vi estas kuraĝa homo, filo Matykó, eĉ Dio kreis vin soldato. Tie estus via loko. Vi estas tia homo, kara mia servisto Maĉjo, ke dum ĉi tiel la nobela prefekta oficejo sekvas daŭre viajn kalkanojn, tie eĉ la reĝo levus antaŭ vi sian ĉapelon.

La koro de Matyej batis laŭte de ĉi kelkaj vortoj, kaj li profunde suspiris:

– Tio estus bona por mi, komisara moŝto!

– Tie oni mezuras la gloron po manplenoj... Ĉu vi aŭdis iam la kazon de Pál Kinizsi? Kiel muelista knabo li iris en la armeon, kaj je hareto li ne finis kiel reĝo.

Matyej spiregis de plezuro, lian animon dolĉe karesis ĉi tiu glata parolo.

– Tiu estas la belega vivo, filo Maĉjo – kondukis plu s-ro Gerge la imagon de Matyej –, kiel la popolfabeloj rakontas, vi manĝus daŭre grason anstataŭ seka pano, kaj trinkus fanditan buteron por estingi vian soifon. Krome kiam vi kuŝiĝus dormi, naŭ vicsoldatoj forpeladus de vi la muŝojn.

– Dungigu min tie, komisara moŝto! – stertoris Matyej Szlimák per sufokita voĉo.

– Tio ne tiel glate fareblas, karega filo Maĉjo. Vidu, nun unue vi estos ankoraŭ kondamnita, poste enkarcerigita por ĉirkaŭ dek jaroj. Post dek jaroj, se ni vivos, ni parolos pri tio, sed kio vi jam estos tiam? La ombro de vi mem.

Szlimák profunde ĉagreniĝis, distrite ŝovante suben-supren sian kuprobukan, unu kaj duonspanan ledzonon.

– Ĉu oni ne povus iel elturniĝi?

– Kial nei, estus malfacile, ĉar estas vere, ke kvankam mi amas vin tiel, filo Maĉjo, mi mem ne scias kial, kvazaŭ vi estus mia laŭsanga frato, tamen mia skribisto jam submetis la raporton al la prefekta oficejo pri tio, ke vi estas kaptita.

– Tio estas jam granda manko, granda manko – murmuris Matyej, kaj pizograndaj ŝviteroj elpremiĝis sur lia frunto.

Gerge faris tiel dum tempeto, kvazaŭ li forte enpensiĝus, poste subite li frapis sur la ŝultron de Matyej, kvazaŭ li decidiĝus:

– Vi ne estas fia kanajlo, Matyej – li diris avide kaj tamen solene.

Matyej fermis la okulojn kaj faris klinon per sia granda, senforma kapo, ke li ne estas fia kanajlo.

– Vi ne trompos min!

La bandito etendis sian manon al Gerge, tiun manon, per kiu ĝuste hieraŭ li senfeligis la bovinon, ŝtelitan de la judo el Lest.

– Jen mia honesta manpremo!

– Mi sciis, ke staras homo sur viaj plandoj. Tial mi decidis, ke mi faros vin sinjoro, ke mi purigos vin je la kulpoj, kaj kiel mi manpremis kun vi, tiel manpremos kun vi ankaŭ la respektinda prefektujo. Sed manpremo ne povas okazi sen tio, ke ankaŭ vi etendus vian manon al la prefektujo…

– Lasu min aŭdi – diris Szlimák malserene.

– Vi rakontos ĉiun vian kazon, vi kondukos min al la restadejo de viaj kunuloj, por ke ankaŭ el ili mi povu skulpti ion. Vi rakontos, kion vi ŝtelis, kien vi metis ilin ktp. Vi reiros al la bando de Jasztrab, vi estos tiel bona kompano por ili, kiel ĝis nun, vi ŝtelos, predados, kaj poste en sabatvesperoj, kiam vi venos al mi por vespermanĝo, vi ĉiufoje rakontos ĉion de eko ĝis fino.

– Kaj poste? – urĝis Szlimák, fikse rigardante Gerge per siaj elorbitigitaj okuloj.

– Vi servos tra unu jaro la prefektujon en tia kvalito. Post unu jaro pasos la lasta sabato, kaj tiam mi prezentos raporton pri viaj utilaj servoj al la vicprefekto, kaj tiu liberigos vin de ĉia persekuto.

– Kaj poste?

– Mi mem kondukos vin al la regimento, aŭ vi mem portos de mi

tian rekomendan leteron en via sako, ke oni tuj rangigos vin kaporalo.

La okuloj de Matyej ekbrilis, kaj frapis rapide ankaŭ duafoje sian kalan manoplaton en tiun de Gerge.

– La afero estas marĉandita, komisara moŝto. Hundo estas, kiu pentus ĝin.

Kaj estis ankaŭ tiel. Matyej ne rompis, kion li promesis, fidele li raportadis al la policestra moŝto pri ĉio, sekve de kio la bando de la malfeliĉa Jasztrab tre maldensiĝis dum duonjaro. Po unu estis kaptitaj liaj ĉefaj homoj, kiujn s-ro Gerge facile konfesigis, ĉar li perpleksigis ilin per sia ĉioscio.

– Nu, filo, kion vi ŝtelis? - la s-ro ĝendarmo kutimis demandi la kaptitajn banditojn.

– Nenion, nobela moŝto. Kurbiĝu miaj fingroj, se ne pro trudo mi kuniris kun la homoj de Jasztrab. Mi ne apartenas al ili.

– Vi ne miskondukos min, kara filo, ĉar mi ĉion scias, kaj se mi demandas, mi faras, nur por vidi, kiom vi bedaŭras kaj kun kia pento vi rekonas viajn mankojn. Estas superflue sekreti! Ĉu ne vi ŝtelis dum Kandelfesto la porkidojn de la pastora moŝto? Ankaŭ el la ŝafejo de Hlina vi kunprenis ok junŝafojn en la paska dimanĉo de la pasinta jaro. Vi senfeligis ilin en la kampobieno Fekete sub la granda robinio per la tranĉilo de Steĉjo Madzag, poste tie vi kuiris ilin en la pendpoto de la ŝafomastro Vrecjar, la felojn vi konservas en la subtegmento de la muelisto de Szurdok, ĝis la hodiaŭa tago tie ili kuŝas, ĉiuj ok. Ĉu mi diru ankoraŭ ion?

– Ne, ne – siblis tiafoje la akuzito neniigita. - Vi scias ĉion... ĉio okazis tiel.

Diskuris la famo de la ĉioscia ĝendarmo inter la slovaka popolo, terura timego kaptis la ŝtelistojn, rabistojn kaj friponojn. Disvastiĝis la superstiĉo, ke s-ro Gerge ŝmiris siajn okulojn per la hepato de centjara lacerto, trovita antaŭ la tago de Sankta Georgo, per ili li vidas tra la homaj korpoj en la korojn, kaj tie li legas la nevideblajn literojn, per kiuj la agoj estas notitaj.

Okazis ne unufoje, ke pro nura suspekto li asignigis al si iun pro anserŝtelaj aventuroj, kaj subite tiu komencis konfesadi, ke se foje li jam

trafis antaŭ la nobelan moŝton, kial nei kaj eviti-heziti, la nobela moŝto ankaŭ sen tio scias, ke li ankaŭ murdis la poŝtiston de Zehere.

La lerta sistemo de Gerge dum mallonga tempo purigis la tutan altlandon de rabistoj, nur la banditestron Jasztrab mem ne eblis kapti; fintoj, perfidoj ne kapablis surhokigi lin, ĉar li estis almenaŭ duoble tiel ruza kiel la prefektujo.

Li plu krimadis en arbaroj, inter montoj, kaj neniel eblis delogi lin de tie. Kaj tie li estis la mastro, vidante cent persekutantajn ĝendarmojn eĉ liaj brovoj ne ektremis.

La romantika altlando estis lia patrono kaj ŝirmis lin; aperturo de grotoj, fendoj de rokoj kovris Jasztrab antaŭ liaj persekutantoj.

Mi povus rakonti, kiaj fortostreĉoj kaj tamen vanaj klopodoj okazis por kapti lin, se mi volus obligi la vortojn, tial mi limigas min nur al tio, ke Gerge venis en febran furiozon ĉiufoje, kiam la arestaj provoj fiaskis, ĉar li opiniis, ke dum la fama rabisto restos libera, eĉ se sola, la publika sekureco ne estos restarigita.

Foje, kiam li elsendis ĉiujn siajn ĝendarmojn al la kampobienoj, por kapti Jasztrab, tiuj revenis kun malplenaj manoj asertante, ke la vivanta diablo mem ne povas superruzi lin, li paliĝis de kolero.

– Eĉ pecon da tindro vi ne valoras! Malaperigu vin de antaŭ miaj okuloj! Mi mem devas aliri.

Kaj ĉe tio li pendigis ŝultren la praan fusilaĉon, per kiu la karmemoraj Gerge'oj ĉasis iam leporojn, kiun la iamaj leporoj, trafintaj antaŭ ilin, bezonis multe malpli timi, ol la iamaj Gerge'oj, tenantaj kaj fajrigantaj ĝin; do kun ĉi tiu fusilaĉo li ekvojis solsola en la teruran imperion de Jasztrab, en la densan arbaron Lopata.

La arbaro havis „televidan" punkton; Gerge bone sciis el la rakontoj de Matyej, ke tie restadas György Jasztrab plej ofte, ĉar jam lia ofico tiel postulas, ke de tia punkto li okulsekvu la vojaĝantojn, vidante orienten tute ĝis la valo Motuz, norden ĝis la vojkruciĝo ĉe Klokava, kaj en ĉi tiu granda areo li rimarkis ĉion, kion la bona ŝanco ŝovis antaŭ lin kiel predon.

De fore li efektive ekvidis Jasztrab tie, sur la elstara loko, apogitan sur sia fusilo, senmove kiel ŝtonstatuo.

Ankaŭ tiu rimarkis, ke la mastro de la prefektujaj spurhundoj venas, li sciis, ke tiu venas ne sencele.

Li povus facile malaperi for de li, sed al la rabisto plaĉis, ke Gerge venas sola, kiam li povus veni ankaŭ kun kvindek ĝendarmoj. Li sentis, ke tio estas speco de esprimiĝo de respekto al lia persono. Kun la fama György Jasztrab volas kruci la spadojn la fama Gerge. Estas tiel bone. György Jasztrab ne evitos honestan, egalŝancan lukton, li trankvile ĝisatendos, kio okazos.

– Kapitulacu! – krias Gerge jam de malproksime. – Mi venis por vi, filo. Mi mem venis por vi, ĉar mi ne opinias vin speco de fuŝbandito, kiun se oni kaptas, estas bone, se ne, same bone. Kaj tia bravulo ne kapitulacas al ordinara, kruda ĝendarmo. Mi konas vin, karega filo, vi estas orgojla homo, vi alte taksas vian honoron, tial mi venis sola. Venu, nu, ne ludu ŝercon, Geoĉjo: mi tiom bontenos vin hejme, ke eĉ en la sino de via patrino vi ne havis pli bonan sorton ol sub mia mano.

La rabisto nur skuis la kapon kaj mallonge replikis:

– Mi konas vin, diabla ĝendarmo kaj ne kredas al vi. Ne venu pli proksimen, ĉar mi alpafos!

Sed Gerge malgraŭe venis pli proksimen. Jam apenaŭ nur dudek paŝoj apartigis ilin.

Jasztrab minacis lin per siaj muskolaj pugnoj, poste levis sian fusilon, alcelis kaj malŝargis ambaŭ tubojn.

La hometo, la fama ĝendarmo sentime akceptis la kuglojn, kiuj senpere forsiblis preter liaj oreloj; lia mirinda spiritĉeesto ne forlasis lin eĉ por momento. Al tio li ŝuldis sian triumfon. En la momento de la knalo de la pafoj li subite elpoŝigis du plumbokuglojn, kaj post kiam la fumo disiĝis, kaj la rabisto alrigardis, kie Gerge devus kuŝi morte sternita, kaj vidis lin stari, fiere, ĉirkaŭita de la lumradioj de la sinkanta suno, kiel gladiatoro, kiu montras en sia levita mano la du kuglojn, senditajn en lian korpon.

– Ne penigu vin, filo Jasztrab, per pafado! – li alkriis lin per kuraĝa, sonora voĉo. – Estas domaĝe konsumi la pulvon! Kugloj ne tuŝas min, karega Geoĉjo mia! Ankaŭ nun mi kaptis ambaŭ. Jen ili ĉi tie, dum flugo kaptitaj…

La morna rabisto ĵetis terurplenan rigardon al la daŭre proksimiĝanto, kaj subite, multe malesperigite li ĵetis teren sian vastan slovakan ĉapelon kaj stertoris per sufokita, obtuza voĉo:

– Mi vidas, vi estas diablo! Venu do, glutu min! Mi kapitulacas.

Kaj s-ro Gerge manprene kondukis hejmen la sovaĝan rabiston, kiun tri prefektujoj ne povis kapti.

Dumvoje li regalis lin el sia tabaksaketo, frapis por li fajron, kaj poste, kvazaŭ ili estus de eterna tempo intimaj kompanoj, konfesigis lin per mildaj vortoj kiel infanon.

– Vi estas ja ruzmensa, brilcerba homo, Geoĉjo! Vi romp-malfermis la vinkelon de Motosicky, ĉu?

– Dio atestas, ĝi ne estis ŝlosita.

– Mi scias, filo! Sed ankaŭ en la grenejo de Bodony via mano umadis.

– Eĉ ungon da utilo mi ne vidis el tio, la tritiko estis brukoplena, la judo ne volis transpreni ĝin, nur por transporta kosto. Sed eĉ por elmarĉandi tion, unue mi devis trabati lin.

– Ĉio ĉi estus en ordo, karega filo, nur unu aferon vi ne devus fari, mortbati vian avon…

– Kiun tio tuŝas?! – saltleviĝis Jasztrab indigninte. – Li ja estis mia propra avo!

– Vi pravas, filo… vi perfekte pravas! Sed la prefektujo, vi scias, prenas la aferon terure malracie.

&

Kálmán Mikszáth

La bonaj palocoj

Noveloj

La iama ŝafido

Mi komencas de la tago, kiam oni sonorigis kontraŭ la nuboj en Bodok. La manoplatoj de la kompatinda Joĉjo Csuri kovriĝis tute per vezikoj, ĝis li forpelis el la kamparo la nigran koleron de Dio, kiun la fulmoj vane klopodis borderi ruĝa per siaj mallarĝaj rubandoj.

Ĉiuj sentis la proksiman viziton de Dio: anseroj alarmiĝis en siaj noktaj kuŝejoj kaj disfluginte gakadis, arboj krakante kliniĝadis, la vento kunbalais vojpolvon kaj kolere pelis ĝin supren. La flava koko de s-ino Csöke flugis sur la domtegmenton kaj de tie ĝi kokerikis, ĉevaloj henadis en la staloj, kaj ŝafoj, densiĝinte en unu kirlo, teruriĝadis sur la kortoj.

Sed la sonorilsono, kiu majeste vibris en la tempesto, deturnis la danĝeron, se ne kalkuli la iomon da pluvo, kiu plie utilis ol damaĝis. La fantome ondantaj tritikokampoj kaj maiztigoj haltis, la ĉielo laŭgrade klariĝis, kaj nur la torentanta akvo de Bágy, kiu kun sovaĝa muĝado pretergalopis sub la ĝardenoj, montris, ke supre, ĉirkaŭ Majornok kaj Csoltó intense hajlis aŭ eble torente pluvis.

Nu, se nun, ĉi-unufoje la rivereto ne elsaltos el sia fluejo kaj ne forinundos la Bodok'anojn kiel zizelojn, tiam pruviĝos avantaĝa esti kristane katolika vilaĝo – en luterana regiono.

La bordoj pleniĝis de homoj, ie-tie ekbrilis fosiloj aŭ sarkiloj. La maljuna Pál Sós kunprenis eĉ hokstangon. La mastroj relasis la pluvakvon tra fositaj sulkoj en la rivereton. Ho, ĝi nur ne revenu, kunprenante pli multan!

La ŝvelinta akvo malpure ruliĝis plu; ĝi deŝiradis ne nur la subajn foliojn de la laŭborda densa salikaro, sed mordadis ankaŭ ties ŝelojn; ie-tie elfosiĝis kelkaj pecoj el la fandiĝema tero kaj falinte diseriĝis en la akvo. Frumatene pli larĝa punto strekiĝos tra la kamparo, ĝiaj zigzagoj estos same novaj.

Traboj, pordoj kaj ĉiaspecaj domutilaĵoj, pastokorboj, pajlofaskoj kaj fenestrotabuloj flosis sur la ondoj. (Ie la akvo kunprenis tutajn domojn!) Baldaŭ aperis pajloportilo kaj post ĝi la ŝaŭmoj rulis specon de kvarangula ŝtipo…

La lunlumo falis ĝuste sur ĝin. Hm, tamen ĝi ne estas ŝtipo, plie tulip-ornama kesto, kaj homoj, vidu miraklon, sidas sur ĝi milde ĉarma

ŝafido!

Jes ja, nun, ke la vento puŝas ĝin al la bordo, ĝi tute bone videblas de la domo de János Tóth-Pernye; metinte sub sin la du malantaŭajn piedojn, ĝi kroĉas sin per la antaŭaj. Bela neĝblanka ŝafido kun du nigraj makuloj sur la spino, ruĝa rubando ĉirkaŭ la kolo. Iu devis ĝin tre ami.

Tiel pacience ĝi sidas sur la kaprice balanciĝanta akvoveturilo, kvazaŭ ĝi navigus memvole, kaj eĉ se kelkfoje ĝi eligas meketojn, nur pro tio, ke ĝi estas malsata. Ĝi povus ankaŭ manĝi, se la kesto en sia petolo atingus la pajloportilon. Ĝi ne tro malproksimas... jen tie ĝi turniĝas, ĉe la ŝedo de la familio Péri! Nu, do ek, maljuna kesto, postkuru ĝin!

Oni rigardas ĝin dum tempo, atendante ke ĝi reaperu ĉe la turniĝo, sed ĝi ne revidiĝas. La obskuro evidente glutis ĝin, aŭ eble s-ro Pál Sós elfiŝis ĝin dumvoje per sia hokstango...

Male, li konfirmas, ke li ja staris tie, tamen eĉ ombron de besto li ne vidis, kio ja devas esti nepre vera, se tiel bonhava, aŭtoritata persono asertas tion, kiu jam ankaŭ ĉi-jare konsideris malmulta la oficon de paŝtadestro kaj ambicias la vilaĝestran oficon sekvajare en ĉi tiu tempo. Nu, ni vidos, se ni vivos.

Nu, se tiu ŝafido jam venis en la parolon, la kazo ŝajnas tamen kurioza, ja dum ĉe la supra vilaĝfino ĉiu scias pri ĝi, ĉe la ĝardeno de Pál Sós ĝi subite senspure perdiĝas, kaj jam neniu el la malsupra-vilaĝanoj vidis ĝin.

Ho, sed tre multas malicaj langoj en la vilaĝo! Jam sekvatage, eĉ dum la dankmeso ili ripozis nur tiel longe, dum ili lekis la foliojn de la preĝolibroj kaj anstataŭ danki por la indulga graco de la Sinjoro, kiu ne plagis la vilaĝon... sed, kiel mi diris, multas ĉi tie malicaj langoj, eĉ cento da homoj eligas ŝovelile sian langon, por forporti sur ĝi la bonan famon de aliuloj.

Oni tuj atakis Pál Sós per suspektoj: nur li povis eltiri la keston, neniu alia! Sed Dio ne dormas, malbona fajro ne estingiĝas, la afero ne forgesiĝos!

La faro nepre retrovos sian farinton!

Oni flustris plekte-tekse, (ĉu oni suĉas ion tian el la fingro?), ke

tiom kaj tiel multe da malnovaj arĝentaj taleroj troviĝis en la kesto.

Kio veras, estas ja vero, ankaŭ maljunulo povas havi junan fantazion, ĉar la „vinkruĉo” György Mócsik, la peltisto el Gózon rakontis ion tian dum sia traveturo, asertante ke se ne pendus seruro sur lia buŝo... Kiu do povas scii? La flustroj pri la arĝentaj taleroj tamen devas esti nura elcerbaĵo.

Ne troviĝis en tiu kesto eĉ rompita groŝo, sed (hodiaŭ ni jam scias) ripozis en ĝi la doto de la bela Ágnes Baló el Majornok: tri perkalaj jupoj, unu el ili kudrita el kvar teksolarĝoj, ses brilkoloraj tukoj, du por kolo, veŝto kun arĝentaj bukoj, dek lintolaj korsaĵoj, krome peltojako kaj paro da rigidtubaj botoj, freŝnovaj, eĉ kalkanumferoj ankoraŭ ne alnajlitaj. Kompatinda Ágnes Baló, ĉion ŝian entenis tiu kesto!

Post kiam la inundo prenis kun si la kampogardistan domon, ĝi forflosigis ankaŭ la geedziĝon. Sen vestoj ŝi ne povas paŝi antaŭ la altaron por publika honto. Ŝi jam havis ĉion; ho kiel pene ŝi akiris ĉiun pecon, laborante kiel servistino. La nupto estus okazonta ĉe la vinrikolto, almenaŭ la fianĉo mem tiel diris la lastan sabaton, sed nun aŭ ĝi okazos aŭ ne okazos.

Profunda malĝojo premus la domon de Mihály Baló, se ĝi ankoraŭ starus, sed ĝuste pro tio ili estas deprimitaj, ke la akvo forkaptis ĝin. Ágnes ruĝploras siajn brilajn okulojn, kvankam almenaŭ ŝi devus konsoli tiun kompatindan infanon Borcsa, kies ŝafido perdiĝis tiel malfeliĉe, la bunta Cukri, kun kiu ŝi ludis kune, dormis kune... Estas bone, ke la feroca Bágy inundis ankaŭ la paŝtejon... ja malestas tiu, kiu manĝus ĝian silkan herbon, ĉar la kara, dolĉe kara ŝafido Cukri perdiĝis...

Kiel gaje ĝi svingetis sian voston ankoraŭ la lastan tagon, kiel ĝoje ĝi saltetadis ekstere en la brila sunlumo. Ĝi leketis la manetojn de Borcsa, gapis al ŝi per siaj senpekaj okuloj, kvazaŭ sentante, ke lastafoje ĝi vidas ŝin!

Tamen, eble ĝi retroviĝos, eble oni reportos ĝin?!

Kaj vere, post semajnoj venis babiloj pri flosanta kesto, sur kiu sidis ŝafido, obstine, kvazaŭ ĝi gardus ĝin. Oni vidis ĝin en Csoltó, eĉ, ankaŭ en Bodok, ĉirkaŭ meznokto la kolera rivereto portis ĝin tien.

Nu, se tio veras, ĝi ne povis esti alio ol la trezoroj de la filinoj Baló!

Mihály Baló tuj ekiris serĉe. Li retrovos la justan posedaĵon de siaj filinoj, eĉ se liaj piedoj eluziĝos ĝisgenue.

Kaj tiel okazis la hontaĵo en Bodok, ke oni traserĉis la domon de la plej bonhava homo. Dio mia, kiel granda sinjoro estas la leĝo! La vilaĝestro mem kaj unu hajduko ĉeestis, ĉar irante laŭ la klaĉo, Mihály Baló turnis sin al la povo.

Sed la traserĉo ne havis rezulton: oni trovis nenion en la domo de Sós. Ĉagrenite ekiris hejmen Baló, liaj filinoj venis al li renkonte tute ĝis la kamparo, se li estus veninta el la foiro, li ne povus esti pli senpacience atendata.

– Ĉu la ŝafido retroviĝis? – demandis Ágnes per sufokita voĉo. Ho ve, ŝi neniel kuraĝus demandi unue pri la kesto! Ŝi eble eĉ svenus, se subite ŝi aŭdus, ke ĝi retroviĝis.

– Nek la ŝafido, nek la kesto. Kvankam la vilaĝestro ĉion traserĉis ĉe tiu homo, kiun mi suspektas.

Li rakontis detale, kion li sciis. Ágnes skuis malaprobe sian belan kapon.

– Patro, vi, la forto iris kontraŭ li kun la povo, nun iros mi, la malforto – ŝi ekparolis spiteme – kaj ruzo estos mia armilo.

Nur la infano ne ekparolis. Kvankam ankaŭ ŝi staris tie: la plej malforta.

Dum semajno Ágnes forestis, serĉis, esploris, demandis junajn, maljunajn, etajn, grandajn, ankaŭ Gózon ŝi vizitis, kie Pál Sós havas filinon edzinigitan, eble tie ŝi trovos la doton. Sed ŝi atingis nenion, krome ŝi malsaniĝis, oni devis iri por ŝi per ĉaro al Bodok.

Nu jen, ankaŭ la vojo de Ágnes montriĝis vana. Helpis nek povo, nek ruzo. La forto de maliculoj estas pli granda.

Kaj se la vero estus ekirinta ne aliveste nek pretervoje, nek kun punglavo sed kun nuraj manoj?...

Oni devis rezigni nun jam ankaŭ pri la espero. Estis malutile ekmovi eĉ nur pajleron por la afero; ĉar ĝi nur turniĝis en pli malbonan direkton.

Ne nur la doto de la kompatinda Ágnes perdiĝis, sed nun jam ankaŭ ŝia sano.

Veturonte por ŝi, la maljunulo metis kusenon kaj plumonon en la sidkeston kaj kunprenis ankaŭ Borinjon, ŝi vidu iom el la mondo. Plimalpli ŝi ja estas ok-jara, kaj ankoraŭ ne elmetis la piedon el la vilaĝo, ŝi estas tre patrinema... aŭ kion mi diras, ja la kompatinda jam delonge ne havas patrinon!

La timo estis pli granda ol la malsano: ili marŝis perpiede, ĉiuj tri sur la pavimita ĉefstrato, por ke la ĉaro ne skuu ŝin, por enĉariĝi ĉe la sonorilstablo. Ágnes paŝadis tiel facile, ke ŝi povus iri perpiede eĉ ĝishejme. Nun jam certas, superfluis veturi per la ĉaro.

Ili ĝuste deturnis sin ĉe la domo de Gergely Csorba, kiam el post la garbejo de Kocsipál subite venis renkonte la tuta vilaĝestraro kaj gravuloj de la vilaĝo, inter ili ankaŭ s-ro Pál Sós, vestita feste, en freŝnova peltojako, kiu pendis baltee de lia ŝultro. Temis pri la nova preĝejo, kiun tiutage oni konsekris.

– Rigardu, Borinjo! Rigardu bone tiun longharan altulon – flustris Ágnes al sia fratineto –, tiu kunprenis Cukri.

La procesio atingis ĝuste la vilaĝdomon, kaj ĉar s-ro Ferenc Sánta-Radó faris la rimarkon, ke la tegmento bezonus novan pajlotegon, la povuloj de la vilaĝo haltis kaj faksperte okulesploris la veterŝiritan domkovron. Estas ja ne mirinde, ĉio eluziĝas en la mondo, ankaŭ la domo de la vilaĝo ne esceptiĝas.

Borinjo timide rigardis tiun homon, ŝiaj grandaj, bluaj okuloj pleniĝis de larmoj.

– He, ne tiraĉu min! – alkriis ŝin Ágnes kaj ellasis ŝian manon.

– Ne, mi ne... mi nur ektremis... Kvazaŭ mi estus vidinta Cukri kuri al mi en la aero.

Dume ankaŭ ili venis antaŭ la vilaĝdomon. S-ro Mihály Baló diris „Estu laŭdata Jesuo Kristo" kaj pluiris. Ágnes same. Sed jen vidu tiun folan infanon, ŝi aliras tute proksime kaj eĉ alparolas tiun potence grandan homon. Ej nu, por kio tio servas?!

– Onklo! – ŝi ekparolis per sonora, milda voĉo. – Redonu al mi mian ŝafidon!

La estraranoj interrigardis. Kies estas ĉi tiu bela knabineto kun trista vizago?

– Redonu mian ŝafidon! – ŝi ripetis, kaj la maldika infanvoĉo tiel siblis en la aero kiel pafaĵo el ŝtonĵetilo.

Pál Sós alrigardis acerbe, reĝustigis malantaŭe sian en *paloca* maniero kombile kuntenitan, grizan hararon kaj afable demandis:

– Kiun vian ŝafidon, knabineto?

– Mian ŝafidon Cukri, tiun kun du nigraj makuloj surdorse, ruĝa rubando ĉirkaŭ la kolo. Sed vi ja scias tion tre bone…

– Neniam mi vidis vian ŝafidon – li diris laŭvide mishumorigite. – Malaperu de ĉi tie, se mi diras…

Li turnis sin al la estraranoj:

– Ja certe, ĝi estas jam kaduke malnova kovraĵo, s-ro vilaĝestro, enfluas tra ĝi…

– Jes ja, sed ankaŭ tra via kovraĵo ĝi enfluas, kiel mi vidas. Ĝi devas estis ie truhava, s-ro Pál Sós.

Tiu ruĝiĝis ĝishare pro la ironia akuzo de la vilaĝestro.

– Mi ĵuras, vilaĝestra moŝto, en ĉi tiu ŝafida afero…

La infano gape rigardis la scenon, kiam Pál Sós incitite reŝovis sian peltojakon, kaj eltirinte elsube la manon, levis du siajn karnoriĉajn fingrojn al la ĉielo.

– Mi ĵuras antaŭ viaj moŝtoj, ĉi tie sub la libera ĉielo, je la unusola vivanta Dio…

Lozigita de la subita reŝovo, la balteo de si mem malnodiĝis, kaj la peza, nova peltojako komencis gliti malrapide, kaj atinginte la koksojn, ĝi subite terenfalis.

Eliginte ŝrikon, Borcsa alsaltis al la falinta vestopeco.

Ĉiuj alrigardis. En la buŝo de la maljuna Pál Sós frostiĝis la sekva ĵurvorto. Kaj bone, ke ĝi frostiĝis.

– Cukri! Mia ŝafideto! – eligis dolore la knabineto.

Ŝi klinis sin. Alpremis sian kapeton, kie du brunaj makuloj vidiĝis sur la subŝtofo…

Ĝi estis majstra peltistaĵo, la tuta subŝtofo estis el bela, purlavita ŝafledo, tamen ĝia makulhava mezo estis la plej vidinda.

La larmopluvo de la eta Borinjo Baló lavis ĝin eĉ pli pura.

Ŝuldo de Anna Bede

La juĝistoj sidis ĉiuj kune. Ekstere la nebulo peziĝis sur la plumpe masiva konstruaĵo, kaj kvazaŭ kunpreminte ties murojn, ĝi sidiĝis sur la fenestroj kaj opakigis la glacifloroj. Por kio ja servus ĉi tie glacifloroj?

En la ĉambrego regis peza, sufoka aero kun peltojaka kaj branda odoroj, kaj nur en la plej supra fenestrovitro turniĝadis pigre la ventolila rado.

La juĝistoj lace rekliniĝis en siaj brakseĝoj, unu fermis la okulojn kaj soblasinte senpove la manojn, aŭskultis la knaretojn de la notaria plumo, la alia oscedante fingrotamburis sur la verddrapa tablo, dum la prezidanto, ŝovinte siajn okulvitrojn sur la nazopinton, viŝis sian ŝvitantan frunton per poŝtuko. Liaj grizaj, malvarmaj okuloj esplore fiksiĝis sur la pordo, tra kiu nun foriris la koncernitoj de la ĵus traktita punafero, la asignitaj atestantoj kaj akuzitoj.

– Ĉu ankoraŭ restis iu ekstere? – li demandas la pedelon per tirata, malvarma voĉo.

– Knabino – diras la pedelo.

– Envenu do tiu knabino.

La pordo malfermiĝis kaj la knabino enpaŝis. Kun ŝi englitis freŝa aerfluo, kiu milde frapetis la vizaĝojn kaj tiklis la palpebroharojn: tra la densa nebulo kvazaŭ ankaŭ radio ŝtelirus al la fenestro, kaj dancante inter la glacifloroj, pliobligus sin sur la muroj kaj la meblaro de la tribunala salono.

Plaĉa kreito de Dio. Svelta, proporcia staturo, sur kiu la mallonga, florbrodita peltojako alĝustiĝas, kvazaŭ fandita sur ŝia staturo; ŝiaj nigraj okuloj estas pudore mallevitaj, ŝia alta, reliefa frunto estas nubigita, en ŝia ekstero regas ĉarmo, gracio en la movoj, sorĉo en la susurado de ŝia jupo.

– Por kiu afero vi venis, infano? – demandas la prezidanto indiferente. (Tia rigida, severa oficisto havas senson por nenio bela.)

La knabino reĝustigas sian nigran kaptukon kaj respondas kun profunda suspiro:

– Granda estas mia malfeliĉo, tre granda.

Ŝia voĉo estas milda kaj trista, penetranta ĝiskore kiel muziko, kiu

eĉ forsoninte, ankoraŭ postsonoras en la aero, ĉarmante ĉiun kaj ĉion.

La juĝistaj vizaĝoj estas jam ne tiel severaj, ankaŭ la bildo de la reĝo kaj iom for tiu de la tutlanda juĝisto afable mienas al ŝi de la muta muro, por ke ŝi kuraĝe rakontu tiun grandan malfeliĉon.

La dokumento estas ĉe ŝi, ĝi rakontos ĉion; sed unue ŝi bezonas serĉi ĝin en sia brusto, ŝi bezonas malkroĉi la supran agrafon de la korsaĵo kaj enŝovi sian manon.

Ho, tiu malica agrafo! Jen, ĝi dissaltis… falis. Kiel rava vidaĵo, kiam ŝi klinas sin por ĝi pudore, dum la skribaĵo elfalas.

La senindulga griza kapo, tiu de la prezidanto deturnas sin, nur la granda, grasa mano etendiĝas por la skribaĵo.

– Decido! – li murmuras, kiam liaj pikaj okuloj trakuras la dokumenton. – Anna Bede estas alvokita, por komenci sian karcerpunon en ĉi tiu tago.

La knabino malgaje jesas per la kapo kaj kiam ŝi levas ĝin, la funebra kaptuko reglitas, unu dika plektaĵo de la abunda, nigra hararo, liberiĝinte inundas ŝian vizaĝon. Estas ja pli bone, se tiu kovras ĝin, ĉar se ĝi estis pli frue blanka lilio, nun ĝi ruĝiĝas de la honto kiel purpuro.

– Antaŭ semajno ni ricevis la skribaĵon – ŝi balbutetas interrompe. – La s-ro vilaĝestro mem alportis ĝin, ankaŭ klarigis ĝian sencon, kaj mia patrino kompatinda diris al mi: „Aliru, filino, la leĝo estas leĝo, oni ne povas ŝerci kun ĝi.” Mi do jen venis, por plenumi la duonjaron.

La prezidanto eĉ dufoje viŝas siajn okulvitrojn, lia kolera, malvarma rigardo serĉas la vizaĝon de la kolegoj, la fenestron, la plankon, la grandan gisfornon, tra kies aĵura pordeto fajrerantaj ardaĵokuloj fikse rerigardas, kaj li murmuras kontraŭvole: „La leĝo estas leĝo.”

Poste li ree tralegas la asignan decidon, tiujn zigzagajn plumstrekojn sur la blanka papero; sed tiuj konsekvence asertas, ke Anna Bede estas kondamnita pro ricelado al duonjara mallibereco.

La ventolila rado komencas turniĝi kun freneza rapido. Certe vento ekestis ekstere, ĝi ja jam ankaŭ skuas la fenestrovitrojn, kvazaŭ ĝi estus ies hantanta animo; vekante frostajn tremojn, ĝi enŝuŝas tra la aperturoj: „La leĝo estas leĝo.”

La senindulga kapo kapjesas aprobon al la transmonda voĉo, kaj la

granda, grasa mano ekskuas la tintinon al la pedelo:

– Akompanu Anna Bede al la karcera inspektoro!

La pedelo transprenas la dokumenton, la knabino senvorte returnas sin, sed ŝiaj ruĝaj lipetoj, dum konvulsie ili ekmoviĝas, kvazaŭ serĉus vortojn.

– Ĉu eble vi havas ankoraŭ ion por diri?

– Nenion… nenion, nur tion, ke mi estas Erzsi, Erzsi Bede, ĉar bonvolu scii, ke mia fratino estas tiu Anna. Antaŭ semajno ni enterigis la kompatindan.

– Do se tiel, ne vi estas kondamnita!

– Ho, Dio mia! Kial mi estus kondamnita? Mi damaĝas eĉ ne muŝon.

– Sed kial vi do venis ĉi tien, vi fola?

– Okazis, sinjoro, ke dum „ŝia afero" pasis tra la reĝa kortumo, ŝi mortis. Kiam ŝi kuŝis sternita en la florornamita kamero, venis la ordono, ke ŝi tamen devas plenumi „ĉi tiun duonjaron". Ho, kiom ŝi atendis la verdikton! Kiel bone, ke ŝi ne povis ĝisatendi ĝin. Ne tion ŝi atendis…

Ŝiaj larmoj ekfluis pro la rememoro, apenaŭ ŝi povis daŭrigi:

– Dum senmove ŝi kuŝis tie kun fermitaj okuloj, mutiĝinta, surdiĝinta por eterne, mi kaj mia patrino promesis al ŝi, ke ni ĉion rebonigos, kion ŝi pro sia amatino kulpis. (Ĉar ŝi tre amis tiun Gábor Kártony, pro li ŝi implikiĝis en kulpon.) Ni do pensis…

– Kion, infano mia?

– Tion, ke ŝi havu plenan kvieton en sia morta ripozo. Neniu povu diri, ke ŝi restis ŝulda: mia patrino pagos la damaĝon, kaj mi trasuferos tiun duonjaron anstataŭ ŝi en la prefekteja karcero.

La juĝistoj interrigardis ridetante: „Kiel naiva, kiel simplamensa knabino!" La vizaĝo de la prezidanto estus kvazaŭ jam ne tiel ceremonie frida. Per sia flava tuko li viŝas ne tiom sian frunton; eble ion pli malsupre…

– Bone, filino – li ekparolis mallaŭte kaj milde –, sed haltu por momento, nun enkapiĝas al mi…

Sian larĝan manon li metas sur la frunton, faras tiel, kvazaŭ li profundiĝus en siaj pensoj.

– Jes, jes, glitis granda miso en la aferon. Ni sendis eraran dokumenton al vi…

– Nu, vidu, vidu do!

Tiel dolora riproĉo sentiĝas en ŝia voĉo, ke la maljuna prezidanto ree etendas la manon por sia poŝtuko. La kruela homo estas tute emociita. Li paŝas al la knabino, tenere karesas la korvonigran hararon sur ŝia kapo.

– Ĉe la reĝa kortumo evidentiĝis, ke la vero estas tute alia. Iru hejmen, filino, mi sendas mian respektan saluton al via patrino, diru al ŝi, ke via fratino Anna evidentiĝis senkulpa.

– Ni ja pensis tion! – ŝi flustris, premante siajn manetojn al la koro.

Pri la belaj haroj de la Péri-knabinoj

Ho, se la famaj orblondaj haroj de la Péri-knabinoj ne estus kreskintaj tiel longaj, tiel belaj, densaj, prefere ŝanĝiĝintaj en linon aŭ estus po unu elfalintaj!

Se ili estus lino, oni teksus ilin blanka tolo, se ili elfalus, la grundo, kien ili falus, kredus, ke tiuj estas ĉielaj herberoj, kaj ĉe nova printempo ĝi plimultigus ilin.

Sed kio efektive okazis? Kompatinda maljuna Péri!… kial li lasis ilin elhejme sen superrigardo al tiel malproksima loko? La du belaj puceloj rikoltis porparte ie en la montetaro Cserhát. Tie okazis la granda hontaĵo.

Katarinjo, la pli granda laboris per falĉileto, dum la eta Judinjo nur kolektis grenfaskojn, kiujn poste la kokfiera Steĉjo Csató garbigis per siaj muskolaj manoj, kaj ĉiufoje, kiam la knabino klinis sin, ŝiaj malligitaj, flosantaj haroj estis tiel same blindigaj en liaj okuloj, kvazaŭ ili estus ornubiĝintaj tritikaj garboj. Poste la tritikaj garboj fariĝis tiaj, kvazaŭ ĉiuj estus la blondaj haroj de Judinjo Péri.

Kvankam Steĉjo Csató ne devus vidi tiel dumaniere, li estas jam edzigita, kaj eĉ ne la lasta virino estas ŝia edzino, jen tie, apud la alta, svelta Katarinjo Péri. (Ho kio? Ŝi ĵus tranĉis sian manon per la falĉileto!) Ŝi ĵetas tre maltrankvilajn rigardojn al sia edzo. Aŭ ŝi tre amas lin,

aŭ ŝi suspektas.

La falĉileto tranĉas arke en la manoj de la rikoltantoj, kraketas la spikotigoj, plivastiĝas la stoplejo, iĝas malkaŝitaj la birdonestoj; la etaj, flavaj koturnetoj scivole rigardas, kie malaperis la ombranta pajloarbaro? Kiom pli miros ilia kompatinda patrino!

Judinjo malligis la tukon de sur la kapo kaj sternis ĝin sur la neston. Ŝi retrovos ĝin helpe de la nesto, kiam vespere ili hejmeniros; ĝis tiam ĝi tenu por ili ombron.

Sed Steĉjo forprenis kaj kaŝis ĝin en sia brusto. Ho, kiel dolĉe kara tuko ĝi estas. Ĝi bruligas, tiklas lin. Restis sur ĝi ankoraŭ la varmo de la etaj birdidoj kaj la odoro de tiu silkohararo.

– Ĉu vi bonvolas tuj remeti la tukon?! – algrumblis lin Judinjo kolere.

– Mi redonos ĝin por kiso! – anhelis Steĉjo Csató pasie, kaj ektordis tiel forte la pajloŝnuron, ke ĝi ŝiriĝis en ses partojn.

– Lasu min! Ĉu vi ne hontas?! – rebatis Judinjo ruĝiĝinte. – Prefere neniam mi vidu tiun tukon.

Ŝi deturnis sin ofendite, kvazaŭ ŝi kolerus pro la aŭdacaj vortoj. Nu, bone, li prenu ĝin, ĝi ne estas oro, kie ĝi estis, troviĝas ja ankaŭ alia.

– Ho, kiel bonan sorton birdoj havas – eksuspiris Steĉjo... Judinjo ne demandis, kial ili havas bonan sorton. Ŝi silentis.

– Birdo povas fari alian neston, se unu tedas ĝin.

Judinjo ne demandis, kion li komprenas sub tio; ŝi mallevis la kapon.

Ankaŭ sekvatage Steĉjo vane petis la kison, sed kiam triatage ili ekiris hejmen, malsupre, sur la senarbejo, kie la salikaro kaŝis ilin de la postmarŝantaj rikoltantoj, li subite kaptis la vespotalion de Judinjo, kaj ne ellasis ĝin, ĝis ŝi per arda kiso elaĉetis sian tukon.

Nu, bone, li prenu ĝin, ĝi ne estas oro, kie ĝi estis, troviĝas ja ankaŭ aliaj.

Kaj Steĉjo ridis en si: „Se foje la grajnoj ekperlas el la spiko, ĝi tute maturiĝos.”

Laŭte li diris jenon:

– Kiam oni krios la noktomezon, estu en la arbustaro malantaŭ la preĝejo! Mi jam estos tie pli frue.

La knabino ektime rigardis malantaŭen.

– Parolu pli mallaŭte! Eble oni aŭdis vin.

– Venu nudpiede – li flustris –, ne trahumidiĝu viaj botoj: je tio oni sciiĝus matene. Surhavu mallongan jupon: longan la roso malsekigus.

Po kvar, po kvin kuŝis la knabinoj, virinoj malantaŭ la garbaro. La nokto kovris la ĉarman vidaĵon. Nur la steloj okulumis supre, dum sube la belaj okuloj fermiĝis. Steloj ĉiam devas esti.

Antaŭ kokokrio Katarinjo Péri neatendite vekiĝis, ŝi kuŝis inter Judinjo kaj s-ino Csató; ŝi rimarkis, ke neniu el ili dormas. El sub la kuseno de s-ino Csató, dum ŝi turniĝadis, io brila elglitis. Katarinjo palpis ĝin: ĝi estis tondilo. „Nu, ŝi certe volas envulti iun."

Post kokokrio Katarinjo Péri ree vekiĝis, sed ŝi trovis nur la malplenan kuŝejon de Judinjo kaj s-ino Csató. Terurite ŝi saltleviĝis: kie malaperis ŝia fratino? Kvazaŭ ŝi aŭdus konfuzajn voĉojn de la arbustaro, instinkte ŝi kuris tien, kie ŝi trovis Judinjon, falintan kvazaŭ senviva.

Ronde-ĉirkaŭe la herbo kvazaŭ estus brodita per oraj fadenoj, la longaj haroj de Judinjo brilis dise. Ŝiaj haroj estis ĝishaŭte tonditaj. Venĝa mano ĵetis ilin en la aeron, venteto kaptis la harojn, kaj kvazaŭ ili estus eroj de disŝirita kometa stelo, petole ĝi disŝutis ilin. La tretitaj herberoj rekonis ilin siaj fratinoj, kaj milde lasis ilin plektiĝi ĉirkaŭ si... Katarinjo komprenis ĉion.

– Stariĝu! Ni iru de ĉi tie! Mi rekondukos vin al nia patro.

Sed ili povis iri nur ĝis la najbara urbeto. Judinjo falis en febron, dum tagoj ŝi devis kuŝi ĉe fremduloj, malproksime de ilia vilaĝo. Kaj Katarinjo flegis ŝin, zorgis pri ŝi.

Kiam ĉiu ilia mono konsumiĝis, eĉ iliaj superfluaj vestopecoj estis monigitaj, ili havis neniun alian posedaĵon ol la harojn, kiujn Katarinjo kolektis en la arbustaro, la belajn orajn harojn, en kiujn la koro de Steĉjo Csató estis enplektita, kaj kiujn la tondilo de s-ino Csató detranĉis, aŭ eble nur duono de tiuj multaj haroj. Se okazis honto, kio iam estis ĉarmaĵo, eble ankaŭ mono ĝi povus fariĝi.

Tremante, esperante Katarinjo malfermis la pordon de la juda butikisto.

– Aĉetu ĉi tiujn harojn! Ili estas de mia malsana fratino. Ni bezonas

medikamenton, kaj ni ne havas monon. Sed aĉetu ilin tuj, mi devas rapidi. Mi lasis ŝin sola.

La butikisto levis la ŝultrojn: li ne povas uzi ilin, ĉar tre malmultaj, kaj ne sufiĉaj por esti miksitaj kun aliaj haroj, sed ĉar ankaŭ Katarinjo havas ĝuste tiajn harojn, ambaŭ li aĉetos por bona prezo. La knabino paliĝis, ĵetis malgajan rigardon en la spegulon, suspiris kaj klinis sian belan kapon kiel tritika spiko sub falĉileton.

Anhelante li kuris hejmen, sed la malsanulino jam ne estis sola. La maljuna Péri iradis sombre tien-reen en la ĉambro. Li venis, trovis la domon; famo flustris al li, kio okazis, kaj la amareco puŝis lin ekvoji.

– Kie perdiĝis la harkrono de via fratino? – li demandis kolere la enpaŝinton.

– Estas tondita – diris Katarinjo spiteme, paŝinte al la lito, kvazaŭ ŝi pretus defendi tiun, kiu senkonscie kuŝas en ĝi.

Péri silentiĝis, subite liaj vitriĝintaj okuloj sovaĝe fiksiĝis al Katarinjo.

– Kaj kie for estas viaj haroj?

– Mi tondis ilin! – ŝi diris timeme kaj elprenis la flakonon de medicinaĵo el sub sia antaŭtuko.

La maljunulo eligis suspiron, longe li rigardis jen unu, jen la alian belan knabinon. Unu, kiu staris, estis ruĝa kiel rozo, la alian, kiu ĝemis, estis blanka kiel lilio.

Kaj tamen li ekkompatis unue la rozon. Li alpaŝis, karesis tenere, kun amo tiun nematuran kapeton.

– Kompatinda Katarinjo mia! Viaj haroj ankoraŭ elkreskos!

La etaj botoj

Mallarĝaj, grizaj nubocifonoj flosas super la ĉirkaŭaĵo. Granda ĉiela perturbo devis esti nokte mikse kun pluvo, tempesto, fulmoj. Ĝiaj spuroj ankoraŭ ĉie videblas, arbobranĉoj kuŝas rompitaj, pluveroj brilas sur arbofolioj, herberoj, en la preĝeja strato pluvakvo ruliĝas en vastaj rojoj. En la posedaĵo de s-ro János Vőneki staras grandaj flakoj, kaj en la ĝardeno de Mihály Zákó – ĵus rakontis Magda Mihók – la torenta paspluvego forlavis eĉ la birdonestojn.

Super la kotmaro kirliĝas nebulo, travidebla kaj blankeca kiel muslina vesto, la fumo de la vilaĝaj kamentuboj leviĝas vertikale – indikoj, ke ne plu estos pluvo, kvankam la ĉielo estas ankoraŭ kolereta, nubosombra kiel la vizaĝo de avo Bizi, kiu estas marŝanta klinita, kun ŝanceliĝantaj paŝoj tra la longa strato kun Istók Szűcs, la masonisto. Kiom la maljunulo ŝrumpiĝis! Ja ne minirinde, la malfeliĉoj trafas lin po aroj. Lia filino mortis, liaj bovoj ŝveliĝis, lia garbejo, garbaro forbrulis, liajn ĉevalojn vagabondoj forpelis.

Li preme sentas la pezon de la „alia" mano de Dio, post kiam li ne povis ĝuste taksi la pli bonan. Nun li jam volonte petegus la favoron de Lia Dia Sankteco, ja ankaŭ lia filo fraŭlaĝa luktas kun la morto; li ĵurpromesis, ke li uzos sian proprietaĵon nur por fari bonon.

Sed la ĉielregno akceptis la promeson malvarme. Okazis vera miraklo. Kiam la bildo de Sankta Maria, kiun li aĉetis por la preĝejo, estis alveturigata, la ponto de Bágy rompiĝis sub ĝi, la ĉevalo perdiĝis, la ĉaro dissaltis en mil pecetojn.

La homoj rigardas lin el siaj kortoj, el post bariloj, dum li preteriras en lana surtuto, retirinte sian etan, kalvan kapon inter la ŝultrojn.

– Ĉit, he vi! – transprenas la parolon Panna Böngér –, almenaŭ vi ne klaĉu pri li! Dio sufiĉe plagas lin. Metu, karulinjo, kelkajn lignopecojn sub la kaldronon, dum mi kirlas la sukon.

– Ĉi tiu ligno estas humida – transprenas la vorton la vidvino de Mátyás Csupor. – En mia tempo eĉ la ligno pli bone brulis, Panna. Sed tio estas la afero de Bizi! Ĉu vi scias, kio denove okazis nokte?

– Ĉu eble al la ŝtona kruco en la tombejo?

– La ĉiela fajro frapis kaj rompis ĝin, karulinjo. Kvankam nur hieraŭ ĝi estis starigita kun multa elspezo.

– Hu, Dio mizerikorda! – konsterniĝis Panna Böngér. – Do ili certe iras por rigardi ĝin. Ek, saltu, Andreĉjo, postkuru, rigardu, filo, kien ili deturniĝos ĉe la acidakva puto!

„La infano de la vilaĝo" (tiel oni nomis la mildavizaĝan, senpatran, senpatrinan knabon) kaŭris meze de la korto apud la marmeladkuira kaldrono, kio estis tre enviinda stato por li, ĉar li povis ne nur varmigi la piedojn ĉe la fajro (la vetero iom pikis), sed la bonkora Panna Bön-

gér permesis ankaŭ gustumadon.

Brr, nun li devas forlasi ĉi tiun grandan feliĉon pro la maljuna Bizi! Maleme li postamblis ilin. Ili direktis sin vere al la tombejo.

La virinoj diris la veron, la belega ruĝa ŝtonkruco kuŝis en du pecoj sur la flaviĝanta gazono. Kaj ho, kie malaperis la oritaj literoj?! „Por la gloro de Dio, starigita de József Bizi.” La fulma sago de Dio disrompis ĝin ĝuste ĉe la literoj, kvazaŭ Li volus diri: „Mi ne bezonas gloradon deflanke de vi, József Bizi, ankaŭ la Maria-bildon mi ne bezonis, ĉi tiun same ne.”

La maljunulo eklevis la kapon de la tero, kie lia donaco kuŝis disrompita, sed li ne kuraĝis rigardi al la ĉielo, kie oni tiel multe koleras lin. Liaj revemaj okuloj haltis sur la infano, kvazaŭ ties hirthara kapo mezus inter la ĉielo kaj la tero. Andreĉjo apogis sin al frakseno kaj alterne levadis la piedojn, sinkintajn en la pluvsaturintan, grasan tombejan teron kaj rigardis kun gapa scivolo Bizi kaj lian kunulon.

– Ni foriru de ĉi tie! – diris Istók.

– Kio do okazu al la kruco? – demandis Bizi per sufokita voĉo. – Ĉu vi kungluos ĝin?

– Mi neniel! – respondis Istók obtuze. – Kion la fingro de Dio rompis, tion la fingroj de homo ne rekunigu. Jes ja, prave, vian moŝton vizitis Dio…

La dentoj de la maljunulo kunklakis.

– Ho, se Li estus nur vizitinta min! – li vokis amare. – Li jam loĝas ĉe mi, Istók, daŭre Li loĝas ĉe mi.

– Oni devas toleri, s-ro Bizi!

– Kvankam, kredu, Istók, mi ne estas malbona homo.

– Via moŝto estis avara, senkora, orgojla. Vi imagis vin mezo de la mondo. Krome, ni konfesu la veron, vi akiris viajn trezorojn per uzuro.

– Mi taksas ĉion ĉi nun jam nenio… – li stertoris. – Mi frostotremas. Havas malbonan antaŭsenton. Kvazaŭ ies mano kunpremus mian koron. Vidu, ree malfeliĉo atendas min… Ho, vi, obstina Dio, per kio mi povus repacigi vin?!

– He, vidu! – ekkriis Istók. – Ĉi tiu postlasita ido daŭre sekvas nin postkalkane! Kiel ruĝaj estas liaj kruroj pro la frosto! Malaperigu vin

for de ni, bubaĉo!

– Ne forpelu tiun infanon, Istók! Agrablas vidi lin apud ni. Venu pli proksimen, fileto!

La maljunulo pensis pri tio, ke el tiu nubogriza ĉielo subite povas elsalti ankoraŭ unu fulmo, sed nur tiam, se la knabo ne plu ĉeestos.

– Nu, venu do pli proksimen!

– Prefere li iru hejmen – opinias Istók –, ja frosto tremigas liajn krurojn.

– Kial vi ne surmetis botojn, knabo? – demandas milde s-ro Bizi.

– Mi ne havas botojn – diras la knabo malgaje.

– Kial do via patro ne kudrigas paron?

– Mi ne havas patron – li respondas indiferente.

Ĉi tiu indiferenta tono kaptis avon Bizi. Kiel li edukiĝos, se eĉ la amon li ne konas?

Senvorte li prenis la manon de la eta Andreĉjo, prenis lin kun si tra la ĉefstrato, tute malsupren apud la preĝejon.

Tie ili eniris domon, sur kies pordo estis pentritaj du botoj kun spronoj kaj oraj kvastoj, kun la sekva subskribo sube: Botista majstro István Filcsik.

– Mezuru por ĉi tiu infano paron da botoj, s-ro Filcsik por mia konto! – diris avo Bizi.

Filcsik okulmezuris la infanon kaj respondis:

– Mi havas ĝuste pretaj tiel etajn botojn. Mi vetus mian pelton kontraŭ aĉa drapjako, ke ili laŭmezuras.

Li elserĉis la botetojn, ili estis efektive konvenaj: kvazaŭ fanditaj sur liaj piedoj.

La infano ĝojis pri ili, brila rideto disfluis sur liaj vangoj kaj gaje li klaketis post la maljunulo en la porĉon.

Ekstere la nuboj intertempe disiĝis. Kiam avo Bizi elpaŝis sur la korton, sunlumo briligis lian malgajan vizaĝon, la ĉielo afable ridetis. La herberoj ridis al li ĉe la vojo, eĉ la kolektiĝintaj pluvoflakoj. Kvazaŭ novan aeron li ensuĉus, li sentis sin pli facile.

– Donu al mi vian manon, filo! Vi havas tiel bone varman manon. Ĉu vi venos al mi?

La infano rigardis plezure la botojn kaj diris:

– Mi volus iri al la kuirado de marmelado.

– Ne, vi venos kun mi. Ni jam estas hejme, jen ĉi tie ni loĝas en la tegoltegmenta domo.

Ĉe la dompordo la koĉero atendis lin kun la novaĵo, ke la ŝtelitaj ĉevaloj retroviĝis, en la galerio akceptis lin la doktoro kun serena vizaĝo, lia filo estas jam trans la danĝero.

Avo Bizi dankoplene rigardis supren al la ĉielo.

Kiom for ĝi estas kaj tamen tiel proksima…

Per paro da botoj oni povas atingi ĝin dum horo…

Vidvineco de Sofinjo Tímár

Ĉi tiuj karaj kreitoj de Dio, ĉi tiuj blondaj virinoj estas tiel mildaj, tiel bonaj kiel ŝafidoj. Almenaŭ ĉi tiu Sofinjo Tímár estas tute tia.

De kiam ŝi estas edzinigita, oni vidas ŝin nur rideti. Pli frue feliĉe, nun dolore.

Per sia feliĉo ŝi ŝarĝis neniun, nek ŝi ŝarĝas per sia doloro. Ŝi ne fanfaronis, nek nun ŝi plendas. Sed ŝia blanka vizaĝo, ŝia ĉiam pli blanka vizaĝo rakontas ĉiutage al ĉiuj, kion cetere ja ĉiuj scias.

Lia edzo forlasis ŝin kruele, malice. Kvankam li estis brava junulo, la plej laborema, la plej lerta ĉarpentisto en la regiono; kiu kredus, ke li trompas ĉi tiun benitan, karan virinon, ke la nokto de du falsaj okuloj tiom nigrigas lian animon… kaj foriras kun tiu alia virino, por damniĝi en la mondo.

Sofinjo eĉ famon ne aŭdis pri li, kiu scias, kien ili foriris; la vojpolvo, en kiu perdiĝis iliaj spuroj, ne rakontas, la venteto ne flustras, kie ili pasas, la susurantaj frondoj ne eldiras tion por homo kompreneble, kvankam pri tio ili daŭre babilas.

Se li estus almenaŭ dirinta nur vorton, kiam li foriris el Bágy, la koro ne tiom dolorus al ĉi tiu bela blondulino, kiu nun havas la nomon „kvazaŭvidvino”. Se li almenaŭ estus kisinta ŝin lastafoje, eĉ se malvarme, sintrude kaj estus tiel parolinta: „Min ne plu vidos vi: mi amas iun alian, al tiu mi donos mian vivon.”

Male, ŝtele, konspire ili malaperis. Li foriris kaj ne revenis. Jam antaŭ unu jaro, antaŭ tuta jaro.

Li revenos. Ho, certe li revenos. Petro ne estas malbona homo. Lia koro estis ĉiam bona, ĝi ne povas esti definitive malboniĝinta; tiu persono povis ja forpreni lian prudenton, povis nestiĝi en lia koro: tio estas tamen nur kiel falsa farbo, la tempo forsuĉos, paligos ĝin; li returnos sin.

Sofinjo Tímár esperis, kaj kiam la tondilo elfalis el ŝia mano dum kudrado, ŝi suspiris, ho, se ĝi pikiĝus en la teron; kiam ŝi vidis flugantan pigon el sia fenestro, ŝi ĉiufoje eksuspiris, ho, se ĝi sidiĝus sur ŝia barilo[24].

Sed la tondilo ne volis mensogi, nek la birdo pigo…

Ĉiuvespere ŝi sidiĝis sur la sojlo, de tie oni povis vidi malproksimen, tre malproksimen al la serpentumanta landvojo, tute ĝis tie, kie jam pendas la piedoj de la nuboj.

Ŝi faris ombrilon el la mano super la bela, pala vizaĝo, tiel ŝi gapis al tiu granda, mistera paĝo, el kiu elvolviĝas, kiel literoj, ŝarĝoĉaregoj, vojaĝantaj foirvendistoj, vagabondoj, kaj la bona Dio scius diri, ankoraŭ kiuj.

La vilaĝanoj ofte preterpasis, salutis ŝin, sed ŝi eĉ ne rimarkis ilin.

– Sofinjo reatendas sian edzon! – oni flustradis inter si kaj eĉ ridis pri ŝi.

Tamen la malfeliĉa Sofinjo pravis. Ŝia koro sciis pli multe, konjektis pli multe, ol la tuta saĝo de la mondo scipovus diri.

Kiam dum unu antaŭtagmezo kun granda zorgemo ŝi akvumis la tabakajn plantidojn (se la mastro revenos, li havu ion por fumi), enpaŝis variolmakula maljunulino en la korton: ŝi alportis mesaĝon.

– Mi venas de via edzo, Sofinjo. Li petas vin pardoni, li pentis, kion li faris. Li laboras en la tria vilaĝo Gózon: oni riparas la ladon de la preĝejturo. Li mem ne kuraĝis veni, timas, ke vi tre koleras lin. Se vi pardonos lin, venu al li, li mesaĝas.

– Ni iru! – diris la milda, blonda virino.

Li malligis la nigran kaptukon kaj surmetis brilruĝan por la vojo. Ŝat-

[24] Superstiĉo, promesanta feliĉon.

ata koloro de Petro, krome pli konvena al ĉi tiu bela tago.

Oni devis fiksi oritan krucon sur la pintobutono de la turo. La edzino de la ekonoma moŝto naskis ĝemelojn, pro ties ĝojo ŝi donacis ĝin al la eklezio.

– Kiu entreprenos la aferon, knaboj? – demandis la ĉarpentista majstro, s-ro Mihály Rögi.

– Mi! – diris Petro. – Mi grimpos supren, s-ro majstro.

– Pli taŭgus Samu Belindek. Vi estas jam iom peza.

– Neniam mi sentis min pli malpeza.

– Mi kredas. Vi liberiĝis de la ŝarĝo. Ĉu vi vere forpelis ŝin? Hm. Ŝi estis sufiĉe plaĉa jupulino. Ĉu ne, Samu?

– Mi abomenis min pro ŝi. Sed por konfesi la veron, se io estas ringo, tio ja ruliĝas.

– Ĝi ruliĝis ankaŭ el via mano, ĉu? Ĉu vi aŭdas, Samu, hehehe? Ej nu, kia bubo, kia bubo li estas! Nu, tial prefere vi surmetos la oran krucon, Samu.

Petro ĵetis malŝatan, trankvilan rigardon al Samu.

– Lasu Samu, s-ro Rögi! Surmetos ĝin mi. Mi atendas iun de ie. Mia koro tre batas, ĉu ŝi alvenos. Jam ankaŭ pro tio mi grimpos sur la turon, por povi ĵeti rigardon al Bágy laŭlonge de la landvojo.

– Nu, mi ne kontraŭas. Ekiru do rapide, el la supra fenestro mi mem etendos al vi la krucon, se vi jam grimpis supren.

Petro baldaŭ jamis supre; li grimpis lerte kiel sciuro de sur la tabula kornico.

– Nun etendu la krucon! – li kriis subklininte sin. – Lasu min rapide surmeti ĝin!

– Jen ĝi, filo.

Petro grimpis pli supren, kaj kiam li jam estis tute ĝustaloke, unue li ĵetis rigardon al la landvojo el Bágy.

Jen tie ŝi venas! Sofinjo estas tiu! Apud la maljunulino ŝi ĝuste nun turnis sin en la vilaĝon, irante kun hastaj paŝoj.

Lia koro ekbatas forte, io kunpremas ĝin, ŝiaj manoj ektremas, liaj okuloj malheliĝas.

– He vi, Petro! Ĉu jam surmetita?

– Sur kiun butonon mi surmetu ĝin?

La maljuna ĉarpentisto paliĝis en la turfenestro, faris krucosignon sur si kaj malgaje murmuris:

– Nun vi jam povas meti ĝin sur kiun ajn.

Tie estis ne pli ol unu butono. Nur kapturniĝanta homo povas vidi ĝin du, tri. Li sciis, kio sekvos.

Nukriske li desupris la ŝtupojn; li sciis, kiam li venos malsupren, Petro estos jam alveninta sube... eĉ pli fore: en la transmondo.

Samtempe ili alvenis ĉe la bazo de la turo, la edzo kaj la edzino. Kun la diferenco, ke unu el la alto, mortinta.

Tamen ŝi devus kunporti la nigran tukon por ĉi tiu renkontiĝo!

Sofinjo mute falis sur la mortinton, kovris lin per kisoj kaj longe, spasme tenis lin brakumita.

Kiam perforte oni deŝiris ŝin, tiu trista vizaĝo ĉiam plu estis same milda, same trankvila kiel cetere. Ŝi ne havis eĉ nur vorton, eĉ nur larmon.

Ŝi returnis sin, ĵetis lastan rigardon al la mortinto kaj falsterniĝis.

Iom poste ŝi stariĝis, kaptis per ŝtala forto la ŝultrojn de la maljunulino kaj kun sovaĝa, taŭzita vizaĝo, obtuzvoĉe demandis:

– Kial vi kondukis min ĉi tien? De kie mi de nun atendu lin?

Kaj ŝiaj larmoj elŝprucis kiel liberigita fonto.

Tiu pagana Filcsik

Frenezeta suspekto disvastiĝas en Csoltó, Majornok, Bodok, laŭ kiu la fama peltmantelo de la maljuna Filcsik estas nur imagata; li parolas pri ĝi, fanfaronas per ĝi, surmetas ĝin, sed efektive li ne havas, eble eĉ ne havis peltmantelon.

Tamen li havis. La loĝantoj de Gózon (ĉar li transloĝiĝis al ni el trans la rivereto Bágy) tre bone memoras ĝin, aparte la pli maljunaj.

Ĝi estas longa, flava peco kun larĝa, nigra ŝaffela kolumo, de kies du ekstremoj pendas ŝafpiedoj en sia natura formo kun ungoj estiel kvastoj; du belaj arĝentaj bukoj kuntenas ĝin. Sur la du malsupraj anguloj de la mantelo estas po unu metalfadene brodita, verda tulipo.

Plie videblas sur ĝi diversaj birdoj, kiel kutime, en ruĝa farbo, kaj surdorse la urbo Miskolc kun siaj nenombreblaj domoj kaj ĉiuj preĝejoj: eĉ la kalvinana koko staras sur unu el la turoj.

Ĝi estas vera majstroverko, por kiu la peltisto domaĝis nek penon, nek materialon.

Sed fakte ne Mócsik el Gózon faris ĝin, sed la plej fama peltisto en la tuta urbo Miskolc. Eĉ se Filcsik refaldas ĝin sube per butonoj je duon-ulno, ĉi tiu naŭa mondmiraklo balaas la teron. Mallonge, kompare al ĉi tiu peltmantelo eĉ tiu de la moskva imperiestro estas nura vatita jako.

Sed kiel ajn fama estas ĉi tiu vestopeco, kaj kiom ajn István Filcsik fieras pri ĝi, la senindulgaj dentoj de la tempo ne respektis ĝin. Ili traktis ĝin tiel same krude, kvazaŭ ĝi estus la peltjako de la jurstudenta filo de la notario. La brodaĵo iĝis senkolora, disfadeniĝanta, la flava ledbazo malpura, grasa. Ankaŭ tineoj faris sian laboron, aparte en la subŝtofo kaj kolumo ili kaŭzis skandalan damaĝon.

Sed Filcsik, kiel enamiĝinta edzo, kiu ne rimarkas, kiel konsumiĝas la rozoj sur la vangoj de sia edzino, kvankam li mem plukadas ilin… ne emas rekoni ĉi tiun malĝojigan transformiĝon; li daŭre vidas la malnovan pelton en la aĉa, kaj lia kutima parolturno: „Mi surmetos mian peltmantelon” neniam perdis eĉ je hareto sian orgojlan karakteron.

Ĝi pendis vintre-somere sur granda, brilfrotita najlo, por ke, se la mastro sidas ĉe la ŝuformilo, ĝi estu kontraŭ li, por ke li ĉiam vidu ĝin.

Nu, estas ja vere, ke li ne tre multe sidis ĉe tiu ŝuformilo. Oni moknomis lin „botisto de la Di-Sinjoro” pro tio, ke li havis propre neniun alian klienton krom la Di-Sinjoro mem.

La maljunulo estis mallaborema. Se li kelkfoje kudris por iu la deziratajn botojn, li faris tion preskaŭ kiel favoron. Do la mendoj ne tro ĝenis lin, krome li grumblis krude kun la homoj: „Por kio servas botoj por kampulo? Iru vi ĉiuj nudpiede!”

Li estis malafabla, moroza homo; li amis neniun kaj nenion en la mondo krom tiu peltmantelo.

Kaj ne povas esti pli ĉielkria kruelaĵo, ol kiun li faris al sia sola infano Terka.

Sed kion ŝi fakte kulpis? Ŝia patro volis trude edzinigi ŝin al la lama muelisto de Csoltó. Planti rezedon en florpoto kun urtiko!

Do ne mirindas, ke ŝi lasis pendi la kapon, ke ŝia koro tordiĝis, ŝi kapturniĝis, ŝia piedo mispaŝis. Ŝi foriris, eskapis kun la juna nobeljuĝisto[25].

Tio estis granda eraro, sed sango bolas, juneco petolas. La tuta mondo povus ĵeti ŝtonon sur ŝin, krom ĝuste ŝia patro.

Depost tiam la maljunulo fariĝis eĉ pli morna, pli sovaĝa, kaj kiam post tempo Terka venis hejmen viziti kun pentofara vizaĝo, por repacigi siajn gepatrojn, la maljuna Filcsik forturnis sin: „Mi ne konas la fraŭlinon", dehokigis sian pelton kaj foriris elhejme tiel, ke li ne revenis, ĝis ŝia filino foriris.

Post tio la kompatinda Terka ne plu kuraĝis hejmenveni. Nur unufoje ŝi vidis sian patron, kiam ŝi preterveturis en kaleŝo kun la nobeljuĝisto. Filcsik amblis ĝuste al la drinkejo, kiam ŝi postkriis lin el la kaleŝo:

– Patro, patro mia!

La maljunulo levis la kapon, dekaptis kun granda humilo sian ĉapon, poste pluiris senvorte. Ja certas, ŝtono sidas anstataŭ koro en la maljunulo.

Kiom ajn da loĝantoj de Majornok vizitis la nobeljuĝiston, ĉiuj tujis rakonti, kiel bonan sorton havas Terka Filcsik: kvazaŭ ŝi estus sinjorina moŝto. „Kredu, kara, ŝi tute ellernis la moŝtajn manierojn." Kaj kian respekton nia vilaĝo havas de tiam! La vero de la Majornok'anoj nun ja superas tiun de la ceteraj vilaĝoj. Krome oni rakontis al la maljunulo ankaŭ, kion ŝi flustre mesaĝis: ŝia patro vizitu ŝin, oni sendos por li kaleŝon, sidigos lin sur silkan kusenon, tage-nokte li povos trinki mielan brandon, li estos respektata, estimata, ankaŭ la sinjoro mem interŝanĝos kun li manpremon, nur li venu kiel eble plej rapide, ĉar Terka ne plu kuraĝas viziti hejmen.

Sed la maljunan Filcsik oni neniel povis persvadi.

Kvankam se li havus prudenton, li povus plibonigi ne nur sian sorton, sed povus fondi por eterne ankaŭ la bonstaton de la nobla komunumo.

[25] Nobeljuĝisto: origine juĝisto de nobeloj, poste ankaŭ estro de subprefektujo.

Ĉar... sed la vorto restu inter ni, Majornok estas la plej mizera vilaĝo en la tuta regiono. Unuflanke ĝi havas la plej malriĉan popolon, sed aparte pro tio, ke ĝi ne havas eĉ unu pavimitan vojon, nek ponton, nek vilaĝdomon.

Kio ja ne mirindas, ĉar la prefektejaj sinjoroj ankoraŭ neniam havis amatinon en Majornok, ja ili konstruigas landvojon, kien ili kutime veturadas.

Jen ni prenu ekzemple la landvojon al Csoltó: ĝi glatas kiel planko; la laŭborda regiono de Bágy ŝuldas dankon por ĝi al la bela Erzsébet Bitró, dum Karancsalja povas beni la laktoblankan vizaĝon de la svelta s-ino Vér.

Ĉar la mondo estas ja tia: vizaĝo de belulino povas doni pli belan aspekton al la tuta kamparo.

Nu, al tiu malfeliĉa Majornok ĝi donis nenion tian.

La prefektuja vicinĝeniero, kiu faris mapon pri la aspekto de la prefektujo, almenaŭ tiel oni parolas, ellasis ĝin el la mapo. Eĉ, la altestimataj prefektujaj ordenoj kaj statoj[26] estus promesintaj cent okdek bankbiletajn forintojn al la najbara prefektujo Hont, se ĝi akceptas ĝin kiel la sian; sed tiu ne deziris ĝin eĉ kontraŭ pluspago. Nu jes, ĉu ĝin trafu la honto kaj kritiko, kiu pluvas sur la nobelan prefektujon pro Majornok?!

Sed se Filcsik volus... en Majornok nun estus vojo, eble eĉ el ruĝa marmoro... Ili estus nun ĉiuj feliĉaj. Sed li rifuzis la noblan inklinon de la nobeljuĝista moŝto. Kvankam li ja ege bezonus iom da bonstato. La botisto de Dio tre magre statis koncerne terajn bonaĵojn. La pasintan semajnon jam eĉ tiu unu arĝenta buko forlasis la pelton favore al la drinkejo. Ĝi troviĝas de tiam en la ŝranko de Száli.

Nu, sed ne vane li estis „botisto de Dio", „Lia kliento" helpis lin en lia plej granda mizero. Foje komencis venadi anonimaj leteroj per la poŝto, subŝtofitaj per dek, dudek, kvindek forintoj. Kutime iu lia malnova, nekonata, subite riĉiĝinta debitoro sendis sian ŝuldon kun la esprimo de sia danko. Tamen troviĝas ja multaj honestuloj en la mondo.

Dum tempo li kredis, ke io tia povas okazi, eĉ se ne al li, sed al lia

[26] Altestimataj ordenoj kaj statoj: Alparolo de la parlamento kaj prefektujaj asembleoj.

patro, kiu nomiĝis same István. Mirigis lin nur, el kio lia patro pruntedonis tiun multan monon.

Kaj apenaŭ lia suspekto vekiĝis, li tuj trovis ankaŭ la ŝlosilon de la afero. Unu post alia li resendis la alvenintajn monkovertojn al la nobeljuĝisto. Kial li kuraĝas sendi al István Filcsik donacon? Ĉu li scias, ke lia avino estis virino el la fama familio Becsky... kaj tiel plu.

Post tio jam ne plu venis monleteroj, sed por la malĝojigaj novaĵoj troviĝis sufiĉe da portantoj.

La bela Terka Filcsik morte malsaniĝis. Kaj en kio ŝi ĝis tiam trovis plezuron, do brilo kaj pompo, tion nun ŝi malŝatis; ŝi forŝovis de si la multekostajn manĝaĵojn kaj la medicinaĵajn flakonojn, ŝi deziris nur vidi sian patron. Ĉi tiu malfeliĉa Terka ne estis ja tiel malbona knabino!

Kaj ĉi tiu varma deziro ŝia tiom ardis, ĝis fine la nobeljuĝisto mem trudiĝis iri por la maljunulo.

– Nu, maljunulo, mi nun kunprenos vin, ĉu vi volas, ĉu ne. Ne rifuzu tion al via malsana filino...

– Mi ne havas filinon!

– Vi venos kun mi kaj punkto!

– Ne eblas, mi petas vian pardonon. Mi havas tre urĝan aferon. Ne eblas!

– Faru tion por mia kontento! – diris afable la nobeljuĝisto. Filcsik eksuspiris. Eble ĉi tiu estis lia unua suspiro, de kiam li vivas.

– Ĉu vi ne venos? Ĉu vi do rifuzas vian infanon?

– Jes ja, sinjoro.

– Vi estas la skorio de la socio!

– Tio ja ne povas esti malebla. De miaspeca maljuna botisto ĉio malbona atendeblas.

La juna sinjoro nun jam transiris al belaj vortoj kaj promesoj, tamen ĉio resaltis de tiu marmora koro, eĉ la minacoj.

– Arestigu min, sinjora moŝto, katenigu min! Tiam mi iros, se kondukata, kien ajn.

Fine devis hejmeniri sen la botisto tiu potenca sinjoro, kiu ordonis al la tuta regiono.

Tamen li havis hajdukon Mihály Suska, homon ne sen ideoj, li el-

pensis lertan militplanon dumvoje.

– Mi bone konas tiun Filcsik, sinjora moŝto! Li venus post ni kiel porkido post maizkorbo, se…

– Parolu via moŝto!

– Se ni povus ŝteli lian peltmantelon. Ĉar li kroĉiĝas al ĝi per ĉiuj dek ungoj. Li estas tre kurioza homo.

– Nu, do ŝteligu ĝin laŭeble plej baldaŭ!

La maljuna veterano ne bezonis plian instigon, nur ke oni konfidu al li la aranĝon. Depost la revolucio jam ne estis konfidita al liaj manoj tiel grava afero. Tiam, male… sed li ne rakontas prie, ĉar oni ne kredus lin.

La malsana virino dume maltrankvile baraktis inter siaj silkaj kusenoj, ektremante ĉiufoje, kiam ŝi aŭdis kaleŝan bruon. Ŝi levis sin sur la kubutojn, alorelante, enprofundigante siajn magriĝintajn manojn en sian longan, nigran hararon, kiu falis sur ŝian blankan noktoĉemizon.

Ŝi estis provizita per ĉio, kion okuloj kaj buŝo povas deziri, kaj tamen la plej malriĉa en la mondo, ĉar ŝia sano mankis, kaj ankoraŭ io: la amo.

Amoro nur bruligas, ŝi estas jam bruligita, sed amo varmigas, kaj ŝi ankoraŭ neniam sentis tian malvarmon.

Nenio estis bona por ŝi; la voĉo de la viro, kiun ŝi amis, estis tiel neeltenebla, ke ŝi preferus, se li ne maldormus apud ŝi, lasus ŝin sola; la lito estis malmola, vane ĝi estas tuta nuraj silko kaj molaj lanugoj, vane oni reĝustigadis ĝin la servistinoj.

Kiel diference estus, se ŝi povus kuŝi hejme sub la tegmento de la mizera patra domaĉo, ĉe la kupolforno, se ŝi aŭdus tra la malfermita fenestro, kiel la sonoriloj de Majornok vokas al vespera preĝo, kaj ŝiaj malvarmiĝantaj piedoj estus kovritaj per la fama patra pelto. Pri tio ŝi parolis, pri tio ŝi sonĝis nokte, kaj jen – matene la sorto aŭskultis ŝin, kiam ŝi vekiĝis, sur la bela ruĝa peplomo estis sternita ŝia kara, malnova konato, la peltmantelo.

Kaj tiuj rozoj, ruĝaj tulipoj, farantaj ĝian kolumon tiel bela, ĵetis aliajn sur la palan vizaĝon de Terka. La lasta ĝojo estas tiel same dolĉa, kiel iam antaŭ longe la unua devis esti.

Mihály Suska rapide realigis sian promeson kaj tre bone li kalkulis. Kiam Filcsik venis hejmen el la drinkejo, li vidis sian loĝejon rompe malfermita, kaj trovis nur la malplenan lokon de la peltmantelo. La granda najlo nudis malplena, senigita de sia vera ornamo. Kvankam la kalendaro montris la finon de oktobro. La vintro atendis sur la sojlo.

Malesperigita, kun sombra frunto Filcsik iradis-venadis kun profunde sobtirita ĉapelo en la vilaĝo. Li ne manĝis, li ne trinkis kaj li ne parolis. Ĉi tiu plago definitive rompis lin. Li ne kuraĝis rigardi en la okulojn de la homoj, ĉar sur ĉies lipoj li vidis ŝvebi la mokan demandon: „Kie estas for via fama peltmantelo?”

Sed la espero ne forlasis lin. Li sentis, ke la karega peco pli-malpli frue retroviĝos. Ĝi ne povas perdiĝi; kiu ŝtelis ĝin, ne povas uzi ĝin, la tuta regiono scias, ke ĝi estas la lia.

Kaj li ankaŭ ne trompiĝis. La famo alportis, ke la farintoj estas vere trovitaj, kaj la peltmantelo nun troviĝas vere en la prefekta oficejo. La posedanto povas transpreni ĝin en kvar tagoj, en kontraŭa okazo ĝi estos aŭkcie vendita kiel senmastra objekto favore al la elspezoj de la hospitalo.

Li tuj ekiris al la kastelo. Li ne hezitis eĉ por momento. Li ja iras nur rehavi sian justan posedaĵon.

La nobeljuĝisto faris nenian objeton, li agnoskis, ke la peltmantelo troviĝas tie, kaj senvorte manvokis Filcsik sekvi lin. Li kondukis tra multaj brilaj, tapiŝitaj ejoj la kotbotan Filcsik, kiu timide paŝetis post li, ĝis fine ili venis en duonhelan ĉambron.

– Jen tie estas via peltmantelo! – li diris per tremanta voĉo, montrante al angulo. Prenu ĝin!

La maljunaj okuloj laŭgrade kutimiĝis al la duonhelo. Malgraŭ tio li instinkte trovis la vojon, de kie aŭdiĝis mallaŭta ĝemado.

La nobeljuĝisto alpaŝis, distiris la litkurtenojn. Filcsik retrocedis. Tie kuŝis Terka, pala kiel rompita lilio, ŝiaj longaj palpebroharoj fermitaj, ŝiaj piedoj kovritaj per la fama tulipornama pelto.

Ŝi estis bela ankaŭ tiel, mortonte. Anĝelo, adiaŭanta la teron. Kien ŝi rapidas? El la ĉielo ŝi ja foje jam falis!

Eble ŝi ne plu malfermos tiujn ĉarme ravajn okulojn, kiuj tiel ruz-

petole povis okulumi, tiujn dolĉajn lipojn, kiujn estis tiel plezure kisi.

Filcsik staris mute, senmove por momento, kvazaŭ enpensiĝinte; poste li firme alpaŝis la liton kaj prenis de sur la mortonto tiun kovrilon, kiun li tiom deziris. Eble ĝi ja ne plu estos bezonata. La mortonta anĝelo eĉ ne ekmovis sin. La mano de Filcsik eĉ ne ektremis. Eĉ unu lastan rigardon li ne ĵetis sur la malfeliĉan filinon. Mute, senvorte li eliris, kvazaŭ nenio dolorus lin.

Eĉ pro la vortoj de la nobeljuĝisto li ne returnis sin, kiam tiu postsiblis al li „pagano".

Ekstere li ĵetis sur la ŝultrojn sian justan posedaĵon, kaj malgraŭ tio, ke vesperiĝis, li ekiris hejmen sur neirataj padoj. Li nun ne volis renkonti homojn. Eble li sentis, ke li ne estas tio.

De lia vizaĝo eblis legi nenion, ĝi ŝajnis trankvila. Eble vidiĝis sur ĝi ankaŭ iom da kontento pro la retrovo de la peltmantelo. Efektive ŝtono loĝas en ĉi tiu homo anstataŭ koro.

Atinginte arbustaron ĉe la abismo de Majornok (kie nokte, kiel oni diras, la animo de s-ino Gélyi galopas sur panikintaj ĉevaloj), li stumblis je io sur la pado.

Tio estis almozula ŝultrosako, plena de sekaj panpecoj. Lia mastro devis bone preĝi, ĉar ankaŭ por morgaŭ restis por li el la ĉiutaga pano.

Sed jen vidu, tie kuŝas ankaŭ ĝia posedanto sub arbo: ĉifona almozulino, kun sia infano en la sino.

Li metis apud ilin la ŝultrosakon kaj ekbruligis alumeton, por pli bone vidi, ĉu ili eble estas mortintaj.

La profunda spirado malkovris, ke la patrino kaj la infano luliĝis en dolĉan dormon. Murda laco devis tiel dormigi ilin. Nur tiu povas tiel dormi, kiu estas tute elĉerpita. Iliaj vizaĝoj, aparte tiu de la infano, jam nun iĝis bluaj pro la malvarmo, kaj ŝiaj etaj membroj tremis kiel gelateno.

Filcsik elserĉis sian pipon el la dolmana poŝo, plenŝtopis, ekbruliĝis ĝin, sidiĝis sur la herbo apud la dormantoj.

Li rigardis ilin longe. Li povis vidi bone. La ĉielo plenis de steloj. Tiuj rigardis lin, kaj eble ankaŭ mansvingis al li, kuraĝigis lin. Li ĉiam pli proksime klinis sin al la dormantoj, de lia frunto gutis ŝvito, lia kapo

falis, la fama peltmantelo glitis de liaj ŝultroj. Estis bone tiel; al li estis ankaŭ sen ĝi tro varme. Krome ankoraŭ neniam la peltmantelo premis lin tiom, neniam ankoraŭ ĝi tiom pezis al li.

Kiam ĝi deglitis, li levis ĝin kaj kun subita ideo sternis ĝin sur la dormantojn. Poste li saltleviĝis kaj malrapide, enpensiĝe ekiris sur la pado. Foje li haltis, returnis sin. Eble li povus tamen reiri por ĝi?

Ne, ne! Kiel opinius prie tiuj milionoj da okuloj sur la ĉielvolbo?

Nun li jam komencis rapidi, preskaŭ kuri hejmen.

La nokto estis silenta sed malvarma; kaj la maljunulo restis sen peltmantelo, tamen li ne sentis malvarmon.

Unu penso varmigis lin interne, en la loko, kie aliaj homoj havas sian koron, sed kien la providenco, laŭ la publika opinio, metis al li ŝtonon.

Post tio lia peltmantelo ne retroviĝis. Tamen li parolas pri ĝi, kvazaŭ li ankoraŭ havus ĝin. Li vetas je ĝi, fanfaronas per ĝi.

La homoj jam sciiĝis, kaj se ili ne timus lian akran langon, ili nur ridus, sed tiel ili nur montras sin indiferentaj. Dio kaj la homoj forturnis sin de li, ĉar li estas sendia, malbona kristano. Kaj se hodiaŭ aŭ morgaŭ li mortos kiel senmastra hundo, korvoj, frugilegoj estos liaj priplorantoj, la tombeja fosaĵo[27] estos lia ripoziga lito.

La miraklo en Bágy

La rivereto de Bágy estas malgranda. La maldikiĝanta arĝenta rubando ricevis larĝan kadron el sablo, kaj ankaŭ la brilanta sablo, tretata de popolfabelaj feinpiedetoj, havas kadre la senfinajn salikarbustojn.

En la muelejo de Bágy oni ne povas mueli. La korto plenas de sakoj; senpaciencaj viroj kaj virinoj el Gózon kaj Csoltó plensidas la bordon de Bágy ĉirkaŭ la muelejo kaj atendas pli da akvo.

Se ĝi ne venos, oni bezonas fari ion por ĝi. Gyuri Kocsipál, la muelista submajstro jam ŝtelis eĉ la ĉerkoportilon el la tombejo de Majornok, ĝia forbruligo ja estas la plej sekura maniero eltrudi paspluvegon

[27] Neindajn, ekz. memmortigitojn oni enterigis en ĉetombejaj fosaĵoj.

ĉe la ĉielaj potenculoj.

Tio nepre devos havi rezulton, ĉar la kluzoj ja estas mallevitaj, kaj la digo kolektas ĉiunokte tiom da akvo, kiom movas la radojn por unu-du horoj, sed kiom ĝi sufiĉas por tiom da vivmaterialo? Ŝimo konsumos la lastan sakon, kiam venos ĝia vico.

Ĉiuj estas ĉagrenitaj, nur la muelista edzino, la belega Klára Vér iradas ridetante inter la mueligantoj, kvankam ŝi havas la plej grandan malutilon pro la ĉi-jara sekeco.

Se tielos plu, la muelisto de Bágy bankrotos, ĉefe se longe li restos en la armeo, ĉar estas ja fakto, ke la lumono estas alta, kaj virino estas nur virino, eĉ se ŝi zonas sian talion per ora pasamento.

Sed la edzino de Mihály Pillér el Gózon ne lasas ĉi tiun opinion sen kontraŭvortoj.

– Dependas de virino. Ĉu mi pravas, Zsófi. Por la muelista edzino mi ne metus la manon en fajron, ĉar la rufa hararo... hej, tiu rufa hararo... Ĉu ne prave, karulinjo Zsófi?

– Vi ne pravas, onklino Zsuzsi! Bona edzino ŝi estas, eĉ se bela.

– Kiel vi povus vidi ion tian el sub via nigra kaptuko?!

– Mi ĉeestis, kiam ŝia edzo foriris... Kiel multe ŝi priploris lin, milfoje ŝi brakumis lin.

– Ĉiu saĝa edzino portas tiel sian jupon, kara, ke ĝia kolora flanko estu ekstere. Ej nu... ĉu vere emociitaj ili adiaŭis sin?

– La muelisto demandis al s-ino Klára: „Ĉu vi restos fidela al mi?" Klára Vér respondis: „Pli frue fluos supren la rivereto de Bágy, ol mia koro forturnos sin de vi."

– Ĉu Bágy supren? – ridegis moke s-ino Pillér. – Al tio tenu vin, János Gélyi!

Ankaŭ la aliaj ridis. Ja ĝuste tio mankus, ke tiu malmulta akvo returnu sin... La malvigla rivereto Bágy fluas eĉ malsupren nur ĝeme-pene. Pli-malpli frue la sablo soifiĝos kaj eltrinkos ĝin unuglute.

Ĉiuj bone amuziĝis pri la rivereto kaj la promeso de la muelista edzino, escepte János Gélyi. Li ruĝiĝis pro la vortoj de s-ino Pillér, profunde sobtiris la ĉapelon, tamen ne tiel profunde, por ne vidi el sub ĝi ĝis la heĝo, kie la muelista edzino pendigis vestaĵojn por sekigo sur

brancofosto.

La eligitaj langetoj de la sunlumo dancis tra la heĝo, kaj kie ili lekis la humidan tolon, tie ĝi iĝis pli blanka.

Ankaŭ la okuloj de János Gélyi ĵetas tiudirekte radiojn, kaj la vizaĝo de Klára Vér ruĝiĝas pro ili.

La mueligantaj virinoj rimarkas, nu, kompreneble, la alrigardon kaj ankaŭ la rerigardon. Ili vortigas tion, kial ne, kaj kion iliaj langoj tuŝas, tio tuj iĝas pli nigra.

Sed jen vidu, kvazaŭ ili altirus per siaj langoj tiun malhelan nubon, de okcidento ĝi subite kovras la tutan ĉielvolbon. Nu, homoj el Gózon, Majornok, la muelŝtonoj moviĝos vespere.

Ĉirkaŭ la posttagmeza intermanĝo estiĝis tia paspluvego, ke eĉ la sulkoj ŝvelis riveretoj. Vere ne malsaĝa homo estas Gyuri Kocsipál, bone li faris, ke li forbruligis la ĉerkoportilon.

Tri tagojn, tri noktojn laboris la muelilo, malpliiĝis la muelotaĵoj kaj la mueligantoj. Ĉirkaŭ la vespero de la tria tago restis nenio alia ol la dek tritikosakoj de János Gélyi.

La junedzino eble intence lasis ilin lastaj, ĉu por ke li restu plej longe? Aŭ eble ŝi nur petolas kun li. Eble tio estas nur, kiel la okulumoj de la robiniaj floroj: ili falas sur ĉiujn, sed kreskas en tia alto, ke ne eblas pluki ilin…

Senpacience li atendis, ke la bela muelista edzino elvenu.

– Aŭdu, Klára Vér… Ni restis solaj. Bone vi faris, ke vi lasis min lasta.

– Ne mi lasis vin lasta. Unuaeco apartenas al la pli maljunaj en la muelejo – respondis Klára Vér ofendite, kaj turnis sian dorson al János.

La masiva, diktrunka junulo stariĝis antaŭ ŝi, liaj grandaj okuloj ardis en ebria lumo.

– Ne eniru! Mi volas diri, ke mi estas ĉi tie jam la kvaran tagon kun la ĉaro, la furaĝo konsumiĝis, miaj ĉevaloj malsatas. Donu faskon da postfojno el la subtegmento!

– Eĉ du.

– Kaj mi estas jam de du jaroj soifa je unu via kiso – li flustris, kaj liaj okuloj gape gluiĝis al tiu lilia talio, kiu ŝajnis rompiĝi de ĉi tiuj vortoj. – Donu al mi unu kison, Klára!

– Eĉ duonon ne, János Gélyi. Mi estis iam via amatino, sed kison tamen mi ne donis. Nun mi estas edzino de aliulo.

Suspiro ŝiriĝis el la brusto de János Gélyi:

– Frapu do Dio per malbeno tiun vian brilantan, rufan hararon, kiu ree forbalais mian trankvilon!

Ŝi enkuris, eĉ la pordon ŝi fermis post si. Ŝi ne plu elvenis, nur foje ŝi forviŝis de interne la larmojn de la aŭtuno de sur la fenestro.

János ankaŭ tie ekvidis ŝin.

– He, s-ino majstro! Kiam iĝos faruno mia tritiko? – li demandis kun sufokita moko, paŝinte al la fenestro.

– Ĝi ne iĝos faruno, nur grio – replikis la muelista edzino kun petola rideto. – Aŭ, prave, vi ja parolas pri viaj sakoj! Ĝuste nun oni muelas ilin, la duono jam pretas.

János Gélyi mordis sian lipon kaj konfuzite balbutis:

– Kaj la alia duono?

– Dum unu ĝis du horoj ankaŭ ĝi pretiĝos kaj vi povos iri kun dia beno.

– Sed ĝis tiam almenaŭ enlasu min al vi en la varmon! Mi forgesis hejme mian peltojakon; al mi iĝis malvarme.

Klára ekkompatis lin, per tiel malgaja, plenda voĉo li petis. Krome devas esti vere malvarme ekstere... ja ankaŭ ŝi sentas malvarmon ĉe la fenestro, kiam ŝi respondas:

– Nu, envenu do, se vi bele kondutos...

János Gélyi eniris, kaj se nur li neniam plu devus eliri! Kiel plaĉa virino ŝi estas, ĉio ŝia estas aminda, ŝiaj irmaniero, rigardo, vortoj, rideto. Ho, oni ne muelu tiel rapide tiun tritikon!

Li ekhavis ideon, kaj ŝtele eliris al la muelista submajstro. Li trovis lin en la malhelo helpe de lia fajfado. Li apogis sin al la porĉo.

– He, aŭdu vi, Gyuri Kocsipál! Via estos mia flaĝoleto, se la muelŝtono haltos, kaj ne moviĝos ĝis mateno.

– Hm! Sed ni ja havas tiel multan akvon!

– Diru al via sinjorino, ke ĝi ne estas sufiĉa, ke necesas kolekti, kaj mallevu la kluzojn.

La bruoj de la pelrado kaj la kribrilo glutis lian sufokitan voĉon, sed

Gyuri Kocsipál tamen komprenis lin.

– Hm! Jes. Sed tiam ĝi transŝprucos super la digo…

– Ne doloru vin la kapo pro tio, mi donacos al vi ankaŭ mian silkofadene kudritan tabaksaketon.

– Ĉu kune kun la purpikilo kaj fajreroŝtalo?

– Kun ĉio komplete.

Kiam Gyuri fermis la kluzojn, li haltis, atendis. Eble la muelista edzino ekatentos la halton de la rado kaj elvenos por refunkciigi ĝin.

Longe neniu elvenis. Subite ankaŭ la kandellumo estingiĝis interne, en la ĉambro. Kaj en la granda silento ie malproksime, tre malproksime kvazaŭ ekgrincus ŝlosilo en seruro.

Gyuri rikane distiris sian grandan buŝon, elmontris siajn dentetojn, kaj dum li skuis sian densharan kapon, ili aspektis, kvazaŭ blanka papilio flirtadus en la nigra nokto.

La akvo multe akumuliĝis ĉirkaŭ meznokto ĉe la mueleja digo kaj kiam ĝi repremiĝis inter la du rokaj montoflankoj, ĝi ekŝvelis, sed ĉar ĝi ne povis libere elinundi, dum tempo ĝi muĝe frapadis la digon, poste la bordojn, sed pli malfrue ĝi alipensis kaj bele silente returniĝis.

La luno nun elŝovis sian kapon kaj trenis sian arĝente brilantan hararon laŭlonge sur la surfaco de la rivereto Bágy.

La vento ekstridis pro miro, blovis de supre, volis karesi la akvon, kaj jen, ĝi taŭzis ĝin. La salikoj, kareksoj, avelujoj tremante klinis siajn kapojn, moke flustris: la rivereto Bágy fluas supren!…

La bonŝanco de Paŭĉjo Szűcs

Kiam Paŭĉjo Szűcs atingis la grandan falĉejon de la maljuna Bizi, li sidiĝis sur limŝtono, por iom ripozi. En li vekiĝis strangaj pensoj. Ĉu ne estus pli bone returni sin?

Eĉ se li volus, li ne povas tion fari. La tuta mondo scias, ke li rapidas al Gózon, por svati sin al Elinjo Bede. Oni vidis lin trairi la vilaĝon en festa vesto kun ruĝa silkotuko en sia poŝo, kiun li volas interŝanĝi por alia tuko. Nun oni jam divenadas hejme, ĉu li havos bonŝancon.

Prema konjekto pezigas liajn piedojn, kapon. Eble ankaŭ nun honto

trafos lin. Ĉar jam tri jarojn pli frue li flirtadis ĉirkaŭ Elinjo, sed la bonhava s-ino Bede eldiris klare-senerare: li ne donas sian filinon al diboĉulo.

Prave, de tiam li pliboniĝis, fariĝis sobra, diligenta, kaj se fojfoje li ekhavis emon gustumi la fluan plezuron, kvazaŭ forta brido ĉiufoje retiris lin: lia koro estis ĉi tiu brido. Sed post kiam aŭtune mortis la kompatinda Anna Bede, Elinjo fariĝis eĉ pli riĉa. Eble tro fiera, se rigardi lian malriĉecon... Se li almenaŭ ne devus servi, ŝi eble edziniĝus al li, sed tiel... sed tiel... Ej, tamen estus pli bone returni min!

La kolerverdaj herberoj, interflustrantaj en la matena vento, la ruĝaj pulsatiloj kun siaj malgaje klinitaj kapoj, la muĝanta kanaro, farbita malhela de la ombro de la nuboj, ili ĉiuj instigis lin returniĝi...

Nur eta trifolia tufo ĉe liaj piedoj ridis pri ĉi tiu malbona konsilo, kiam la unua radio de la suno, elaperanta el la nubo, falis sur ĝin. La sunradioj petole kuradis sur ĝi de folio al folio, la diketaj folietoj ridetante disstrecis sin pro la varmiganta lumo kaj brilante gajnis orecan koloron, sed ankaŭ perdis siajn brilantajn rosogutojn.

Paŭĉjo Szűcs malkovris kvarfolian trifolion[28] inter ili; li klinis sin por ĝi... ĝi egalas bonŝancon... kaj plukis ĝin.

Vere, ĉiuj kvar folioj havas unu tigeton. Kiel bele ŝvelintaj estas la folioj, ĉiuj estas evoluintaj, karnecaj, senmankaj, ne rustmakulaj, eĉ nur unu flaviĝanta ne troviĝas inter ili; la blankecaj nervuraj makuletoj estas sur ili kisoj de la steloj...

Zorge li metis ĝin en sian monujon inter arĝentajn forintojn, kaj kiam li ree levis la okulojn, la suno jam brilis en sia tuta pompo; la tuta valo de Bágy ridetis. Malproksime la ladtegita preĝejturo de Gózon kvazaŭ etendadus al li orajn rubandojn, kiuj traondas la kamparon inter la du vilaĝoj...

Sed nun li ja ne returnos sin en posedo de la bonŝanco.

Fajfetante li daŭrigis sian vojon ĝis Bodok, kie apud la drinkejo venis transportistoj renkonte al li.

– Kien, amiko Paŭĉjo? – alparolis lin Gergely Mák.

– Al Gózon.

[28] Kvarfolia trifolio: laŭ ĝenerala superstiĉo ĝi alportas bonŝancon, feliĉon.

– Mi vidas je vi. Do rapidu, ili estas hejme! – li diris kaj haltigis sian ĉaron. – Nun saltis en mian menson, Paŭĉjo! Eble vi jam aŭdis, ke mi servos kiel hajduko ekde la festo de Ĉiuj Sanktuloj. Kaj se ankaŭ via sorto tiel turniĝos, vi povus farmi mian bieneton.

– Ne malbone, ja certe... nur mono necesus por tio – li aldonis, subite serioziĝinte.

– Vi pagos ĝin el via gajno. Mi konas vin homo brava. Vi gustumis ankaŭ la malbonon kaj ne refalis. Mi donus ĝin prefere al vi ol al aliulo. Vizitu min dimanĉe, ni faros la kontrakton.

La koro de Paŭĉjo ekŝvelis de espero. La bonŝanca herbo estas tamen ne malsaĝaĵo! Li jam fidis la estontecon kaj ne iris sed kuris al Gózon. Oni ĝuste sonorigis tagmezon, kiam li malfermis la dompordon ĉe la familio Bede.

S-ino Bede tilis kanabon sur la korto, afable ŝi akceptis la saluton de la fraŭlo kaj deskuis la ŝelerojn de sia antaŭtuko, kiel decas antaŭ merita gasto.

– Ni eniru, kara Paŭĉjo! Vi venis ĝustatempe: Elinjo kuiras la tagmanĝon.

Efektive ŝi fervoris en la kuirejo, kiam ili enpaŝis, kaj kvankam ŝi ne lasis elfali la lignokuleron en sia embaraso, tamen certas, ke ŝi ruĝiĝis.

Kaj certas ankaŭ, ke kiam ŝia patrino eniris kun Paŭĉjo en la ĉambron, la katon, kiun ŝi ĵus batis pro ĝia miskonduto, ŝi prenis en la sinon, karesis ĝin milde kaj donis al ĝi teleron da frandaĵo.

– Ne koleru, eta mia cindrostria... mi donas al vi mian parton. Ho, se vi scius, kateto mia, kiu vizitas nin! Venu, lasu frapeti vian vangeton.

La kato faris saĝan mienon, oni povus eĉ babili kun ĝi, kiam Paŭĉjo neatendite, senbrue kaj nerimarkeble aperis antaŭ ŝi.

– Ĉu vi scias, Elinjo, kial mi venis? – li demandis mallaŭte, umante ĉirkaŭ la maŝoj de sia koltuko.

– Huŝ, vi malica! – ekkriis Elinjo, kaj sen ajna vera kaŭzo ŝi forsaltigis la katon, kaj kvazaŭ ne povante reteni sian koleron, persekute ŝi ekkuris post ĝi.

Nu, oni povis atendi ŝin, de si mem ŝi ne venis! Estis malfacile relogi

ŝin. Ŝi kaŝis sin en la florĝardeno malantaŭ siringaj arbustoj kaj ŝovis sian blankmakulan tukon sur sian ardantan vizaĝon, kiam oni vokis ŝin.

Kvankam ĝuste tiun tukon Paŭĉjo volis kunpreni interŝanĝe.

Kaj tio kostis ja ne grandan penon. Ankaŭ Elinjo volis tion, ŝia patrino same ne protestis, la fraŭlo ja reboniĝis, kaj la afero kun Gergely Mák venis kvazaŭ vokita kaj petita. Paŭĉjo ekiris hejmen kun la blankmakula tuko en la poŝo kiel la plej feliĉa fianĉo en la mondo.

Lia vizaĝo ruĝis pro la ĝojo, kaj eble pro la bona vino, ĉar ankaŭ ĝi ne mankis ĉe la tagmanĝo; petolaj fajreroj saltadis en liaj okuloj, kaj senbridaj diabletoj dancis antaŭ li: tiuj pro la ĝojo, kaj ĉi tiuj pro la vino.

Kiam li atingis la drinkejon en Bodok, la diabletoj enkuris ĉiuj tra la drinkeja pordo.

– Ba, kial ankaŭ mi ne enirus? – pensis Paŭĉjo Szűcs. – Estas ja nur unu tia tago inter la tagoj.

Li eniris, trinkis. De la unua litrono li iĝis pli feliĉa, de la ceteraj sovaĝa kaj de la lasta rabia.

– Violonu mian ŝatatan kanton, maljuna Marci Gilagó!

Tra la fenestro li ekvidis koketantan, farbitan vizaĝon, kvazaŭ vokitan kaj petitan.

– Envenu, Maris Réki, mia maljuna amatino! Ni ankoraŭfoje amuziĝu iom! Mi donas al vi ĉi tiun blankmakulan tukon.

La transportistoj el Gózon ree preterveturis, sed nun jam hejmdirekte, kun karba ŝarĝo.

– Ej, ej, Paŭĉjo, Paŭĉjo! – enkriis Gergely Mák riproĉe. – Vi ja faris belan viziton en Gózon.

– Kial tuŝus min Gózon?! Vinon al mi ankoraŭ! Ĉu vi komencos fine mian kanton? Mi pagos por ĝi, jen ĝia prezo…

Li elpoŝigis sian monujon kaj elŝutis ĝian enhavon. La forintoj disruliĝis, kvazaŭ ili estus radoj en la ĉaro de Satano. Gilagó kolektis ilin. Ankaŭ la kvarfolio elfalis. Maris Réki tretis ĝin…

S-ro Gergely Mák skuis sian kapon kaj ekvipis la ĉevalojn:

– Nu, Paŭĉjo Szűcs, vi povos al mi veni por la kontrakto, sed nun jam vane!

La frumatena friska vento mordis blua lian torditan vizaĝon, taŭzis liajn kaŝtanbrunajn harojn, kiam hejme, sur la korto li rekonsciiĝis el sia ebrieco. Kiu kondukis lin hejmen, li ne sciis. Zumis en lia kapo, la mondo turniĝis ĉirkaŭ li ankaŭ tiam: apenaŭ li povis treni sin en sian ĉambron.

Ho, se li ne povus eniri... Sur la lito kuŝis sternita la ruĝa fianĉiniga tuko, kiun hieraŭ li lasis ĉe Elinjo.

Li komencis konsciiĝi. Kiel ĝi povis trafi tien? Ĉu ĝi estus resendita? Neeble, ja neeble... ĉar tiam ankaŭ la blankmakula tuko ankoraŭ devus esti ĉi tie, kiun li ricevis de ŝi! Kaj la kvarfolia trifolio? Ho, se li ne estus ĝin perdinta! Ĝi ne plu estas, nenio plu restas!

Sian nebulan kapon li klinis enpensiĝe sur keston... Eble li ne estis efektive en Gózon, li nur sonĝis la tutan historion...

Sinjorino Galanda

La *paloca* popolo estas superstiĉa, ŝatas misterojn, kredas je diablo kaj premvizioj. Se super *paloco* flugas nigra korvo: tio egalas faton. Li deĉifras la futuron el la susurado de ĝiaj flugiloj. Mistera, malklara nebulo ĉirkaŭas lin, kaj kien liaj okuloj ne atingas, li popoligas tiun lokon per fantomoj, teruraĵoj kaj mirindaĵoj. Falintajn pecojn de fantaziaj popolfabeloj li knedas en bulon, kaj ĝi cementiĝas kredo en lia animo.

Ankaŭ mi mem ensuĉis ĉi tiujn superstiĉojn per lulfabeloj kaj kredas ilin veraj. La lumo de spertoj nur grizigis la nigran fonon, sed ne malaperigis ĝin, tial mi memoras lin, la kompatindan Patyus, neniam li eliros el mia kapo.

Li estis nia koĉero, kaj mia patro foje enkarcerigis lin pro delikteto por dudek kvar horoj. Lia karcero estis malluma kamero, kie li trankvile pasigis la nokton. Armeo-spertintan homon io tia ja ne multe ĉagrenas.

Matene, en mia ĉeesto la servisto portis al li manĝaĵon. Li estis gaja kaj fajfetis, kiam ni reŝlosis la pordon de lia karcero.

Sed apenaŭ pasis horo – ni, infanoj ludis ĝuste sur la korto –, kiam

subite ni aŭdis dolorajn kriojn el la kamero, kvazaŭ botaŭro ekmuĝus.

– Patyus, Patyus! – mi kriis frapante al la pordo. – Kio vin trafis? Parolu!

Neniu respondo.

Mi enrigardis tra la serurtruo. Tranĉa vento frapis kontraŭ mia okulo, kaj sulfura vaporo haladzis, kaj interne la planko frapiĝadis, kvazaŭ du homoj interluktus; kelkaj obtuzaj stertoroj, kelkaj formortantaj anheloj miksiĝis fojfoje en la bruaĉon.

Instinkta timo kaptis min. Mi kuris por mia patro, rakontis al li, ke io okazas al Patyus.

– Vi estas malsaĝulo, filo, li havas nenion malbonan. La maljuna fripono timigas vin.

Kaj por tuj ankaŭ pruvi tion, li malfermis la kamerpordon kaj redonis la liberecon al Patyus.

Tiu mortpala, senenergie elŝanceliris, kvazaŭ naŭ jarojn li estus flarinta la ŝimflorojn de la malliberejo.

– Malfrue! – li stertoris. Jam estas malfrue!

– Kio estas malfrua, vi, urso?

– Mi jam subskribis la kontrakton kun la diablo – li anhelis kaj liaj dentoj interklakadis.

– Sensencaĵon parolas vi, Patyus – mi intermetis. – Kiel vi povus subskribi, kiam vi ne scipovas skribi?

– Per la mano mi strekis krucosignon – li diris amare, kaj refaldinte siajn krudajn ĉemizmanikojn, li montris trueton sur lia maldekstra brako, sur kiu ankaŭ tiam pufiĝis malhelruĝa sangoguto. – De ĉi tie la satano elŝprucigis la sangon.

– Kaj kion vi subskribis? – demandis Patro ridante.

– Mi vendis min por paro da rigidtubaj botoj kaj por ruĝa jupo, kiujn la diablo alportos por s-ino Galanda el la foriro de Putnok. Li permesis al mi nur unununran jaron da vivo.

Ĉi tiu sceno profunde ĉiziĝis en mia memoro, pri kiu ni ne plu parolis, ĉar ĉiuj forgesis ĝin en la domo, nur mi atentis la maljunan Patyus, kiu iĝis de tago al tago pli serioza. Ĉiudimanĉe li akurate vizitis la preĝejon, kaj ankaŭ dumtage mi ofte vidis lin preĝi kun deprenita

ĉapelo, retiriĝinte malantaŭ garbaron.

Kompatinda Patyus! Vanis la preĝoj, ili havis neniun utilon! Ĉe la turniĝo de la jaro, dum fortaventa mateno, kiam ni vekiĝis, la vento balancadis lin sur la kamerpordo; li pendigis sin sur la supra ferbendo: la du malmolaj kalkanumoj de liaj grandaj juftobotoj interfrapiĝadis, kvazaŭ la malfeliĉa Patyus dancus kalkanuman dancon.

Kaj nun jam ĉiuj rememoris la kontrakton kun la diablo, kiun li tiel honeste plenumis. Oni recitis ĉiujn liajn vortojn, kiujn li tiam diris, aparte lian rimarkon pri s-ino Galanda.

Ĉi tiu s-ino Galanda jam delonge fifamis kiel sorĉistino en Bodok: ŝi envultis bovinojn de la komunumo, kaj ili ne donis lakton; kaj se iu iĝis grave malsana, ankaŭ tiun certe la sorĉa kuirmiksaĵo de s-ino Galanda puŝis en la malfeliĉon. Se la pastra moŝto ekhavis stomakan spasmon, kaj ne povis diri la festan predikon, kaj se hajlo batis la kamparon, ankaŭ tiuj estis senescepte kaŭzitaj de s-ino Galanda.

Ĉi tiu s-ino Galanda lavis la vestojn de la malfeliĉa Patyus. La vorto 'lavis' eble signifas nenion en la salonoj, sed ĉe la ordinara popolo ĝi egalas interrilaton. Kiu lavas por ĉiamfraŭlo, tiu estas ĉio por li, tiu estas lia akompana ombro; tiu alte taksas lin, dum li vivas, kaj priploras lin, kiam li mortas. Tio estas geedzeco, kiun ligas ne ĵuro sed amaso da vestopecoj.

Tial s-ino Galanda elakompanis la malfeliĉan Patyus al la ĉetombeja fosaĵo.

Tio okazis ĉirkaŭ la komenco de la aŭtuno. Sekvis ĝin kruda, obstina vintro. La tero estis kovrita per blanka tuko, kiel poetoj kutimas diri, sub la fajfanta vento la prujnaj branĉoj de la arboj krakadis, knaradis kiel ostoj.

Kiu iam vizitis Bodok, al tiu certe frapis la okulojn tiu blanka domeeto, kiu estis konstruita tuj ĉe la tombejo, kaj kies ĉiuj fenestroj rigardis al la tombejo. Mia patrino estis konstruiginta ĝin. Ŝi havis iun, al kiu ŝi volis esti ĉiam proksime. Ĉi tie ni loĝis, en ĉi tiu domo, kie ĉio estis tiel malgaja, tiel fantomeca.

Multe pli la Luciino-tago[29], kiu estas ankaŭ sen tio tiu de sorĉistinoj.

[29] Tago de Luciino: la 13a de decembro, tago al kiu ligiĝas multaj superstiĉoj.

Mi vigle memoras kelkajn, aparte tiun, kiu sekvis post la enterigo de Patyus.

La vicpaŝtistoj komencis skulpti Luciino-seĝojn[30], la koĉeroj desegnis krucojn per ajlo sur la stalpordoj kontraŭ la misefiko de malicaj sorĉistinoj, kaj ni infanoj tremante rigardis, kiel vesperiĝas, kiel la monstroj de la fajraj balailoj prenas la nokton sub sian povon.

Mia timo tamen tute disvaporiĝis, kiam vespere venis al ni gastoj: la fratino de Patro kun sia filineto. Min kuraĝigis la scio, ke ankaŭ en la najbara ĉambro iuj dormos. La sorĉistinoj povos enveni nur tra ĝi. En ĉi tiu kredo mi dolĉe luliĝis en dormon, pluplektante en mia sonĝo la fabelojn de patrino.

Miaj gepatroj timis nenion, kaj mi tiam miris pri tio. Ili ne ŝajnis rimarki la Luciino-tagon, almenaŭ ili eĉ ne menciis ĝin.

Sed post noktomezo subite ŝirvekis nin el nia dormo la ŝriko de onjo Mari en la najbara ĉambro. Ni alkuris, ĉu elbe io trafis ŝian filinon. Onjo Mari kuŝis kun distaŭzita hararo, tremante, duonsvene, kunfalinte meze de la ĉambro kaj nur per interrompataj vortoj ŝi povis direkti nian atenton al tio, kio ekstere okazis.

Kaj efektive, infera kakofonio aŭdiĝis de ekstere, hundoululado, homŝrikoj, veoj kaj tondrecaj krakegoj.

Ni elrigardis tra la fenestro. La luno fantomece prilumis la tombejon. La neĝkovritaj tombaltaĵoj blankis kiel paŝtiĝantaj ŝafoj; nur la alta kolono de nia kripto ruĝis.

Pli fore, ĉe la rando de la tombejo, kie troviĝis la tombo de Patyus, staris mirinde bela knabino kun malligita, nigra hararo, glime brilantaj okuloj, kiun amaso da gigantaj spurhundoj mordadis, ŝiradis.

Ŝia marmora frunto, sur kiu sidis ia demona obskuro, vunde sangis, la manikoj estis tute forŝiritaj de ŝiaj brakoj, kaj ankaŭ de ŝia svelta staturo la robo pendis en ĉifonoj. Ruĝa sango ŝprucis en maldika fluo el ŝia brusto.

Ŝi kolektis la sangon en siaj manetoj kaj ŝprucigis ĝin kontraŭ la okulojn de la inferaj spurhundoj, de kio tiuj muĝante, jelpante pro

[30] Luciino-seĝo: oni komencis skulpti ĝin la 13an de decembro kaj finis ĝin la 24an de decembro. Stariĝinte sur ĝi, oni ekvidis sorĉistinojn.

doloro, dissaltis, por baldaŭ returni sin kun nova furiozo.

Kaj kvazaŭ dume tomboj malfermiĝus en la ĝardeno de mortintoj, hundoj post hundoj vekiĝis el la blankaj terbuloj. Unue ili estis nur nigraj punktetoj, fulmrapide ili kreskis, ĝis kun nervotremiga bojado ili ekkuregis en neniam malpliiĝanta grego al la tombo de Patyus.

Patro tremante frapfermis la fenestron kaj trenis nin kaj patrinon duonsvenajn al nia lito.

Matene la famo rapide diskuris tra la vilaĝo, ke dum la nokto, en tiu de la Luciina tago diabloj en formo de hundoj disŝiris sorĉistinon.

Pro tio, ke ankaŭ ni konfirmis la fakton, la magistrato tuj transformiĝis en komisionon, por konstati la eventon surloke.

Mi petis Patron, ke ankaŭ mi povu kuniri kun la respektinda palavrantaro.

Antaŭe paŝadis la s-ro vilaĝestro, post li s-ro Istók Buga amblis, puŝpikante per sia kornusa bastono la patrinan teron. Ĉeestis ankaŭ Mihály Suska, kiu insiste asertis, ke sorĉistinoj ne ekzistas en la mondo, ĉi unusola okazo tamen povas esti escepto.

Ni alvenis la tombon de Patyus kaj trovis la spurojn de la interpuŝiĝo. La tombo de Patyus aspektis kiel freŝnova, brodita drapmantelo. (Kompatinda Patyus deziris dum sia tuta vivo tian drapmantelon.) Kun la diferenco, ke tiuj floroj estis pentritaj per sango sur la blanka neĝo!

La fatala loko plenplenis de ŝtofpecoj. Peco da blua tolo: kaptuko, ruĝa silkoŝiraĵo: jupo (eble ĝuste tiu, por kiu Patyus kontraktis kun la diablo), ie-dise ŝirpecoj el pli kruda hejma tolo: certe korsaĵo.

La s-ro vilaĝestro reŝovis la ĉapelon sur la kapo kaj jene esprimiĝis (ni ĉiuj atendegis liajn vortojn):

– Mi havas de mia flanko la opinion, ke tia afero eble eĉ en Budapeŝto ne okazis nokte.

– Tamen kiel via moŝto prijuĝas ĝin? – demandis urĝe la komisianoj.

– Ĉu prijuĝi? Mi ja prijuĝus ĝin – diris la vilaĝestro –, se ne estus tubero en la afero…

– Kio ĝi estus, s-ro vilaĝestro?

– La tubero sidas tie, ke ĉi tiu loko, kie ni staras, kaj kie ĉi tiu luci-

fera afero okazis, estas tre proksime al la vilaĝo; kaj ne estas sufiĉe proksime al la limo de nia kamparo; ĉar se ĉi tiu loko, kie ĉi tiu lucifera afero okazis, situus pli proksime al la kamparlimo, ni simple donacus la limon de nia kamparo tute ĝis ĉi tie al la Gózon'anoj, kaj tiam la kapo de lia moŝto, la vilaĝestro de Gózon dolorus, kaj ne la nia pri tio, kio farendus. Sed tiel ni ne povas fordonaci la kamparon, ĉar al ni restus nenio.

Pri ĉi tiu profunda saĝaĵo konsente kapjesis la tuta prisorĉistina deputitaro, kaj oni tuj sendis la vilaĝpedelon por la altestimata paroĥestra moŝto, por ke li bonvolu konsekri la lokon kaj la vestoĉifonojn, nome plej urĝe, ĉar ĝis tiam kristana homo ne povas paŝi proksimen, nek preni en la manojn, kiel la esploro postulus, la suspektindajn, inferajn pruvaĵojn.

Dum la altestimata paroĥestra moŝto alvenis kun la incensilo kaj konsekris la koncernajn lokon kaj objektojn, kunariĝis ĉiuj maljunulinoj de la supra vilaĝfino, kaj ili baldaŭ konstatis je la brodaĵo sur la kolumo de la disŝirita korsaĵo, ke ĝi apartenas al neniu alia, ol – estu laŭdata Jesuo la Kristo – al s-ino Galanda.

– Oni devas ŝtiparumi ŝin! Palisumi la obstinan, maljunan sorĉistinon! – aŭdiĝis krioj de ĉie, skuis la kapon nur mi, kiu mi vidis okulateste, kvazaŭ ŝi estus ĉi-minute antaŭ miaj okuloj, ke tiu estis belega juna knabino, kiun pasintnokte la hundoj disŝiris.

– Ŝi ne forbrulos eĉ en fajro! – aŭdiĝis replikoj de la *palocaj* virinoj.

– Ni vidos, homoj! – diris la vilaĝestra moŝto. – Se en Szeged oni povis ŝtiparumi ilin, do ankaŭ mi povos... aŭ mi ne estu vilaĝestro!

Kaj frapinte sur la bruston, li ekiris kun granda memfido fronte de la marŝantaro rekte al la malpura kabanaĉo de s-ino Galanda.

Alveninte, ni pliopiĝis tuta armeo. Ĉe la barilo la du pedeloj, kiel la deco postulas, diskurigis la popolaĉon per energiaj batoj, kaj nur mi kaj la oficialaj personoj estis enlasitaj. Antaŭe iris la pastra moŝto Kubcsik kun la incensilo.

Ni paŝis en la kuirejon. Sur la kuirforno bolsusuris ĉiuspecaj dekoktaĵoj en grandegaj potoj, disvastigante inferan odoraĉon. Kun pinĉita nazo, malrapide, piedpinte ni paŝis al la ĉambropordo, la altestimata

pastra moŝto ektiris la pordoŝnuron kaj unue enlasis sanktan fumon tra la aperturo, kaj nur post tio ni kuraĝis enpaŝi.

Tie kuŝis la maljunulinaĉo en sia lito, anhelante, ĝemante. Sur ŝia kapo estis glacia kompreso, ŝiaj abomenaj faltoj malkaŝis nenion, eĉ ne scivolon, sur ŝia mentono hirtis kvin longaj, grizaj haroj, donante eĉ pli timigan aspekton al ĉi tiu bufo.

– Kiel via moŝto fartas, karega avino? – demandis la vilaĝestro kun estimplena tenereco, ĉar ja neniu glutis fungon, por kolerigi kontraŭ si maljunan sorĉistinon.

– Mi tre malbone fartas, karega filo. Mi plenplenas de vundoj, mordoj. Rigardu mian korpon!

Kaj ŝi levis la angulon de la plumono, lasis vidiĝi la vundojn sur sia brusto kaj la spurojn de hundomordoj sur siaj elsekiĝintaj kruroj. Elpufiĝantaj ostoj en bluaj kampoj, kiel heraldikistoj dirus.

– Hihihi! – ŝi ekrikanis, montrante la iaman loĝlokon de siaj dentoj – mi havis afereton ĉi-nokte.

Kaj per siaj ruĝecaj okuloj ŝi sendis oblikvajn rigardojn al la komisianoj tiel, ke ties dentoj interklakadis.

– Jam certas, ke ŝi estas la sorĉistino! – flustris al mi s-ro Istók Buga.

– Ne ŝi!... Ja neniel ŝi! – mi respondis subvoĉe. – Mi insistas pri tio, ke la sorĉistino estis bela knabino. Mi vidis ŝin propraokule.

S-ino Galanda eltiris sian ostecan, bandaĝitan manon el sub la plumono kaj minacis min per ĝi.

– Ej, ej! Ĉu vi do kredas, ke la maljuna s-ino Galanda ne scipovas esti bela, se ŝi volas? Ej, ej, atentu, neniel renkonti la maljunan s-inon Galanda, kiam vi vidos antaŭ vi la plej belan virinan vizaĝon...

La vilaĝestra moŝto puŝis kubute la s-ron juĝisto, kaj la s-ro juĝisto puŝis la s-ron pedelo, kaj la s-ro pedelo puŝis la pastran moŝton, kaj en bela ordo, senvorte, silente ni forleporis el la ĉambro.

Sankta Maria de Gózon

La kristana religio iĝis tiel populara ankaŭ pro tio, ke bela, blonda virino troviĝas inter ĝiaj dioj. Ŝia milda, ĉiela vizaĝo helpis konkeri la homaron. Kaj al revemaj, sonĝemaj homoj, kiuj kredas je ŝi, plej ofte ŝi aperas. Ŝi aperas el putofundoj, elmergiĝas el la ondoj de Bágy aŭ en la mistera duonlumo de arbaroj ŝi montras sin al tiuj, kiujn ŝi ekamis.

Ankaŭ la forpasinta János Préda vidis ŝin, same s-ino Szűcs, krome la patro de Mihály Sánta-Nagy, sed ŝi devis aperi ankaŭ al la prauloj, ĉar ne senkiale oni konstruis la naŭ kapelojn kun kalvario en la kaŝtanarbaro de Gózon.

Kio koncernas la loĝantojn de Bágy, el ili nur al Panna Gughi estas donite, vidi aperi Maria; ŝi interparolas kun ŝi ĉe la sankta puto ĉiufoje, kiam okazas kermeso, ĉar ŝi estas la plej pia inter la fidelularo kaj kantas la psalmojn per tiel bela, devota voĉo, ke la antaŭkantanta Jancsi Mindég, portanta la florkronitan Kriston, ne lacas ripeti: „Jen belega voĉo, tiu de la vilaĝa kantoro kompare estas azenbleko".

Sed pli granda admiranto – ol la maljuna Jancsi Mindég – de la voĉo de la junedzino, kaj... kiu scias... eble ankaŭ de ŝiaj du ruĝaj vangoj, kokse luliĝanta, bela talio estas Gábor Csúz, ĉar li estas tiel disfame pia fraŭlo, ke eĉ Panna Gughi ne estas pli fervora pilgrimanto ol li. Tamen estas io neordinara en tio, se iu subite turnas sin tiel devote al la sanktuloj. Ja, kiel oni diras, kiu multe staradas sur la korto de juĝisto, tiu certe havas proceson.

Oni flustradas... Kiu propre rakontis?... Certe la draŝantoj sur la kampo de Bizi'oj, ke en Csoltó, kie li pasintjare servis ĉe ili, li estis fianĉigita kun brava junulino nomata Marinjo Kovács, kaj li tiom akiris ŝian koron, ke ankaŭ ŝian prudenton li forprenis. Ĉi tiuj honestaj homoj estas nun tute skandalitaj pro lia konduto; ja farinte ŝin, malfeliĉa, li forlasis ŝin. Vane sendadas al li Marinjo mesaĝojn, ke la honto mortigos ŝin, ke la fraŭlina harbendo bruligas ŝian kapon, tio lin neniom tuŝas, kaj li eĉ ne montras sin al ŝi. Tio ne havos bonan finon! Foje la knabino aperos ĉi tie kune kun sia honto.

Pririgardu foje ĉi tiun Gábor Csúz: en liaj grizaj okuletoj sidas insido, kiom ajn li turnadas ilin al la ĉielo. Se oni mencias al li Marinjon Ko-

vács, pi-afekte li hezitas-evitas dirante, ke okazis tiel kaj ĉi tiel, ke ja estis io inter ili, tamen la knabino estas luterana, kaj li, fervora katoliko ne perdis la prudenton edzinigi ŝin.

Aŭdu he, vi Gábor Csúz! Dio ne postulas tiajn aferojn!

Respekto, estimo doniĝu al Panna Gughi, sed tio estas jam kredeble ŝia afero, ĉar aŭ la fraŭlo estas stulta, kaj ŝi inokulas en lin la blindan fervoron, aŭ estas rilato inter ili... Hej, Panna, Panna Gughi! – Dio pardonu min, se mi pekas –, sed ankaŭ ŝia sankta vivo ne estas tute pura afero.

Estas ja prave, ke preĝado estas ŝiaj enlitiĝo kaj vekiĝo, kaj kvin specoj de rozarioj troviĝas en la poŝo de ŝia faldjupo, kaj ŝia fola edzo adoras ŝin kiel sanktulon. Oni ne povas ankaŭ nei, ke ŝi troviĝas en graco ĉe la ĉielanoj: se iu havas malfeliĉon, ŝi intervenas ĉe la Beata Virgulino. Tamen estas, jes ja, tre suspektinde, ke el la multa mono, kiun la helpobezonaj homoj sendas tra ŝi al Maria, unu truan taleron pasintfoje rekonis Erzsi Beda ĉe la butikisto de Kartal. Sanktaĵo estas tiu mono, kiun ŝi sendis al Maria. Ŝi ankaŭ demandis al Panna, ĉu ŝi transdonis ĝin.

– Jes ja, certe, karulino. La Beata Sinjorino promesis, ke ŝi mildigos la koron de via patrino al Pali Szűcs. Ŝi ankaŭ transprenis la taleron kaj dankas vin plej kore.

Nu, kiel tio okazis, kiel ne, neniu povas scii, tamen estas fakto, ke Sankta Maria mem ne povis porti la taleron al la judo de Kartal.

Estas ankaŭ fakto, ke semajnon pli malfrue duone, se ne tute ĉio evidentiĝis en la aŭtuna kermeso en Gózon.

Pasis belaj, mildaj tagoj. Multaj veturis tien el Bágy: Zsófi Tímár tuta en nigra lintola vesto, la maljuna József Bizi, s-ino Böngér, eĉ la sendia István Filcsik kun la tuta domanaro (jes ja, la mondo renverse inversiĝas!), ne mankis la kokete flirtema Klára Vér (la malpudora ne hontas iri inter homojn!), kaj kiu scipovus listigi la ceterajn: estis bonaj kaj malbonaj intermikse, inter ili, mi ne bezonas diri, Panna Gughi kaj Gábor Csúz.

Granda kunariĝo estis, ĉirkaŭ tridek procesioj venis el la ĉirkaŭaĵo. El Gózon, Bodok, Kartal, Szilke, Tarján, Beléd, Keszi, *palocoj* el Csoltó,

eble ankaŭ la katolika parto el la malproksima Majornok. En tiaj okazoj estus bone farmi la kvestujojn de la pastroj!

Tiuj el Bágy alvenis ĉe sinkanta suno, kaj trairinte surgenue la naŭ kapelojn de stacio al stacio, ili apenaŭ havis tempon ĉirkaŭrigardi inter la mielkukistoj, kie la popolo plej dense ondis. Kaj jam krepuskiĝis, kiam ili nestiĝis por la nokto, kaj la elĉerpiĝo tuj lulis la plimulton en dormon, nur malmultaj aŭskultis Panna Gughi, kiu parolis mirindaĵojn pri la Sankta Maria de Gózon.

– Kaj poste, kio poste?... Rakontu plu, karega filino Panna! – instigis ŝin s-ino Filcsik. – Kion ankoraŭ diris la Sankta Virgulino?

– Mi devas ĉion raporti al ŝi pri vi ĉiuj.

– Ho, ho, ho! – gurdas la variolmakula Panna Böngér –, kiel feliĉa estas tiu, kiu estas tiel dioplaĉa kiel vi! Ĉu mi donu sub vin ankaŭ ĉi tiun ŝultotukon, Panna? Mi vidas, via kuŝejo estas malmola, karulinjo. Kaj vi, Gábor Csúz, ekscitu iom la fajron, ni vidu la vizaĝon de mia kolombinjo, kiam ŝi parolas...

Gábor havis nenion kontraŭe: li svingis lignopecon kun ardaĵo kaj prilumis ŝian densan, nigran hararon kaj ŝiajn du okulravajn vangokavetojn, aspektantajn sur tiu ruĝeta vizaĝo kiel senfundaj kavoj, kie liaj trankvilo kaj animo perdiĝis.

– Priskribu, koreto mia – konfesigas ŝin s-ino Filcsik –, kiel Maria aspektas!

– Ho, estas malfacile rakonti... Blindige blanka vizaĝo, orblonda hararo, falanta sur la ŝultrojn, malgajaj, bluaj okuloj, sur ŝia dekstra brako, sanganta pro dornoj, infaneto dolĉe dormas...

– Ho jes... la eta Jesuo! Tiel same ŝi estas pentrita en mia preĝlibreto...

– Kaj en la preĝejo de Bodok! – aldonas Gábor, kaj animite sorbas en sin ĉiun vorton de Panna; kiel la Virgulino venas, kiel foriras, kelkfoje ĉirkaŭas ŝin blindiga lumo, alifoje ŝi surhavas simplan katunan robon. Sed nur ŝi povas vidi ŝin, se ŝi restas sola ĉe la Maria-arboj.

– Ĉu hodiaŭ vi vidos ŝin? – oni demandas.

– Mi ne scias; en mia sonĝo ŝi kutimas voki min – respondis Panna, poste klinis sin al Gábor kaj flustris en lian orelon: – Malgraŭ tio vi ta-

men venu, por kiam mi diris!

La fajro jam ne brulis, nur ie-tie ekflametis fajreroj sub la cindro; la sonĝo iom post iom fermis la okulojn, ankaŭ pli fore estingiĝis la flamoj, la tuta kermesa popolo ripozis en la sino de Tiu, al Kiu ili venis sur la vastan kampon, etendiĝantan rande de la arbaro. Estis silento, nur la arbaro de Gózon muĝis maldekstre, kelkaj noktaj birdoj flirtigis siajn flugilojn en la aero. Pro tio la fideluloj povis sonĝi tiel same trankvile pri la blindige blanka vizaĝo, orblonda hararo... kiel maltrankvile sonĝis maldorme Gábor Csúz pri la kaveta, ruĝeca vizaĝo kaj korvonigra hararo.

La kermesuloj el Bodok, Tarján, Beléd, kaj aliflanke, Dio scias, kiuj fideluloj blankis ronde-ĉirkaŭe. Inter ili unu figuro ofte ekmovis sin, kvazaŭ li esplorrigardus ĉi-flanken. Gábor vidis, ke ankaŭ aliflanke baraktas iu maltrankvila animo, ankaŭ tiu ne povas dormi, ankaŭ tiu gapas en la grandan nenion kiel li. Longa, longa tempo pasis, ĝis fine la sonorilo ekgongis sur la kalvaria monteto. Ĝi vidis leviĝi Panna inter la virinoj kaj malaperi en la nokto. Gábor atendis duonhoron, tiel estis interkonsentite, poste ankaŭ li forŝteliris.

Rapide li marŝis sur la arbara pado, borderita de dornarbustoj, kelkfoje haltante, por elpreni dornojn el la piedoj, kaj tiafoje kvazaŭ li aŭdus paŝojn postdorse. Ĉu iu sekvas lin? Ba, kiu sekvus lin?

Anhelante li atingis la Maria-arbojn. Panna jam atendis lin. Ŝi sidis sur la putrando, ludadis kun siaj malplektitaj nigraj haroj kaj ĉe la lumo de la steloj rigardis sin en la putakvo.

– Vi longe forrestis! Venu, nu, sidiĝu apud mi! – ŝi flustris milde.

Ekbrulis la grizaj okuloj de Gábor, li sidiĝis apude, sed ne kuraĝis brakumi ŝin.

– Kial vi timas min? Klinu vian kapon en mian sinon. Ankaŭ vi estas fidelulo de la Sinjoro, mi plibonigis vian animon. Sankta Maria permesis, ke ni amu unu la alian.

– Ĉu ŝi vere diris tion? – balbutis la junulo kun superstiĉa devoto kaj tamen dubeme.

– Dio atestas...

En ĉi tiu momento la telero de la luno kvazaŭ estus rompita, kaj fal-

inte surteren, ĝiaj brilaj romperoj prilumis la silkan gazonon.

Malvarmeta venteto trasusuris la arbaron. La branĉetoj disiĝis kun mildaj bruetoj kaj subite ili kunfrapiĝis ... Kaj paŝis antaŭ ilin el inter la arboj ĉiela vidaĵo: virino kun blindige blanka vizaĝo, orblonda hararo, falanta sur la ŝultrojn, kun tristaj, bluaj okuloj... sur ŝia neĝblanka dekstra brako, sanganta pro dornoj, dolĉe dormis infaneto.

– Sankta Maria! – ekŝrikis Panna terurite.

Gábor mute kovris sian vizaĝon per la manoj.

– Ve al mi, Sankta Patrino! Ho, indulgu min! – frapis Panna sian bruston malespere kaj falis sur la teron. – Mi estas pekulino. Mi ŝtelis vian monon, mensogis per via nomo...

La tristavizaĝa patrino milde ekridetis.

– Nenion komunan mi havas kun vi, bona virino! Rigardu ĉi tien, Gábor, mi alportis vian fileton. Tie, inter la popolo mi ne volis hontigi vin.

Intermite kaj pudore ŝi daŭrigis:

– Mi kaŝobservis vin... venis post vi kaj jen mi trovis vin.

Gábor frotis sian frunton per sia aspra mano, timide proksimiĝis al la parolanto. La infano ĝuste tiam malfermis siajn okuletojn kaj ridetis.

– Vi trovis min, Marinjo Kovács kaj neniam perdos min, se vi pardonos...

Repaciĝe Marinjo afable etendis al li la infanon. Li avide kaptis por ĝi, sed baldaŭ ellasis ĝin.

– Ne, ne! Lasu min ankoraŭ rigardi vin. Tiel multe bela vi ja estas kun la infano!

Romano de la du kampobienoj

Jes ja, certe, la malfeliĉa Geoĉjo proksimas al sia fino. Li kuŝas sur peltmantelo sub la tegmentorando. Sur lia pala vizaĝo vidiĝas ruĝaj makuloj, bridrimenaj ringoj de la ĉevalo de Sankta Miĥaelo[31]. Ankaŭ lia gingivo ruĝas roze.

– Malbona antaŭsigno! – diras la flegantaj virinoj, kiuj tiatempe kutime riĉas je vortoj, konsiloj. – Prave, ja prave: la kolero de la patroj

[31] Ĉevalo de Sankta Miĥaelo: portilo por mortintoj, katafalko. Sankta Miĥaelo estas la patrono de tombejoj kaj enterigoj.

kreskis plago en la infanoj. Amo estos la kaŭzo, se li mortos... Tamen eble ia granda ĝojo povus helpi lin.

Ankaŭ la maljuna paŝtisto pensas tiel.

– Aŭdu, Geoĉjo, mi havas ideon... Mi faros tion por via bono. Ne gravas, mi faros tion. Mi humiligos min antaŭ la paŝtisto de la kampobieno Fekete. Ĉu mi povis scii, ke vi tiom amas Borinjon? Mi rigardis vin infano, mi eĉ ne rimarkis... mi ne volis rimarki. Nu, sed nun jam ne malĝoju, mi ne plu kontraŭas, mi svatos ŝin al vi.

Sur la vizaĝo de la ŝrumpmalsana fraŭlo aperis rideto, malforta, velka rideto. Li levis la kapon kaj apogis sin per la kubuto sur la peltaĉo. Ankaŭ tiu estis iam nova kaj florplena...

– Ankoraŭ hodiaŭ. Hodiaŭ. Ĉu, patro?

– Apenaŭ mi elpelos la ŝafaron al Ordas, mi konfidos ĝin al la vicpaŝtisto por la tempo, dum mi rapide vizitos la kampobienon Fekete.

La malsanulo ĵetas dankan rigardon al la maljunulo kaj demandas melankolie:

– Kiam vi revenos, patra moŝto?

– Ĉirkaŭ sunsubiro... eble iom pli frue, kiel kutime.

– Estos malfacile ĝisatendi! – suspiris la filo. – Tial mi volus ion peti de vi: la patro de Borinjo havas kvar tintilojn... mi konas ilian sonoron... se vi feliĉe aranĝis la aferon, se oni donos la knabinon, pruntu la sonorilojn, ligu ilin sur la kolon de la kvar gvidŝafoj, por ke mi povu aŭdi ilin de malproksime.

– Estos tiel, filo.

– Mi sentas, ke de tiu sonoro mi resaniĝos.

– Vi aŭdos ĝin, kara filo.

La paŝtisto foriris. Foriris al tiu kruela homo, al la eterna malamiko. Sed propre kial ili iĝis malamikoj? Ba, sensencaĵo, la kaŭzo estis la komuna paŝtejo; du paŝtistoj forpaŝtumis unu de la alia la plibonon de la herbo, el tio iĝis incito, el la incito kolero, el la kolero malamo.

Tagmeze li frapis al la fenestro de la kampobieno Fekete.

– Aŭdu, he, maljuna kompano Marci! Estas mi, la paŝtisto de la kampobieno Veres, Demeter Koppantyú. Mi venis por unu floro.

– Nu, envenu do, se vi jam estas ĉi tie!

– Ĉu vi donas vian filinon? Nu?

– Unue envenu, lasu min vidi vian vizaĝon!

– Malsaĝa vi estas! Ne por mi mi petas ŝin. Por mia filo.

– Ĉu do li ne mortis?

– Li ja eĉ malsana ne estas, nur malforta.

– Oni diras, li falis en ŝrumpmalsanon.

– Oni mensogas – diris morne Demeter Koppantyú.

– Tamen hieraŭ iu rakontis ĉi tie, ke li estas mortonta.

La paŝtisto de la kampobieno Veres ekridegis, kvankam trude li faris tion.

– Malsaĝa klaĉo! Ĉu vi donos vian filinon aŭ ne?

– Mi ne donos, dum mi ne vidas vian mienon, vi orgojla hundo!

– Elvenu vi!

– Mi ne eliros. Mi ne humiligos min.

– Nu, do mi atendos vin ĉi tie.

Li sidiĝis sur ŝtono en la korto, aŭskultis, kion flustradas la folioj de la moruso, pri kio zumas la abeloj, dum ili portas tiun flavan polvon sur siaj antenoj... kaj rigardis la „bovinetojn de Dio", la meloojn, kiam ili elvenis el sub terbuloj por sunumi sin.

Malgraŭ ĉio la mondo estas tamen bela printempe. Kiel ridas, kiom ĝojas la naturo! Ĉiu vivo rekomenciĝas. Nur tiu unu velkas.

Li saltleviĝis incitite, iris al la fenestro kaj ree ekfrapis ĝin:

– Do bone, nu!... Mi eniros al vi!

Li premis la klinkon de la porĉo, eniris.

La ŝafisto de la kampobieno Fekete rigide rigardis en lian vizaĝon. Tiu estis trae-kvere strekita per sulkoj, kvazaŭ ili spegulus la tristan hejman bildon. Sur ĝi jam videblis nenia memfiero, nenia orgojlo, la ŝafisto de la kampobieno Veres estis rompita.

– Do bone, nu! – diris la ŝafisto de la kampobieno Fekete. – Mi donos la filinon. Se Dio tiel volas... Ŝi estu la via. Ankaŭ ŝi konsentos.

– Kiel vi scias?

– Mi vidis ŝian vizaĝon hieraŭ kaj hodiaŭ. Ni iru en la ĝardenon, rigardu ŝin ankaŭ vi, Koppantyú!

Ili eliris en la ĝardenon, sed Borinjon ili ne trovis. La patro kriis ŝian

nomon, sed la ĉirkaŭaĵo ne donis respondon, nur Ipoly plaŭdetis en la silenton.

– Ŝi iris verŝajne al Ipoly, por kolekti florojn... Jen ŝiaj spuroj en la sablo.

Ili turnis sin tiudirekte tra la salikaro. El la flanko de la brikfarejo enorma junkuniklo kuris rekte kontraŭ ili, poste kvazaŭ ĝi krucus ilian vojon, forsaltis oblikve al la luzernokampo de vidvino Gál.

– Malbona antaŭsigno! – diris la ŝafisto de la kampobieno Veres.

– Jen vidu, la kaptuko de Borinjo! Certe ŝi dormiĝis sub arbusto.

Sed Borinjo ne estis tie, nur ŝia tuko; ĝi devis esti implikita je branĉeto... Tamen estas strange, ke ŝi lasis ĝin tie!

La ŝafistoj nun jam alvenis sur la bordo. Meze de la deklivo kvazaŭ du tulipoj florus inter la abunda herbo, simile io ruĝis de malproksime.

Ili aliris. La karmezinaj botoj de Borinjo staris tie...

La patro konsternite demandis:

– Kial ŝi demetis la botojn? Ĉu ili premis ŝiajn piedojn, aŭ eble...

La maljuna Koppantyú kompletigis la sombran penson:

– Aŭ eble ŝi ne volis kunpreni ilin tien... tien, kien ŝi iris...

La ŝafisto de la kampobieno Fekete klinis la kapon, kaj ne kuraĝis demandi, kion li komprenas sub „tien". Senvorte, rigidigitaj ili rigardis al la akvo. La petola Ipoly ne atentis ilin, gaje babiletis plu... nenion ĝi elbabilis.

Kvankam eble ĝi sciis, kial detiris tiu trista, bela knabino la ruĝajn rigidtubajn botojn. Ĉar ŝi jam ne bezonis ilin: anĝeloj iradas supre nudpiede...

Piedpinte oni paŝadas en la kampobieno Veres. Geoĉjo fartas pli malbone, li kuŝas en la ĉambro, alorelas eksteren: „Ho, la ŝafoj venas!"

La maljunulinoj vane klarigas al li, ke ankoraŭ ne vesperas, ade-ree oni devas malfermi al li la fenestron, por ke li mem vidu, ke la suno ankoraŭ plenmane ŝutas sian lumon.

Kiel malrapide la tempo pasas! Oni eliru, rigardu, ĉu la polvo jam leviĝas sur la vojo, ĉu la ŝafaro jam alvenas!

Sed ja eĉ tagmezo ankoraŭ ne pasis.

Tio ne interesas lin, eble li ankaŭ ne komprenas. Subite li eligas laŭtan rukton, lia kapo senforte falas sur la kusenon, li fermas la okulojn:

– Mi aŭdas la tintilojn... – li flustras – mi aŭdas, aŭdas...

Dolĉa rideto ruĝigas lian vizaĝon, sed baldaŭ la ruĝo ŝanĝiĝas en bluecan stankoloron.

...La tintiloj sonas ĉiam pli proksime, tutproksime. Li jam aŭdas ankaŭ la paŝobruojn de la alvenantaj ŝafoj. La kvar silkaj junŝafoj gaje saltadas antaŭ la grego...

Liaj fermitaj okuloj vidas ilin, ankoraŭfoje li malfermus ilin, sed jam aperas nur la okulblanko; ankoraŭfoje li ensuĉus la balzaman aeron, sed tio estas jam nur stertoro.

––

Vespere alvenis la ŝafaro, triste sonoras la unusola tintilo. Sur la koloj de la kvar gvidŝafoj pendas nenio.

– Finfine vi alvenis, maljuna Koppantyú!

– Mi alvenis, sed la tintiloj ne sonoras, por ke ilia voĉo resanigu mian filon.

– Envenu! Li jam aŭdis ilian sonoradon tagmeze, kaj ankaŭ resaniĝis de ĝi!

La „jupo de la reĝino”

Niaj pitoreskaj valoj, se vi ekparolas, se vi stariĝas inter la homoj, por fari justecon...

Se la maljuna monto Bogát elpaŝas el la nebulo, la koloraj ŝtoneroj de la terfendoj intervenas en la aferojn de la bravaj *palocoj*. Arbaroj, kampoj, lagoj, torentoj, kanaroj severe sidiĝas en la juĝista seĝo...

Ĉar okazis tiel... ĉiuj memoras. Ofte eĉ kvardek ĝis kvindek fojnostakoj viciĝis sur la „jupo de la reĝino” (tiel oni nomas la faman herbokampon de la familio Gyócsi), ĉar la kampo estas tiel larĝa kompare kun la ceteraj herbokampoj, kiel la jupo de la reĝino devas esti (precipe dimanĉe) inter la ceteraj, ordinaraj jupoj. Tiu unusola herbokampo pli valoras ol ĉiuj posedaĵoj de la familio Gyócsi.

Sed kial mi parolas pri la familio Gyócsi, kiam estas publike sciate, ke post la morto de Istók Gyócsi la vidvino starigis apud sin kiel edzon

Mihály Mudrik, kaj nun, ke ankaŭ ŝi fermis por eterne la okulojn, estus juste dividi ĉiujn terpecojn kaj terangulojn en tri egalajn partojn, same la moveblaĵojn; kaj la domo restu por la kripla Imre; li kiel la plej maljuna kaj viro pagus la kontraŭvaloron al siaj du neplenaĝaj fratinoj Eszter Gyócsi kaj Erzsi Mudrik, filino de la vicpatro. Ĉar estas tiel kutime ĉe honestuloj.

Sed la domo kaj ankaŭ la vasta herbokampo estis heredigita al Erzsi. Lia malica patro priŝtelis, ŝteltrompis la Gyócsi-georfojn, kvankam la forpasinto, al kiu la havaĵo apartenis, ankaŭ por ili estis tiel same patrino kiel por Erzsi. Estas tute certe, ke ŝi ne povas ripozi trankvile en sia tombo!

Imre ricevis la monton Bogát. Lia heredaĵo estas tiel same ĝiba kiel lia dorso. Ĝi estas mizera senarbigejo, ĝi ne redonas en sekaj jaroj eĉ la semgrajnojn. Kaj al Eszter estis donita la Csipke-kampo: terfendo post terfendo. Eĉ por paŝtejo ne taŭga; en la katastro ĝi estas registrita kiel „neutiligebla".

Ĉiu bona animo skandaliĝis en la vilaĝo, sed la leĝa justeco surmetis sian sigelon. S-ro Mihály Mudrik scipovis bone paroli en la lingvo de tiu justo.

Oni tute ne povis ĝin reĝustigi, se ne per peticio al la reĝo... Sed kiu scias, kia homo li estas.

La notario ankaŭ komponis la dokumenton tiel konvinke, elokvente, ke ĝi emocius ŝtonon. Nia notario estas vere saĝa homo, kvankam tie supre nenie trovis komprenon ĉi tiu peza plendo.

Gaje Mudrik revenis hejmen, des pli malĝoje Imre Gyócsi el la urbo, kie la respektinda prefektuja ofico deklaris, ke ĉio restos tiel, kiel estas, al Imre apartenas Bogát, al Eszter la ŝtonerriĉa novalo Csipke, al Erzsi la silka herbokampo, la „jupo de la reĝino". Nu, por ĉi tiu „jupo" certe amfrenezos iam la fraŭloj en Csoltó...

Propre ankaŭ ĉi tiu estas ja fratino de Imre deflanke de lia patrino, tamen la alia estas la pli senhelpa; lia koro tiras lin al tiu alia. Pro sia afero li ne plendus, li estas kaj malbela kaj ĝiba, li ne povus utiligi la havaĵon, krome se ankaŭ el la domo oni fordeziros lin hodiaŭ aŭ morgaŭ, li ankoraŭ povos dungiĝi kiel bienservisto, sed la kompatinda

Eszter... Ŝi estas tiel eta, maldika; krome ankoraŭ nur infano.

Li levis la pugnon. „Hej, se nun estus ĉi tie, kiu faris min almozulo!” Lia koro pleniĝis ĝisrande per amareco. Ho, se li povus elversi ĝin, se li povus plendi prie al iu, se ĉi tiuj montoj, torentoj, kaj rokoj komprenus lin!

En kolerverda koloro ridetas al li de fore la kampoj de Csoltó, dum li marŝas sur la polva vojo sub Bogát. Kvazaŭ la „jupo de la reĝino” havus faldojn, sunradioj kaj ombroj klinas sin unuj sur aliaj en longaj, ondantaj strioj.

La suno estas sinkanta, ho, kiom ĝi origas eĉ la maljunan Bogát... Tie supre troviĝas lia semitaĵo. Bela estas la klopodo de ĉi tiu monto. La spikoj estas ja sufiĉe mizeraj, tamen ili elkreskis. La bluaj cejanoj same bele plektiĝas inter ili kiel aliloke.

Dio mia, Dio mia, ho, kiel bela estas ĉi tiu kamparo de Csoltó! Eble la paradizo ne estos tiel bela...

Ja prave, la plej malbela parto estas la lia, nura malfekunda montodorso, tamen io kreskas sur ĝi. Krome, se pli bone pripensi, ĝi ne estas tiel malbona, oni devas nur bone kulturi ĝin. Kaj almenaŭ inundoj ne detruas ĝin, se io kreskas sur ĝi.

Sed la heredaĵo de Eszter vere neniom valoras, eĉ plugi ĝin ne indas.

Tiu larĝa, granda novalo trans la limvojo aspektas kiel alĵetita makulaĉo sur verda festa kostumo, okulofenda, malĝojiga: kun siaj abismoj kiel etendiĝanta vundo sur la korpo de la patrina tero.

La vojo de Imre kondukis preter ĝi, li do haltis, rigardis ĝin pli atente.

Ja certe, mizera terpeco ĝi estas! Sur ĝi kreskas nenio, nur stipoj, aŭ kiel ĉi tie ili nomiĝas, orfulinaj haroj vegetas ĉe la abismaj randoj. Ankaŭ la haroj de la kompatinda eta Eszter estas ĝuste tiel blankecaj...

Sed vidu, kiel bela herbotufo kreskas malsupre, inter la ŝtoneroj! Kiel abunde grasa, kiel ĝi ridetas al Imre! Eĉ sur la „jupo de la reĝino” ne produktiĝas pli bona, ĝi estus ankaŭ ties plej bela krispo. Ĉi tiu grundo ja havas forton, se ĝi volas. Jen ankaŭ la sukerbeto saltis kreski sur la alia ekstremo... Oni tamen ne devas subtaksi ĉi tiun teron.

Li sobiris en la fendon, karesis la herbotufon. Kiel mola ĝi estas, kara kiel silkoveluro! Ĉu ĉi tiuj herberoj kelkfoje babilas inter si? Kial ili

ne babilus?

Estas tre kurioze, ke se krudaj piedoj tretas, ĉifas, premaĉas ilin, matene ili jam stariĝas, kvazaŭ trafitaj de nenio malbona. Estas vere neordinare, ke ĉi tiuj etaj, malfortaj herberoj estas pli fortaj ol la homo…

Sub liaj fergarnitaj botoj la ŝtoneroj ekgrincis, koloraj ŝtoneroj de la bona, argila *paloca* tero. Ĉi tiujn oni ne kutimas meti en ringojn, tamen ili estas tre belaj. La homoj kulpas prie, ne la tero. Ĝi donas ilin kun tiel bona koro kiel oron, arĝenton, tamen ni ne taksas ilin laŭmerite, ĉar ni ne scipovas diveni ilian utilon.

Kvankam estas granda bonemo deflanke de la tero, ke dum pli alte, ĉe la slovakoj ĝi subŝtofas sin per grandaj, grizaj ŝtonoj, kaŭzantaj al la lokanoj tiel multajn zorgojn, ĉi tie, kvazaŭ ĝi volus favori, eldonas el si etajn, plaĉajn ŝtonerojn.

Imre klinis sin kaj plenigis per ili la manikon de sia drapmantelo[32]. Troviĝis inter ili bluaj, flavaj, ruĝaj kaj orkoloraj. Funde de la terfendo elvidiĝis angulo de granda nigra ŝtono; kiam li paŝis sur ĝin per sia kalkanumo, peco deskvamiĝis. Li metis ankaŭ ĝin inter la aliajn. Estos bone al Eszter por ludi.

Plifaciligite li daŭrigis sian vojon hejmen. La monto kaj la novalo esperigis lin. Oni ja bezonas nur rigardi ilin, por senti kontenton. Eble estas eĉ pli bone, ke la silkokampo apartenas al Erzsi. Pli-malpli frue ŝia patro mortos, ŝi havos neniun, kaj li restos ankaŭ plu ĉe sia fratino. Krome la vizaĝo de Eszter estas multe pli bela, kun malpli da plibeligo ŝi venos sub la edzinan kufon. Dio atestas, ĉio estas bona tiel, kiel estas!

Li tiom enpensiĝis, ke li ne rimarkis la maljunan sinjorĉasiston, proksimiĝantan de la monto, nur kiam tiu alparolis lin.

– Bonan vesperon, amiketo! Kie vi loĝas?

– En Csoltó.

– Vi do scias ankaŭ, al kiu apartenas ĉi tiu montodorso.

Imre ekridetis. Tute rekte li ne konfesos sian posedantecon, ja ne estas kaŭzo por fanfaroni per ĝi.

– Al Imre Gyócsi – li diris maleme.

[32] La gorĝo de la drapmantelaj manikoj estis kunkudritaj kaj servis kiel poŝoj.

– Kiel mi vidas, li uzas ĝin por plugokampo. Por tio ĝi ne devas esti tre taŭga.

La subtaksa tono incitis Imre. Li ja ne lasos ofendi Bogát!

– Ĝi estas ne malbona, ĝi estas sufiĉe bona.

– Kaj kia estas la vojo de tie ĝis la vitrofandejo de Beléd?

– Kaprica, preskaŭ ĉiam kaprica…

La ĉasisto murmuris ion, kaj ĉar ili ĝuste alvenis en la vilaĝo, adiaŭonte li demandis:

– Kie loĝas tiu Gyócsi?

– Ĉi tie, ĉe lia vicpatro. Mi mem estas tiu – li konfesis ruĝiĝinte.

– Do kun vi mi marĉandos.

Imre ne povis imagi, pri kio, kaj gapmire vidis, ke tiu sekvas lin efektive en la domon.

Mudrik jam estis hejme, ĉar li venis veture.

Per suspektemaj okuloj li esploris la fremdulon; li timis, ke la junulo kunprenis advokaton. Li venigis tiun ja ĝustatempe, postokaze…

Erzsi ludis kun siaj mielkukoj kaj lignopupoj. La du jarojn pli aĝa Eszter kubutis sur la tablo kaj rigardis kun deziraj okuloj la trezorojn de sia fratino. Al ŝi haviĝis nenio el la foiraj donacoj.

Ŝiaj belaj, bluaj okuletoj turniĝis plende al sia frato, kun espero kaj atendo.

La ĝibulo rimarkis tion, kaj nubo de mishumoro trakuris lian vizaĝon. Li apenaŭ aŭdis, pri kio la fremdulo parolas. S-ro Mihály Mudrik respondadis al li.

– Kio? Ĉu vi volas aĉeti la monton Bogát de mia vicfilo? Ĉu la sinjoro perdis la prudenton? Ĉu vi aŭdas, Imre, li volas aĉeti de vi Bogát. Nu, respondu do vi al li!

Ridante li kunfrapis la manojn.

– Nu, vere pompa terpeco ĝi estas! Kaj kiom la sinjoro donus por ĝi?

Ankaŭ Imre rondigis la okulojn, kaj embarasite balbutis:

– Mi ne vendas mian monton… neniel mi vendos ĝin. La sinjoro ja havus nenian utilon el ĝi… Kaj mi ekamis ĝin, vere mi ekamis ĝin.

Li ekmemoris la ŝtonerojn, kiuj estis en la maniko de lia drapmantelo. Li ekridetis, ekĝojis kaj kun petolema okulumo vokis al si la

etan Eszter.

Tiu alsaltis kun brila mieno, per siaj manetoj ŝi levis la suban randon de sia antaŭtuketo: eble eniĝos ĉio, kion frato Imre alportis.

Li elmetis la ŝtonerojn unu post aliaj. Timete li rigardis, ĉu ili plaĉas al sia fratino. Kial ili ne plaĉus?

Ŝi kunfrapis la manojn en sia ĝojo, eble ankaŭ pro tio, ke ŝi altiru la atenton de Erzsi, kvazaŭ ŝi dirus: „Vidu, kian trezoron mi havas!" Poste ŝi residiĝis al la tablo, unue detiriĝinte for de Erzsi. Ili okulmezuradis fremdece, enviante la ludilojn de la alia, kiuj valoras pli, sed vidiĝis je la rigardoj de ambaŭ, ke la frosto baldaŭ degelos.

– Ej nu, homo, aŭskultu min fine... – diris la ĉasisto senpacience. – Mi venis ĉi tien ne por ŝerci, mi estas serioza aĉetonto... fabrikisto en Beléd.

– Ĉu tiu riĉa homo – intermetis vigle Mihály Mudrik –, kiu posedas la vitrofandejon kaj la grandan kampobienon?

– Ĝuste la vitrofandejo kondukis min ĉi tien. Mi bezonas la grundon de Bogát por la vitrofarado. Ĝis nun mi venigis la materialon el kvarmejla distanco, ĉar mi ne sciis, ke ankaŭ la interno de Bogát gravedas de ĝi. Hodiaŭ mi ekzamenis ĝin. Tiu monto valoras por mi multe, ĉar ĝi situas proksime. Mi aĉetos ĝin por bona prezo.

La vizaĝo de Mudrik iĝis tiel ruĝa kiel skarlata drapo, des pli pala tiu de Imre.

– Mi ne povas deŝiriĝi de tiu monto – li diris honteme. – Ĝi heredigis al mi, ĝi ankaŭ restu la mia.

– Sed se mi bone pagos ĝin?

– Mi ne vendos ĝin eble eĉ por...

Li pensis, kion grandan li diru:

– ...eble eĉ por la tuta kamparo.

La vitrofandisto ekridetis. – Nu, bone, bone... mi vidas, ke vi estas vera *paloco*... vi algluiĝis al tiuj terbuloj, do mi farmos ĝin. Pli ĝuste nur ĝian internon. Vi povas plugi, kulturi ĝian supron, mi donos al vi kvincent forintojn por ĉiu jaro.

Mihály Mudrik paliĝis nun pro envio, kaj Imre Gyócsi ruĝiĝis de ĝojo. Tiom da mono ja eĉ ne ekzistas eble en la tuta mondo! Kvincent fo-

rintoj! Eĉ la „jupo de la reĝino” eble ne valoras tiom. Kiel riĉa fianĉino fariĝos el ĉi tiu…

Eszter estis lia unua penso.

– Eszter! Nu, ridu do! Venu al mi, koreto mia!

Sed Eszter ne ridis, faris paŭtan mienon. Ŝi nome prenis unu ŝtoneron en la buŝon, ĉirkaŭlekis ĝin, kaj evidentiĝis, ke ĝi estas ne el sukero.

– Ili estas ja ŝtonoj! – ŝi suspiris ekploretante. – Manĝu ilin vi! – Kaj kolere ŝi ĵetis ĉiujn alplanke.

Dume unu el ili, la nigra peco ruliĝis al la piedoj de la fandisto.

Li levis, frapetis ĝin per la fingro kaj tra okulvitroj li ankoraŭfoje ekzamenis ĝin.

– Ej nu, kiel fajna nigra ŝtonkarbo ĝi estas! De kie vi prenis ĝin?

– Sur la tero de mia fratineto mi rompis ĝin de granda ŝtonpeco. Ĝi estas plena de tiaj.

– Nu, filo – diris la fandisto saltleviĝinte –, ĉu vi scias, ke vi ambaŭ estas riĉaj, tre, tre riĉaj homoj?!

La knabineto, kiu nun ekatentis la fremdulon, ĉesis plori, kaj gape rigardis liajn grizajn harojn, longan blankan barbon. En fabeloj ŝi jam aŭdis pri homoj kun tia aspekto.

Kaj Imre fermis la okulojn, por ne vekiĝi, longe li ne kuraĝis malfermi ilin.

Kvankam li povus kuraĝe malfermi ilin, ĉar la afero iĝis efektiva realo. Ja ĉiuj scias, kiel tio okazis, kiel oni malfermis la ŝtonkarban minejon de Csoltó. Eĉ, la kernon de tio oni divenis, ĉar la popolo ne estas malsaĝa, scipovas pensi, se ĝi volas. Kaj ekzistas ja pli granda potenco ol la prefektuja oficejo, kion ajn diras s-ro Filcsik, kiu estas sendia pagano.

Montoj, riveroj, valoj prenis en siajn manojn ĉi tiun aferon de la dividado de la heredaĵo.

Bogát kaj la Csipke-kampo restis mildaj: ne damaĝis la herbokampon de Erzsi, nur helpis leviĝi la Gyócsi-georfojn.

Male, Bágy montris sin kruela. (Bogát ofte „fumis”, ĉu ĝi eble sobtiris la nubojn?) Bágy kvar jarojn sinsekve inundis la kampojn kaj kreskigis

tiel grandan kanaron sur la „jupo de la reĝino”, ke de jaro al jaro la rusto povis hejme senĝene ronĝi la falĉilklingon de s-ro Mihály Mudrik.

La ĉevaloj de la kompatinda János Gélyi

La mastro plibeligas unue la kolon de la orhara Krispa en la stalo per lantrikita rubando, poste plektas la noktonigran kolhararon de Feo, kaj tiel plu ĉe la du ceteraj.

La kvar saĝaj bestoj komprenas, ke temas pri parado. Ankaŭ tintiloj estas kroĉitaj al la kondukiloj, ĝuste tiel, kiel pasintjare ĉi-tempe, kiam la bela vidvino muelista Klári Vér estis veturigita al la domo, kaj ili tiel fiere levas-ĵetas la kapon, kvazaŭ ili estus ĉiuj rajdĉevaloj de la vic-prefekto.

Sed eĉ se ili apartenus al la palatino, kaj estus nutrataj el ora fojnorako per rozpetaloj, trinkigataj el arĝenta trogo per la akvo de la sankta puto de Gózon, ili ne havus tiel bonan sorton kiel sub la mano de János Gélyi.

Ĉiujn kvar li mem bredis, ili kreskis antaŭ liaj okuloj tiel belegaj, li flegis, kombis, lavis ilin kun gardema amo, eĉ kribris ilian avenon, antaŭ ol ŝuti ĝin al ili, li forselektis el la fojno, postfojno, kio ne estas bongusta, li kovris ilin vintre per varmaj lanteksaĵoj, naĝigis ilin somere, li eĉ kisadis ilin en ilia ĉevalida aĝo.

Nun li ne plu kisas ilin, post kiam junedzino venis en la domon, nome tiu certa, malnova amatino, kiu jam apartenis foje al aliulo; dufoje ŝi iĝis dolĉe karega…

Nun li ne plu kisas ilin, tamen ankaŭ nun li pasie amas ĉiujn, kaj ne interŝanĝus ĉi tiujn kvar eĉ por dek ses ĉevalaroj el Csoltó kaj Bodok.

Kvankam se ekzistas aferoj grandaj en la mondo, ĉiuj estas nuraj bagateloj kompare kun la gloro de Csoltó kaj Bodok. En naŭ prefektujoj oni scias, en kvindek du oni rakontas pri la bela staturo, maldikaj kruroj, plaĉa talio, belega kolo de la ĉevaloj.

Kie troviĝas grandsinjoroj, ili ĉiuj venas al la kamparanoj de Csoltó kaj Bodok elekti al si ĉevalojn por kvarjungitaroj, kaj tiafoje ja okazas… almenaŭ la maljuna Pál Csillom diris foje al la grafo de Beléd, kiam tiu

volis edziĝi, ke „tiu edziĝo ĝis printempo neniel okazos, ĉar mia ĉevalido estas ankoraŭ juna, kaj ankaŭ por tiu de János Péri la jungado estus ankoraŭ antaŭtempa”; kaj en ceteraj lokoj de la mondo oni ne trovus egalajn ĉevalojn.

Sed nun jam troviĝas tiaj, János Gélyi ellernis ilian arton kaj dresis tiaj la kvar ĉevalidojn, ke kiam ili tragalopas Csoltó, Bodok, la tuta vilaĝo elkuras por primiri ilin, kaj la homoj paliĝas de envio.

Plektinte ilian kolhararon, li surmetis la jungilojn. Unu jungoŝnuro estis tiel strikte nodita, ke li nur pene povis malligi ĝin. La kvar ardaj stalonoj maltrankvile metadis siajn belajn, sveltajn krurojn, svingadis siajn vostojn.

La pordo de la stalo estis malfermita; bela, rozvizaĝa junulino aperis en ĝi, sed ŝi ne rimarkis János Gélyi: la kolo de Falko kaj la fojnorako kaŝis lin.

Ankaŭ János ne rimarkis la virinon, sed post nelonge li aŭdis ŝian flustran voĉon de ekstere... interrompitajn vortojn, kiuj, alveninte en liajn orelojn, perdis sian sencon.

Kun kiu ŝi parolas?

„Diru al li, ankaŭ mi iros al la nuptofesteno, sed poste... mi ankoraŭ ne scias, kio okazos...”

Tiuj estis la vortoj de Klári, li klare aŭdis ilin. Al ili respondis aspra, ĝemeca voĉo, akompanata de tusoj, kiu scias, kion, ne eblis kompreni. Tamen la flustradon de Klári li komprenis.

„Du alceoj estos sur mia brusto, li estu ĉe... li estu ĉe la kanaboruantoj.”

János lasis fali la bridon de Falko el la mano, la multaj ringoj kaj la buŝfero laŭte ektintis sur la paŝtabulo, sed li ne aŭdis tion... li aŭskultis ne tion.

„Se mi lasos fali la ruĝan sur la vojon, li forrestu, se la blankan, li venu.”

János Gélyi apenaŭ povis jungi la kvaran ĉevalon, lia koro kunpremiĝis, liaj manoj paraliziĝis, li faris ĉion inverse-renverse. Sombra konjekto peziĝis sur lia koro. Foje li jam aŭdis tia ĉi tiun mildan voĉon!

Ba, sensencaĵo! Ĉu vortoj timigu lin? Kio ne havas korpon, ĉu li vidu

ties ombron? Ĉu li preparu blankan liton al nigra suspekto?

Trankvile li elkondukis la jungitajn ĉevalojn, por trinkigi ilin. Klári ĝuste tiam elakompanis ŝrumpintan maljunulinon tra la dompordo.

– Kiu estis tiu avino de diabloj? – demandis la juna mastro duone ŝerce.

– S-ino Vőneki el la preĝeja strato.

– Kion tiu sorĉistino aranĝas ĉe vi?

– Iom da gisto petis la kompatinda.

– Hm! Ĉu ŝi do knedas panon?... Nu, sed nun jam rapidu prepari vin, Klári! Baldaŭ ni ekveturos.

La malpeza ĉaro kun freŝgrasitaj radoj estis jam eltirita el la remizo sur la korton, dum minutoj estis jungite. Ili sursidiĝis.

János eksvingis la vipon super la kvar ardaj bestoj, kaj tiuj ekiris snufante, kun anhelaj nazotruoj, etaj dancpaŝoj el la korto.

Li pririgardis ilin, kaj dum li okulmiris tiujn kvar belformajn kapojn, kiuj frapiĝis jen en la bruston, jen gracie leviĝis, la kuproringojn sur la jungaĵo, kiuj brilis, glimis, la belajn kvastojn, flirtantajn ĉirkaŭ la sveltaj talioj, kaj la ŝtalhufumojn, ŝajnantaj bruligi la patrinan teron sub la piedoj, lia koro ekŝvelis de ĝojo.

Kiel bone estas, ke li vendis al neniu la kvar ĉevalojn, malgraŭ tio, ke tiel ofte oni petis por ili. Antaŭ nelonge ekzemple Bodok kaj Csoltó kunmetis kvar mil forintojn, por aĉeti kaj mortbati ilin en la kamparo.

Pereu eĉ la semo de la pli bona speco!

Sed lia rigardo subite trafis de la ĉevaloj al la freŝruĝa vizaĝo, neĝblanka brusto de lia edzino, kaj sur ŝia neĝblanka brusto al la du alceoj, ruĝa kaj blanka.

Ŝi diris... tiel ŝi diris.

János Gélyi lasis libera la vipon, la kvar ĉevaloj flugis, baŭmis la dekstra kaj maldekstra antaŭĉevaloj, la bela edzino faris ŝirmilon el siaj rozecaj manoj por siaj falsaj okuloj, reveme rigardis la pejzaĝon... ankaŭ ŝi flugis.

– Mi ne kredis, Johano, ke vi kunprenos min, mi scias, ke vi ne volonte faras tion... ĉar por la malicaj langoj ankoraŭ ne sufiĉis klaĉi pri mi, krome...

Klári Vér atendis, ke ŝia edzo ekparolu, demandu, sed ankaŭ li gapis al la pejzaĝo, al la preterkurantaj paŝtejoj, proksimiĝantaj kanabruejoj, kiuj tiel brilis per sia verdeca akvo kiel mokaj okuloj, kaj pli fore al la rokfendegoj, ĉi tiuj profundaj, malfermitaj ĉerkoj.

– Krome mi pensis, ke ĉar vi preparis vin por la morgaŭa foiro, vi rekte tien ekvojos de la nuptofesteno de la familio Csillom.

Eĉ al tio János Gélyi ne respondis. La edzino venu do pli proksimen kun siaj dornoj.

– Ej nu, kiel trofiera iĝis via moŝto! Eĉ paroli vi ne degnas. Kiel do okazos, lasu min aŭdi? Ĉu vi lasos min tie dume aŭ kunprenos min?

– Mi lasos vin tie – li diris maleme. – La festeno ja daŭros tri tagojn.

Ili venis al la ruejo. Sur la kampa vojo paŝadis Sándor Csipke en sia tulipornamita drapmantelo, festa ĉapelo kaj ŝajnigis, ke hazarde li turnas sin pro la ĉarobruo, kvankam eĉ la tero aŭdas, se la kvar famaj ĉevaloj de János Gélyi pasas.

Sed kial gravus nun la ĉevaloj?! Li kaŝesploras la vizaĝon de sia edzino. Jen, kiel ŝiaj okuloj ekbrilas, kiam ŝi alrigardas la sveltan fraŭlon, sopire, kaŝe, longe ŝi ĵetas sur lin sian dolĉe ĉarman rigardon.

Kaj ho ve, la blanka alceo elfalis el ŝia mano, la blanka alceo ne plu sidas sur ŝia brusto.

Liaj malfortiĝantaj manoj ellasis la kondukilojn ĉiam pli, ĉiam pli… Kiel rapidema vento, se ĝi volas porti nubojn, la ĉevaloj de Gélyi sovaĝe galopas; jam eĉ ne ĉevaloj, la terura rapideco kunknedas ilin en unu nigran flugilon, kiu freneze frapiĝadas… frapiĝadas. Eĉ ne flugilo ili estas, sed la furiozanta morto mem!

– Mizerikordo, helpo! Ho ve, tenu la kondukilojn! – ekŝrikas Klári Vér. – Ĉi tie la abismo kaj tie la vortico!…

– Dio batu vin; Li ja batos vin!

– Ho, tenu la kondukilojn, karulo, karega edzo mia!

Li ja tenis ilin, sed nur ĝis li malligis sur ĝi la nodon. Li klakis per la lango kaj aŭdigis ĉevalinstigan siblon:

– Hot! Hoto! Feo! Falko!

Poste li alĵetis la du malligitajn kondukilojn inter la kolojn de Krispa kaj Fulmo…

La infanoj

Kiam la nuptoprocesio ekiris de la fianĉina domo, ĝi longiĝis ĝis la mueleja kanalo, ja du famaj magnataj familioj unuiĝis: la filo de la forpasinta János Csillom el Bodok kaj la filino Anjo de la familio de János Major el Kartal.

En naŭ ĉaroj sidis nur la nuptanaro, en la deka la muzikbando de Gilagó. En la lasta oni portis la tulipornamajn kestojn kaj la liton. Sur la unua ĉaro sidis la fianĉino kun blanka florkrono, apude rajdis la fianĉo sur sia kapmakula ĉevalo.

Kiam ili atingis la ŝtonriĉan kamparon de Bodok, la ĉevalo de Joĉjo Csillom stumblis; kvankam ĝi ne estas blinda, eĉ „lampo" lumas sur ĝia frunto. Krome ĝi stumblis tiel, ke ĝia rajdanto renversiĝis en la neĝon, ĉar se la selo sobglitas, vane estas volvita la bridrimeno ĉirkaŭ lia mano.

Li falis; la mallerta besto eĉ paŝis sur lian dolmanon; apenaŭ li povis restariĝi, kaj kial nei, plibeligi... li batiĝis sur la frostaj terbuloj kaj amare ekploris.

La eta fianĉino nur rigardis lin, rigardis dum tempo, kaj ĉar ĉiuj ridis, tiel longe ŝi klopodis ne tordi sian buŝon pro la ridoj, ĝis ankaŭ ĉe ŝi elŝprucis la larmoj... ŝi ekploretis.

Joĉjo ne kuraĝis residiĝi sur la ĉevalo; li deziris apudi sian fianĉinon sur la ĉaro. Oni ligis la ĉevalon al la postkrado. Ŝi pli orgojle levadis sian tukitan kapon, dum interne la infano senteme ploris, kio iom post iom transiris en senvoĉan, anhelan ploreton.

S-inoj Homokos, Filcsik kaj István Felsővégi Kapor, pli klaĉavida ol eĉ la jupulinoj, moke ridis pri la afero.

Eĉ tiaj povas iĝi geedzaj homoj! Ho, kiel oni povis kunligi du tiajn laktosuĉulojn! Unu bezonus ankoraŭ pupon, la alia paperdrakon, ne edzinon... Kaj se lia kuratoro tamen volis edzigi lin, oni devus trovi por li parulinon, kiu jam posedas sian prudenton. Jen, ekzemple, en la najbaraĵo loĝas la pli granda filino de Péri... Iu havos bonŝancon kun ŝi.

Nu jes, la fianĉino estas bela, ja bela, kiel freŝa majorano; ankaŭ la fraŭleto estas svelta, belstatura kiel rosmareno, ili iam interadaptiĝos, sed nun ankoraŭ – ho, Dio mia! –, kio okazos al ili, se post la festeno

s-ino Major kaj la kuratoro s-ro Seregély iros hejmen, kaj ili restos solaj en la granda Csillom-domo?

Nu, okazis tio, ke ili interkisadis la tutan tagon, kaj kiam la brua nuptanaro iom post iom foriris, la domo fariĝis eĉ pli vigla de iliaj ridoj kaj la pordofrapiĝoj.

Ĉirkaŭ la kolaziona tempo venis en ilian kapon, ke ili ankoraŭ ne tagmanĝis.

– Anjeto! Nu, ne forkuru! Mi bezonas ne vian kison... Ĉu vi scias, ke hodiaŭ mi ankoraŭ ne manĝis?

– Ho, kiom vi pravas – ŝi diris mirante –, mi same ne, Joĉjo, ankaŭ mi ne manĝis.

– Ĉu vi scipovas kuiri? – demandis la edzo zorgoplene.

La eta Anjo enpensiĝis; sian blankan frunton ŝi kuntiris en sulkojn, la dekstran manon dignoplene premis sur la kokson.

– Kiel mi ne scipovus?! – ŝi respondis tirvoĉe kaj kun flamiĝinta vizaĝo elglitis en la kuirejon.

Post duonhoro la supo jam surtabliĝis. Joĉjo mergis en ĝin sian kuleron, sed ĉe la unua gluto li paligis, saltleviĝis.

– Vi venenis min! – li siblis mortpala.

– Ho, mi malfeliĉa! Mi scias nenion. Ho ve, kial vi edzinigis min?!

La nematuruloj troviĝis en granda zorgo, kiam enpaŝis s-ino Tél, kaj gustuminte la manĝaĵon, ŝi divenis, ke ĝi estas tute ne veneno, sed anstataŭ vera salo la junedzino elprenis alunon el la kuireja ŝranko, kaj per ĝi „salis" la senhelpulineto la acidaĵsupon.

Ĉi tiu honto tuj disbabiliĝis en la vilaĝo, kaj ĝia sekvo estis, ke s-ino Tél devis esti dungita kiel kuiristino por kvardek forintoj en bankbiletoj, dek du ulnoj da tolo kaj paro da kap-riparitaj botoj ĉe Kandelfesto.

Tio sendube valorus la prezon, ĉar ŝi scipovis spici kaj bongustigi la pladojn – videblis, ke ŝi kuiris en sia knabinaĝo al la altestimata dekana moŝto –, se ŝi ne estus tiel ĉikanema kaj kruda! Apenaŭ ŝi varmiĝis en la domo, tuj ŝi prenis la kondukilojn en siajn manojn en ĉio, direktis laŭplaĉe la simplaanimajn gejunulojn.

Ili timis ŝin kiel fajron. Ŝi estis ekscitanto de klaĉoj kaj kvereloj. Ŝi disportis novaĵojn en la vilaĝo, kaj kiom ŝi forportis, tiom ŝi reportis.

Ĉiu ŝia novaĵo egalis akran dornon, aŭ se ne, ŝi transformis ĝin en dornon tiel lerte, ke kie ĝi pikis, tie ĝi penetris ĝissange.

La infanoj toleris ŝin dum tempo, ŝtele ili englitis la domon aŭ elglitis el la domo, por ke ŝi ne alparolu ilin, sed fine la mistraktado plenigis ĝiselflue ankaŭ iliajn senkulpajn korojn per amareco.

– Ho, se mia bona patrino estus ĉi tie! – suspiris Anjo ne unufoje.

– Kio do tiam okazus?

– Mi eldonus al ŝi la vojpakon. Ĉar mia patrino estas ja tre potenca virino, Joĉjo…

– Ej nu, kial tio ĝis nun ne enkapiĝis al ni. Sed prokrastita ne estas forĵetita. Ĉu vi kuraĝus fari tion?

– Ĉu mi? Ĉu mi mem? – lispis Anna retiriĝeme.

– Ĝuste vi. Io tia estas afero de virinoj.

– Ĉu de virinoj? Do bone. Morgaŭ mi maldungos ŝin.

Ŝi ne maldungis ŝin, tute ne. Eĉ, ĉar s-ino Tél rimarkis, ke ili kovas ion kontraŭ ŝi, ŝi fariĝis eĉ pli kverelema: homoj, bestoj ne povis resti en paco pro ŝi. Ŝi nomis sian mastron laktosuĉulo, sian etan mastrinon minacis per bato.

– Ĉu vi tamen ne forpelis ŝin?! – diris Joĉjo riproĉe. – Jen vi vidas, jen vi vidas la sekvon…

Anjeto ree ekploris, falis sur la kolon de Joĉjo, kaj ferminte la okulojn, milde ŝi flustris:

– Ne postulu tion de mi, Joĉjo! Mi ne kuraĝas… mi ne povas fari tion. Vi estas la viro en la domo…

– Mi ankaŭ montros tion! – interrompis ŝin Joĉjo memfiere.

Sed ankaŭ li restis ĉe la nuraj vortoj. Tiel longe li prokrastadis de morgaŭ al postmorgaŭ, ĝis foje enkapiĝis al li kiel savilo la patrino de Anjo.

– Iru por ŝi, mia anĝeleto! Ŝi sendos al ni servistinon.

– Kiel vi imagas? Unutaga vojo en ĉi tiu akra frosto!

– Nenio malbona trafos vin, mi varmige envolvos vin. Morgaŭ vi ambaŭ jam estos hejme.

– Bone, mi ne kontraŭas, sed ni pendigos la tintilojn sur la ĉevalojn.

– Jen kio mankis! Mi ne donas miajn tintilojn, por ke ili eluziĝu.

– Kaj mi ne veturos sen la tintiloj! – spitis Anjo. – Prefere restu s-ino Tél; ŝi estas ja bona virino... ni danku Dion, ke ŝi estas ĉe ni.

Sed kio estas kolero tiafoje, se ne nubofloko?

Eĉ pluvon ĝi ne akuŝis, tiel rapide ĝi forpasis.

Anjo forveturis por sia patrino, kaj sekvatage, kiel estis dirite, ĉirkaŭ vespero la tintila sledo enveturis la korton de la familio Csillom.

La junedzino desaltis unua kaj enkuris al sia edzo:

– Ho ve, mi alveturigis ŝin! Ni forkuru malproksimen! Ni rapidu en la ĝardenon, ĉar tuj ŝi komencos...

Pli ĝuste, ŝi jam komencis. Apenaŭ ŝi malvolvis sin el la granda pelto, jam sur la sledo ŝi eklanĉis siajn fulmojn:

– Ej nu! Kie estas tiu persono? Lasu min vidi tiun venenan aspidon! Tuj mi montros al ŝi la vojon eksteren! Hej, s-ino Tél, maljuna s-ino Tél! Elŝovu vian nazon!

La infanoj interpremiĝis en la ĝardeno malantaŭ prujnobrila ribujo; iliaj vangoj intertuŝiĝis, kaj ne la frosto pinĉis ilin, sed la timo, la ekscitiĝo farbis ilin ruĝaj. Ilia spiro interrompiĝis, iliaj koroj laŭte batadis.

– Ĉu vi aŭdas? Ve, ĉu vi aŭdas? – flustris Anna. – Dio mia, Dio mia, se nur feliĉe finiĝus ĉi tiu terura tago!

Kie malaperis Magda Gál?

La homoj en Bodok ne multe povas fanfaroni per sia acidakvo! Se oni kutimiĝas al dolĉakvo, oni do trinkas dolĉakvon kaj ne deziras trinki acidan. Akvo estas akvo! Vane ili starigis la statuon de la limgarda Sankta Vendelino malantaŭ la fonto, ili havis kun ĝi pli da komplikaĵoj ol plezuroj.

Prave, la akvo estas tre forta, paserojn, hirundojn, se ili ne alte traflugas super ĝi, paralizas, sufokas tiel, ke mortintaj ili faladas el la aero. Ĝi fariĝis tombejo por multaj etaj birdoj. Ja kial pasas malalte tiu, kiu naskiĝis por alto?!

Kaj ne laste menciindas, ke kiam la slovakoj el Brezina en grandaj grupoj preteriris ĝin, marŝante por draŝado, unu el ili, kiu soifiĝis, ĉerpis el ĝi per sia vastranda ĉapelo kaj trinkis grandan buŝplenon.

– Homoj! – li diris miregante. – Vino, min trafu la fulmo de la Sinjoro, se ĝi ne estas vino.

Ili gustumis ĝin unuj post aliaj. Kompreneble, ĝi estas vino, nur tre baptita.

Avide ili alĵetis sin, kaj kredante, ke ili trovis abundan vinfonton, la slovakoj ebriiĝis kaj aranĝis tiel frenezan dancadon, kantadon ĉirkaŭ la puto, ke la tuta Bodok kunariĝis por primiri.

Tamen englitis ankaŭ „eraro" pro ĉi tiu puto. Kiam homoj el Majornok iniciatis tiun limkorektan proceson kontraŭ la Bodok'anoj, kaj gajnis la suprajn herbokampojn tiel, ke ankaŭ la puto forproprietiĝis al ilia kamparo, la advokato enkalkulis ankaŭ la acidakvon en la ĝisnunan fruktuzon, kiu dum ĝia uzado tra dudek sep jaroj signifis po unu forinton ĉiutage por la sanstato de ĉiu Bodok'ano, pro kio ĉi tiu damaĝo repagendis en unu ronda sumo al la Majornok'anoj.

Nu, se la respektinda prefektujo tiel juĝas la aferon, ne nur la tuta kamparo perdiĝos post la puto, sed ankaŭ iliaj haroj ne plu restos iliaj propraj.

La herbokampojn ili jam ne bedaŭris, ili helpis ankaŭ al Sankta Vendelino tiamaniere, ke ĉiziginte sub ĝi la surskribon: *Starigita ĉi tiu Sanktulo koste de la komunumo Bodok, kaj kvankam nun ĝi troviĝas en la kamparo de Majornok kune kun la kapelo kaj ĉio, Li tamen superrigardas la kamparon de Bodok*, tamen pro la puto, tio estas pro la nove starigita postulo estiĝis granda teruro en la vilaĝo.

Mi ne scias, kiel ĉio ĉi estus finiĝinta, se ili ne reprudentiĝus kaj ne dungus ankaŭ ili advokaton, kiu regajnis en proceso la malnovan kamparon.

Kvankam la danĝero foriris sur ĉi tiu vojo, la diablo ankoraŭ havis padon por si.

Ĉar estu honoro por ĉiu knabina harbendo, se ĝi estas brila, sed vane oni plibeligus, plibriligus la fakton, se ĝi estas fakto, nome ke junulinoj de Bodok neniam povas iĝi aliaj ol Bodok'aj junedzinoj. Fraŭloj el aliaj vilaĝoj eĉ hazarde ne trafas ĉi tien por svatiĝi, eĉ homo el Bodok, se li havas la eblon, alkondukas por si edzinon el fremda komunumo.

La moroj de la jupulinoj estas ĉi tie nome tiel fragila kiel susuranta kano: ĝia krono fleksiĝadas, ĝia radiko perdiĝas en la marĉo. Kaj ankaŭ ties kaŭzo estas, mi ne lacas aserti, tiu puto.

La knabinoj aliras kun siaj koloraj kruĉoj, kaj fraŭloj atendas ilin tie. Tiu acidakva puto estas la kaŭzo de multaj dolĉaj rendevuoj, multaj amaraj pentoj.

Pimpe vestitaj en freŝamelitaj jupoj, ŝvelbruste, petoleme, kun sagoj en la okuloj ili paŝadas kiel pavoj. Al la diabloj apartenas tiuj, kiuj iradas unu-du jarojn ĉi tiun vojon.

Inter ili, por ne mencii Klára Vér, Judit Péri, sufiĉas mencii la kazon de la milda Magda Gál. Ĉar la afero okazis ja ne tiel, kiel s-ino Gál, ŝia patrino kredas kaj rakontas... Tia maljunulino jam havas ŝtupetaron el sia koro al sia menso!

Kiom ajn ruĝiĝema, hontema estis Magda, ja ankoraŭ infano, devis okazi miraklo, ke foje ŝi ekdeziris vizitadi la puton.

Ĝi okazis, kiam tiuj ĉevalkomercistoj kantonmentis en la vilaĝo kaj trinkadis la postmarĉandajn glasojn en la drinkejo. La plej kokema inter ili, iu Gyuri Sás elokulumadis tra la fenestro, kelkfoje stariĝis antaŭ la pordo kaj ekvidis la etan Magdi veni sur la vojo.

Li estis plaĉa junulo. Unufoje en ĉiu jaro li venis ĉi tien kaj aĉetis la plej bonajn ĉevalojn. Kelkfoje dek, alifoje eĉ okdek. Kaj el tio konkludeblis, ĉu tiujare la reĝoj faris militon aŭ ne.

La vidvino Tél rakontas, ke li tre pririgardis tiun nematuran infanon Magda Gál... Antaŭhieraŭ vespere ili interŝanĝis kelkajn vortojn, hieraŭ li jam pinĉetis ŝin. Prave, Magda frapis sur lian manon, sed hodiaŭ li jam kovris ĝin per kisoj, kaj ŝi ne frapis al li sur la buŝon.

Nu, sed la vortoj de s-ino Tél ne konsideriĝas seriozaj, aparte se temas pri Magda; ŝi ne estas tiel edukita, ne de tiu speco ŝi estas... ŝia patrino estas honesta virino, kiu tenas ŝin per mallongaj kondukiloj.

Tamen estis iom suspektinde, ke de kelka tempo tiel multa acidakvo konsumiĝis ĉe la domo. Krome en tiu tago Magda iris trifoje al la puto. Io puŝis ŝin foriri, ŝi ne havis trankvilon hejme, kio ajn trafis en ŝiajn manojn, tio havis misan sorton.

S-ino Gál fajreris de kolero.

– Jam denove vi kaptas por tiu kruĉo? Kien vi denove forkuras? Kion farendan vi havas ade-ree ĉe tiu puto? Mi volus scii, he!

Ekflamis la blanka vizaĝo de la eta Magda. Eĉ unu vorton ŝi ne povis eldiri por ĉio en la mondo.

– Demetu tuj tiun porfestan peltojakon! Ej, vi arbara lacerteto, kiel vi kuraĝas meti tiun silkotukon ĉirkaŭ la kolon? Ĉu ĝi servas por ĉiutagoj ĉe la infanoj de honestuloj? Deĵetu ĝin, tuj! Mi aĉetis ĝin nek por la supra vilaĝfino, nek por la malsupra. Sed mi aĉetis ĝin por en la domo de la Sinjoro, por dimanĉo. Por ke la Sinjoro havu sian sanktan plaĉon pri tiu silkotuko…

Magda ekploretis kaj timide, tremante demetis la vestopecojn.

– Kaj nun malaperu de antaŭ miaj okuloj! Sed mi atentigas vin, ne rompu tiun freŝnovan blankan kruĉon! Sinjoro, Dio mia, ĉi tiu estas jam la tria kruĉo depost Pasko. Se vi rompos ankaŭ ĉi tiun, neniam plu revenu hejmen! Ne aŭdacu reveni al mi, ĉar kiel veras, ke mi estas vidvino Gál, tiel vere estas, ke mi rompos ĉiujn viajn ostojn!

Ŝi malplektis la silkan rubandon el sia longa, nigra hararo, demetis ankaŭ la etajn, belajn botojn. Tiel, nudpieda ŝi foriris kiel kamposervistaj knabinoj. Ŝi pensis, ĉu entute iri por la akvo, tamen ŝi ekvojis. Ŝiaj piedoj, prefere mi diru: ŝia koro kontraŭvole portis ŝin al tiu malbenita puto.

Komencis krepuski. Jóska Csuri, la noktogardisto kaŭris ĉe la vilaĝfino antaŭ la sonorilstablo, li atendis nur, ke la bovinoj de la pastra moŝto alvenu kun la grego, ĉar de ilia alveno dependas la akurata prisonorado de la vespero en Bodok.

– Kien vi rapidas, eta Magda?

– Por akvo, oĉjo Jóska. Kiel vi fartas?

– Dankon, filineto! Nu, kiel mi neniam estu kaj ankoraŭ neniam estis. Mia plej granda malfeliĉo estas, ke mi perdis miajn patronojn, la ĉevalkomercistojn.

– Ĉu ili foriris? – balbutetis Magda interrompe. Kvankam ŝi antaŭsentis, ke ili foriros.

– Jen tie ili nun ekvojas, vidu! Mi riproĉas al ili nur, ke ili ne aĉetis mian ĉevalon… kvankam mi vendus ĝin malmultekoste.

– Kiun vian ĉevalon? – demandis Magda, sed la tero jam brulis sub ŝi.

– Nu, la mian, eta Magda... Tiun, sur kiu oni rajdas kun piedoj antaŭen, la ĉevalon de Sankta Miĥaelo, hehehe![33]

– Vi ĉiufoje priŝercas min, oĉjo Jóska! – alkriis la knabino kaj ekkuris sur la plej mallonga pretervojo, tra la draŝejo de la familio Csillom, sur la herbejon, al la „acida puto".

Kiam ŝi alvenis, eĉ unu animo ne videblis. Ŝi elprenis la belan blankan kruĉon el la ŝultrosako, ligis la sakoŝnuron sur ĝian anson kaj fingrofrapetis ĝin kun infana plezuro, poste, kiel kutime, soblasis ĝin kun atenta singardo.

La akvo ellasis vezikojn, ĝis la kruĉo pleniĝis, sed ŝi ne rimarkis, ke ĝi pleniĝis, ŝiaj okuloj fiksiĝis daŭre al la landvojo; la ĉevalkomercistoj devus jam preteriri tie!

Ĉu Gyuri Sás ekkonos ŝin de la vojo? Ho ve, se li ekkonos ŝin! Sed ho ve, se li ne ekkonos ŝin!

Li, jes ja, ekkonis ŝin. Ne vane li havis tiajn rondajn, ruzetajn okulojn, ke li ne povus ekvidi de malproksime inter mil knabinoj ĉi unusolan.

Li veturis sur la lasta ĉaro, li tuj haltigis ĝin kaj rapidis al la puto. Li venis ĝustatempe, por helpi meti la kruĉosakon sur la ŝultron de Magda. La manoj de la kompatinda Magda Gál tremis, neniel ŝi sukcesis bone ligi la sakoŝnurojn sur sia brusto. Ili estis ankaŭ ne bone fiksitaj sub la akseloj.

Gyuri Sás etendis la manon, reĝustigis ilin. Kaj se lia mano jam pasis tiel proksime, li brakumis ŝian belegan talion. Estus peko preterlasi tion.

– Ho ve, ne rompu mian kruĉon, atentu! Sen ĝi neniam plu mi irus hejmen.

– Ĝuste tion mi volus. Se neniam plu vi irus. Kaj ankaŭ ne iru, mi diras al vi. Venu kun mi, Magda!

– Ne parolu sensencaĵon... ĉar tuj mi forkuros!

– Mi kunprenos vin, se vi volas. Mi bone traktos, amos vin. Eĉ venton mi ne lasos blovi sur vin, kaj mi eĉ la lokon purblovos, kie mi sidigos vin.

La voĉo de la pasio kvazaŭ estus tempesta vento, ĝi mordis la viza-

[33] Ĉevalo de Sankta Miĥaelo: kadavroportilo.

ĝon de Magda Gál sangoruĝa.

– Ne!... Ne parolu tiel! Kaj ankaŭ ne malgajigu min!... Vi jam havas edzinon. La aliaj diris...

– Mi ĵuras, nur vin mi amas! Neniun alian tiel multe... Mi kunprenos vin... portos vin al loko, kie neniu konas nin. Tie ni vivos duope.

– Ne tentu min! Dio mia, ne forlasu min!

– Mi vidis, ankaŭ vi amas min, vane vi neus tion. Venu, nu, ne tremu, rapide sidiĝu sur la ĉaro, neniu vidos vin.

Sed jen... Kia ĝeno ĝuste nun! La grego venas renkonte. La tintilo sur la kolo de la bovino de la familio Gál eksonoras dolĉe, konate. Ĝuste pretere iras Riska kaj per siaj grandaj, mildaj okuloj ĝi afable rigardas al Magda, svingante sian faltoriĉan kolon.

– Jen vidu, Riska! Riska! Nia Riska vokas min hejmen!

Kaj perforte liberiginte sian manon, ŝi ekkuris post Riska hejmen.

Sed kiam post ĉirkaŭ cent paŝoj ŝi atingis la vilaĝrandan grenejon, jam ekster la danĝero, ŝi ne povis ne ĵeti ankoraŭfoje rigardon al la kompatinda Gyuri... nun jam lastafoje.

Kaj kiam ŝi subite returnis sin – Dio mia, Dio mizerikorda! – ŝi batis la kruĉon kontraŭ trabon, elstarantan el la grenejo. Ho ve, eble ĝi rompiĝis!

Ŝi ankoraŭ ne atentis tion, ŝi nur rigardis Gyuri, vidis nur Gyuri, sentis lian kison sur siaj liliovangoj. Ŝi sentis nenion alian, kvankam la akvo jam traŝprucis la ŝultrosakon, trahumidigis la korsaĵon, ekfluis sur ŝia jupo. La maldiketa lintolo gluiĝis al ŝia bela talio, elmontris ĝian veran formon, koloron...

...Gyuri ankoraŭ staris mediteme samloke ĉe la puto kaj manvokis al ŝi, ke ŝi revenu.

– Ej vi, ventokapa... vi rompis, filineto, la kruĉon – subite ekparolis oĉjo Csuri malantaŭ ŝia dorso. – Nu, via patrino ne ŝparos hejme siajn fulmojn kaj tondrojn!

La brava maljunulo ĝuste nun finis la sonorigon, kaj vidinte, ke Magda ektime kaptas al sia dorso kaj subite paliĝas, lia koro ekkompatis ŝin.

– Nu, timu nenion! Mi antaŭeniros kaj repacigos vian patrinon, ĉar

mi konas, kiel granda hejma drako ŝi estas. Restu ĉi tie por tempeto!

Magda haltis, apogis sin al tiu elstaranta, akrapinta trabo, rompinta la kruĉon, kaj fikse, kun vualitaj okuloj ŝi gapis, eble en la nenion, eble al la acidakva puto.

La vespera krepusko malrapide sinkis sur la domojn kaj herbojn. Tiuj unue cedis al ĝi siajn kolorojn, poste ankaŭ siajn formojn.

Eble Magda ne vidis, kiel tiu homo venas de la puto ĉiam pli proksimen. Eble, se ŝi rimarkus, ŝi ne ĝisatendus lin tie, sed ne estas maleble ankaŭ, ke ŝi rigardis kaj atendis ĝuste lin.

La krepusko iĝis tamen ĉiam pli bruna. Ĝi kovris, envolvis ankaŭ Magda. Kaj neniam plu ĝi disiĝis ĉirkaŭ ŝi. Ankaŭ nun ĝi kovras ŝin. Senspure ŝi malaperis, nek famo, nek novaĵo venis pri ŝi. Neniu vidis ŝin, neniu plu parolis kun ŝi…

Ŝia kompatinda patrino priploras ŝin de jaroj kaj konsumas sin tra sendormaj noktoj, asertante, ke ŝi estas la kaŭzo, ŝi povus scii, kiom la minaco perturbas la koron de tiu milda, senkulpa infano. Pro mizera kruĉo ŝi ne kuraĝis hejmenveni, kaŝvagas en la mondo. Kiu aŭdis pri io simila? Hej, tiu kruĉo, tiu kruĉo!

La homoj ne malĝojigas ŝin pli, ne kontraŭdiras al ŝi.

Kvankam povas esti, ke ne nur la kruĉo rompiĝis… kaj ja ne tiu estis malforta.

Nu, tiuj en Bodok ne devus fanfaroni per tiu puto. Estus pli bone ŝtopi, tretebenigi ĝin… Pro tio, ke birdoj flugis malalte, ĝi fariĝis tombejo por multaj el ili… kaj multe pli malbona ol tombejo por multaj knabinoj de Bodok.

&

Enhavo

Slovakaj kunfratoj

Kelkaj klarigaj notoj 3
La fraŭlino el oro 5
Enkonduko 5
Unua ĉapitro 7
Dua ĉapitro 13
Tria ĉapitro 20
Kvara ĉapitro 30
Epilogo 33
Makulo tre nigra 36
Lapaj, la fama sakŝalmisto 60
Pereo de la bando Jasztrab 84

La bonaj palocoj

La iama ŝafido 95
Ŝuldo de Anna Bede 101
Pri la belaj haroj de la Péri-knabinoj 104
La etaj botoj 107
Vidvineco de Sofinjo Tímár 111
Tiu pagana Filcsik 114
La miraklo en Bágy 122
La bonŝanco de Paŭĉjo Szűcs 126
Sinjorino Galanda 130
Sankta Maria de Gózon 137
Romano de la du kampobienoj 141
La „jupo de la reĝino” 145
La ĉevaloj de la kompatinda János Gélyi 152
La infanoj 156
Kie malaperis Magda Gál? 159

Kálmán Mikszáth (1847-1910): devenas el bonstata, klera familio. Li ĉesigis siajn jurajn studojn kaj eklaboris ĉe ĵurnaloj. Pli malfrue li alprenis ankaŭ politikan agadon kiel deputito. Lia anekdotema, samtempe kritika, ofte satira stilo baldaŭ popularigis lin. Devenante el Altlando (nun Slovakio), li bone konis kaj kun amo pentris la vivon de la tieaj homoj.
Ambaŭ novelaroj devenas el lia frua verkista periodo. Ili alportis al li konatecon kaj famon. Kun profunda kunsento, kelkfoje kun komprenema ironio, en perfekte cizalitaj noveloj li revivigas la ĉiutagan vivon, gajan kaj tragikan flankojn de *palocoj* kaj altlandaj slovakoj.

* * *

La paloca popolo estas superstiĉa, ŝatas misterojn, kredas je diablo kaj premvizioj. Se super paloco flugas nigra korvo: tio egalas faton. Li deĉifras la futuron el la susurado de ĝiaj flugiloj. Mistera, malklara nebulo ĉirkaŭas lin, kaj kien liaj okuloj ne atingas, li popoligas tiun lokon per fantomoj, teruraĵoj kaj mirindaĵoj. Falintajn pecojn de fantaziaj popolfabeloj li knedas en bulon, kaj ĝi cementiĝas kredo en lia animo.
Ankaŭ mi mem ensuĉis ĉi tiujn superstiĉojn per lulfabeloj kaj kredas ilin veraj. La lumo de spertoj nur grizigis la nigran fonon, sed ne malaperigis ĝin, tial mi memoras lin, la kompatindan Patyus, neniam li eliros el mia kapo.

Sinjoroj, se la diabloj en la infero foje ekhavus la ideon, konstrui urbon, ĝi estus sendube tia, kia Selmecbánya.
Pardonu min la tiea meritplena magistrato pri ĉi tiu mallaŭdo; ĝi celas esti nek ofendo, nek moko, precipe rilate al la loĝantoj tie, kiuj ja neniel kulpas, ke iliaj prapatroj konstruadis sur tiel kaprica loko. Afabla leganto, kiu ankoraŭ ne veturis en tiu kurbplena lando, imagu al vi tri mil montopintojn, samtiom da valoj, dek-kelkajn rokojn, dense trakonstruitajn per domoj de ĉiaj formoj, la antaŭaĵo de kiuj estas ofte trietaĝa, dum ilia postaĵo modeste gluiĝas al montoflanko.
Se vi iras tra ĉi tiu urbo, pavimita de la naturo, via koro ĝiselflue pleniĝas de humanismaj sentoj kaj kortuŝite vi suspiras: „Ĉu eĉ ĉi tie loĝas homoj?!”